


LA DORMANTO
VEKIGAS

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY, Ltd.
LONDON



Eliri Rusujon

Eliri la teatro

La malfacilajoj tute ne estas solvitaj;
 de nur estas forŝovitaj al tiu regularo
 Tiu figureto staris alte supra trans
 la spaco apud la supro de uno el
 la festonoj

Troviĝis homoj trankvilaj manĝi

LA DORMANTO VEKIGAS

Mi devas fidi min al vi

Pur nekanta suprena kliniĝo

Jenova stupetaro staris

Li kondukis ^{lia} de la Ĉefo

Monoplano falis preskaŭ kun rando
 antaŭe kaj antaŭo malsupre

moviĝantaj punktoj kiiĝis

glutiĝis de nebulo 131

malsarĝi al si 50

DU LEGINDAJ LIBROJ

LUNO DE IZRAEL

De la mondkonata aŭtoro

SIR H. RIDER HAGGARD.

TRADUKITA DE E. S. PAYSON KAJ M. C. BUTLER.
Broŝurita, 3ŝ. 6p.; tole bindita, 5ŝ.; afranko, 4p.

Pri la Origino de l'Homo

DE

PROF. SIR ARTHUR KEITH, F.R.S.

TRADUKITA DE

PROF. W. BROWN, M.Sc., KAJ F. R. A. McCORMICK.
Broŝurita, 1ŝ. 9p.; bindita, 2ŝ. 6p.; afranko, 2p.

ELDONITA DE

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY, LTD.

Haveblaj ĉe

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC.),

142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

Kaj ĉiu Esperantista libro-vendisto.

ATENTU!

KIU LERNAS ESPERANTON,

tiu bezonas gazeton interesan, literaturan, bonstilan,
kun artikoloj kaj romanoj, seriozaj kaj amuzaj:

KIU LERNAS ANGLAN LINGVON,

tiu bezonas tekstojn malkarajn, pri aktualaĵoj:

KIU PROPAGANDAS ESPERANTON,

tiu bezonas bonaspektan, bele presitan gazeton, kun
lastatempa informo pri la Movado, kiu pruvos la
seriozecon de nia afero. Resume:—

ĈIU BEZONAS

INTERNATIONAL LANGUAGE

Monata gazeto en angla kaj esperanta lingvoj.

Jarabono 2ŝ 6p. (3 frankoj svisaj)

Petu provekzempleron ĉe "I.L. (L),"

142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1,
ANGLUJO.

DC 16 5603
R14205473/16
J710612016

LA DORMANTO VEKIGAS

ROMANO DE
H. G. WELLS

EL LA ANGLA LINGVO TRADUKITA DE
A. FRANK MILWARD


894.5412
W481d

1929:
THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY, LTD.
LONDON, W.C.1

UNIVERSIDADE DO CEARÁ
C. C. F. E.
BIBLIOTECA
N.º DE TOMBO 98/64 ✓

ENHAVO.

Ĉapitro	Pago
ANTAŬPAROLO - - - - -	ix
I. SENDORMECO - - - - -	1
II. LA TRANCO - - - - -	9
III. LA VEKIĜO - - - - -	15
IV. LA SONO DE TUMULTO - - - - -	19
V. LA MOVIĜANTAJ VOJOJ - - - - -	31
VI. LA HALO DE LA STATUO DE ATLAS - - - - -	35
VII. EN LA SILENTAJ ĈAMBROJ - - - - -	43
VIII. LA TEGMENTAJ SPACOJ - - - - -	53
IX. LA POPOLO MARŜAS - - - - -	65
X. LA BATALO EN LA MALLUMO - - - - -	71
XI. LA MALJUNULO, KIU SCIIS ĈION - - - - -	81
XII. OSTROG - - - - -	92
XIII. LA FINO DE LA MALNOVA REĜIMO - - - - -	105
XIV. DE LA ELRIGARDEJO - - - - -	109
XV. EMINENTAJ PERSONOJ - - - - -	115
XVI. LA MONOPLANO - - - - -	126
XVII. TRI TAGOJ - - - - -	136
XVIII. GRAHAM MEMORAS - - - - -	141
XIX. LA VIDPUNKTO DE OSTROG - - - - -	149
XX. SUR LA VOJOJ DE LA URBEGO - - - - -	156
XXI. LA SUBA PARTO - - - - -	175
XXII. LA BARAKTO EN LA KONSILEJO - - - - -	181
XXIII. GRAHAM DIRAS SIAN VORTON - - - - -	192
XXIV. DUM LA AEROPLANOJ ALPROKSIMIĜIS - - - - -	196
XXV. LA ALVENO DE LA AEROPLANOJ - - - - -	201



ANTAŬPAROLO.

INTER la listo de fruaj verkaĵoj de la aŭtoro H. G. Wells troviĝas rakonto pri mirinda "Tempomaŝino," per kiu oni kapabliĝis veturi tra la tempo, kvazaŭ tiu estus la spaco, kaj tiel atingi iun ajn punkton en la pasinteco aŭ la estonteco. Legante la nunan libron, oni ricevas impreson, ke oni spertas tian veturon, ĉar jen libro, kiu provas bildigi por ni la vivon en okcidenta Eŭropo post ducent jaroj; tamen multaj el la detaloj profetitaj en ĝi jam efektiviĝis dum la tridek jaroj, de kiam la aŭtoro verkis ĝin. Krome, el la multaj detaloj, kies plenumiĝo ankoraŭ apartenas al la estonteco, estas notinde, ke eĉ lastatempe profesora parolo raportis pri plano tegmenti spacojn de kvadrata duonmeĵlo sole per vitro kaj metalaj kadroj, por ŝirmi la enloĝantojn kaj ŝpari koston de apartaj tegmentoj.

Foje oni eĉ povas senti, ke la "estonta" vivo ĉi tie montrata jam estas efektive malnovmoda; ekzemple, la nuntempa disvastiĝo de brodkastado estas multe pli mirinda, ol la "Babilmaŝinoj," kies sola funkcio estis anstataŭi ĵurnalojn. Kaj jen troviĝas bazo por granda espero; ĉar, se ni jam laŭ kelkaj punktoj ne plenumis sed plibonigis la profetaĵon, ni povas esperi, ke ni poste evitos ankaŭ la plenumadon de la multaj malĝojigaj ideoj de la aŭtoro pri la posta evoluigo de la homaro.

Eĉ ŝajnas, ke oni rajtas kredi, ke la aŭtoro mem nun same opinias. Same kiel ĉiu serioza verkisto, li nepre laboras, almenaŭ parte, por la profito de siaj posteuloj, kaj jam de multaj jaroj H. G. Wells forlasis novelojn pri mirindaĵoj, kaj nun gajnas tutmondan famon eldonante

studojn pri la vivo socia kaj psikologia, kaj krome kelkajn historiojn de la mondo ; ĉiuj laŭ stilo, kiu interesos estontan generacion, nur se tiu havos kreskantan komprenon pri la problemoj de la homa familio.

Kuraĝa pensanto, Wells neniam timas diri senkaŝe sian penson. Eĉ en la noveloj de sia juneco, kiuj koncernis mirindajn aferojn preskaŭ similajn al tiuj de fabeloj, li sukcesis montri, ke la efektiva sekvo de tiaj okazaĵoj tre diferencus de la "feliĉa fino" de la infanaj rakontoj. Tiamaniere, atakante ofte akceptitajn opiniojn, kaj eĉ pli ofte akceptitajn sentimentojn, li restas vigla partiano de la vero, eĉ se ĝi eble estas malbongusta. Do, en la nuna libro, la leganto kredeble trovos ion, kion li volos ne kredi, eble eĉ detalojn, kiujn li konsideros absurdaj ; sed tamen li trovos nenion, kio ne estas la rezulto de profunda pensado kaj sperto.

A. FRANK MILWARD.

BIRMINGHAM,

ANGLUJO.

Marto, 1929.



LA DORMANTO VEKIĜAS

ĈAPITRO UNUA.

SENDORMECO.

UNU posttagmezon, je malalta maro, S-ro Isbister, juna artisto kiu loĝis ĉe Boscastle, promenis de tie al la pitoreska haveno Pentargen, dezirante ekzameni la tieajn kavernojn. Duone malsupreninte la deklivan vojeton al la Pentargena marbordo, li subite trovis viron sidantan laŭ pozo de ega suferado sub elstaranta rokamaso. La manoj de tiu viro restis malforte sur liaj genuoj, liaj okuloj estis ruĝaj kaj rigardegis antaŭen, kaj lia vizaĝo malsekiĝis de larmoj.

Li ekturnis la rigardon pro la piedsonoj de Isbister. Ambaŭ viroj embarasiĝis, Isbister pli ol la alia, kaj, por deturni sian embarason pri sia senvola halto, li diris, kvazaŭ de matura konvinkiĝo, ke la vetero estas varma laŭ la jarsezono.

“Tre varma,” respondis la fremdulo mallonge, hezitis unu sekundon, kaj aldiris per senkolora tono, “Mi ne povas dormi.”

Isbister haltis abrupte. “Ĉu ne?” estis lia sola respondo, sed lia sinteno montris lian helpeman impulson.

“Eble sonos nekredinde,” diris la fremdulo, turnante lacegajn okulojn al la vizaĝo de Isbister, kaj emfazante siajn vortojn per malvigla mano, “sed mi ne dormis—tute ne dormis dum ses noktoj.”

“Ĉu oni konsilis vin?”

“Jes. Plejparte malbone konsilis. Pri drogoj. Mia nerva sistemo. . . . Ili sufiĉe taŭgas por la plejmulto da personoj. Estas malfacile klarigi. Mi ne kuraĝas uzi . . . sufiĉe potencajn drogojn.”

“Tio malfaciligas la aferon,” diris Isbister.

Li staradis senpove sur la mallarĝa vojeto, nesciante kion fari. Evidente la viro volis interparoli. Ideo, sufiĉe natura laŭ la cirkonstancoj, instigis lin daŭrigi la konversacion. “Mi ne suferis mem pro sendormeco,” li diris per ordinara babila tono, “sed je la okazoj, kiujn mi jam renkontis, oni kutime trovis ion——”

“Mi ne kuraĝas eksperimenti.” Li parolis lacege. Li faris rifuzan geston, kaj dum iom da tempo ambaŭ silentis.

“Ĉu korpekzercado?” sugestis Isbister necerte, kun rigardo de la mizera vizaĝo de sia kunparolanto al la turisma kostumo, kiun li portis.

“Tion mi ĵus provis. Eble malsaĝe. Mi sekvis la marbordon, tagon post tago—de Newquay. Tio nur aldonis muskolan lacecon al la cerba. La kaŭzo de tiu senripozeco estis troa laboro—ĉagreno. Estis io——”

Li haltis kvazaŭ pro lacego. Li frotis la frunton per malgrasa mano. Li ekparolis ree kiel homo, kiu parolas al si mem.

“Mi estas soleca lupo, soleculo, vaganta tra mondo, kiun mi ne partoprenas. Mi estas senedzina—seninfana. Kiu nomas la seninfanajn homojn la mortintaj branĉetoj sur la vivarbo? Mi estas senedzina, seninfana—mi ne povis trovi devon por fari. Nek eĉ deziron en mia koro. Sed unu aferon fine mi devigis min fari.

“Mi diris, mi ja faros tion; kaj por fari ĝin, por venki la inertecon de mia malvigla korpo, mi ekuzis drogojn. Granda Dio, mi satas pri drogoj! Mi ne scias, ĉu vi sentas la pezan ĝenon de la korpo, ĝian agacan postulon de tempo kiu devus aparteni al la cerbo. Vivi! Ni vere vivas nur tiel malofte, kiel sunlumo en arbaro. Ni devas manĝi, kaj poste venas la banalaj digestaj kontentecoj—aŭ agacadoj. Ni devas promeni, aŭ alie niaj pensoj malrapidiĝas, stultiĝas, fluas en golfojn kaj senelirejojn. Milo da distraĵoj levas sin de interne kaj ekstere, kaj tiam sekvas laceco kaj dormo. La homo ŝajnas vivi por dormi. Kiel malmulte da ies tago estas vere propra al li—eĉ je la plej bonaj cirkonstancoj! Kaj poste venas tiuj falsaj amikoj, tiuj strangolistaj helpantoj, la alkaloidoj, kiuj sufokas naturan lacecon kaj mortigas ripozon—nigra kafo, kokaino——”

“Mi komprenas,” diris Isbister.

“ Mi faris mian laboron,” diris la sendormulo, per plendema tono.

“ Kaj ĉi tio estas la pago ? ”

“ Jes.”

Dum iom da tempo la du restis senvortaj.

“ Oni ne povas imagi la deziron por ripozo, kiun mi sentas—malsaton kaj soifon. Dum ses longaj tagoj, de kiam mi finis la laboron, mia cerbo estas akvokirilo rapida, neprogresanta kaj senĉesa, torento el pensoj kondukanta nenien, kirliĝanta rapide kaj regule—”

Li paŭzis. “ Al la abismo.”

“ Vi devas dormi,” diris Isbister decideme, kun mieno de iu, kiu eltrovas kuracilon. “ Certe vi devas dormi.”

“ Mia cerbo estas perfekte klara. Neniam ĝi estis pli klara. Sed mi scias, ke mi alproksimiĝas al la vortico. Baldaŭ—”

“ Jes ? ”

“ Vi jam vidis aĵojn subiri en kirliĝo ? For de la taglumo, for de ĉi tiu dolĉa mondo de cerbsaneco—suben—”

“ Sed—,” protestis Isbister.

La viro tendis manon al li, kaj liaj okuloj iĝis sovaĝaj kaj lia voĉo subite alta. “ Mi mortigos min. Se per neniu alia metodo—ĉe la piedo de tiu malhela krutaĵo, kie la ondoj verdas, kaj la blanka ŝaŭmo leviga kaj malleviga, kaj tiu eta fadeno el akvo tremas malsupren. Ĉiukaze—tie troviĝas . . . dormo.”

“ Tio estas neracia,” diris Isbister, surprizite de lia histeria ekblovo de emocio. “ Drogoj estus pli bonaj ol tio.”

“ Ĉiukaze—tie troviĝas dormo,” ripetis la fremdulo, ne atentante lin.

Isbister rigardis lin. “ Tio ne estas certa, vi komprenas,” li diris. “ Simila krutaĵo staras ĉe la Lulworth Haveno—almenaŭ egale alta—kaj knabineto falis de la supro ĝis la fundo. Kaj tamen vivas hodiaŭ—tute sana.”

“ Sed tiuj rokoj tie ? ”

“ Oni povus kuŝi sur ili iom malgaje tra malvarma nokto ; la rompitaĵoj ostoj knarus dum oni frostotremas, la malvarma akvo plaŭdus sur vin. Kio ? ”

Iliaj rigardoj renkontiĝis. “ Pardonu, ke mi renversas viajn idealojn,” aldiris Isbister, kun sento de nezorgema

brileco, “sed sinmortigo de sur tiu krutaĵo (aŭ eĉ iu ajn krutaĵo)—vere, kiel artisto—” Li ridis. “Ĝi estus diable malsperta.”

“Sed la alia afero,” diris la sendormulo, agacite, “la alia afero. Neniu povas resti cerbosana se nokton post nokto—”

“Ĉu vi promenis laŭ tiu marbordo sola?”—“Jes.”

“Malsaĝa afero por fari. Pardonu, ke mi tion diras. Sola! Kiel vi jam diris, la korpa laceco ne estas kuracilo por la cerba. Kiu konsilis tion al vi? Mi ne miras; promeni! Kun la sunbrilo sur la kapo, la varmeco, laceco, soleco dum la tuta tago; kaj poste, mi supozas, vi iras liten, kaj penegas—ĉu ne?”

Isbister abrupte haltis kaj rigardis dubeme la suferanton.

“Rigardu tiujn rokojn!” kriis la sidanta viro kun subite forta gesto. “Rigardu tiun maron, kiu brilas kaj tremetas tie de eterneco! Vidu la blankan ŝaŭmon, kiu rapidas en la mallumon sub tiu granda krutaĵo. Kaj tiun bluan arkaĵon, kun blindiga sunbrilo verŝata el ĝia kupolo. Ĝi estas via mondo. Vi akceptas ĝin, vi ĝojas pro ĝi. Ĝi varmigas kaj subtenas kaj plaĉas vin. Kaj por mi—”

Li turnis la kapon kaj montris mortecan vizaĝon, sangstriaajn palajn okulojn, kaj sensangajn lipojn. Li parolis preskaŭ flustre. “Tio estas la vestaĵo de mia mizero. La tuta mondo . . . estas la robo de mia mizero.”

Isbister rigardis la tutan sovaĝan belecon de la sunlumigitaj rokoj ĉirkaŭ ili, kaj ree tiun malesperan vizaĝon. Unu momenton li silentis.

Li eksaltis, sed faris geston de senpacienca rifuzo. “Vi dormu dum unu nokto,” li diris, “kaj vi ne vidos multe da mizero ĉi tie. Fidu al mi pri tio.”

Li nun sentis sin tute certa, ke tiu estas providenca renkonto. Nur duonhoron antaŭe li sentis sin terure enua. Jen estas okupo, kies nura pripensado kaŭzas virtan sinaplaŭdon. Li komencis tuj. La unua bezonaĵo de tiu eluzita viro estis kunulo. Li dejetis sin sur la tre deklivan herbaĵon apud la senmova sidanto kaj etendis komencan fadenon de babilado.

Lia aŭskultanto reprofundiĝis en apation; li rigardis malgaje maren, kaj respondis nur la rektajn demandojn

SENDORMECO

de Isbister— kaj ne ĉiun el tiuj. Sed li ne protestis pri la bonintenca entrudo en lian malesperon.

Li ŝajnis eĉ dankema, kaj kiam Isbister poste, sentante, ke sia nesubtenata parolado perdas la vigelecon, proponis ke ili resupreniru la deklivon kaj revenu al Boscastle, donante por kialo la perspektivon ĝis Blackapit, li sin submetis kviete. Duonvoje li komencis paroli al si mem, kaj abrupte turnis mortecan vizaĝon al sia helpanto. “Kio okazas?” li demandis, kun malgrasa klariga mano. “Kio okazas? Kirl', kirl', kirl', kirl'! Ĝi turniĝas kaj turniĝas, ĉirkaŭe kaj ĉirkaŭe por ĉiam!”

Li staradis kun rondiranta mano.

“Ne gravas, amiko,” diris Isbister, kun mieno de iu malnove konata. “Ne ĝenu vin. Fidu al mi.”

La viro mallevis la manon, kaj ree turniĝis. Ili iris trans la supron kaj al la promontoro preter Penally; la sendormulo gestis foje kaj ree, kaj diris fragmentajn frazojn pri sia kirliĝanta cerbo. Ĉe la promontoro ili staris apud la benko, kiu donas vidon al la mallumaj misteroj de Blackapit, kaj tiam li sidiĝis. Isbister reparolis kiam ajn la vojeto larĝiĝis sufiĉe por ke ili paŝu duope. Li faris priskribon pri la granda malfacileco eniri la havenon de Boscastle dum malbona vetero, kiam subite kaj tute senrilate lia kunulo lin interrompis denove.

“Mia kapo ne sentas la samon, kia antaŭe,” li diris, gestante pro manko de esprimaj frazoj. “Ne la samon, kia antaŭe. Mi sentas specon de subpremo, pezo. Ne— ne dormemo. Dio donu ke ĝi estu! Ĝi ŝajnas kvazaŭ ombro, profunda ombro, kiu falas rapide kaj subite super ion tre okupatan. Kirl', kirl', en la mallumon! La tumulto de pensado, la konfuziteco, la kirliĝo, kaj kirliĝo! Mi ne kapablas esprimi ĝin. Mi apenaŭ povas fiksi la pensojn al ĝi sufiĉe por diri al vi.”

Li haltis malvigle.

“Ne ĝenu vin, amiko,” diris Isbister. “Mi kredas kompreni. Almenaŭ ne multe gravas, ke vi ne diras ĝin nun al mi.”

La sendorma viro ŝovis la fingrajn artikojn al la okuloj kaj frotis ilin. Isbister denove parolis, dum la frotado daŭris, kaj poste nova ideo trafis lin. “Venu al mia

ĉambro," li sugestis, "kaj ni fumos. Mi ^{sciis} povus montri al vi skizojn de tiu Blackapit. Ĉu plaĉus al vi?"

La alia leviĝis obeeme kaj sekvis lin malsupren laŭ la deklivo.

Kelkfoje Isbister aŭdis lin faleti, dum ili malsupreniris, kaj liaj movoj estis malrapidaj kaj hezitemaj. "Eniru kun mi," diris Isbister, "kaj provu cigaredojn kaj la benitan donacon, alkoholon. Ĉu vi trinkas alkoholaĵojn?"

La fremdulo hezitis ĉe la pordeto de la ĝardeno. Li ŝajnis ne plu konscii pri siaj agoj. "Mi ne trinkas ilin," li diris malrapide, venante laŭ la aleo, kaj post momento ripetis distrite, "Ne, mi ne trinkas alkoholaĵojn. Ĝi ĉirkaŭiras. Kirl', ĝi iras—kirl'—"

Li faletis ĉe la ŝtupo kaj eniris la ĉambron kun la mieno de iu, kiu vidas nenion.

Tiam li sidiĝis peze en la brakseĝon, ŝajnis preskaŭ fali en ĝin. Li klinis sin antaŭen kun la frunto sur la manoj kaj senmoviĝis. Iom poste li faris malfortan sonon en sia gorgo.

Isbister moviĝis ĉirkaŭ la ĉambro, kun la embaraso de nesperta gastiganto, dirante aferetojn, kiuj apenaŭ postulis respondon. Li transiris la ĉambron al sia paperujo, metis ĝin sur la tablon, kaj rimarkis la horloĝon sur la kamenbreto.

"Mi ne scias, ĉu vi ŝatus vespermanĝi kun mi," li diris, kun nebruligita cigaredo en la mano—lia cerbo ĝenata de ideoj pri kaŝe donota dozo de kloralo. "Nur malvarma ŝafviando, kompreneble, sed tre dolĉa. Kimra. Kaj torto, mi kredas." Li-ripetis tion post momenta silento.

La sidanto ne respondis. Isbister haltis kun alumeto ĉe mano, rigardante lin. La silento longiĝis. La alumeto estingiĝis; li demetis la cigaredon nebruligita. La viro certe estis tre senmova. Isbister levis la paperujon, malfermis, demetis ĝin, hezitis. "Eble," li flustris, dubeme. Poste li ekrigardis la pordon kaj ree la viron. Tiam li ŝteliris piedpinte el la ĉambro, rigardante sian kunulon post ĉiu zorgema paŝo.

Li fermis la pordon senbrue. La domopordo staris malfermita, kaj li eliris preter la portikon, kaj staris kie la akonito troviĝis ĉe la angulo de la ĝardena bedo. De tie li povis vidi la fremdulon tra la malfermita fenestro,

senmova kaj malklara, sidanta kun kapo sur mano. Li ankoraŭ ne moviĝis.

Kelkaj infanoj irante laŭ la vojo haltis kaj rigardis la artiston scivole. Boatisto interŝanĝis saluton kun li. Li sentis, ke verŝajne lia singarda sinteno kaj pozicio aspektas strangaj kaj neklarigeblaj. La fumado, eble, ŝajnus pli natura. Li elprenis pipon kaj tabakujon el la poŝo, kaj plenigis la pipon malrapide.

“Mi scivolas,” . . . li diris, kun apenaŭ rimarkebla perdo de certeco. “Almenaŭ oni devas doni al li ŝancon.” Li frotis alumeton virmaniere kaj ekbruligis la pipon.

Li aŭdis la dommastrinon malantaŭ si ; ŝi venis kun lia lampo el la kuirejo. Li turniĝis gestante al ŝi per la pipo, kaj haltigis ŝin ĉe la pordo de la sidoĉambro. Nur malfacile li sukcesis flustre klarigi la aferon, ĉar ŝi ne sciis, ke li akceptas vizitanton. Ŝi reiris kun la lampo, ankoraŭ iom perpleksite, se oni povis juĝi laŭ ŝia mieno, kaj li rekomencis rigardi de la portika angulo, iom ruĝa kaj malpli trankvila.

Longe post kiam li elfumis la pipon, kaj kiam la vespertoj ĉirkaŭflugis, la scivolemo venkis liajn miksitajn hezitojn, kaj li ree ŝteliris en la malluman sidoĉambron. Li haltis ĉe la pordo. La fremdulo ankoraŭ sidis laŭ la sama pozo, nigra kontraŭ le fenestro. Krom la kantado de maristoj sur unu el la ardezoportantaj ŝipetoj en la haveno, la vespero estis tre silenta. Ekstere la spikoj de akonito kaj delfinio staris rektaj kaj senmovaj kontraŭ la ombro de la montflanko. Io ekbrilis en la cerbo de Isbister, li eksaltis, kaj, apogante sin sur la tablo, aŭskultis. Malplaĉa suspekto plifortiĝis ; fariĝis konvinko. Surprizo kaptis lin kaj fariĝis—timo.

Neniu sono de spiro aŭdiĝis ĉe la sidanta figuro !

Li ŝteliris malrapide kaj senbrue ĉirkaŭ la tablo, haltante dufoje por aŭskulti. Fine li povis meti la manon sur la dorsparto de la brakseĝo. Li klinis sin ĝis la du kapoj restis orelon ĉe orelo.

Tiam li klinis sin ankoraŭ pli malalten por rigardi la vizaĝon de sia vizitanto. Li eksaltis fortege kaj ekkriis. La okuloj estis malplenaj spacoj el blanko.

Li denove rigardis kaj vidis, ke ili estas malfermitaj kaj havas la pupilojn rulitajn sub la palpebrojn. Li sentis

sin tima. Li ekprenis la viron je la ŝultro kaj skuis lin. “Ĉu vi dormas?” li diris, dum lia voĉo tremis, kaj denove, “Ĉu vi dormas?”

Konvinko kaptis lian cerbon, ke la viro estas mortinta. Li iĝis agema kaj bruema, paŝis trans la ĉambron, fuŝirante kontraŭ la tablon dume, kaj sonigis la tintilon.

“Bonvolu alporti lampon tuj,” li diris en la koridoro. “Mia amiko iel malsanas.”

Li revenis al la senmova sidanto, ekprenis la ŝultron, skuis ĝin, kriegis. La ĉambro pleniĝis per flava brilo, kiam la dommastrino eniris kun la lampo. Lia vizaĝo estis pala kiam li turniĝis palpebrumante al ŝi. “Mi devas venigi kuraciston,” li diris. “Tio estas aŭ la morto, aŭ ia atako. Ĉu troviĝas kuracisto en la vilaĝo? Kie mi povas trovi kuraciston?”

ĈAPITRO DUA.

LA TRANCO.

LA stato de katalepsia rigideco, en kiun tiu viro falis, daŭris senprecedente longe, kaj poste li pasis malrapide al stato malfirma, al pozo malrigida, kiu sugestis profundan ripozon. Tiam oni povis fermi liajn okulojn.

Oni portis lin de la hotelo al la Boscastle-a kuracistejo, kaj de tie, post kelkaj semajnoj, al Londono. Sed li ankoraŭ kontraŭstaris ĉiun provon revivigi lin. Post iom da tempo, pro kialoj kiuj aperos poste, oni ĉesigis tiujn penojn. Dum longa tempospaco li kuŝis laŭ tiu straŭga stato, inerta kaj senmova—nek vivanta nek mortinta, sed kvazaŭ pendanta mezvoje inter nenieco kaj ekzistado. Lia mallumo ne estis rompita de ia radio de penso aŭ sento ; ĝi estis sensonĝa povomanko, vasta spaco de paco. La tumulto de lia cerbo antaŭe leviĝis kaj svelis ĝis abrupta klimakso de silento. Kie restis la homo ? Kie restas iu ajn homo, kiam la senkonscieco regas lin ?

“Ŝajnas nur hieraŭ,” diris Isbister. “Mi memoras ĉion kvazaŭ ĝi okazis nur hieraŭ—pli klare, eble, ol se ĝi estus okazinta hieraŭ.”

Tio estis la sama Isbister de la lasta ĉapitro, sed li ne plu estis junulo. La haroj, kiuj antaŭe estis brunaj kaj iomete troaj por la laŭmoda longeco, nun aspektis fergrizaj kaj mallonge tranĉitaj ; kaj la vizaĝo, kiu antaŭe estis roza kaj blanka, nun estis bruneta kaj ruĝa. Li portis pinthavan barbon parte grizan. Li parolis al maljunulo vestita per somera vestaĵo el dreliko (la somero de tiu jaro estis neordinare varma). Tiu estis Warming, londona notario, kaj la plej proksima parenco al Graham, la viro kiu entranciĝis. Kaj la du viroj staris flankon ĉe flanko en ĉambro en domo en Londono, rigardante lian kuŝantan korpon.

Ĝi estis flava figuro kuŝanta malrigide sur akvolito kaj vestita per larĝa ĉemizo ; figuro kun velkinta vizaĝo

kaj stoplosimila barbo, malgrasaj membroj kaj longaj ungoj, kaj ĉirkaŭ ĝi troviĝis ŝranko el maldika vitro. Tiu ĉi vitro ŝajnis forbari la dormanton de la realeco de la vivo ĉirkaŭ li—li estis io aparta, nenormalaĵo stranga, izolita. La du viroj staris apud la vitro spionante internen.

“La afero ŝokis min,” diris Isbister. “Mi sentas kvazaŭ strangan surprizon eĉ nun, kiam mi pensas pri liaj blankaj okuloj. Ili aspektis blankaj, vi komprenas, ruliĝintaj supren. Veni ĉi tien memorigas ĉion al mi.”

“Ĉu vi neniam vidis lin de tiam?” demandis Warming.

“Ofte mi volis veni,” diris Isbister, “sed la komerco nuntempe estas tro serioza afero por multe de libertempo. Mi restis en Ameriko dum la plej granda parto de la tempo.”

“Se mi ĝuste memoras,” diris Warming, “vi estis artisto.”

“Mi estis. Kaj tiam mi fariĝis edzo. Mi remarkis tre baldaŭ, ke la desegna metodo per nigro kaj blanko ne sukcesos, almenaŭ ĉe mezspertulo; kaj mi ekturnis min al la kolorprocedo. Tiuj afiŝoj sur la klifoj ĉe Dover estas de mia firmo.”

“Bonaj afiŝoj,” konfesis la notario, “kvankam mi bedaŭris vidi ilin tie.”

“Ili daŭros tiel longe kiel la klifoj mem, se necesas,” kriis Isbister kontente. “La mondo ŝanĝiĝas. Kiam li ekdormis, antaŭ dudek jaroj, mi estis en Boscastle kun akvarelujo kaj nobla, malnovmoda ambicio. Mi ne atendis, ke iam miaj koloriloj ornamu la tutan marbordon de Anglujo, de Land’s End rondire ĝis La Lizard denove. La bona sorto venas al homo tre ofte kiam li ne atendas ĝin.”

Warming ŝajnis dubi pri la kvalito de la sorto. “Je iometo mi ne renkontis vin, se mi ĝuste memoras.”

“Vi veturis returne en la kariolo, kiu portis min al la Camelford stacidomo. Estis proksime de la Jubileo, la Jubileo de l’ reĝino Viktorino, ĉar mi memoras la sidejojn kaj flagojn ĉe Westminster, kaj la kverelon kun la fiakristo ĉe Chelsea.”

“Tio estis la Diamanta* Jubileo,” diris Warming, “la dua.”

*Sesdekjara (—trad).

“Ha, jes! Je la vera Jubileo—la kvindekjara afero—mi estis ĉe Wookey—nur knabo. Mi maltrafis ĉion. . . . Kian klopodon ni faris pri li! Mia dommastrino ne volis ricevi lin, ne volis, ke li restu—li aspektis tiel stranga kiam li estis rigida. Ni devis porti lin en seĝo supren al la hotelo. Kaj la Boscastle-a kuracisto—ne la nuna, sed lia antaŭulo—klopodis pri li ĝis preskaŭ la dua horo, dum mi kaj la hotelestro tenis lumilojn kaj tiel plu.”

“Ĉu vi volas diri, ke li estis rigida kaj malmola?”

“Rigida! Kiam ajn oni fleksis lin li tiel restis. Oni ja povus starigi lin surkape kaj li restus. Mi neniam vidis tian rigidecon! Kompreneble tio ĉi”—li montris la kuŝantan korpon per kapmovo—“tute diferencas. Kaj la malgranda kuracisto—kiel li nomiĝis?”

“Ĉu Smithers?”

“Ĝuste Smithers—tute malpravus provante revivigi lin tro frue, laŭ ĉiuj rakontoj. Kiajn aferojn li faris! Eĉ nun tio igas min senti—uh. Mustardo, naztabako, pikado. Kaj unu el tiuj aĉaj aĵetoj—, ne dinamoj—”

“Galvanizilo.”

“Jes. Oni povis vidi liajn muskolojn pulsi kaj ŝveli, kaj li tordis sin ĉien. Estis nur du flagraj, flavaj kandeloj, kaj ĉiu ombro tremis, kaj la malgranda kuracisto timemis kaj afektis, kaj *li*—nuda kaj tordanta sin laŭ plej nenaturaj pozoj. Nu, tio igis min sonĝi.”—Paŭzo.

“Tiu estas stranga stato,” diris Warming.

“Ĝi estas speco de tuta foresto,” diris Isbister. “Jen la korpo, malplena. Tute ne mortinta, kaj tamen ne vivanta. Ĝi similas sidlokon vakan kaj markitan ‘rezervita.’ Neniu sento, neniu digestado, neniu batado de la koro—ne eĉ tremeto. *Tio* ne sentigas min ke viro ĉeestas. Laŭ iu senco ĝi estas pli morta ol la morto, ĉar la kuracistoj diras al mi, ke eĉ la haroj ĉesis kreski. Nu, ĉe vera mortinto la haroj daŭre kreskas—”

“Mi scias,” diris Warming kun eklumo de doloro je sia vizaĝesprimo.

Ili spionis, denove tra la vitro. Graham troviĝis certe je stranga stato, je la malrigida fazo de franco, sed franco senprecedenta dum la historio de l’ kuracarto. Francoj antaŭe daŭris eĉ tutan jaron, sed fine de tiu tempo ĉiam okazis vekigo aŭ morto; foje la unua antaŭe kaj la alia poste.

Isbister rimarkis la makulojn, kiujn la kuracistoj faris injektante nutraĵon, ĉar oni ekprovis tion por prokrasti kolapson; li montris ilin al Warming, kiu jam antaŭe penis ne vidi ilin.

“Kaj dum li kuŝis tie ĉi,” diris Isbister, kun la ĝuega tono pro vivo libere pasigita, “mi ŝanĝis miajn planojn pri la vivo; edziĝis, edukis familion. Mia plej aĝa knabo—mi tiam eĉ ne komencis pensi pri filoj—estas amerikano kaj atendas forlasi Harvardon. Troviĝas griza nuanco ĉe miaj haroj. Tamen ĉi tiu viro (efektive) estas ne unu tagon pli aĝa aŭ pli saĝa, ol mi dum miaj junecotagoj. Estas strange pripensi tion.”

Warming turniĝis. “Kaj mi ankaŭ maljuniĝis. Mi ludis kriketon kun li dum mi ankoraŭ estis nur knabo. Kaj li ankoraŭ aspektas kvazaŭ junulo. Flava eble. Sed tiu ja estas junulo malgraŭ tio.”

“Kaj la milito okazis,” diris Isbister.

“De komenco ĝis fino.”

“Mi sciigis,” diris Isbister post paŭzo, “ke li posedis moderan propran havaĵon?”

“Estas vere,” diris Warming. Li tuis seke. “Lauhazarde—mi administras ĝin.”

“Ha!” pensis Isbister, hezitis kaj parolis. “Sendube—lia nutraĵo ĉi tie ne estas kosta—sendube tiu pliboniĝas—amasiĝas?”

“Vere. Li vekigis multe pli riĉa—se li vekigis—ol kiam li ekdormis.”

“Kiel komercisto,” diris Isbister, “tiu penso nature enrestis mian cerbon. Efektive mi foje pensis, ke, laŭ komerca vidpunkto, kompreneble, tiu dormo povas esti bona afero por li. Ke li saĝe agas, se konvenas tiel diri, restante senkonscia tiel longe. Se li daŭre vivis—”

“Mi dubas, ĉu li antaŭintencis tion,” diris Warming. “Li ne estis longvida viro. Efektive—”

“Kio?”

“Ni malkonsentis pri tiu punkto. Mi havis kun li rilaton iom kuratoran. Vi kredeble vidis jam sufiĉe pri aferoj por scii ke foje ia malagordo—. Sed eĉ tiukaze ekzistas dubo, ĉu li iam vekigis. Tiu ĉi dormo eluzas malrapide—sed ĝi ja eluzas. Ŝajne li glitas malrapide,

tre malrapide kaj tede, malsupren de longa deklivo, se vi komprenas min ?”

“Bedaŭrinde, ke oni perdos lian surprizon. Okazis multe da ŝanĝo dum la dudek jaroj. Tiu estus Rip Van Winkle realigita.”

“Okazis multe da ŝanĝo, vere,” diris Warming, “kaj, inter aliaj ŝanĝoj, mi mem ŝanĝiĝis. Mi estas maljunulo.”

Isbister hezitis, kaj poste ŝajnis tro malfruan surprizon. “Mi ne tion kredus.”

“Mi estis kvardekkvinjara, kiam lia bankiero—vi memoras, ke vi telegrafis al lia bankiero—sendis al mi.”

“Mi trovis la adreson per la ĉeklibro en lia poŝo,” diris Isbister.

“Nu, la adicio ne estas malfacila,” diris Warming.

Okazis alia paŭzo, kaj tiam Isbister cedis al la neevitebla scivolo. “Li eble restos tiel ankoraŭ dum jaroj,” li diris, kaj spertis momentan heziton. “Necesas konsideri tion. Liaj aferoj, vi komprenas, povas veni iam al la manoj de—iu alia, vi komprenas.”

“Tio, se vi kredos min, S-ro Isbister, estas unu el la problemoj plej konstante antaŭ mia atento. Okazas, ke ni estas—efektive ne ekzistas por ni iuj tre fidindaj parencoj. La pozicio estas groteska kaj senprecedenta.”

“Certe,” diris Isbister.

“Ŝajnas al mi, ke tiu estas afero por iu publika korporacio, ia preskaŭ senmorta kuratoro. Se vere li daŭre vivos—kiel kelkaj el la kuracistoj opinias. Efektive mi jam vizitis unu aŭ du eminentulojn pri ĝi. Sed ĝis nun oni ne faris ion.”

“Ne estus malbona ideo transdoni lin al iu publika korporacio—la Kuratoroj de la Brita Muzeo, aŭ la Reĝa Kolegio de Kuracistoj. Tio ŝajnus iom stranga, sed la tuta situacio estas stranga.”

“La malfacilo estas persvadi ilin akcepti lin.”

“Pro rutineco, mi supozas ?”

“Parte.”

Paŭzo. “La afero estas stranga, certe,” diris Isbister. “Kaj la malsimpla procentaĵo daŭre amasiĝas.”

“Vere,” konsentis Warming, “kaj nun, kiam la provizo da oro eluziĝas, ekzistas tendenco al . . . plivaloriĝo.”

“ Mi jam sentis tion,” diris Isbister kun grimaco, ” sed tio plibonigos aferojn por *li*.”

“ Se li vekigōs.”

“ Se li vekigōs,” eĥis Isbister. “ Ĉu vi remarkas la pinĉitan aspekton de lia nazo, kaj la maniero laŭ kiu liaj palpebroj kaviĝas? ”

Warming rigardis kaj pensis iomete. “ Mi dubas, ĉu li vekigōs,” li diris fine.

“ Mi neniam precize komprenis,” diris Isbister, “ kio okazigis tion. Li diris al mi ion pri troa studado. Ofte mi estis scivolema.”

“ Li estis viro kun multaj talentoj, sed nedaŭra, emociema. Li spertis gravajn familiajn ĉagrenojn, eksedzinigis sian edzinon, efektive, kaj por malŝarĝi sin pri tio, mi opinias, li komencis frenezan specon de politiko. Li estis fanatika Radikalulo—Socialisto—aŭ tipa Liberalulo, kiel ili kutimis nomi sin—de la superprogresna skolo. Energia, frivola, nedisciplinita. Troa laboro pri polemiko faris tion al li. Mi memoras la broŝuron kiun li verkis—kurioza produktaĵo. Freneza, kirliĝema afero. Ĝi enhavis kelkajn profetaĵojn. I j el ili jam estas frakasitaj, aliaj nun estas ĉi tagaj faktoj. Sed, plejparte, legi tian tezon igas rimarki, kiom la mondo estas plena de neatenditaj aferoj. Li trovos multon por lerni, multon por mallerni, kiam li vekigōs. Se iam okazos vekigō.”

“ Mi fordonus multon por esti tie,” diris Isbister, “ nur por aŭdi, kion li dirus pri ĉio.”

“ Kaj mi ankaŭ,” diris Warming. “ Jes, mi ankaŭ! ” kun la subita reveno al sinkomparto de maljunulo. “ Sed mi neniam vidos lin vekigi.”

Li staradis rigardante penseme la vakosajnan korpon. “ Li neniam vekigōs,” li diris fine. Li sopiris. “ Neniam li vekigōs denove.”

ĈAPITRO TRIA.

LA VEKIĜO.

SED Warming estis malprava pri tio. Vekiĝo ja alvenis.

Kia mirinde komplika afero estas tiu ŝajna unuaĵo—la memo! Kiu kapablas sekvi ĝian rekunmetiĝon, dum matenon post mateno oni vekigās; la fluon kaj reflumon, dum ĝiaj sennombraj faktoroj interplektiĝas, rekonstruiĝas; la malfortajn unuajn movojn de la animo; la kreskadon kaj sintezon de senkonscio al subkonscio, de subkonscio al vekiganta konscio, ĝis fine oni denove sin konas. Kaj same kiel okazas al la plimulto el ni post nokta dormo, tiel okazis al Graham je la fino de lia longega dormo. Malklara nebuleto el sento formiĝis, nebula malgajeco, kaj li sin trovis neprecize ie, kuŝanta, malforta, sed vivanta.

Lia pilgrimo al persona estado ŝajnis transpasi vastajn abismojn, kaj daŭri dum epokoj. Gigantaj sonĝoj, kiuj siatempe estis teruraj realaĵoj, postlasis malklare perpleksajn memorojn pri strangaj kreitaĵoj, strangaj pejzaĵoj, kvazaŭ de alia planedo. Venis ankaŭ klara impresio pri gravega interparolo, pri nomo—li ne sciis kiun nomon—nomo, kiu poste revenos; pri kurioza, longe forgesita sento ĉe vejno kaj muskolo, pri sento de vasta, senespera peno, la penego de homo kiu dronas en mallumo. Tiam sekvis panoramo el brilaj, nefiksitaj, kunfluemaj scenoj. . . .

Graham rimarkis, ke liaj okuloj estas malfermitaj kaj rigardas ion nefamiliaran.

Tio estis ia blankaĵo, la rando de io, kadro el ligno. Li movis iomete la kapon, sekvante la formon de tiu konturo. Ĝi daŭris supren ĝis preter la supro de liaj okuloj. Li provis pensi, kie li eble estas. Ĉu gravas, dum li sentas sin tiel mizera? La koloro de liaj pensoj estis malhela malgajeco. Li sentis la senforman mizeron de tiu, kiu vekigās proksime de la tagiĝa horo. Li spertis necertan senton pri flustroj kaj paŝoj kiuj rapide foriras.

Lia kapmovo kaŭzis percepton pri treega korpa malforteco. Li supozis, ke li kuŝas en la lito en la hotelo ĉe tiu loko en la valo—sed li ne povis memori tiun blankan randon. Nepre li jam dormis. Li membris nun, ke li deziris dormi. Li remembris la klifon kaj la akvofalon, kaj poste ion pri interparolo kun preterpasanto.

Dum kiom da tempo li dormadis? Kio estas tiu sono de bateto de piedoj? Kaj tiu leviĝo kaj malleviĝo, kvazaŭ la murmuro de ondoj sur ŝtonetoj? Li elstreĉis malviglan manon por preni la poŝhorloĝeton de sur la seĝo, kie li kutime metis ĝin, kaj tuŝis glatan malmolan surfacon, similan al vitro. Tio estis tiel neatendita, ke ĝi treege konsternis lin. Subite li ruliĝis, rigardegis dum momento, kaj baraktis al sida pozo. La peno estis neatendite malfacila, kaj lasis lin kapturita kaj malforta—kaj miranta.

Li frotis al si la okulojn. La enigmo pri lia ĉirkaŭaĵo estis konfuza, sed lia cerbo sentiĝis tute klara—videble lia dormo jam profitis lin. Li tute ne troviĝis en lito—laŭ sia propra kompreno pri la vorto—sed kuŝis nuda sur tre mola kaj cedema matraco, en trogo el malhela vitro. La matraco estis iom travidebla, kiun fakton li observis kun sento de nesekureco, kaj sub ĝi spegulo reflektis lin grize. Ĉirkaŭ lia brako—kaj li vidis kun ŝoko, ke lia haŭto estas strange seka kaj flava—ligiĝis kurioza aparato el kaŭĉuko, tiel ruze ligita, ke ĝi ŝajnis pasi sub lian haŭton supre kaj malsupre. Kaj tiu lito estis metita en ŝranko el verdeta vitro (kiel ŝajnis al li); tio, kio unue altiris lian atenton, estis stango en la blanka kadro de tiu ŝranko. Je la angulo de la ŝranko staris tenujo kun brilaj kaj delikate faritaj iloj, aparatoj, plejparte tute nekonataj, kvankam maksimuma-minimuma termometro estis rekonebla.

La iomete verda koloro de la vitro-simila substanco, kiu ĉirkaŭis lin ĉiuflanke, malklarigis tion, kio troviĝis ekstere, sed li vidis, ke ĝi estas vasta ĉambro de belega aspekto, kaj kun granda kaj simpla blanka arkaĵo kontraŭ li. Apud la muroj de la kaĝo staris mebloj, tablo kovrita per arĝenteca tuko, arĝenteca simile al la flanko de fiŝo, paro da graciaj seĝoj, kaj sur la tablo nombro da pletoj kun substancoj sur ili, botelo kaj du glasoj. Li eksentis sin treege malsata.

Li ne povis vidi iun, kaj post hezita periodo li rampis de

la diafana matraco kaj provis stari sur la pura blanka planko de sia ĉambreto. Li tamen miskalkulis sian forton, ŝanceliĝis, kaj metis la manon antaŭ si kontraŭ la vitreca plato por firmigi sin. Dum momento ĝi rezistis lian manon, fleksiĝante eksteren kiel streĉita veziko, tiam ĝi rompiĝis kun eta krako kaj malaperis, kvazaŭ pikita bobelo. Li ŝanceliĝis en la ĝeneralan spacon de la halo, treege surprizite. Li ekprenis la tablon por sin savi, faligante unu el la glasoj al la planko—ĝi sonoris sed ne rompiĝis—kaj sidiĝis sur unu el la brakseĝoj.

Kiam li iom refortiĝis, li pleniĝis la restantan glason el la botelo kaj trinkis—ĝi estis senkolora fluidaĵo, sed ne akvo, kun plaĉa malforta aromo kaj gusto, kaj eco por tuja subteno kaj stimulado. Li demetis la glason kaj rigardis ĉirkaŭen.

La halo perdis neniom de sia grandeco kaj beleco nun, kiam la verdeta travideblaĵo, kiu antaŭe intervenis, estis for. Li vidis, ke la arkaĵo kondukas al ŝtuparo, iranta malsupren sen interveno de pordo al grandspaca, transversa koridoro. Tiu koridoro kondukis inter poluritaĵoj kolonoj el blankvejna, profunde marblua substanco, kaj laŭlonge de ĝi venis la sono de homaj moviĝoj, kaj voĉoj, kaj profunda senŝanĝa zuma tono. Li sidis, nun plene vekigiĝinta, aŭskultante atenteg, forgesante la nutraĵojn pro sia atento.

Tiam, kun ŝoko li memoris, ke li estas nuda, kaj rigardante ĉirkaŭen por kovraĵo, li vidis longan nigran robon, ĵetitan sur unu el la apudaj seĝoj. Li volvis tiun ĉirkaŭ sin kaj residiĝis, tremante.

Lia menso estis ankoraŭ ŝvelema perpleksiĝo. Videble li estis dorminta, kaj oni forportis lin dum la dormo. Sed kien? Kaj kiuj estas tiuj homoj, la malproksima amaso preter la malhele bluaj kolonoj? Boscastle? Li elverŝis kaj trinkis alian plenglason de la senkolora fluidaĵo.

Kio estas tiu loko?—tiu loko, kiu por liaj sentoj ŝajnis subtile tremeti kvazaŭ vivaĵo? Li rigardis ĉirkaŭen al la pura kaj belega formo de la halo, nemakulita de ia ornamaĵo, kaj vidis, ke la plafono estas fendita je unu loko per ronda tubego plena de lumo. Dum li rigardis, firma, svingiĝanta ombro mallumigis tion kaj forpasis, kaj venis denove kaj forpasis. "Bat', bat'," tiu svingiĝanta ombro havis

propran tonon inter la subigita tumulto, kiu plenigis la aeron.

Li volis kriegi, sed nur eta sono venis al lia gorgo. Tiam li stariĝis kaj, per la nefirmaj paŝoj de ebrulo, iris al la arkajo. Li ŝanceliĝis laŭ la ŝtupoj, faletis paŝante sur la rando de la nigra mantelo kiun li volvis ĉirkaŭ si, kaj savis sin ekprenante unu el la bluaj kolonoj.

La koridoro laŭiris malvarmetan perspektivon el bluo kaj purpuro, kaj finiĝis malproksime per kradobarita spaco, simila al balkono, brile lumigita kaj elstaranta en nebuletan spacon, spacon similan al la interno de giganta konstruaĵo. Pli malantaŭe kaj malproksime montriĝis vastaj kaj malprecizaj arkitekturaj formoj. La tumulto el voĉoj nun leviĝis laŭte kaj klare, kaj sur la balkono kun dorsoj turnitaj al li, ŝajne vigle interparolante, troviĝis tri personoj, riĉe vestitaj per larĝaj komfortaj roboj kun brilaj molaj koloroj. La bruo de granda amaso da homoj suprenfluis trans la balkonon, kaj unufoje ŝajnis, ke la supro de standardo preterpasis, kaj unufoje ia brilkolora aĵo, eble palblua ĉapo aŭ vestaĵo ĵetita en la aeron, ekbrilis trans la spacon kaj falis. La krioj sonis anglaj, venis ripetado de "Vekiĝos!" Li aŭdis malklaran krion, kaj abrupte la tri viroj ekridis.

"Ha, Ha, Ha!" ridis unu—ruĝharulo, kun mallonga purpura robo. "Kiam la Dormanto vekigis—*Kiam!*"

Li turnis la rigardon plenan de ridado laŭlonge de la koridoro. Lia vizaĝo ŝanĝiĝis, la tuta viro ŝanĝiĝis, rigidiĝis. La du aliaj rapide turniĝis pro lia ekkrio kaj staris senmovaj. Iliaj vizaĝoj prenis esprimon de konsterniĝo, esprimon, kiu profundigiĝis al timo.

Subite la genuoj de Graham fleksiĝis sub li, lia brako kontraŭ la kolono kolapsis malrigide, li ŝanceliĝis antaŭen, kaj falis sur la vizaĝon.



ĈAPITRO KVARA.

LA SONO DE TUMULTO.

LA lasta impresoj de Graham antaŭ ol li svenis rilatis la sonon de sonoriloj. Li sciigis poste, ke li restis senkonscia, pendante inter vivo kaj morto dum la plej granda parto de horo. Kiam li rekonsciigis, li trovis sin ree sur sia diafana lito, kaj sentis komencan varmecon ĉe koro kaj gorĝo. Oni jam forigis, li rimarkis, la malhelan aparaton de lia brako, kiu estas bandaĝita. La blanka kadro ankoraŭ ĉirkaŭis lin, sed la verdeta travidebla materialo, kiu antaŭe plenigis ĝin, nun estis tute for. Viro kun malhele violkolora robo, unu el tiuj, kiuj antaŭe staris sur la balkono, rigardis arde lian vizaĝon.

Malproksime sed insiste aŭdiĝis bruo de sonoriloj kaj konfuzitaj sonoj, kiu sugestis por lia menso la bildon de grandnombra amaso krianta kune. Io ŝajnis fali trans tiun tumulton, pordo subite fermita.

Graham movis la kapon. “Kion ĉio ĉi signifas?” li diris malrapide. “Kie mi estas?”

Li vidis la ruĝharulon kiu unue trovis lin. Voĉo ŝajnis demandi kion li diris, kaj abrupte silentiĝis.

La viole vestita viro respondis per mallaŭta voĉo, parolante angle laŭ iomete fremda maniero, aŭ almenaŭ tiel ŝajnis por la oreloj de la Dormanto. “Vi estas tute ekster danĝero. Oni portis vin ĉi tien de tie, kie vi ekdormis. Estas tute sendanĝere. Vi jam restis ĉi tie longan tempon—dormante. En tranco.”

Li aldonis ankoraŭ ion plu, kiun Graham ne povis aŭdi, kaj oni transdonis al li boteleton. Graham sentis malvarmetigan ŝprucon, aroma nebuleto flirtis momente sur lia frunto, kaj lia sento de refreŝiĝo pliiĝis. Li fermis la okulojn kontente.

“Ĉu pli sana?” demandis la viro, kiam Graham remalfermis la okulojn. Li estis plaĉe vizaĝa viro eble tridekjara, kun pinta flaveta barbo kaj ligilo el oro ĉe la kolo de sia violkolora robo.

“Jes,” diris Graham.

“Vi jam longe dormis. En katalepsia tranco. Vi jam scias? Katalepsio? Eble ŝajnos strange por vi unue, sed mi certigas vin, ke ĉio estas bona.”

Graham ne respondis, sed tiuj vortoj utilis por sia trankviliga celo. Liaj okuloj vagis de vizaĝo al vizaĝo de la tri personoj ĉirkaŭe. Ili rigardis lin strange. Li sciis, ke li devus troviĝi ie en Cornwall, sed li ne kapablis rilatigi tiujn aferojn kun tiu ideo.

Afero, kiu troviĝis en lia cerbo dum liaj lastaj maldormaj momentoj ĉe Boscastle revenis, afero decidita sed ial neatentita. Li tuse klarigis sian gorĝon.

“Ĉu oni telegrafis al mia kuzo?” li demandis. “E. Warming, 27, Chancery Lane?”

Ili ĉiuj aŭskultis kun streĉita atento. Sed li devis ripeti la diraĵon. “Kia kurioza malklareco je lia voĉtono!” flustris la ruĝharulo. “Telegrafis, mastro?” diris la junulo kun la flaveta barbo, evidente perpleksita.

“Li volas diri, sendi elektran telegramon,” klarigis la tria, plaĉe vizaĝa junulo dek-naŭ-ĝis dudek-jara. La flavetbarbulo eligis komprenan krion. “Kiom mi estas stulta! Vi povas resti certa ke oni faros ĉion, mastro,” li diris al Graham. “Mi timas, ke estus malfacile—*telegrafi* al via kuzo. Li ne restas nun en Londono. Sed ne ĝenu vin ankoraŭ pri aranĝoj; vi dormis dum tre longa tempo, kaj la grava afero estas resaniĝi pro tio, mastro.” (Graham supozis ke la vorto estas “mastro,” kvankam la viro prononcis ĝin kvazaŭ “Majstro.”)

“Ha!” diris Graham, kaj silentiĝis.

Ĉio ŝajnis tre perpleksa, sed klare tiuj nefamiliare vestitaj personoj scias, kion ili faras. Tamen, ili estas kuriozaj, kaj la ĉambro estas kurioza. Ŝajnas, ke li troviĝas en iu nove starigita loko. Li sentis subitan suspektan eklumon! Ĉu tio eble estas publika ekspozicia halo! Se jes, li riproĉus al Warming forte. Sed ĝi apenaŭ posedas tian aspekton. Kaj en publika ekspozicia halo li ne sin trovus nuda.

Tiam subite li ekkomprenis, kio okazis. Ne venis ia perceptebla intertempo de suspekto, nek kreskado de lia scio. Abrupte li jam sciis, ke lia tranco daŭris tra longega tempo; kvazaŭ per procedo de penslegado li tradukis la miregon en la okuloj, kiuj atentis lian vizaĝon. Li rigardis ilin strange, plena de ega emocio. Ŝajnis, ke ili legis liajn okulojn. Li fiksas la lipojn por paroli, sed ne kapablis. Stranga impulso, ke li kaŝu sian scion, trafis lian menson preskaŭ sammomente kun lia eltrovo. Li rigardis siajn nudajn piedojn silente kaj daŭre. La impulso pri parolo forpasis. Li tremis treege.

Oni donis al li rozan fluidaĵon kun verdeta fluoresko kaj viandeca gusto, kaj la certeco pri lia revenanta forto kreskis.

“Tio—tio min sentigas pli sana,” li diris raŭke, kaj aŭdiĝis murmuroj de respektama aprobo. Li sciis nun tute klare. Li ree provis paroli, kaj denove ne kapablis. Li premis al si la gorgon, kaj provis la trian fojon. “Dum kiel longe?” li demandis per trankvila voĉo. “Kiel longe mi dormis?”

“Sufiĉe longan tempon,” respondis la flavetbarbulo, ekrigardante rapide la aliajn.

“Sed kiom?”

“Tre longan tempon.”

“Jes—jes,” diris Graham, subite ĝenata. “Sed mi volas—. Ĉu—ĉu—kelkaj jaroj? Multaj jaroj? Okazis io, mi forgesas kion. Mi sentas min—konfuzita. Sed vi—” Li spasme spiris. “Ne necesas, ke oni skermu kun mi. Kiel longe—?”

Li ĉesis, spirante neregule. Li premis la okulojn per la fingrartikojn kaj sidadis, atendante respondon.

Ili parolis flustre.

“Ĉu kvin aŭ ses?” li demandis malforte. “Pli?”

“Multe pli ol tio.”

“Pli!”

“Pli.”

Li rigardis ilin, kaj ŝajnis kvazaŭ diabletoj tordetas la muskolojn de lia vizaĝo. Li demandis nur per rigardo.

“Multajn jarojn,” diris la ruĝbarbulo.

Graham baraktis al sida pozo. Li forviŝis mizeran larmon de sia vizaĝo per maldika mano. “Multajn jarojn!”

li ripetis. Li fermis fikse la okulojn, malfermis ilin, kaj sidis, rigardante ĉirkaŭen de unu nefamiliara aĵo al alia.

“Kiom da jaroj?” li demandis.

“Vi devas pretiĝi por surprizo.”

“Nu?”

“Pli ol groso* da jaroj.”

Li incitiĝis pri la stranga vorto. “Pli ol *kio*?”

Du el ili parolis kune. Kelkajn rapidajn vortojn, kiujn oni diris pri “decimala,” li ne kaptis.

“Kiel longe vi diris?” demandis Graham. “Kiel longe? Ne rigardu tiamaniere. Diru al mi.”

Inter la diraĵoj subvoĉaj, lia orelo kaptis kvin vortojn: “Pli ol duo da jarcentoj.”

“Kio?” li kriis, turnante sin al la junulo, kiu, li kredis, estas parolinta. “Kiu diras—? Kio estis tio? Duo da jarcentoj!”

“Jes,” diris la ruĝbarbulo. “Ducent jaroj.”

Graham ripetis la vortojn. Li antaŭe sentis sin preta aŭdi pri longega ripozo, sed tamen tiuj konkretaj jarcentoj venkis lin.

“Ducent jaroj,” li rediris, dum la formo de vasta abismo malfermiĝis tre malrapide en lia menso; kaj poste, “Ho, sed—!”

Ili diris nenion.

“Vi—ĉu vi diris—?”

“Ducent jaroj. Du centoj da jaroj,” diris la ruĝbarbulo. Okazis paŭzo, Graham rigardis iliajn vizaĝojn kaj vidis, ke tio, kion li aŭdis, ja estas vera.

“Sed ne povas esti,” li diris plendeme. “Mi sonĝas, certe. Trancoj—trancoj ne daŭras. Tio ne estas ĝusta—tio estas ŝerco, kiun vi faras kontraŭ mi! Diru al mi—antaŭ kelkaj tagoj, eble, mi promenis laŭlonge la bordon de Cornwall—?” Lia voĉo velkis.

La flavetbarbulo hezitis. “Mi ne estas tre sperta pri la historio, sinjoro,” li respondis malforte, kaj rigardis la aliajn.

“Estis tie, sinjoro,” diris la junulo. “Boscastle, en la antikva duklando Cornwall—ĝi troviĝas en la sudorienta parto preter la kampoj de la laktejo. Domo restas tie ankoraŭ; mi jam vizitis ĝin.”

*Angla nombromezuro = 144 (dek-du dek-duoj)—trad.

“Boscastle!” Graham turnis la rigardon al la junulo. “Tio certe—Boscastle. Eta Boscastle. Mi ekdormis—apud tie. Mi ne ĝuste memoras.” Li premis al si la frunton kaj flustris, “Pli ol *ducent jaroj*!”

Li komencis paroli kun spasma vizaĝo, sed sentis la koron malvarma interne. “Sed se ja estas *ducent jaroj*, ĉiu, kiun mi konis, ĉiu homo, kiun mi iam vidis aŭ alparolis, antaŭ ol mi dormis, certe estas mortinta.”

Oni ne respondis al li.

“La Reĝino kaj la Reĝa Familio, ŝiaj Ministroj, la Eklezio kaj la Ŝtato. Altaj kaj malaltaj, riĉaj kaj malriĉaj, unu kun alia. . . . Ĉu Anglujo ankoraŭ ekzistas? . . . Tio estas konsolo! Ĉu ekzistas Londono? . . .”

“Ĉi tiu *estas* Londono, ĉu? Kaj vi estas mia subgardisto; subgardisto. Kaj tiuj ĉi—? Ĉu jes? Subgardistoj ankaŭ!”

Li sidadis kun mizera esprimo je la vizaĝo. “Sed kial mi troviĝas ĉi tie? Ne! Ne parolu. Silentu. Ke mi—”

Li restis silenta, frotis la okulojn, kaj malkovrante ilin trovis alian glaseton da rozeta fluidaĵo etendita al li. Li prenis la *dozon*. Tuj kiam li glutis ĝin li komencis plori nature kaj refreŝige.

Poste li rigardis iliajn vizaĝojn, subite ridis tra la larmoj, iom malsaĝe. “Sed—*du—cent—jar—oj!*” li diris. Li grimacis histerie kaj rekovris al si la vizaĝon.

Post iom de tempo li trankviliĝis. Li leviĝis, kun la manoj pendantaj sur la genuoj, preskaŭ precize je la sama pozo, laŭ kiu Isbister trovis lin sur la klifo ĉe Pentargen. Lia atento sin direktis al malklara estrema voĉo, al la piedpaŝoj de venanta persono. “Kion vi faras? Kial oni ne avertis min? Ĉu vi ne kapablis scii? Iu suferos pro tio. Oni devas ne maltrankviligi la viron. Ĉu la pordoj estas fermitaj? Ĉiuj pordoj? Oni devas teni lin tute trankvila. Oni devas ne diri al li. Ĉu oni jam diris ion al li?”

La flavetbarbulo diris ion neaŭdeblan, kaj Graham, rigardante preter lian ŝultron, vidis alproksimiĝi malaltan, grasan kaj diktrunkan senbarban viron, kun agleca nazo kaj peza kolo kaj mentono. Tre dense nigraj kaj iomete kliniĝaj brovoj, kiuj preskaŭ kuniĝis super lia nazo kaj

superpendis profunde grizajn okulojn, donis al lia vizaĝo esprimon kurioze timindan. Li malame rigardis Graham unu momenton, kaj tiam lia rigardo revenis al la flavetbarbulo. "Tiuĵ aliaĵ," li diris per voĉo treege incitita. "Estas pli bone, ke vi foriru."

"Foriru?" diris la ruĝbarbulo.

"Certe, foriru nun. Sed zorgu, ke la pordoj estu fermitaj malantaŭ vi."

La du viroj, kiujn li alparolis, turniĝis obeante, post unu nevolonta rigardo al Graham, kaj anstataŭ iri tra la arkaĵo, kiel li atendis, marŝis rekte al la muro de la halo kontraŭ la arkaĵo. Longa strio de tiu ŝajne solida muro suprenvolviĝis kun kraketo, pendis super la du forirantoj kaj refalis, kaj tuj Graham troviĝis sola kun la noveveninto kaj la flavetbarbulo kun la purpura robo.

Dum iom da tempo la dikulo tute ne atentis al Graham, sed daŭre aldemandis la alian—evidente sian subulon—pri ilia traktado al sia gardato. Li parolis klare, sed per frazoj nur parte kompreneblaj por Graham. La vekigo ŝajnis afero ne nur miriga, sed ankaŭ konsterna kaj ĝena al li. Li estis evidente profunde ekscitita.

"Vi devas ne konfuzi al li la cerbon, dirante aferojn al li," li ripetis foje kaj ree. "Vi devas ne konfuzi al li la cerbon."

Kiam liaj demandoj estis responditaj, li turniĝis rapide kaj rigardis la vekiginton kun dubesenca mieno.

"Ĉu vi sentas vin stranga?" li demandis.

"Tre stranga."

"La mondo, tiom, kiom vi vidas de ĝi, ŝajnas kurioza por vi?"

"Mi supozas, ke mi devas vivi en ĝi, eĉ se ĝi ŝajnas stranga."

"Mi supozas ke jes, nun."

"Unue, ĉu mi ne bezonas vestaĵojn?"

"Oni—" diris la dikulo kaj haltis, kaj la flavetbarbulo renkontis lian rigardon kaj foriris. "Vi baldaŭ havos vestaĵojn," diris la dikulo.

"Ĉu efektive veras, ke mi dormis ducent—?" demandis Graham.

"Oni diris tion al vi, ĉu? Fakte, ducent tri."

Graham akceptis nun la nedisputeblan fakton kun

levitaj brovoj kaj depremita buŝo. Li sidis silenta momente, kaj poste demandis, "Ĉu troviĝas muelilo aŭ dinamo apude?" Le ne atendis respondon. "Ĉio ŝanĝiĝis treege, mi supozas?" li diris.

"Kio estas tiu kriegado?" li demandis abrupte.

"Nenio," diris la dikulo senpacience. "Tio estas popolamaso. Vi komprenos pli bone poste—eble. Kiel vi diras, ĉio ŝanĝiĝis." Li parolis mallonge, kun la brovoj kuntiritaj, kaj ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ homo kiu penas decidi je dilemo. "Ĉiukaze, ni devas havigi por vi vestaĵojn kaj tiel plu. Pli bone, ke vi atendu ĉi tie ĝis oni alportos ilin. Neniu vin ĝenos. Vi bezonas raziĝi."

Graham frotis al si la mentonon.

La flavetbarbulo revenis al ili, turniĝis subite, aŭskultis dum momento, levis la brovojn je la pliaĝa viro, kaj forrapidis tra la arkaĵo ĝis la balkono. La tumulto de kriegado pli laŭtiĝis, kaj la dikulo turniĝis kaj aŭskultis ankaŭ. Li blasfemis subite subvoĉe, kaj turnis la rigardon al Graham kun neamika esprimo. Ĝi estis ondo el multaj voĉoj, kiuj levigis kaj mallevigis, kriegante kaj ŝirkriante, kaj unu fojon okazis sono kvazaŭ batado kaj akraj ekkrioj, kaj tiam krakado, kvazaŭ la brulado de sekaj branĉetoj. Graham streĉe aŭskultis por tiri ian apartan sonfadenon el la teksita tumulto.

Tiam li perceptis, foje kaj ree ripetita, certan frazon. Dum iom da tempo li dubis pri la oreloj. Sed certe tiuj estis la vortoj: "Montru al ni la Dormanton! Montru al ni la Dormanton!"

La dikulo kuris subite al la arkaĵo.

"Wild!" li kriis. "Kiel ili scias? Ĉu ili scias? Aŭ ĉu ili nur divenas?"

Eble okazis respondo.

"Mi ne povas veni," diris la dikulo; "Mi devas prizorgi lin. Sed krii de la balkono."

Venis neaŭdebla respondo.

"Diru, ke li ne vekigis. Diru ion ajn. Mi lasas tion al vi."

Li rekuris al Graham. "Vi devas havi vestaĵojn tuj," li diris. "Vi ne povas resti ĉi tie—kaj estas neeble—"

Li forrapidis, dum Graham vokis nerispondatajn demandojn post lin. Post momento li revenis.

“ Mi ne povas diri al vi, kio okazas. La afero estas tro malsimpla por klarigi. Post momento oni faros por vi vestaĵojn. Jes—post momento. Kaj tiam mi povos forkonduki vin de tie ĉi. Vi komprenos niajn ĝenaĵojn sufiĉe frue.”

“ Sed tiuj voĉoj. Ili kriis—? ”

“ Ion pri la Dormanto—tiu estas vi. Ili havas ian torditan ideon. Mi ne scias, kio ĝi estas. Mi scias nenion.”

Akresona tintilo ŝprucis subite trans la malklaran miksiĝon de malproksimaj bruoj, kaj tiu abruptulo saltis al malgranda ilaro ĉe la angulo de la ĉambro. Li aŭskultis momente, rigardante globon el kristalo, kapjesis kaj diris kelkajn neklarajn vortojn; tiam li paŝis al la muro tra kiu la du viroj antaŭe malaperis. Tio suprenvidiĝis denove kvazaŭ rulkurteno, kaj li staris atendente.

Graham levis la brakon kaj miris pri la forto, kiun la refortigiloj jam donis al li. Li movis unu kruron trans la flankon de la kuŝejo kaj poste la alian. Lia cerbo ne plu kirligis. Li povis apenaŭ kredi pri sia rapida resaniĝo. Li sidadis palpante siajn membrojn.

La flavetbarbulo reeniris de la arkaĵo, kaj dum li faris tion la kaĝo de lifto glitis malsupren antaŭ la dikulo, kaj aperis en ĝi malgrasa grizbarbulo, portanta rulon kaj vestita per malvasta kostumo malhele verda.

“ Tiu estas la tajloro,” diris la dikulo kun prezenta gesto. “ Neniam taŭgos, ke vi portu tiun nigraĵon. Mi ne povas kompreni, kiel ĝi venis ĉi tien. Sed mi sciigos. Mi certe sciigos. Estu kiel eble plej rapida,” li diris al la tajloro.

La verde vestita viro riverencis, kaj antaŭenirante, sidiĝis apud Graham sur la lito. Lia mieno estis trankvila, sed liaj okuloj estis plenaj de scivolo. “ Vi trovos, ke la modoj aliĝis, Majstro,” li diris. Li rigardis de sub la brovoj la dikulon.

Li malfermis la rulilon per rapida movo, kaj konfuziĝo el brilaj ŝtofoj fluis super liaj genuoj. “ Vi vivis, Majstro, dum periodo esence cilindra—la Viktorina periodo. Kun duonsfera tendenco ĉe ĉapeloj. Ĉiam cirkklaj kurboj. Nun—” Li ekeltiris etan ilon samgrandan kaj samaspektan kiel memstreĉa poŝhorloĝo, kirlis la tenilon, kaj jen—eta blanke vestita figuro aperis kvazaŭ per kinetoscopo sur la plataĵo, paŝante kaj turniĝante. La tajloro ekprenis

specimenon de blueblanka atlaso. "Tio estas mia koncepto pri la nuntempa traktado por vi," li diris.

La dikulo venis kaj staris apud la ŝultro de Graham.

"Ni disponas tre malmultan tempon," li diris.

"Fidu min," diris la tajloro. "Mia maŝino sekvas. Kion vi opinias pri tio?"

"Kio tio estas?" demandis la homo el la dek-naŭa jarcento.

"Je via epoko oni montris al vi modbilden," diris la tajloro, "sed tio estas nia moderna evoluajo. Rigardu." La eta figuro repetis siajn moviĝojn, sed malsimile vestita. "Aŭ tio ĉi?" kaj kun klapeto alia malgrandulo portante pli vastan tipon de robo marŝis sur la platon. La tajloro estis tre rapidmova, kaj ekrigardis dufoje al la lifto dum li faris tiujn agojn.

Ĝi rulsonis denove, kaj mallonghara anemia knabo kun trajtoj de ĥina tipo, vestite per kruda palblua kanvaso, aperis kune kun malsimpla maŝino, kiun li ŝovis senbrue sur radetoj en la ĉambron. Senprokraste la tajloro faligis la etan kinetoskopon, kaj invitis, ke Graham staru antaŭ la maŝino; li murmuris kelkajn ordonojn al la mallonghara knabo, kiu respondis per gorgaj tonoj kaj per vortoj kiujn Graham ne rekonis. La knabo tiam iris por fari nekompreneblan solparolon ĉe la angulo, kaj la tajloro eltiris nombbron da traboritaj brakoj, kiuj finiĝis per disketoj, eltirante ilin ĝis la diskoj kuŝis plate kontraŭ la korpo de Graham, unu ĉe ĉiu ŝultrosto, unu ĉe la kubutoj, unu ĉe la nuko, kaj tiel plu, tiel ke fine troviĝis, eble, kvardeko da ili sur lia korpo kaj membroj. Samtempe iu alia eniris la halon per la lifto, malantaŭ Graham. La tajloro ekfunkciigis mekanismon kiu kaŭzis mallaŭtan ritman movadon de partoj de la maŝino, kaj post alia minuto li suprenfrapis la brakojn kaj liberigis Grahamon. La tajloro resurmetis al li la nigran mantelon, kaj la flavetbarbulo donis al li glaseton da refreŝiga fluidaĵo. Graham vidis super la rando de la glaseto palvizaĝan junulon, kiu rigardis lin neordinare fikse.

La dikulo paŝadis ĉiam trans la ĉambron plendeme, kaj nun turniĝis kaj iris tra la arkaĵo al la balkono, de kiu la bruo de malproksima amaso ankoraŭ fluis per leviĝoj kaj malleviĝoj. La mallonghara knabo donis al la tajloro

rulaĵon de la blueta atlaso, kaj la du fiksitaĵoj al la mekanismo laŭ maniero memoriga pri paperrulo ĉe presmaŝino de la dek-naŭa jarcento. Tiam ili ŝovis la tuton sur ĝiaj facilaj senbrujaj radetoj trans la ĉambron al malproksima angulo, kie plektita kablo kurbiĝis iom gracie de la muro. Ili kunigis ion kaj la maŝino fariĝis energia kaj rapida.

“Kion tio faras?” demandis Graham, montrante per la malplena glaseto la klopodemajn virojn, kaj penante malatenti la rigardegon de la noveveninto. “Ĉu tio estas—ia forto—kondukata internen?”

“Jes,” respondis la flavetbarbulo.

“Kiu *tiu* estas?” Li indikis la arkaĵon malantaŭ si.

La purpure vestita viro karesis sian barbeton, hezitis, kaj respondis subvoĉe, “Li estas Howard, via ĉefa gardisto. Efektive, Majstro—estas iom malfacile klarigi. La Konsilantaro nomas gardiston kun subuloj. Tiu ĉi halo, ekster kelkaj reguloj, estis publika. Por ke la popolo kontentigu sin. Ni nun baris la pordojn la unuan fojon. Sed mi pensas, se ne malplaĉas al vi, ke mi lasos al li la klarigon.”

“Strange!” diris Graham. “Konsilantaro? Gardisto?” Tiam, turnante la dorson al la noveveninto, li demandis mallaŭte, “Kial tiu viro *rigardegas* min? Ĉu li estas hipnotisto?”

“Hipnotisto! Li estas kapilotomisto.”

“Kapilotomisto!”

“Jes, unu el la ĉefaj. Lia ĉiujara salajro estas sesdoz leonoj.”

Tio sonis kvazaŭ sensencaĵo. Graham ekkaptis la lastan frazon per ŝanceliĝema cerbo. “Sesdoz leonoj?” li diris.

“Ĉu vi ne kalkulis per leonoj? Mi supozas, ke ne. Vi uzis la antikvajn funtojn? Ili estas niaj monunuoj.”

“Sed kion vi ankaŭ diris—sesdoz?”

“Jes, Majstro, ses doznoj.* Kompreneble, eĉ tiuj malgrandaĵoj ŝanĝiĝis. Vi vivis en la tagoj de la decimala sistemo, la araba sistemo—dekoj kaj malgrandaĵoj centoj kaj miloj. Ni posedas nun dek-unu numeralojn. Ni uzas

*Angle: dozen=dek-duo.

simplajn ciferojn por dek kaj dek-unu, du ciferojn por dozno, kaj dozno da doznoj faras grosan, granda cento, vi komprenas, dek-du grosoj estas dozando, kaj dozando da dozandoj estas miriado. Tre simple? ”

“ Mi supozas, ke jes,” diris Graham. “ Sed tiu kap—kion vi diris? ”

La flavetbarbulo ekrigardis trans lian ŝultron,

“ Jen viaj vestaĵoj! ” li diris. Graham turniĝis rapide kaj vidis la tajloron, kiu staris ĉe lia flanko ridetante, kaj tenante evidente novajn vestaĵojn sur la brako. La mallonghara knabo, per unu fingro, ŝovis la malsimplan maŝinon al la lifto, en kiu li antaŭe venis. Graham rigardegis la finitan vestaron. “ Ĉu vi vere volas diri—! ”

“ Ĵus farita,” diris la tajloro. Li faligis la vestaĵojn ĉe la piedoj de Graham, paŝis al la lito sur kiu Graham lastatempe kuŝis, elĵetis la travideblan matracon, kaj suprenturnis la spegulon. Dum li faris tion, furioza tintilo vokis la dikulon al la angulo. La flavetbarbulo rapidis al li kaj poste elkuris tra la arkaĵo.

La tajloro helpis al Graham surmeti malhele purpuran kombinitan vestaĵon, samtempe ŝtrumpoj, vesto, kaj pantalonon, dum la dikulo revenis el la angulo por renkonti la flavetbarbulon, kiu revenis de la balkono. Ili komencis rapide paroli subvoĉe, ilia mieno tenis sendube maltrankvilan econ. Super la purpura subvestaĵo sekvis malsimpla vestaĵo blue blanka, kaj Graham vestiĝis ree laŭmode, kaj vidis sin, ankoraŭ flavpala, nerazita kaj vila, sed almenaŭ ne plu nuda, kaj, laŭ ia nedifineble senprecedenta maniero, gracia.

“ Mi devas min razi,” li diris rigardante sin en la spegulo.

“ Post momento,” diris Howard.

La persista rigardego ĉesis. La junulo fermis la okulojn, remalfermis ilin, kaj kun etendita malgrasa mano, alproksimiĝis al Graham. Tiam li haltis, malrapide gestante per la mano, kaj ĉirkaŭrigardis.

“ Seĝon,” diris Howard senpacience, kaj tuj la flavetbarbulo metis seĝon malantaŭ Graham. “ Bonvole sidiĝu,” diris Howard.

Graham hezitis, kaj en la alia mano de la sovaĝokula viro li vidis la brileton de ŝtalo.

“Ĉu vi ne komprenas, Majstro?” kriis la flavetbarbulo, rapide sed ĝentile. “Li intencas tondi al vi la harojn.”

“Ho!” kriis Graham komprenante. “Sed vi nomis lin—”

“Kapilotomisto—ĝuste! Li estas unu el la plej bonaj artistoj en la mondo.”

Graham abrupte sidiĝis. La flavetbarbulo malaperis. La kapilotomisto antaŭeniris, ekzamenis la orelojn de Graham kaj surrigardis lin, palpis lian kranion, kaj estus denove sidiĝinta por rigardi lin, krom pro la aŭdebla senpacienco de Howard. Tuj per rapidaj movoj kaj sinsekvo de lerte manipŭlitaj iloj li razis la mentonon de Graham, tondis liajn lipharojn, kaj frizis kaj aranĝis liajn harojn. Ĉion ĉi li faris senvorte, kun io kvazaŭ la ravita mieno de inspirita poeto. Kaj tuj kiam li finis oni donis al Graham paron da ŝuoj.

Subite laŭta voĉo kriis—ŝajnis, ke ĝi venas de maŝino en la angulo—, “Tuj—tuj. La popolo scias tra la tuta urbego. Oni ĉesas labori. Oni ĉesas labori. Ne atendu pro io, sed venu!”

Tiu krio ŝajnis treege maltrankviligi Howardon. Laŭ liaj gestoj Graham pensis, ke li hezitas inter du direktoj. Abrupte li iris al la angulo, kie staris la aparato ĉirkaŭ la kristala globeto. Dume la subtono de tumulta kriegado el la arkaĵo, kiu ankoraŭ daŭris la tutan tempon, ŝvelis ĝis sonego, muĝis kvazaŭ ĝi preterfluegas, kaj kvietiĝis ree kvazaŭ ĝi rapide foriras. Ĝi logis Graham post sin per nerezistebla altiro. Li ekrigardis la dikulon, kaj tiam obeis sian impulson. Per du paŝoj li malsupreniris la ŝtupojn kaj troviĝis en la koridoro, kaj per dudek li eliris sur la balkonon sur kiu la tri viroj antaŭe staris.

ĈAPITRO KVINA.

LA MOVIĜANTAJ VOJOJ.

LI iris al la kradbarilo de la balkono kaj rigardis supren. Surpriza ekkrio pri lia apero, kaj la movoj de amaso da homoj, venis el la granda spaco malsupre.

Lia unua impresio estis pri konsterna arkitekturo. La loko, en kiun li rigardis, estis perspektivo el titanaj konstruaĵoj, kurbiĝantaj grandioze ambaŭdirekten. Supre fortegaj kantileveroj kunkurbiĝis trans la vastan larĝon de la loko, kaj reto el diafana materialo kaŝis la ĉielon. Gigantaj globoj kun malvarmete blanka lumo hontigis la palajn sunradiojn, kiuj filtriĝis malsupren tra la traboj kaj dratoj. Tie kaj aliloke araneaĵeca pendponto, punktita de piedmarŝantoj, sin ŝetis trans la abismon, kaj la aero estis transretita de maldikaj kabloj. Ke krutega konstruaĵo pendas super li, li ekvidis, kiam li suprenrigardis, kaj la kontraŭa fasado estis griza kaj fendita de vastaj arkaĵoj, rondaj malfermaĵoj, balkonoj, murapogiloj, turetoj, miriadoj da grandaj fenestroj, kaj komplika sistemo de arkitektura reliefo. Trans tiuj legiĝis horizontale kaj oblikve surskriboj el nefamiliaraj literoj. Kelkloke apud la tegmento strange dikaj ŝnuregoj estis ligitaj, kaj kurbiĝis krute ĝis rondaj malfermaĵoj ĉe la kontraŭa flanko de la spaco. Ĝuste dum Graham rimarkis tiujn, malproksima figureto de palblue vestita viro kaptis lian atenton. Tiu figureto staris alte supre trans la spaco apud la supro de unu el la festonoj, klinante sin antaŭen de malgranda ŝtona breto kaj manipulante kelkajn preskaŭ nevideblajn ŝnuretojn kiuj pendis de la linio. Subite, kun flugfalo kiu levis la koron de Graham al lia buŝo, tiu viro rapidegis laŭ la kurbo kaj malaperis tra ronda truo kontraŭflanke de la vojo. Graham jam rigardis supren dum li eliris sur la balkonon, kaj unue tio, kion li vidis

supre kaj kontraŭe, kaptis lian atenton kaj elbaris ĉion alian. Tiam subite li rimarkis la straton! Tiu tute ne estis strato, laŭ la ideo de Graham pri tiaj aferoj, ĉar dum la deknaŭa jarcento la solaj vojoj kaj stratoj estis ebenaj strioj el senmova tero, kunpremitaj riveretoj da veturiloj inter mallarĝaj trotuaroj. Sed tiu vojo havis cent metrojn da larĝeco, kaj moviĝis; ĝi moviĝis tute, krom la meza, la plej malalta parto. Dum momento la movado konfuzis lian cerbon. Tiam li komprenis.

Sub la balkono tiu eksterordinara strato fluis rapide dekstren de Graham, senĉesa fluado rapidante kiel ekspresvagonaro de la deknaŭa jarcento, senfina rubandego el mallarĝaj transaj superkuŝantaj latoj, kun etaj interspacoj, kiuj lasis, ke ĝi sekvu la konturon de la strato. Sur ĝi staris seĝoj, kaj foje kajree etaj kioskoj, sed tiuj ĉi preterkuris tro rapide, tiel ke li ne vidis, kio troviĝas interne. De tiu plej apuda kaj rapida trotuaro serio da aliaj malsupreniris ĝis la mezo de la spaco. Ĉiuj moviĝis dekstren, ĉiu videble pli malrapida ol tiu supere, sed la diferenco de rapideco estis sufiĉe malgranda, ke oni povis paŝi de unu trotuaro al la apuda, kaj tiamaniere marŝi seninterrompe de la plej rapida ĝis la senmova meza vojo. Trans tiu meza vojo troviĝis simila serio da senfinaj trotuaroj rapidantaj maldekstren de Graham. Kaj sidante amase sur la du plej larĝaj kaj rapidaj trotuaroj, aŭ paŝante de unu al alia kvazaŭ sur ŝtuparo, aŭ ŝvarmante sur la meza spaco, iris nenombrebla kaj mirinde diversa amaso da homoj.

“Ne konvenas, ke vi restu ĉi tie,” kriis Howard subite, ĉe lia flanko. “Vi devas tuj forveni.”

Graham ne respondis. Li aŭdis kvazaŭ ne aŭdante. La vojoj iris kun muĝado, kaj la amaso kriegis. Li vidis virinojn kaj knabinojn kun fluantaj haroj, belege vestitajn, kun transaj strioj inter la mamoj. Tiuj aperis la unuaj el la konfuziĝo. Tiam li rimarkis, ke la ĉefa nuanco en tiu kalejdoskopo el kostumo estas la palbluo, kiun la knabo de la tajloro antaŭe portis. Li ekrimarkis kriojn—“La Dormanto! Kio okazis al la Dormanto?” kaj ŝajnis, kvazaŭ la zumantaj trotuaroj antaŭ li subite makuliĝis de la pala flaveto de homaj vizaĝoj, kaj poste eĉ pli dense. Li vidis montrantajn fingrojn. La senmova meza spaco de

tiu vastega arkajo kontraŭ la balkono estis preme plenigita de bluestitaj personoj. Iam barakto jam komenciĝis. Ŝajnis, ke oni puŝas homojn supren al la rapidantaj vojoj ĉiuflanke, kaj ke ili estas kontraŭvole forportataj. Ili desaltis, tuj kiam ili troviĝis for de la densa parto de la konfuziĝo, kaj rekuris al la barakto.

“Tio estas la Dormanto. Vere la Dormanto,” voĉoj kriis. “Tio ne povas esti la Dormanto,” kriis aliaj. Pli kaj pli da vizaĝoj sin turnis liadirekten. Kelkloke laŭlonge de tiu meza vojo Graham rimarkis malfermajojn, putojn, ŝajne la suprojn de ŝtuparoj, kiujn homoj supren- kaj malsupreniris. La barakto centriĝis ĉirkaŭ la plej proksima al li el tiuj. Homoj kuris malsupren trans la moviĝantaj vojoj, lerte saltante de ŝtupo al ŝtupo. La kunpremantoj sur la plej altaj trotuaroj ŝajnis dividi sian intereson inter tiu loko kaj la balkono. Aro da fortikaj homoj vestitaj per brile ruĝa uniformo, vigle laborante kune, sin okupis barante la vojon al tiu ŝtuparo. Ĉirkaŭ ili amaso rapide kolektiĝis. Ilia brila koloro kontrastis frape la blankbluon de iliaj kontraŭuloj, ĉar sendube okazas barakto.

Li vidis tion, dum Howard kriis ĉe lia orelo kaj svingis lian brakon. Kaj subite Howard malaperis, kaj li staris sola.

La krioj, “La Dormanto!” kreskis laŭte, kaj la homoj sur la plej apuda trotuaro stariĝis. Tiu trotuaro, li rimarkis, estas malplena dekstre de li, kaj malproksime trans la spaco la kontraŭen-iranta rubandego alvenas homplena kaj forpasas malplena. Nekredinde rapide vasta amaso jam kolektiĝis en la meza spaco antaŭ liaj okuloj; dense svingiĝanta amaso da homoj, kaj la kriegoj ŝvelis de necerta vokado ĝis vasta senĉesa bruego: “La Dormanto! La Dormanto!” kun ekkrioj kaj aklamoj, svingado de vestoj kaj krioj—“Ĉesigu la vojojn!” Ili kriis ankaŭ alian nomon nekonatan de Graham. Tiu sonis kvazaŭ “Ostrog.” La pli malrapidaj vojoj baldaŭ pleniĝis de agemaj homoj, kiuj kuris kontraŭ la movado por sin teni apud li.

“Ĉesigu la vojojn,” ili kriis. Viglaj figuroj kuris de la mezo supren al la rapida vojo proksime de li; ili portiĝis rapide preter li, kriante strangajn nekompreneblaĵojn, kaj rekuris oblikve ĝis la meza vojo. Unu dirajon li povis

distingi: "Tio estas vere la Dormanto. Tio estas vere la Dormanto," ili konstatis.

Dum iom da tempo Graham staradis senmova. Tiam li vive komprenis, ke ĉio ĉi rilatas lin. Li ĝojis pri sia mirinda populareco, li kliniĝis, kaj serĉante geston pli malproksime videblan, svingis la brakon. Li restis mirigita de la bruego, kiun tio ĉi instigis. La tumulto ĉirkaŭ la malsuprenirejo leviĝis ĝis furioza forto. Li rimarkis homplenajn balkonojn, virojn kiuj glitas laŭ ŝnuregoj, virojn sur seĝoj kvazaŭ trapezoj sin ĵetantajn trans la spacon. Li aŭdis voĉojn malantaŭ si, kie amaso da personoj malsupreniris la ŝtupojn tra la arkaĵo. Li subite rimarkis, ke lia gardisto Howard revenas kaj premas dolorige lian brakon, kaj krias neaŭdeble en lia orelo.

Li turniĝis, kaj la vizaĝo de Howard estis pala. "Revenu," li aŭdis. "Oni haltigos la vojojn. La tuta urbego konfuziĝos."

Multe da viroj aperis rapidante laŭ la koridoro el bluaj kolonoj malantaŭ Howard—la ruĝharulo, la flavetbarbulo, la altkreska viro cinabroruĝe vestita, amaso da aliaj kiuj portis bastonojn—kaj ĉiuj ĉi personoj aspektis maltrankvilaj kaj hastemaj.

"Forkonduku lin," krias Howard.

"Sed kial?" diris Graham. "Mi ne komprenas—"

"Vi devas forveni!" diris la ruĝvestita viro per firma tono. Liaj vizaĝo kaj okuloj ankaŭ aspektis firmaj. La rigardo de Graham iris de vizaĝo al vizaĝo, kaj li subite konsciiĝis pri tiu plej malagrabra gusto de la vivo, la perforto. Iu ekprenis lian brakon. . . .

Oni lin fortiris. Ŝajnis, kvazaŭ la tumulto subite duobliĝas, kvazaŭ la duono de la krioj, kiuj antaŭe envenis de la mirinda vojo, nun eksaltas en la koridorojn de la granda konstruaĵo post li. Mirante kaj konfuzite, sentante senpovan deziron rezisti, Graham sin trovis duone kondukata, duone ŝovata, laŭlonge de la koridoro el bluaj kolonoj, kaj subite li trovis sin sola kun Howard en lifto, kaj rapide iranta supren.

ĈAPITRO SESA.

LA HALO DE LA STATUO DE ATLAS.

DE la momento kiam la tajloro kliniĝis adiaŭante, ĝis la momento kiam Graham trovis sin en la lifto, pasis entute apenaŭ kvin minutoj. Ĝis nun la nebulo de lia longega intertempo de dormo superpendis lin. Ankoraŭ la komenca strangeco, ke li eĉ vivas je tiu malproksima periodo, pentris ĉion per miro, per sento de neracio, per io kvazaŭ la eco de realisma sonĝo. Li sentis sin ankoraŭ aparta, miranta rigardanto, ankoraŭ nur duone implikita en la vivo. Tio, kion li jus vidis, kaj precipe la lasta homplena tumulto, kadrita de la ekstero de la balkono, havis dramecan aspekton, same kiel io vidata de en teatra loĝio. “Mi ne komprenas,” li diris. “Kio ĝenas ilin? Mia cerbo kirligās. Kial ili kriegis? Kio estas la danĝero?”

“Ankaŭ ni havas ĝenaĵojn,” diris Howard. Liaj okuloj evitis la demandon de Graham. “Nun estas maltrankvila tempo. Kaj efektive, via apero, via nuntempa vekigo, havas ian rilaton—”

Li parolis spasme, kvazaŭ viro kiu ne tute fidas sian spiron. Li haltis abrupte.

“Mi ne komprenas,” diris Graham.

“Tio klariĝos pli poste,” diris Howard.

Li ekrigardis maltrankvile supren, kvazaŭ li trovis malrapida la progreson de la lifto.

“Mi komprenos pli bone, sendube, kiam mi iom ĉirkaŭrigardos,” diris Graham perpleksite. “Tio estos—nepre estos perpleksa. Nun ĉio ŝajnas tiel stranga. Io ajn ŝajnas ebla. Io ajn. Eĉ rilate detalojn. Via kalkulado, oni diras, estas diferenca.”

La lifto haltis, kaj ili elpaŝis en mallarĝan sed tre longan koridoron inter altaj muroj, laŭlonge de kiu iris eksterordinara nombro da tuboj kaj drategoj.

“Kiel granda ĉi tiu loko estas!” diris Graham. “Ĉu ĝi estas unu sola konstruaĵo? Kio ĝi estas?”

“Ĉi tiu estas unu el la urbaj vojoj por diversaj publikaj servoj. Lumo kaj tiel plu.”

“Ĉu tio estis socia maltrankvilo—tiu—sur la granda voja placo? Kiel vi estas regata? Ĉu vi ankoraŭ posedas policon?”

“Kelkajn,” diris Howard.

“Kelkajn?”

“Ĉirkaŭ dekkvar.”

“Mi ne komprenas.”

“Tre kredeble ne. Nia socio probable ŝajnos tre malsimpla por vi. Verdire, mi mem ne tre klare komprenas ĝin. Neniu komprenas ĝin. Vi, eble, komprenos—pli poste. Ni devas iri al la Konsilantaro.”

Graham dividis la atenton inter la urĝa neceseco de siaj demandoj, kaj la homoj en la haloj kaj koridoroj, kiujn ili laŭiris. Momente lia atento fiksiĝis al Howard, kaj la hezitaj respondoj, kiujn tiu faris, kaj tiam li perdis la sekvon pro iu viva neatendita impresio. En la koridoroj, en la haloj, la duono de la personoj ŝajnis porti la ruĝan uniformon. La palblua kanvaso, kiu antaŭe tiom abundis en la strato de moviĝantaj vojoj, ne aperis. Ĉiam tiuj viroj rigardis lin, kaj salutis lin kaj Howard, kiam ili pasis.

Li kaptis klaran vidon de longa koridoro, kaj tie kelkaj knabinoj sidis sur malaltaj seĝoj, kvazaŭ ĉe klaso. Li ne vidis instruiston, sed nur strangan aparaton, de kiu, ŝajne, voĉo venas. La knabinoj rigardis lin, li kredis, kun scivolemo kaj miro. Sed oni rapidigis lin for, antaŭ ol li povis klare bildigi al si la kunvenon. Li opiniis, ke ili konas Howardon, sed ne lin mem, kaj ke ili demandas sin, kiu li estas. Tiu Howard, laŭŝajne, estis grava persono. Sed tamen li estis nur la gardisto de Graham. Estis strange!

Poste sekvis koridoro kvazaŭ krepuska, kaj en tiun pendis trotuaro, tiel ke li vidis la piedojn kaj maleolojn de la personoj kiuj iris kaj reiris sur ĝi, sed neniun plian parton de ili. Tiam nebulaj impresoj pri galerioj kaj pri hazardaj mirigitaj preterpasantoj, kiuj turniĝis por rigardi la duon kun ilia ruĝvestita gvardio.

La stimulo de la refortigiloj, kiujn li trinkis, estis nur dumtempa. Li rapide laciĝis pro la troa rapidado. Li petis, ke Howard malpliigu la rapidecon. Baldaŭ li troviĝis en lifto, kiu posedis fenestron frontantan al la granda strata spaco, sed ĝi estis vitrita kaj ne malfermebla, kaj ili staris tiel altloke, ke li ne povis vidi la moviĝantajn vojojn sube. Sed li vidis homojn pasantajn tien kaj reen laŭ ŝnuregoj kaj sur strangaj, malfortaspektaj pontoj.

De tie ili transpasis la straton je granda alteco super ĝi. Ili transiris per mallarĝa ponto, fermita per vitro tiel klara, ke li kapturniĝis eĉ memorante ĝin. Ĝia planko ankaŭ estis el vitro. Laŭ lia memoro pri la klifoj inter New Quay kaj Boscastle, tiel malproksima laŭ tempo, sed tiel proksima laŭ lia sperto, ŝajnis al li, ke ili staras pli ol cent metrojn super la moviĝantaj vojoj. Li haltis, rigardis malsupren inter siaj kruroj sur la svarmantan bluan kaj ruĝan homamason, malgrandan kaj perspektivigitan, baraktantan kaj gestantan ankoraŭ al la eta balkono, kie li antaŭ tiel mallonge staris. Maldensa nebuleto kaj la brilego de la grandaj globoj el lumo malklarigis ĉion. Viro sidanta en malgranda reta duonkaĝo prerapidegis de loko eĉ pli alta ol la mallarĝa ponteto, malsuprenirante sur ŝnurego preskaŭ tiel rapide, kvazaŭ li falas. Graham nevole haltis por rigardi tiun strangan pasaĝeron malaperi suben, kaj tiam liaj okuloj reiris al la tumulto barakto.

Laŭlonge de unu el la pli rapidaj vojoj kuris aro da ruĝaj makuloj. Tiu ĉi rompiĝis en individuojn dum ĝi alproksimiĝis al la balkono, kaj iris fluante trans la pli malrapidajn vojojn al la densa baraktanta amaso sur la meza spaco. Tiuj ruĝvestitaj viroj ŝajnis esti armitaj per bastonoj; ili ŝajnis frapi kaj puŝbati. Granda kriado, koleraj kaj akraj krioj, elkreis kaj supreniris al Graham malforte kaj fadensimile. "Iru plu," kriis Howard, metante la manojn sur lin.

Alia viro rapidegis laŭ ŝnurego. Graham subite ekrigardis supren, por vidi, de kie li ĵus venis, kaj vidis tra la vitra tegmento kaj la reto el kabloj kaj traboj malklarajn aĵojn ritme pasantajn kiel la velojn de ventmueliloj, kaj inter ili kaptis ekvidojn al malproksima kaj pala ĉielo. Tiam Howard ŝovis lin antaŭen trans la ponton, kaj li sin trovis en mallarĝa koridoreto ornamita per geometriaj desegnaĵoj.

"Mi volas vidi pli da tio," kriis Graham kontraŭstarante.

"Ne, ne," kriis Howard ankoraŭ tenante lian brakon. "Jen la vojo. Vi devas iri laŭ tie." Kaj la ruĝvestitaj viroj kiuj sekvis ilin ŝajnis pretaj subteni liajn ordonojn.

Kelkaj negroj, portante kuriozan vesposimilan uniformon, aperis en la koridoreto, kaj unu rapide suprenŝovis glitantan

kovrilon, kiu ŝajnis al Graham kiel pordo, kaj kondukis ilin tra ĝi. Graham trovis sin en galerio, kiu superpendis la finon de grandega ĉambro. La nigre kaj flave vestita servisto transiris tion, suprenŝovis duan panelon, kaj staris atendante.

Tiu loko aspektis kvazaŭ antaŭĉambro. Li vidis kelke da homoj sur la meza spaco, kaj je la kontraŭa fino grandan imponan pordegon, supre de ŝtuparo. La pordo estis peze kurtenita, sed lasis ekvidon al ankoraŭ pli granda halo. Li rimarkis blankulojn ruĝe vestitajn, kaj aliajn negrojn vestitajn nigre kaj flave, kiuj staris rigide apud tiuj pordegoj.

Dum ili transiris la galerion, li aŭdis flustron de malsupre, "La Dormanto," kaj rimarkis turniĝadon de kapoj, kaj zumon de observado. Ili eniris alian koridoreton en la muro de tiu ĉi antaŭĉambro, kaj tiam trovis sin sur ferkradita metala galerio, kiu pasis ĉirkaŭ la flanko de la grandega halo, kiun li jam vidis tra la kurtenoj. Li eniris la lokon ĉe la angulo, tiel ke li ricevis la plej plenan impreson pri ĝiaj grandegaj proporcioj. La negro kun la vesposimila uniformo paŝis flanken, kiel bone dresita servisto, kaj fermis la panelon post si.

Kompare kun ĉiu loko, kiam Graham ĝis tiam vidis, tiu dua halo ŝajnis esti ornamita treege riĉe. Sur piedestalo ĉe la malproksima fino, kaj pli brile lumigata ol ĉio cetera, staris giganta blanka statuo de Atlas, forta kaj vigla, kun la terglobo sur liaj klinitaj ŝultroj. Tio estis la unua afero, kiu trafis lian atenton, ĉar ĝi estis tiel vasta, tiel pacience kaj dolorige reala, tiel blanka kaj simpla. Escepte tiun statuon kaj estradon ĉe la mezo, la vasta planko de la halo estis brila vakaĵo. La estrado staris malproksime en la vasto de la spaco; ĝi aspektus nura metalplato, se grupo el sep viroj ne starus ĉirkaŭ tablo sur ĝi, kaj tiel donus ideon pri ĝiaj veraj proporcioj. Ili ĉiuj portis blankajn robojn; ŝajnis, ke ili nur ĵus leviĝis el siaj seĝoj, kaj ili rigardis al Graham fikse. Ĉe la fino de la tablo li vidis la brileton de kelkaj mekanikaj aparatoj.

Howard kondukis lin laŭ la fina galerio, ĝis ili staris kontraŭ tiu fortega laboranta statuo. Tiam li haltis. La du ruĝvestitaj viroj, kiuj sekvis ilin en la galerion, venis por stari po unu ambaŭflanke de Graham.

"Vi devas resti ĉi tie," murmuris Howard, "kelkajn

minutojn," kaj, ne atendante respondon, li forrapidis laŭlonge la galerion.

"Sed *kial*—?" komenciĝis Graham.

Li moviĝis kvazaŭ por sekvi Howard, kaj trovis ke unu el la ruĝvestitaj viroj baras al li la vojon. "Vi devas atendi ĉi tie, Majstro," diris la ruĝvestita viro.

"*Kial*?"—"Pro ordono, Majstro."

"Kies ordono?"—"Ordonoj al ni, Majstro."

Graham montris sian incitiĝon per rigardo.

"Kiu loko tiu estas?" li demandis baldaŭ. "Kiu estas tiuj?"

"Ili estas la Anoj de la Konsilantaro, Majstro."

"Kiu Konsilantaro."—"La Konsilantaro."

"Ho!" difis Graham, kaj post egale neefika provo je la alia viro, iris al la kradbarilo kaj rigardis malproksime la blankvestitajn virojn, kiuj staris rigardante lin kaj frustrante kune.

La Konsilantaro? Li ekvidis, ke nun estas ok, kvankam li ne rimarkis, kiel la noveveninto alvenis. Ili ne faris salutajn gestojn; ili staris rigardante lin, same kiel dum la dek-naŭa jarcento aro da homoj eble starus sur la strato rigardante malproksiman balonon, kiu subite flotas antaŭ ilian rigardon. Kia konsilantaro tio estas, kolektiĝinta tie, tiu areto da viroj sub la signifa blanka Atlas, tute for de ĉiu subaŭskultanto en la impresa vasto? Kaj kial oni kondukas lin al ili, kaj kial ili rigardas lin strange kaj parolas neaŭdeble? Sube Howard aperis, paŝante rapide al ili trans la poluritan plankon. Kiam li alproksimiĝis, li riverencis kaj faris kuriozajn movojn, ŝajne de ceremonia speco. Tiam li supreniris la ŝtupojn de la estrado kaj staris apud la aparato ĉe la fino de la tablo.

Graham observis la videblan, neaŭdeblan kunparolon. Foje iu el la blankvestitaj viroj ekrigardis lin. Li vane streĉis la orelojn. La gestoj de du el la parolantoj vigliĝis. Li rigardis de ili al la pasivaj vizaĝoj de siaj gardistoj. Kiam li denove rigardis, Howard etendis la manojn kaj movis la kapon, kiel viro kiu protestas. Li estis interrompita, ŝajne, de unu el la konsilantoj, kiu frapis la tablon.

La kunparolo daŭris senfine longe laŭ la sentoj de Graham. Liaj okuloj leviĝis al la trankvila giganto, ĉe kies piedoj

sidis la Konsilantoj. De tie ili vagis al la muroj de la halo. Ĝi estis ornamita per longaj pentritaj paneloj de kvazaŭ-japana tipo, el kiuj multaj estis tre belaj. Tiuj paneloj grupiĝis en granda kaj malsimpla kadraĵo el malhela metalo, kiu ligiĝis ankaŭ kun la kariatidoj* de la galerioj kaj la grandaj strukturlinioj de la interno. La facila gracio de tiuj paneloj kontrastis la fortegan blankan figuron kiu laboris ĉe la centro de la skemo. La okuloj de Graham reiris al la Konsilantaro, kaj Howard ĵus mal-supreniris la ŝtupojn. Kiam li alproksimiĝis, oni povis distingi liajn trajtojn, kaj Graham vidis, ke li estas ruĝa kaj elblovas siajn vangojn. Lia vizaĝo estis ankoraŭ maltrankvila, kiam baldaŭ li reaperis sur la galerio.

“Laŭ tie,” li diris koncize, kaj ili silente iris plue al pordeto, kiu malfermiĝis je ilia alveno. La du ruĝvestitaj viroj haltis po unu ambaŭflanke de tiu pordo. Howard kun Graham enpasis, kaj, rigardante reen, Graham vidis la blankvestitajn Konsilantojn; ili ankoraŭ staris, preme grupigitaj kaj rigardantaj lin. Tiam la pordo refermiĝis kun peza bato, kaj la unuan fojon post sia vekigo li troviĝis en silento. Eĉ la planko estis silenta sub liaj piedoj.

Howard malfermis alian pordon, kaj ili sin trovis en la unua el du kunaj ĉambroj meblitaj blanke kaj verde. “Kiu Konsilantaro tio estis?” komencis Graham. “Kion ili diskutis? Kial ili koncernas min?” Howard fermis la pordon zorge, pezege sopiris, kaj diris ion subvoĉe. Li paŝis oblikve trans la ĉambrom kaj turniĝis, elblovante denove la vangojn. “Uĥ!” li grunitis, kiel homo malŝarĝigita.

Graham staradis, rigardante lin.

“Necesas, ke vi komprenu,” komencis Howard abrupte, evitante la okulojn de Graham, “ke nia socio estas tre komplika. Duona klarigo, simpla nemodifita konstato, donus al vi falsajn impresojn. Efektive—la kazo parte rilatas amasiĝan procenton—via malgranda riĉaĵo, kaj tiu de via kuzo Warming, kiun li testamentis al vi—kun iuj aliaj komencaĵoj—jam fariĝis tre konsiderindaj. Kaj

*Statuo kiu subtenas balkonon, arkaĵon, k.t.p. per la kapo (caryatide: en multaj lingvoj: de Greka *kara*=kapo).

laŭ aliaj manieroj, kiun vi malfacile komprenos, vi estas persono signifa—leĝe treege signifa—leĝe plivole ol praktike—implikita en la aferoj de la mondo.”

Li haltis.— “Jes?” diris Graham.

“Ni spertas gravajn sociajn ĝenojn.”—“Jes.”

“Aferoj jam tiom graviĝis, ke efektive estas konsilinde, ke oni izolu vin ĉi tie.”

“Malliberigu min!” kriis Graham.

“Nu—petu, ke vi restu izolite.”

Graham turniĝis al li. “Estas strange!” li diris.

“Oni ne dolorigos vin.”—“Ne dolorigos!”

“Sed vi devas resti ĉi tie—”

“Dum mi lernas pri mia situacio, mi supozas.”

“Precize.”—“Nu, bone, Komencu. Kial dolorigos?”

“Ne nun.”—“Kial ne?”

“Tio estas tro longa rakonto, Majstro.”

“Nur plua kaŭzo, ke mi komencu tuj. Vi diras, ke mi estas gravulo. Kio estis tiu kriado, kiun mi aŭdis? Kial vasta homamaso krias kaj ekscitiĝas pro tio, ke mia tranco finiĝis, kaj kiuj estas la blankvestitaj viroj en tiu grandega konsilejo?”

“Ĉio siatempe, Majstro,” diris Howard. “Sed ne krude, ne krude. Nun estas malsolida tempo, kiam neniu posedas firman opinion. Via vekigo—neniu atendis vian vekigon. La Konsilantaro konsideras ĝin.”

“Kiu Konsilantaro?”—“Tiu, kiun vi vidis.”

Graham faris koleretan geston. “Tio ne decas,” li diris. “Konvenas, ke oni diru al mi, kio okazas.”

“Vi devas atendi. Vere vi devas atendi.”

Graham sidiĝis abrupte. “Mi supozas, ĉar mi tiel longe atendis por reviviĝi,” li diris, “ke mi devas iom plu atendi.”

“Pli bone,” diris Howard, “Jes, multe pli bone. Kaj mi devas lasi vin sola. Dum iom da tempo. Dum mi ĉeestas la diskuton de la Konsilantoj . . . mi bedaŭras.”

Li iris al la senbrua pordo, hezitis, kaj malaperis.

Graham paŝis al la pordo, provis ĝin, trovis ĝin fikse ŝlosita per metodo, kiun li neniam poste komprenis, turniĝis, transpaŝis la ĉambrojn senripoze, iris tute ĉirkaŭ ĝi, kaj sidiĝis. Li restis sidanta kelkan tempon kun brakoj falditaj kaj brovoj kuntiritaj, mordante la ungojn kaj

penante kunmeti la kalejdoskopajn impresojn de tiu unua horo de maldorma vivo; la vastaj mekanikaj spacoj, la senfina serio da ĉambroj kaj koridoroj, la granda barakto kiu muĝis kaj fluegis tra tiuj strangaj vojoj, la grupeto de malproksimaj nesimpatiaj homoj sub la kolosa Atlas, la mistera konduto de Howard. Ideo pri vasta heredaĵo jam troviĝis en lia cerbo—vasta heredaĵo eble misuzita—pri ia senprecedenta gravaĵo kaj okazo. Kion li devas fari? Kaj la izola silento de tiu ĉambro estis elokventa pri mallibereco!

Eniris lian cerbon, nerezisteble konvinke, la ideo, ke tiu serio da grandiozaj impresoj estas nur sonĝo. Li provis fermi la okulojn, kaj sukcesis, sed tiu ĉi ruzo honorita de tempo ne kaŭzis vekigon.

Poste li komencis tuŝi kaj ekzameni ĉiujn nefamiliarajn meblaĵojn en la du ĉambretoj en kiuj li troviĝis.

En longa ovala spegulpanelo li vidis sin mem, kaj haltis mirigita. Li estis vestita per gracia vestaĵo el purpuro kaj blueta blanko, kun grize nuancita barbeto tondita je pinto, kaj liaj haroj, kies nigreco nun striiĝis per grizo, estis aranĝitaj sur lia frunto laŭ maniero nefamiliara sed plaĉa. Li ŝajnis esti viro eble kvardek-kvinjara. Dum momento li ne perceptis, ke tiu estas li mem.

Ekrido venis kun la kompreno. “Mi vizitu al Warming vestite tiamaniere!” li ekkriis, “kaj petu, ke li akompanu min por tagmanĝi!”

Tiam li pensis pri renkontigo kun unu post alia el la nemultaj familiaraj konatoj de sia frua virago, kaj meze de sia amuzo li ekpensis, ke ĉiu homo, kun kiu li kapablus tiel ŝerci, jam mortis antaŭ multaj jardekoj. La penso trafis lin abrupte kaj akre; subite li haltis, kun la vizaĝesprimo ŝanĝita al pala konsternigo.

La tumulta memoro pri la moviĝantaj trotuaroj kaj la grandega fasado de tiu mirinda strato sin realtrudis. La kriantaj homamasoj revenis, klaraj kaj vivaj, kun tiu malproksima, neaŭdebla, neamika konsilantaro blankvestita. Li sentis sin eta figuro, tre bagatela kaj neefika, kompatinde elstara. Kaj ĉie ĉirkaŭe, la mondo estis—*stranga*.



ĈAPITRO SEPA.

EN LA SILENTAJ ĈAMBROJ.

POST nelonge Graham rekomencis ekzameni la ĉambrojn. La scivolemo igis lin moviĝi, spite de lia laceco. La interna ĉambro, li vidis, estas alta, kaj ĝia plafono kupoloforma, kun kvarangula truo meze, kondukanta al funelo, en kiu turniĝis rado kun larĝaj ventumiloj ŝajne pelanta la aeron supren laŭ la tubego. La mallaŭta zuma tono de ĝia facila movado estis la sola klara sono en tiu senbrua loko. Dum tiuj ventumiloj transiris, unu post la alia, Graham ricevis nedaŭrajn vidojn al la ĉielo. Surprizis lin, ke li vidas stelon.

Tio atentigis al li la fakton, ke la brila lumigado de la ĉambroj venas de amaso da tre malfortaj elektraj lampetoj ĉirkaŭmetitaj sur la kornicoj. Ne ekzistis fenestroj. Kaj li rememoris, ke tra ĉiuj vastaj ĉambroj kaj koridoroj, kiujn li trapasis kun Howard, li tute ne rimarkis fenestrojn. Ĉu troviĝis fenestroj? Fenestroj ekzistas apud la stratoj, certe, sed ĉu por lumo? Aŭ ĉu oni lumigas la tutan urbegon tage kaj nokte por ĉiam, tiel ke nokto ne plu ekzistas tie?

Kaj alia afero trafis lian atenton. Li ne vidis kamenon en iu ĉambro. Ĉu la sezono estas somero, kaj tiuj nur someraj apartamentoj, aŭ ĉu oni regule varmigas aŭ malvarmigas la tutan urbegon? Li komencis interesiĝi pri tiuj demandoj, ekzamenis la glatan supraĵon de la muroj, la simple konstruitan liton, la inĝeniajn aranĝojn per kiuj oni preskaŭ nuligis litĉambrajn servojn. Kaj super ĉio troviĝis stranga foresto de intenca ornamaĵo, nuda gracio ĉe formo kaj koloro, kiun li trovis tre plaĉa al la okulo. Tie staris kelkaj komfortaj seĝoj; malpeza tablo sur silentaj glitiloj portis kelkajn botelojn da fluidaĵoj kaj glasojn, kaj du teleroj havis klaran substancon kvazaŭ gelaton. Tiam li rimarkis, ke ne troviĝas libroj,

jurnaloj, aŭ skribmaterialoj. "La mondo certe ŝanĝiĝis," li pensis.

Li rimarkis, ke unu kompleta flanko de la ĉambro estas kovrita de vicoj da kuriozaj duoblaj cilindroj surskribitaj per verdaj literoj sur blanko, kiuj harmonias kun la dekoraciskemo de la ĉambro, kaj meze de tiu ĉi flanko elstaras aparateto granda je ĉirkaŭ kvadrata metro, kaj donanta blankan glatan surfacon al la ĉambro. Seĝo frontis tion ĉi. Li sentis momentan ideon, ke eble tiuj cilindroj estas libroj, aŭ moderna anstataŭaĵo por libroj, sed unue ne ŝajnis tiel.

La literoj sur la cilindroj perpleksis lin. Ili ŝajnis kiel ruslingvaj. Tiam li rimarkis sugeston de groteska familiareco ĉe kelkaj el la vortoj :

"L'OMO KJU VOLESTIS REDIIIO "

trudis sin al li por "La Homo kiu volis esti Reĝo." "Reformita literado," li diris. Li memoris, ke li antaŭe legis rakonton sub tiu titolo, tiam li rememoris la rakonton vive, unu el la plej belaj rakontoj de la mondo. Sed tiu aĵo antaŭ li ne estis libro laŭ lia kompreno. Li deĉifris la titolojn de du apudaj cilindroj. "La Koro de la Mallumo," li neniam antaŭe priaŭdis, nek "La Madono de la Estonteco"—sendube se ili vere estis rakontoj ili estis verkitaj de post-Viktorinaj aŭtoroj.

Li cerbumis pri tiu kurioza cilindro dum iom da tempo kaj reenmetis ĝin. Tiam li turniĝis al la kvadrata aparateto kaj ekzamenis tion. Li malfermis specon de kovrilo, kaj trovis interne unu el la duoblaj cilindroj, kaj sur la supra rando malgrandan butonon kvazaŭ tiun de elektra tintilo. Li premis tion, kaj rapida klaketo komenciĝis kaj ĉesis. Li konsciis pri voĉoj kaj muziko, kaj vidis ludadon el koloroj sur la glata antaŭplato. Li subite ekkomprenis, kio tio eble estas, kaj paŝis malantaŭen por rigardi ĝin.

Sur la glata surfaco nun troviĝis eta bildo, tre vive kolorigita, kaj sur tiu bildo staris figuroj kiuj moviĝis. Ili ne nur moviĝis sed ankaŭ interparolis per klaraj voĉetoj. Tio aspektis ĝuste kiel realaĵo vidata tra inversigita binokleto kaj aŭdata tra longa tubo. Lia intereso kaptiĝis tuj de la situacio, kiu prezentis viron paŝantan tien kaj reen kaj kriantan koleraĵn vortojn al beleta sed petola

virino. Ambaŭ vestiĝis per la pitoreska kostumo, kiu ŝajnis tiel stranga por Graham. "Mi longe laboris," diris la viro, "sed kion vi faris?"

"Ha!" diris Graham. Li forgesis ĉion alian, kaj sidiĝis sur la seĝo. Post kvin minutoj li aŭdis sin nomata, aŭdis "kiam la Dormanto vekigōs," uzata ŝerce kaj proverbe pri longega prokrastado, kaj preterpasis sin mem, aĵon malproksiman kaj nekredindan. Sed post nelonge li konis tiujn du personojn kvazaŭ intimajn amikojn.

Fine la miniatura dramo finiĝis, kaj la kvadrata plataĵo de la aparato estis ree blanka.

Tio estis stranga mondo, en kiun li ĵus permesiĝis rigardi, senskrupula, plezurerĉema, energia, subtila—mondo ankaŭ kun terura ekonomia baraktado; okazis aludoj, kiujn li ne komprenis, aferoj, kiuj donis strangajn sugestojn pri ŝanĝitaj moralaj idealoj, eklumoj de dubinda klarigo. La blua kanvaso, kiu rolis tiel vaste en lia unua impresio pri la urbegaj vojoj, aperis kaj reaperis kiel la kostumo de la ordinara popolo. Li ne dubis, ke la rakonto estas nuntempa, kaj ĝian eĝan realismon oni ne povis nei. Kaj la fino estis tragedio, kiu premegis lin. Li restis sidanta, rigardante la blankecon.

Li eksaltis kaj frotis al si la okulojn. Li estis tiom profundigiĝinta en tiu moderna anstataŭaĵo por romano, ke li vekigis al la verda kaj blanka ĉambreto kun pli ol nuanco de la surprizo de sia unua vekigo.

Li stariĝis, kaj abrupte troviĝis ree en sia propra mirolando. La klareco de la kinetoskopa drameto pasis, kaj revenis la barakto sur la vasta placo de stratoj, la enigma Konsilantaro, la rapidaj fazoj de lia vekiga horo. Tiuj homoj parolis pri la Konsilantaro, kun malprecizaj sugestoj pri universaleco de potenco. Kaj ili ankaŭ parolis pri la Dormanto; tiutempe li ne vere komprenis vive, ke li mem estas la Dormanto. Li devis memori precize tion, kion ili diris. . . .

Li pasis en la litĉambro, kaj spionis supren tra la rapidaj interspacoj de la turniĝanta ventolilo. Dum la ventumiloj turniĝis, malklara bruoj kia la sono de maŝinoj venis per ritmaj ondoj. Ĉio alia silentis. Kvankam la konstanta taglumo ankoraŭ radiis tra lia apartamento,

li vidis, ke la intermita strio de ĉielo estas nun profunde blua—preskaŭ nigra, kun polvo el steletoj. . . .

Li rekomencis sian esploron de la ĉambroj. Li ne povis trovi rimedon por malfermi la rembiritan pordon, nek sonorilon aŭ alian rimedon por voki servistojn. Lia mirsento restis subpremita; sed li sentis sin scivolema, maltrankvile dezirema por informo. Li volis scii precize kiel tiuj ĉi novaj aferoj rilatas lin. Li penis trankviliĝi por atendi ĝis iu venos al li. Post nelonge li fariĝis senripoza kaj avida por scio, por distriĝo, por novaj sentoj.

Li reiris al la aparato en la alia ĉambro, kaj baldaŭ elserĉis la metodon por anstataŭigi la cilindrojn per aliaj. Dum li faris tion, la ideo trafis lin, ke nepre estas tiuj aparatetoj, kiuj fiksas la lingvon, tiel ke ĝi restas ankoraŭ klara kaj komprenebla post ducent jaroj. La cilindroj kiujn li hazarde enmetis, ludis muzikan fantazion. Unue ĝi estis bela, kaj poste volupteta. Baldaŭ li rekonis tion, kio ŝajnis esti aliigita formo de la historio de Tannhäuser. La muziko estis nefamiliara. Sed la prezentado estis realisma kun tiutempa nefamiliareco. Tannhäuser ne iris al Venusmonto, sed al Plezururbo. Kio estas Plezururbo? Songo, nepre, la imago de fantazia, voluptema verkisto.

Li interesiĝis, scivolemiĝis. La historio malvolviĝis kun gusto de strange tordita sentimento. Subite li ne ŝatis ĝin. Li ŝatis ĝin eĉ malpli dum ĝi daŭris.

Li spertis renverson de sentoj. Tio ne estas bildo, nek fantaziaĵo, sed fotografitaj realaĵoj. Li ne volis pli da tiu dudek-du-jarcenta Venusmonto. Li forgesis la rolon luditan de la pozistino en la dek-naŭ-jarcenta arto, kaj cedis al arkaika indigno. Li leviĝis, kolera kaj duone honta, ke li vidas tian aferon eĉ en soleco. Li tiris antaŭen la aparaton, kaj per iom da forto serĉis rimedon por haltigi la funkciadon. Io rompiĝis. Violkolora fajrero pikis kaj konvulsiigis al li la brakon, kaj la ilo restis senmova. Kiam la proksiman tagon li provis anstataŭigi tiujn Tannhäuser cilindrojn per alia paro, li trovis la aparaton rompita. . . .

La iradis oblikve trans la ĉambron kaj paŝis tien kaj reen, baraktante kontraŭ netolereblaj vastaj ideoj. La impresoj, kiujn li ricevis de la cilindroj, kaj de tio, kion li antaŭe vidis, perpleksis, konfuzis lin. Ŝajnis

por li plej nekredinde, ke dum sia tridekjara vivo li neniam provis bildigi al si tiujn venontajn tempojn. “Ni konstruis tiam la estontecon,” li diris, “kaj apenaŭ iu el ni sin ĝenis demandi kian estontecon ni konstruas. Kaj jen ĝi!”

“Kien oni atingis? Kio estas jam farita? Kie mi staras en la mezo de ĉio?” Li sentis sin preta por la vasteco de strato kaj domo, la amasoj da homoj. Sed bataloj sur la urbaj vojoj! Kaj la sistemigita volupteco ĉe klaso de riĉuloj!

Li pensis pri Bellamy, en kies Socialisma Utopio la ĉefa persono tiel kurioze anticipis ĉi tiun efektivan sperton. Sed jen troviĝis neniuj Utopio, nenia Socialisma ŝtato. Li jam vidis sufiĉon por scii, ke ankoraŭ daŭras la antikvaj maloj de lukso, malŝparado kaj sinindulgo unuflanke, kontraŭ mizera malriĉeco aliflanke. Li sciis sufiĉe pri la esencaj vivofaktoroj por kompreni tiun interrilaton. Kaj ne nur la konstruaĵoj de la urbego aspektis gigantaj kaj la amasoj sur la stratoj ŝajnis gigantaj, sed ankaŭ la voĉoj, kiujn li aŭdis sur la vojoj, la maltrankvileco de Howard, eĉ la atmosfero, parolis pri giganta malkontento. En kiu lando li troviĝis? Ŝajnis, ke ankoraŭ en Anglujo, sed tamen strange neangla. Lia menso ekrigardis la ceteron de la mondo, kaj vidis nur enigman vualon.

Li ĉirkaŭvagis la ĉambron, esplorante ĉion, kiel enkaĝa besto. Li sin sentis tre laca, kun tiu febra ellaciĝo, kiu ne permesas la ripozon. Li aŭskultis longe sub la ventolilo por kapti ian malproksiman eĥon de la tumultoj, kiuj (li kredis) nepre daŭras en la urbego.

Li komencis paroli al si mem. “Ducent tri jarojn!” li diris al si multfoje, ridante stulte. “Sekve mi estas ducent-tridek-trijara! La plej maljuna enloĝanto! Ĉu oni inversigis la tendencon de nia tempo, kaj reiris al regado de la plej maljunaj? Mia pretendo estas ne pridisputebla. Mm, Mm, Mm! Mi memoras la kruelegaĵojn en Bulgarujo, kvazaŭ ili okazis nur hieraŭ. Mia estas granda aĝo! Ha, Ha!” Li surpriziĝis, aŭdante sini ridi, kaj tiam reridis intence kaj pli laŭte. Poste li rimarkis, ke li kondutas malsaĝe. “Pli trankvile,” li diris; “Pl trankvile!”

Li paŝado iĝis pli ritma. “Tiun novan mondon,” li diris. “Mi ne komprenas ĝin. *Kial?* . . . Sed ĉio estas *kial!*”

“Mi supozas, ke oni nun flugas kaj faras ĉiuspecajn aferojn. Mi provu memori, ĝuste kiel tio komenciĝis.”

Unue li surpriziĝis, trovante kiel nebula nun fariĝis la memoroj pri liaj unuaj tridek jaroj. Li memoris pecetojn, plejparte bagatelajn momentojn, negravajn aferojn kiujn li antaŭe rimarkis. Lia knabaĝo ŝajnis unue la plej atingebla; li memoris lernolibrojn kaj iuj lecionoj pri mezurado. Tiam li revivigis la pli elstarajn partojn de sia vivo, memorojn pri la delonge mortinta edzino, kun ŝia magia influo nun tute for trans la putrado, pri siaj rivaloj kaj amikoj kaj perfidantoj, pri la decidado de tiu kaj tiu aferoj, kaj poste pri siaj lastaj jaroj de mizero, pri hezitaj decidoj kaj fine pri siaj penegaj studoj. Post nelonge li perceptis, ke li nun reposedas ĉion; malklare, verŝajne, kvazaŭ metalo longe kaŝita, sed neniel difektita aŭ rompita, inda por repolurado. Kaj ĝia koloro estis malheliĝanta mizero. Ĉu ĝi sufiĉe valoris la repoluradon? Per miraklo li sin trovis levita el vivo, kiu jam fariĝis netolerebla. . . .

Li revenis al sia nuna stato. Li baraktis vane kontraŭ la faktoj. Ili fariĝis neelirebla implikaĵo. Tra la ventolilo li vidis la ĉielon roza pro tagiĝo. Antikva ideo venis el la mallumajoj de lia memoro. “Mi devas dormi,” li diris. Ĝi aperis kiel ĝoja malŝarĝiĝo de la cerba maltrankvileco kaj de la kreskanta doloro kaj pezo de liaj membroj. Li iris al la stranga liteto, kuŝiĝis kaj baldaŭ dormis. . . .

La sorto dekretis, ke li tre familiariĝu kun tiu apartamenteto antaŭ ol li lasis ĝin, ĉar li restis tri tagojn mallibera. Dum tiu tempo neniu krom Howard eniris la ĉambrojn. La miro pri lia destino miksiĝis kun la miro pri lia reviviĝo, kaj iel ĝin malpliigis. Li vekigis al la homaro, verŝajne, nur por esti forkaptita en tiun neklarigeblan solecon. Howard venis regule kun subtile subtenaj kaj nutraj fluidaĵoj, kaj plaĉaj, malpezaj mangaĵoj, tute strangaj por Graham. Li ĉiam fermis la pordon zorge kiam li eniris. Pri detaloj li montriĝis pli kaj pli komplezema, sed la rilaton de Graham al la grandaj aferoj, kiuj evidente prikontestiĝis tiel forte post la sonbaraj muroj, li rifuzis klarigi. Li evitis, kiel eble plej ĝentile, ĉiun demandon pri la aferstato ĉe la ekstera mondo.

Kaj dum tiuj tri tagoj la senĉesaj pensoj de Graham vagis malproksimegen. Ĉio, kion li jam vidis, kaj tiu tuta, malsimpla rimedo por malhelpi ke li vidu, kunbaraktis en lia cerbo. Preskaŭ ĉiun eblan klarigon pri sia situacio li debatis kun si—eĉ, laŭhazarde, la ĝustan. Aferoj kiuj poste okazis al li fariĝas fine kredindaj pro tiu sama izoleco. Kiam fine lia momento por reliberiĝo alvenis, ĝi trovis lin preta. . . .

La mieno de Howard faris multon por profundigi la impreson de Graham pri lia propra graveco ; la pordo inter sia malfermiĝo kaj fermiĝo ŝajnis enlasi kun li spiron de gravega okazaĵo. La demandoj de Graham iĝis pli difinitaj kaj serĉemaj. Howard posteniris tra protestoj kaj malfacilaĵoj. La vekigo estis neatendita, li rediris ; hazarde ĝi okazis kune kun la fluo de socia konvulsio. "Por klarigi ĝin mi devas diri al vi la historion pri *grosso* kaj duono de jaroj," protestis Howard.

"Jen la afero," diris Graham. "Oni timas pri io, kion mi faros. Iamaniere mi estas arbitracianto—mi povus esti arbitracianto."

"Ne tio gravas. Sed vi havas (mi povas diri tiom)—nu, la aŭtomata pliigo de via havaĵo metas en viajn manojn grandajn eblojn por malhelpo. Kaj alimaniere vi posedas influon, kun viaj ideoj de la dek-oka jarcento."

"Dek-naŭa jarcento," korektis Graham.

"Pro viaj antikvaj ideoj, do, senscia pri ĉiu trajto de nia Ŝtato, kiel vi estas."

"Ĉu mi estas malsaĝulo ? "

"Tute ne."

"Ĉu mi ŝajnas la speco de homo, kiu agas senpense ? "

"Oni ne atendis, ke vi agos iamaniere ajn. Oni ne kalkulis je via vekigo. Neniu eĉ revis, ke vi iam vekigos. La Konsilantaro ĉirkaŭigis vin per antisepsa medio. Efektive oni kredis, ke vi estas mortinta—simpla prokrasto de putrado. Kaj—sed tio estas tro malsimpla. Ni ne kuraĝas, subite—dum vi ankoraŭ nur duone maldormas."

"Ne sufiĉas," diris Graham. "Ni supozu, ke aferoj statas, kiel vi diris. Kial oni ne tage kaj nokte plenigas min per faktoj kaj avertoj kaj ĉian hodiaŭan saĝon, por taŭgigi min por mia situacio ? Ĉu mi pli saĝas nun ol

antaŭ du tagoj, se efektive pasis du tagoj, de kiam mi vekigis?

Howard tiris al si la lipon.

“Mi komencas senti—ĉiuhore mi pli klare sentas—sistemon de kaŝado, kies vizaĝo vi estas. Ĉu tiu Konsilantaro, aŭ komitato, aŭ kio ajn ĝi sin nomas, okupiĝas falsante la kontojn pri mia havaĵo? Ĉu tiel?”

“Tiu suspektema tono—” diris Howard.

“Uĥ!” kriis Graham. “Nu, fidu min, ĉi tio rezultos malbone por tiuj, kiuj metis min ĉi tie. Rezultos malbone. Mi vivas. Ne dubu pri tio, mi vivas. Ĉiutage mi sentas mian pulsbaton pli forta kaj mian menson pli klara kaj pli vigla. Nenia trankvileco plu. Mi estas viro reveninta al la vivo. Kaj mi volas *vivi*—”

“*Vivi!*”

La vizaĝo de Howard lumiĝis pro ideo. Li venis al Graham kaj parolis per facila konfidema tono.

“La Konsilantoj izolas vin ĉi tie pro via propra sendanĝereco. Vi estas ne ripozema. Nature—energia homo! Vi trovas aferojn ĉi tie neinteresaj. Sed ni volas, ke ĉio, kion vi eble deziras—ĉiun deziron—ĉiuspecan deziron. . . . Eble ekzistas io. Ĉu estas iu speco de kunulo?”

Li paŭzis signife.

“Jes,” diris Graham penseme. “Jes, estas speco.”

“Ha! *Nu!* Ni traktis vin malatente.”

“La amasoj, sur viaj stratoj ekstere.”

“Tio,” diris Howard, “Mi timas—. Sed—”

Graham komencis transpaŝi la ĉambron. Howard staris apud la pordo rigardante lin. La aludo en la sugesto de Howard estis nur duone klara por Graham. Kunulo? Supozu, ke li akceptos la proponon, postulos ian *kunulon*? Ĉu ekzistas ebleco, ke li ricevu el la parolo de tiu ĉi dua persono nebulan ideon pri la konflikto, kiu tiel vive ekkreis je lia vekiga momento? Li remeditis, kaj la sugesto akiris koloron. Li turniĝis al Howard abrupte.

“Kion vi volis diri per ‘kunulo?’”

Howard levis la okulojn kaj tiam siajn ŝultrojn. “Homoj,” li diris, kun stranga rideto sur sia peza vizaĝo.

“Niaj sociaj moroj,” li diris, “posedas pluan libéralecon, eble, kompare kun viaj tempoj. Se viro volas malŝargi al si tian tedon, kia tiun ĉi—per ina kunuleco, ekzemple—

Kial ne “el”

ni ne konsideras tion skandalo. Ni forigis formulojn de niaj opinioj. Ekzistas ĉe nia urbego klaso, necesa klaso, ne plu malestimata—diskreta—”

Graham subite ĉesis paŝi.

“Eble tio pasigus la tempon,” diris Howard. “Ĝi estas afero, kion mi devus antaŭe pripensi, sed efektive tion nun okazas—”

Li indikis la eksteran mondon.

Graham hezitis. Momente la bildo de ebla virino estris al li la menson per ega allogado. Tiam li ekkoleriĝis.

“Ne!” li kriis.

Li komencis marŝi rapide tien kaj reen trans la ĉambron. “Ĉio, kion vi diras, ĉio, kion vi faras, konvinkas min—pri iu granda celo, kiu rilatas min. Mi ne deziras pasigi la tempon, kiel vi nomas tion. Jes, mi scias. La deziro kaj la indulgo estas iasence la vivo—kaj la morto! Estingiĝo! Dum mia vivo, antaŭ ol mi ekdormis, mi jam solvis tiun kompatindan enigmon. Mi ne volas rekomenci. Jen troviĝas urbego, homamaso—. Kaj dume mi restas ĉi tie kvazaŭ kuniklo en sako.”

Lia kolero rapide altiĝis. Li sufoketis momente kaj svingis la premitajn pugnojn. Li cedis al kolera spasma, li blasfemis per arkaikaj malbenoj. Liaj gestoj havis eon de prikorparaj minacoj.

“Mi ne scias, kiu eble estas via partio. Mi staris en nescio, kaj vi tenas min en nescio. Sed mi ja scias ĉi tion, ke oni izolas min ĉi tie por nenia bona celo. Por nenia bona celo. Mi avertas vin, mi avertas vin pri la sekvo. Tuj kiam mi atingos al mia potenco—”

Li ekkomprenis, ke tiamaniere minaci povas porti danĝeron al li mem. Li haltis. Howard staris rigardanta lin kun stranga esprimo.

“Ĉu mi komprenu, ke tio estas mesaĝo por la Konsilantoj?” diris Howard.

Graham sentis momentan impulson salti sur la viron, por faligi aŭ senkonsciigi lin. Verŝajne tio montriĝis per lia vizaĝesprimo; almenaŭ la moviĝo de Howard estis rapida. Post unu sekundo la senbrua pordo estis fermita, kaj la viro de la dek-naŭa jarcento troviĝis sola.

Momente li staris rigide, kun la kunpremitaj manoj duonlevitaj. Tiam li faligis ilin. “Kia malsaĝulo mi

estis!" li diris, kaj cedis ree al sia kolero, piedbatante ĉirkaŭ la ĉambro kaj kriante malbenojn. . . . Longe li restis kvazaŭ en frenezo, furiozante pri sia situacio, pri sia propra malsaĝeco, pri la friponoj, kiuj malliberigis lin. Tion li faris, ĉar li ne volas rigardi trankvile la situacion. Li tenis sin al sia kolero—ĉar li timis pri timo.

Post nelonge li rezonis kun si mem. Lia malliberigo ŝajnas nekomprenebla, sed sendube la leĝaj formularoj—novaj leĝoj—de la tempo permesas tion. Certe ĝi devas esti laŭleĝa. Tiu popolo staras ducent jarojn pli antaŭe sur la marŝo de la civilizacio, ol la Viktorina generacio. Ne estas probable, ke oni estas malpli humana. Sed tamen oni jam purigis la menson de formuloj! Ĉu la humaneco ankaŭ estas formulo, same kiel la ĉasteco?

Lia imago komencis sugesti tion, kion oni kapablas fari al li. La provoj de lia racio nuligi tiujn sugestojn, kvankam plejparte logike valoraj, estis tute vanaj. "Kial oni volu fari ion al mi?"

"Eĉ ekstremonokaze," li sin trovis diranta fine, "mi povas cedi tion, kion ili deziras. Sed kion ili deziras? Kaj kial oni ne postulas ĝin de mi, anstataŭ enkaŝigi min?"

Li revenis al sia antaŭa meditado pri la eblaj intencoj de la Konsilantaro. Li komencis rekonsideri la detalojn de la konduto de Howard, la minacajn rigardojn, la neklarigeblajn hezitojn. Poste, dum iom da tempo, lia atento rondiris ĉirkaŭ la ideo liberigi sin de tiuj ĉambroj; sed kien li povus forkuri en tiu vasta homplena mondo? Li troviĝus pli malbonstata ol estus antikva anglosaksa kamparano subite demetita en dek-naŭ-jarcenta Londono. Kaj krome, kiamaniere oni povus liberigi sin de la ĉambroj?

"Kiel profitos al iu ajn se malbonaĵo okazos al mi?"

Li pensis pri la tumulto, la granda socia barakto, de kiu li tiel neklarigeble estas la akso. Teksto, sufiĉe senrilata, kaj tamen strange insistema, alvenis, flotante supren el la mallumo de lia memoro. Ankaŭ tiu ĉi Konsilantaro diris:

"Bone estas por ni, ke unu homo mortu por la popolo."

ĈAPITRO OKA.

LA TEGMENTAJ SPACJOJ.

DUM la ventolilo en la ronda truo de la interna ĉambro turniĝis kaj allasis ekvidojn de la nokto, malfortaj sonoj envagis tra ĝi. Kaj Graham, starante sube, surpriziĝis pro voĉsono.

Li spionis supren kaj vidis, dum la interspacoj de la turniĝo, malhele kaj malklare, la kapon kaj ŝultrojn de viro rigardanta lin. Tiam malluma mano etendiĝis, la rapida ventumilo frapis ĝin, hezitis, kaj daŭre batis kun bruneta makulo sur la rando de ĝia maldika klingo, kaj io komencis fali de tie sur la plankon, gutante silente.

Graham rigardis malsupren, kaj vidis sangmakulojn apud siaj piedoj. Li denove suprenrigardis kun stranga ekscitiĝo. La figuro jam malaperis.

Li restis senmova—ĉiu sento estis atentega al la ombrotremigita, malluma spaco. Li rimarkis, ke malklaraj, malproksimaj, malhelaj pecetoj flotas malpeze tra la ekstera aero. Ili malsupreniris al li, necerte, kirlеме, kaj pasis flanken el la suprenfluo de la aerumilo. Lumradieto flagretis, la eroj blanke lumiĝis, kaj tiam revenis la mallumo. Varma kaj lumigita li sin sentis, sed li tamen perceptis, ke neĝas nur kelkajn metrojn malproksime de li.

Graham transpaŝis la ĉambron kaj revenis al la ventolilo. Li vidis la kapon de viro pasi proksime de ĝi. Aŭdiĝis flustra sono. Tiam akra frapo sur iu metala substanco, penego, voĉoj, kaj la ventolilo haltis. Ekblovo de neĝflokaj kirliĝis en la ĉambron, kaj malaperis antaŭ ol tuŝi la plankon. “Ne timu,” diris voĉo.

Graham restis sub la truo. “Kiu vi estas?” li flustris.

Dum momento okazis nenio krom svingo de la ventumilo, kaj tiam la kapo de viro ŝoviĝis singardeme tra la malfermaĵo. Lia vizaĝo aperis preskaŭ renversita al Graham; liaj malhelaj haroj estis malsekaj de degelantaj neĝflokaj

sur ili. Lia brako supreniris en la mallumon, tenante ion nevidatan. Li posedis junecan vizaĝon kaj brilajn okulojn, kaj la vejnoj sur lia frunto ŝvelis. Li ŝajnis penegi por konservi sian pozicion.

Dum kelkaj sekundoj nek li nek Graham parolis.

“Vi estis la Dormanto?” diris la fremdulo fine.

“Jes,” diris Graham, “Kion vi deziras ĉe mi?”

“Mi venas de Ostrog, Majstro,” — “Ostrog?”

La viro en la ventolilo turnis la kapon, tiel ke lia profilo presentigis al Graham. Li ŝajnis aŭskulti. Subite okazis rapida ekkrio, kaj la entrudanto saltis supren ĝustatempe por eviti la frapon de la liberigita aerumilo. Kaj kiam Graham denove rigardis supren nenio troviĝis videbla krom la malrapide falanta neĝo.

Pasis eble kvaronhoro antaŭ ol iu revenis al la aerumilo. Sed fine la sama metalsona haltigo reokazis, la ventumilo haltis, kaj la vizaĝo reaparis. Graham restis la tutan tempon ĉe la sama loko, atenta kaj treme ekscitita.

“Kiu vi estas? Kion vi deziras?” li diris.

“Ni volas paroli kun vi, Majstro,” diris la entrudanto.

“Ni deziras—mi ne kapablas teni la aĉaĵon!—Ni jam penis trovi vojon al vi—dum tri tagoj.”

“Ĉu ĉi tio estas savado?” flustris Graham. “Ĉu liberigo?”

“Jes, Majstro, se vi tion volas.”

“Vi estas mia partio—la partio de la Dormanto?”

“Jes, Majstro.”

“Kion mi faru?” diris Graham.

Sekvis barakto. La brako de la fremdulo aperis, kaj lia mano sangis. Liaj genuoj venis trans la rondon de la funelo.

“Staru for de sub mi,” li kriis, kaj li falis iom peze sur la manoj kaj unu ŝultro ĉe la piedoj de Graham. La liberigita ventolilo zumis brue. La fremdulo ĉirkaŭruliĝis, saltis vigle surpieden, kaj restis spirmanka kun la mano al kontuzita ŝultro, kaj kun la brilaj rigardoj sur Graham.

“Vi ja estas la Dormanto,” li diris. “Mi vidis vin dormi. Kiam la leĝo permesis, ke iu ajn vidu vin.”

“Mi estas tiu, kiu entranciĝis,” diris Graham. “Oni malliberigis min ĉi tien. Mi restas ĉi tie de kiam mi vekigis—almenaŭ tri tagojn.”

La entrudanto ŝajnis esti parolonta, aŭdis ion, ekrigardis rapide la pordon, kaj subite forlasis Grahamon kaj kuris al ĝi, kriante rapidajn nekomprenoblajn vortojn. Brila kojno el ŝtalo aperis en lia mano, kaj li komencis frap', frap', rapidan sinsekvon de frapoj sur la ĉarniroj. "Gardu vin!" kriis voĉo. "Aĥ!" La voĉo venis de supre.

Graham rigardis supren, vidis la plandojn de du piedoj, kaŭris, estis frapita de unu el ili je la ŝultro, kaj granda pezo ŝovis lin teren. Li falis sur la genuoj, kaj antaŭen, kaj la peza afero ruliĝis super lian kapon. Li levis sin surgenuen, kaj vidis duan homon de supre, sidantan antaŭ li.

"Mi ne vidis vin, Majstro," ekspiris la viro. Li leviĝis, kaj helpis, ke Graham leviĝu. "Ĉu vi vundiĝis, Majstro?" li spiregis. Serio da pezaj frapoj sur la aerumilo komenciĝis, io falis preter la vizaĝo de Graham, kaj tremanta klingo el blanka metalo dancis, turniĝis, kaj kuŝis plate sur la planko.

"Kio tio estas?" kriis Graham, konfuzite, kaj rigardante la ventumilon. "Kiu vi estas? Kion vi intencas fari? Memoru, ke mi komprenas nenion."

"Staru pli posten," diris la fremdulo, kaj tiris lin de sub la truo, dum alia metalpeco peze falis.

"Oni deziras, ke vi venu, Majstro," ekspiris la noveveninto, kaj Graham, rigardante denove lian vizaĝon, vidis ke nova vundo jam ŝanĝiĝis de blanko al ruĝo sur lia frunto, kaj du fluetoj da sango falas de ĝi. "Via popolo vokas vin."

"Ke mi venu kien? Mia popolo?"

"Al la halo super la vendplacoj. Via vivo ĉi tie restas en danĝero. Ni posedas spionojn. Ni sciiĝis nur ĝustatempe. La Konsilantoj jam decidis—ĉi tiun tagon mem—ke ili aŭ narkotos aŭ mortigos vin. Kaj ĉio staras preta. La popolo jam dresiĝis, la ventmaŝina polico, la inĝenieroj kaj la duono de la vojofaristoj staras niaflanke. Ni tenas plenaj la halojn—la amaso kriegas. La tuta urbego krias kontraŭ la Konsilantaro. Ni posedas armilojn." Li viŝis la sangon for per sia mano. "Via vivo ĉi tie ne valoras pli ol—"

"Sed kial armiloj?"

"La popolo sin levas por defendi vin, Majstro. Kio?"

Li turniĝis rapide, ĉar la unua viro faris siblon per la dentoj. Graham vidis ĉi tiun salti malantaŭen, gesti al ili, ke ili sin kaŝu, kaj moviĝi kvazaŭ por sin kaŝi post la malfermiĝantan pordon.

Dum li faris tion Howard aperis, kun pleteto en unu mano kaj la peza vizaĝo malgaja. Li eksaltis, rigardis supren, la pordo fermegiĝis malantaŭ li, la pleteto kliniĝis flanken, kaj la ŝtala kojno frapis lin post la orelo. Li falis, kiel hakita arbo, kaj kuŝis, kiel li falis, trans la planko de la ekstera ĉambro. La viro, kiu ĵus frapis lin, kliniĝis rapide, studis lian vizaĝon momente, leviĝis, kaj revenis al sia laboro ĉe la pordo.

“Via veneno!” diris voĉo ĉe la orelo de Graham.

Tiam abrupte ili troviĝis en mallumo. La sennombraj lumoj de la kornico estingiĝis. Graham vidis la malfermaĵon de la ventolilo, kun fantoma neĝo kirlanta super ĝi, kaj malhelajn figurojn moviĝantajn haste. Trio da homoj surgenuis sur la ventumilo. Tiu malklaraj—ŝtupetaron—oni malsuprenigis tra la malfermaĵo, kaj mano aperis portanta necertan flavan lumon.

Li spertis heziton momentan. Sed la sinteno de tiuj viroj, ilia rapida vigleco, iliaj vortoj, egalas tiel komplete liajn proprajn timojn pri la Konsilantoj, lian ideon kaj esperon pri liberigo, ke ĝi ne daŭris unu sekundon. Kaj lia popolo lin atendas!

“Mi ne komprenas,” li diris. “Mi fidas. Diru al mi, kion fari.”

La viro kun la vundita frunto ekprenis la brakon de Graham. “Grimpu supren per la ŝtupetaro,” li flustris. “Rapide. Oni certe jam aŭdis—”

Graham serĉis la ŝtupetaron per etenditaj manoj, metis la piedon sur la unuan ŝtupeton, kaj, turnante la kapon, vidis trans la ŝultron de la plej proksima viro, sub la flava flagreto de la lumo, la unuan veninton ankoraŭ ĉe la pordo. Graham returniĝis al la ŝtupetaro, kaj estis ŝovata de sia kondukanto kaj helpata de tiuj supre, kaj tiam sin trovis staranta sur io malmola kaj malvarma kaj glitiga ekster la ventolila funelo.

Li frostotremis. Li rimarkis grandan diferencon je la temperaturo. Kvin aŭ ses viroj staris ĉirkaŭ li, kaj malpezaj neĝeroj tuŝis manojn kaj vizaĝon kaj degelis.

Momente estis mallume, tiam dum ekbrilo mortece viol-blanke, kaj tiam ĉio ree mallumiĝis.

Li vidis, ke li ĵus elvenis sur la tegmenton de la vasta urbega konstruaĵo, kiu anstataŭis la diversajn domojn, stratojn, kaj malfermitajn spacojn de Viktorina Londono. La loko sur kiu li staris estis ebena, kaj grandegaj serpentaj drategoj kuŝis trans ĝi ĉiudirekten. La rondaj radoj de aro da ventmaŝinoj vidiĝis malklaraj kaj gigantaj tra la mallumo kaj neĝo, kaj muĝis kun varianta laŭteco dum la ŝanĝiganta vento leviĝis kaj malleviĝis. Iom malproksime intermita blanka lumo ŝprucis de malsupre, lumigis la kirlojn de la neĝo per efemera brileto, kaj faris nedaŭran fantomon en la nokto; ankaŭ kelkloke, malalte, ia malklare konturita, ventoturnita mekanismo eklumis per blankaj fajreroj.

Ĉion ĉi li rimarkis laŭ fragmenta maniero dum liaj liberigintoj staris ĉirkaŭ li. Iu jetis dikan molan mantelon el peltsimila ŝtofo sur lin, kaj ligis ĝin per bukitaĵ rimenoj je talio kaj ŝultroj. Aferoj diriĝis mallonge, decideme. Iu lin ŝovis antaŭen.

Antaŭ ol lia cerbo klariĝis, malhela formo ekprenis lian brakon. "Tien ĉi," diris tiu formo, tirante lin antaŭen, kaj direktis Graham trans la platan tegmenton al malklara duonronda nebulo el lumo. Graham obeis.

"Gardu vin!" kriis voĉo, kiam Graham faletis sur ŝnurego. "Inter kaj ne trans ilin," diris la voĉo. Kaj, "Ni devas rapidi."

"Kie restas la popolo?" diris Graham. "La popolo, kiu, laŭ via diro, atendas min?"

La fremdulo ne respondis. Li lasis la brakon de Graham kiam la vojeto mallarĝiĝis, kaj iris kondukante per rapidaj paŝegoj. Graham blinde sekvis. Post minuto li sin trovis kuranta. "Ĉu la aliaj venas?" li spiregis, sed ne ricevis respondon. Lia kunulo ekrigardis malantaŭen kaj daŭre kuris. Ili venis al speco de vojeto el lata metalajo, kiu iris transe al ilia antaŭa direkto, kaj ili turniĝis flanken por sekvi tion. Graham rigardis malantaŭen, sed la neĝado jam kaŝis la aliajn.

"Venu, do!" kriis lia kondukanto. Nun kurante, ili alproksimiĝis al malgranda ventmaŝino turniĝanta alte en la aero. "Kaŭru!" kriis la kondukanto de Graham,

2 — kaj ili evitis senfinan rimenon kurantan muĝante supren al la ŝafto de la maŝino. “Tien ĉi!” kaj ili troviĝis ĝis la maleoloj en kanaletoj plena de blovita degelanta neĝo, inter du malaltaj muroj el metalo, kiuj poste leviĝis ĝis iliaj talioj. “Mi iros la unua,” diris la kondukanto. Graham tiris la mantelon ĉirkaŭ sin kaj sekvis. Tiam subite aperis mallarĝa abismo trans kiu la kanaletoj saltis ĝis la neĝa mallumo de la transa flanko. Graham spionis unufoje super la flanko kaj trovis la abismon nigra. Momente li bedaŭris pri sia forkurado. Li ne kuraĝis denove rigardi, kaj lia cerbo turniĝis dum li vadis tra la duone fluida neĝo.

Tiam ili rampis el la kanaletoj kaj rapidis trans vasta ebena spaco, malseka pro degelanta neĝo, kaj ĝis la duono de sia amplekso malklare lumigata de lumoj, kiuj iris kaj reiris sube. Li hezitis pro tiu nefirmaspekta substanco, sed lia kondukanto kuris antaŭen nezorge, kaj tiel ili atingis kaj suprenrampis glitigajn ŝtupojn ĝis la rando de granda vitra kupolo. Ili iris ĉirkaŭ tio. Malproksime sube kelkaj personoj ŝajnis danci, kaj muziko filtriĝis tra la kupolo. . . . Graham imagis, ke li aŭdas kriegojn tra la neĝado, kaj lia kondukanto rapidigis lin per nova akcelado. Ili grimpis spirege al spaco kun grandegaj ventmaŝinoj—unu tiel vasta, ke nur la malsupra rando de ĝiaj ventkaptiloj rapidis al la vido, kaj forrapidis supren por perdiĝi en la nokto kaj la neĝo. Ili rapidis dum iom da tempo tra la kolosa metala reto de ĝiaj subteniloj, kaj alvenis fine super placo kun moviĝantaj vojoj, simila al la loko, kien Graham rigardis de la balkono. Ili rampis trans la deklivan travideblajn kiu kovris tiun straton el trotuaroj, rampante sur manoj kaj genuoj pro la gliteco de la neĝo.

Plejparte la vitro estis vaporkovrita, kaj Graham vidis nur nebulajn ombrojn de la homoj sube, sed proksime de la pinto de la travidebla tegmento la vitro estis klara, kaj li sin trovis rigardanta malsupren sur ĉion. Dum kelka tempo, spite la instigoj de sia kondukanto, li cedis al kapturigo, kaj kuŝadis etendite sur la vitro, naŭzita kaj paralizita. Malproksime sube, nur moviĝantaj punktoj kaj polveroj, iris la anaro de la sendorma urbego, sub sia konstanta taglumo, kaj la moviĝantaj vojoj daŭrigis

sian senĉesan iradon. Komisiistoj kaj viroj kun nekonataj aferoj rapidegis laŭ la pendantaj ŝnuregoj, kaj la malpezaj pontoj estis homplenaj. Ŝajnis, kvazaŭ oni spionas en gigantan vitran abelujon, kaj ĝi kuŝas vertikale sub li kun nur rezista vitro de nekonata dikeco por savi lin de falo. La strato montriĝis varma kaj lumigita, kaj Graham nun estis malseka ĝis la haŭto pro degelanta neĝo, kaj liaj piedoj estis sensentaj pro malvarmo. Dum tempospaco li ne kapablis sin movi. "Venu, do!" kriis lia kondukanto, kun teruro en la voĉo. "Venu, do!"

Graham atingis la pinton de la tegmento per penego.

Trans la pinto, sekvante la ekzemplon de sia kondukanto, li turniĝis kaj glitis dorsantaŭe malsupren de la kontraŭa deklivo tre rapide, inter malgranda lavango el neĝo. Dum li glitis li demandis al si kio okazus, se iu rompita malfermaĵo renkontus lin. Ĉe la rando li ŝancele stariĝis ĝis la maleoloj en la malseka neĝo, dankante al la ĉielo pro denove netravigebla piedvojo. Lia kondukisto jam rampas supren per metala lataĵo ĝis ebena etendaĵo.

Tra la maloftaj neĝflokaj super tio vidiĝis alia vico da vastaj ventmaŝinoj, kaj tiam subite la senforma tumulto de la turniĝantaj radoj trapikiĝis de surdiga sono. Ĝi estis mekanika akra sono de eksterordinara forteco, kiu ŝajnis veni samtempe de ĉiu parto de la horizonto.

"Oni jam eltrovis nian forkuron!" kriis la kondukanto per voĉtono de teruro, kaj subite, pro blindiga lumego, la nokto fariĝis tago.

Super la blovata neĝo, de la suproj de la ventmaŝinoj, aperis grandaj mastoj portantaj globojn el blanka lumo. Ili foriris laŭ nelimigitaj perspektivoj ĉiudirekten. Tiel malproksime, kiel lia okulo kapablis penetri la neĝon, ili brilegis.

"Venu sur tion," kriis la kondukanto, kaj ŝovis lin antaŭen al longa krado el senneĝa metalo, kiu iris kvazaŭ rubando inter du iomete kliniĝaj etendaĵoj el neĝo. Ĝi sentiĝis varma sub la preskaŭ sensentaj piedoj de Graham, kaj malgranda kirlo de vaporo leviĝis de ĝi.

"Venu!" kriis lia kondukanto de malproksime dek metrojn, kaj, ne atendente, kuris rapide tra la inkandeska brilego al la feraj subteniloj de la proksima vico de

ventmaŝinoj. Graham, retransviliĝante de sia mirego, sekvis tiel rapide, konvinkita pri sia baldaŭa kaptiĝo. . . .

Post dek sekundoj ili sin trovis inter reta desegno el brilego kaj nigraj ombroj strekita de moviĝantaj strioj sub la grandegaj radoj. La kondukanto kuradis dum iom da tempo, kaj subite sin ĵetis flanken kaj malaperis en nigran ombbron ĉe la angulo de la piedo de subtenilego. Post plua momento Graham staris apud li.

Ili kaŭris spiregante kaj rigardis eksteren.

La sceno, kiun Graham vidis, estis tre sovaĝa kaj stranga. La neĝo nun preskaŭ ĉesis; nur malfrua floko de tempo al tempo transiris la bildon. Sed la vasta ebena etendo antaŭ ili aspektis mortece blanka, fendita nur de gigantaj amasoj kaj moviĝantaj formoj kaj longaj strioj el nepenetrebla mallumo, grandaj malgraciaj Titanoj el ombro. Tute ĉirkaŭe interplektiĝis grandegaj metalaj strukturoj, feraj traboj, preternature vastaj, kiel ŝajnis al li, kaj la randoj de ventmaŝinoj, apenaŭ turniĝante pro la senventeco, pasis per grandaj brilaj kurboj pli kaj pli krute supren en luman nebuleton. Kie ajn la neĝotuŝita lumo radiis malsupren, lignaj kaj metalaj traboj, kaj senfinaj rimenoj irantaj per haltejo sed nevenkebla firmeco, pasis supren kaj malsupren en la nigron. Kaj spite de tiu tuta fortega vicleco, kune kun ĉia sento pri motivo kaj plano, tiu neĝkovrita soleco el mekanismo ŝajnis esti sen ia homa ekzistaĵo krom ili, ŝajnis tiel senvoja kaj dezerta kaj senhoma, kiel neatingebla alpa neĝkampo.

“Oni ĉasos nin,” kriis la kondukanto. “Ni estas apenaŭ duonvoje. Malgraŭ la malvarmo, ni devas kaŝiĝi ĉi tie dum kelka tempo—almenaŭ ĝis denove neĝas pli dense.”

Liaj dentoj kunklaketis.

“Kie staras la vendhaloj?” demandis Graham elrigardante. “Kie restas la popolo?” La alia viro ne respondis.

“*Rigardu!*” flustris Graham, kaŭris internen kaj silentiĝis.

La neĝo subite densiĝis denove, kaj glitante kun la kirloj el la nigra puto de la ĉielo venis io malklara kaj granda kaj rapidega. Tio malsupreniris per kruta kurbo kaj ĉirkaŭturniĝis, kun larĝaj flugiloj etenditaj, kaj sekvaĵo

el blanka kondensiĝanta vaporo malantaŭe. Ĝi leviĝis kun facila rapideco, kaj glitis supren en la aeron, ŝvebis horizontale antaŭen per larĝa kurbo, kaj remalaperis inter la vaporantaj neĝeroj. Kaj, tra la ripoj de ĝia korpo, Graham vidis du virojn, tre malgrandajn kaj viglajn, ŝajne serĉantaj la neĝajn spacojn ĉirkaŭe per binoklo. Dum sekundo ili montriĝis klare, tiam nebule tra densa neĝkirlo, tiam malgrande kaj malproksime, kaj post momento ili estis for.

“ Nun ! ” kriis lia kunulo. “ Venu ! ”

Li tiris la manikon de Graham, kaj senprokraste la du kuris blinde laŭ la arkado el feraĵo sub la ventmaŝinoj. Graham, senorde kurante, koliziis kun sia gvidanto, kiu ĵus ree turniĝis al li subite. Li sin trovis ne dek metrojn malproksime de nigra abismo. Tio etendiĝis pli foren ol li povis vidi dekstren kaj maldekstren. Ĝi ŝajnis bari al ili la iradon ambaŭdirekte.

“ Faru same, kiel mi, ” flustris la gvidanto. Li kuŝiĝis kaj rampis ĝis la rando, transstreĉis la kapon, kaj sin tordis ĝis unu kruro pendis. Li ŝajnis serĉi ion per la piedo, trovis ĝin, kaj iris glitante trans la randon en la abismon. Lia kapo reaperis. “ Tio estas breto, ” li flustris. “ En mallumo dum la tuta vojo. Faru same, kiel mi. ”

Graham hezitis, surgenuiĝis, rampis ĝis la rando, kaj spionis en veluran nigron. Dum naŭza momento li kuraĝis nek antaŭeniri nek reveni, tiam li sidiĝis kaj pendigis la kruron, sentis la manojn de la gvidanto, kiuj tiris lin, kaj spertis abomenan senton, ke li glitas trans la randon en nesondeblan profundecon; li plaŭdis, kaj trovis sin en ŝlima kanaletoj, nepenetreble malluma.

“ Ĉi tien, ” flustris la voĉo, kaj li komencis rampi laŭ la kanaletoj tra la fluetanta degelaĵo, premante sin kontraŭ la muro. Ili iradis tiel dum kelkaj minutoj. Li ŝajnis pasi tra cent gradoj de mizero, pasi minuton post minuto tra cent gradoj de malvarmo, malseko, kaj ellaciĝo. Post nelonge li ĉesis senti siajn manojn kaj krurojn.

La kanaletoj kliniĝis malsupren. Li rimarkis, ke ili nun staras multajn metrojn sub la suproj de la konstruaĵoj. Vicoj da fantomaj blankaj konturoj, kvazaŭ la fantomoj de kovritaj fenestroj, leviĝis super ilin. Ili atingis la finon

de ŝnurego ligita super unu el la blankaj fenestroj, malklare videbla, kaj falanta en nepenetreblajn ombrojn. Subite lia mano trafis tion de la gvidanto. "Silente!" flustris ĉi tiu tre mallaŭte.

Li rigardis supren surprizite, kaj vidis laflugilegojn de la flugmaŝino glitantaj malrapide kaj senbrue super ili trans la larĝan rubandon de neĝmakulita grizblua ĉielo. Post momento ĝi rekaŝiĝis.

"Restu senmova; ili ĵus turniĝas."

Dum iom da tempo ambaŭ ne moviĝis, tiam la kunulo de Graham stariĝis, kaj, etendante la manon al la ligajoj de la kablo, fuŝis je iaj neklaraj ŝnuroj.

"Kio tio estas?" demandis Graham.

La sola respondo estis malforta krio. La viro kaŭris senmova. Graham rigardis kaj vidis lian vizaĝon malklare. Li rigardegis la longan rubandon de ĉielo, kaj Graham, sekvante liajn okulojn, vidis la flugmaŝinon malproksima kaj malgranda. Tiam li rimarkis, ke la flugiloj etendiĝas ambaŭflanken, ke ĝi direktas sin kontraŭ ili, ke ĉiunomente ĝi pligrandiĝas. Ĝi sekvis la randon de la abismo al ili.

La movoj de la viro iĝis konvulsiaj. Li ŝovis du krucajn stangojn al la mano de Graham. Graham ne povis vidi ilin; li trovis ilian formon palpante ilin. Ili pendis per maldikaj ŝnuroj de la ŝnurego. Sur la ŝnuro troviĝis teniloj por la mano el iu mola elasta substanco. "Metu la krucon inter viajn krurojn," flustris la kondukanto histerie, "kaj premu la tenilojn. Premu firme, premu!"

Graham faris tion, kion li diris.

"Saltu," diris la voĉo, "Pro la nomo de la ĉielo, saltu!"

Dum unu gravega sekundo Graham ne kapablis paroli. Poste li ĝojis, ke la mallumo kaŝis lian vizaĝon. Li diris nenion. Li komencis tremi fortege. Li rigardis flanken al la rapida ombro, kiu glutis la ĉielon flugante al li.

"Saltu! Saltu—pro la Dia nomo! Aŭ oni nin kaptos," kriis la gvidanto de Graham, kaj pro la forto de sia pasio ŝovis lin antaŭen.

Graham konvulsie ŝanceliĝis, elpuŝis ĝeman krion, krion spite de si mem, kaj tiam, dum la flugmaŝino rapidis super ili, falis antaŭen en la puton de tiu mallumo, sidante sur la ligna kruco, kaj tenante la ŝnurojn per la tenego de morto. Io krakis, io frapis forte kontraŭ muron. Li

aŭdis la radon de la ŝnuraro zumi sur la ŝnurego. Li aŭdis la aeronauĵojn krei. Li sentis paron da genuoj, kiuj obtuze pikpremis lian dorson. . . . Li rapidis freneze tra la aero, falante tra la aero. Lia tuta forto restis ĉe liaj manoj. Li volis krei akre, sed li ne posedis spiron.

Li ĵetiĝis sub blindiga lumo kiu igis lin pli firme teni la ŝnurojn. Li rekonis la grandan straton kun la moviĝantaj vojoj, la pendantaj lumoj, kaj la interplektitaj traboj. Ili flugis supren kaj preter lin. Li spertis momentan impreson pri granda ronda buŝo malfermita por engluti lin.

Li denove sin trovis en mallumo, falante, falante, premante per doloraj manoj, kaj jen ! tondra sono, brilego de lumo, kaj li flugis trans brile lumigitan halon kun muĝanta amaso da homoj sub liaj piedoj. La popolo ! Lia popolo ! Estrado rapidis supren al li, kaj lia ŝnurego pendis malsupren ĝis ronda malfermaĵo dekstre de tio. Li sentis, ke li veturas multe pli malrapide, kaj, subite, tre multe pli malrapide. Li distingis kriojn : "Savita ! La Majstro. Li estas libera !" La estrado flugis al li kun multe malpliiganta rapideco. Tiam—

Li aŭdis la viron, kiu venis post li, krei kvazaŭ subite timigita, kaj tiu krio estis eĥita de krio de sube. Li sentis, ke li jam ne glitas sur la ŝnurego, sed falas kune kun tio. Okazis tumulto el konfuzitaj krioj. Li sentis ion malmolan kontraŭ sia etendita mano, kaj la kunfrapo de malhelpita falo tremis tra lia brako. . . .

Li volis resti trankvila, sed oni levis lin. Li kredis poste, ke oni portis lin al la estrado kaj donis al li trinkaĵon, sed li neniam certe sciis pri tio. Li ne rimarkis, kio okazis al lia gvidanto. Kiam lia cerbo ree klariĝis, li sin trovis staranta ; avidaj manoj helpis lin stariĝi. Li restis en granda alkovo okupanta la lokon, kie dum lia antaŭa vivo staris la malsupraj loĝioj. Se tio vere estis teatro.

Fortega tumulto sonis en liaj oreloj, tondra muĝado, la krioj de sennombra homamaso. "Jen la Dormanto ! La Dormanto troviĝas inter ni !"

"La Dormanto troviĝas kun ni ! La Majstro—la Posedanto ! La Majstro troviĝas inter ni. Li estas savita."

Graham spertis ondantan vizion pri granda halo plena de homoj. Li ne vidis individuojn, li konsciis nur pri

ŝaŭmo el rozaj vizaĝoj, pri svingataj brakoj kaj vestoj, li sentis la okultan influon de grandega amaso fluanta super li, subtenanta lin. Li vidis balkonojn, galeriojn, grandajn arkaĵojn kun malproksimaj perspektivoj, kaj ĉie homojn, vastan amfiteatron da homoj, dense enpakitaj kaj aklamantaj. Trans la pli proksima spaco kuŝis la falinta ŝnurego kvazau monstra serpento. La viroj en la flugmaŝino tranĉis ĝin ĉe la supra fino, kaj ĝi dekirliĝis en la halon. Ŝajnis, ke homoj klopodas, tirante ĝin for de la spaco. Sed la tuta efekto estis nebula, la konstruaĵoj mem tremis kaj saltis pro la sonego de la voĉoj.

Li staris ŝanceliĝe kaj rigardis tiujn ĉirkaŭe. Iu subtenis lin per unu brako. "Lasu min en malgrandan ĉambron," li diris, plorante, "malgrandan ĉambron," kaj ne povis diri plu. Li konsciis pri ŝajnaj oficistoj, kiuj malfermis pordon antaŭ li. Iu gvidis lin al seĝo. Li faletis. Li sidigis peze, kaj kovris sian vizaĝon per la manoj; li fortege tremis, lia nerva kontrolo jam elĉerpiĝis. Oni liberigis lin de la mantelo, li ne povis memori kiamaniere; li vidis, ke liaj purpuraj ŝtrumpoj estas nigraj de malseko. Homoj kuris ĉirkaŭ li, aferoj okazis, sed dum longa tempo li ne atentis ilin.

Li estas libera. Miriado da krioj diris tion al li. Li estas ekster danĝero. Tiuj estas la homoj de lia partio. Dum tempospaco li spiregis ĝeme, kaj tiam li sidis kviete kun la vizaĝo kovrita. La aero ŝajnis plena de la kriadado de sennombraj homoj.



ĈAPITRO NAŬA.

LA POPOLO MARŜAS

LI rimarkis, ke iu instigas lian atenton pri glaso da klara fluidaĵo, rigardis supren, kaj trovis, ke tiu estas malhela junulo flave vestita. Li glutis tuj la dozon, kaj post momento li sin sentis tute varma. Altkreska viro kun nigra robo staris apud lia ŝultro, kaj montris fingre la duone malfermitan pardonon al la halo. Tiu viro kriegis proksime de lia orelo, kaj tamen tio, kion li diris, estis neklara pro la bruego el la granda teatro. Malantaŭ la viro staris knabino, vestita per arĝente griza robo, kaj Graham, eĉ tra tiu konfuziĝo, rimarkis ke ŝi estas bela. Ŝiaj malhelaj okuloj, plenaj de miro kaj scivolo, fiksiĝis al li, ŝiaj lipoj tremetis aparte. Duone malfermita pordo ekvidigis la homplenan halon kaj enlasis vastan ŝveleman tumulton, frapadon, aplaŭdadon kaj kriadon, kiuj mallaŭtiĝis kaj rekomenciĝis, kreskante al tondra nivelo, kaj tiel daŭris intermite la tutan tempon, dum Graham restis en la ĉambreto. Li rigardis la lipojn de la nigre vestita viro, kaj komprenis, ke tiu klarigas ion.

Li rigardadis stulte dum kelkaj momentoj tiujn aferojn kaj tiam abrupte stariĝis; li ekpemis la brakon de la krieganto.

“Diru al mi!” li kriis. “Kiu mi estas? Kiu mi estas?”

La aliaj pli alproksimiĝis por aŭdi liajn vortojn. “Kiu mi estas?” Liaj okuloj priserĉis iliajn vizaĝojn.

“Oni nenion diris al li!” kriis la knabino.

“Diru—diru al mi!” kriis Graham.

“Vi estas la Mastro de la Tero. Vi estas la posedanto de la mondo.”

Li ne kredis, ke li aŭdas ĝuste. Li kontraŭis la ideon. Li ŝajnis ne kompreni, ne aŭdi. Li levis denove la voĉon.

“Mi jam maldormas tri tagojn—malliberulo dum tri tagoj. Mi divenas, ke okazas barakto inter multaj de homoj en ĉi tiu urbo—ĉu ĝi estas Londono?”

“Jes,” diris la pli juna viro.

“Kaj tiuj, kiuj kunvenas en la granda halo kun la blanka Atlas? Kiel tio koncernas min? Iel tio koncernas min. *Kial*, mi ne scias. Drogoj? Ŝajnas por mi, ke dum mi dormis, la mondo freneziĝis. Mi mem freneziĝis. . . . Kiuj estas tiuj Konsilantoj sub la Atlas? *Kial* ili penis drogi min?”

“Por teni vin senkonscia,” diris la flave vestita viro. “Por malhelpi, ke vi vin intrudu.”

“Sed *kial*?”

“Pro tio, ke vi mem estas Atlas, Majstro,” diris la flavvestito. “La mondo kuŝas sur viaj ŝultroj. Ili regas ĝin laŭ via rajto.”

Jam mallaŭtiĝis la sonoj el la halo ĝis silento transirata de sola unutona voĉo. Nun subite, kvazaŭ surpaŝegante tiujn lastajn vortojn, aŭdiĝis surdiga bruego, muĝado kaj tondrado, akلامo post akلامo, voĉoj raŭkaj kaj akresonaj, batante, reciproke sin trafluante, kaj, dum tio daŭris, la personoj en la ĉambreto ne povis aŭdi la kriojn unu de aliaj.

Graham staradis, lia atento tenis sin senpove al tio, kion li ĵus aŭdis. “La Konsilantaro,” li ripetis stulte, kaj tiam ekkaptis nomon, kiu antaŭe trafis lian atenton. “Sed kiu estas Ostrog?” li diris.

“Li estas la organizinto—la organizinto de la ribelo. Nia ĉefo—per via aŭtoritato.”

“Mia aŭtoritato?—Kaj vi? *Kial* li ne ĉeestas ĉi tie?”

“Li—deputis nin. Mi estas lia frato, lia duonfrato, Lincoln. Li deziras, ke vi vin montru al tiuj homoj kaj poste venu al li. Pro tio li sendis al vi. Li restas en la oficejo de la ventmaŝinoj, direktante ĉion. La popolo marŝas.”

“Per via aŭtoritato,” kriis la pli juna viro. “Ili regis, subpremis, tiranis. Fine eĉ—”

“Per mia aŭtoritato! *Mia*! La mastro?”

La junulo subite aŭdebligis tra paŭzo en la ekstera tondro, indigna kaj laŭtvoĉa, kun alta penetra voĉo sub sia ruĝa agleca nazo kaj densaj lipharoj. “Neniu atendis,

ke vi vekigōs. Neniu atendis, ke vi vekigōs. Ili estis ruzaj. La damnindaj tiranoj ! Sed ili sin trovis en dilemo. Ili ne sciis, ĉu drogi vin, hipnoti vin, mortigi vin.”

Denove la halo regis ĉion.

“ Ostrog staras preta ĉe la oficejo de la ventmaŝinoj. Eĉ nun venas onidiro pri ekbatalado.”

La viro kiu sin nomis Lincoln alproksimiĝis al li. “ Ostrog jam planis ĝin. Fidu al li. Ni posedas pretajn niajn organizojn. Ni kaptos la flugmaŝinajn staciojn—. Eĉ nun li eble faras tion. Poste—”

“ Tiu publika teatro,” kriegis la flave vestita viro, “ nur enhavas kontingenton. Ni posedas kvin miriadojn da dresitaj homoj—”

“ Ni havas armilojn,” kriis Lincoln. “ Ni havas planojn. Ĉefon. Ili polico foriris de la stratoj kaj nun amasiĝas en la—” (neaŭdebla). “ Nun aŭ neniam estas la okazo. La Konsilantaro ŝanceliĝas. Ili ne povas fidi eĉ siajn dresitojn—”

“ Aŭdu la popolon, kiu vokas vin ! ”

La spirito de Graham estis kvazaŭ nokto de lunlumo kun rapidaj nuboj ; jen malluma kaj senespera, jen klara kaj palluma. Li estis la Mastro de la Tero, li estis viro tramalsekigita de degelanta neĝo. El ĉiuj liaj diversaj impresoj la ĉefoj montris konflikton ; unufanke staris la Blankaj Konsilantoj, potencaj, disciplinitaj, nemultaj, la Blankaj Konsilantoj de sub kiuj li ŝus liberiĝis ; kaj aliflanke grandegaj amasoj, kunpremitaj amasoj da nedistingeblaj homoj kriegantaj lian nomon, salutantaj lin kiel Mastron. La alia flanko jam malliberiĝis lin, debatis lian morton. Tiuj vokantaj miloj tra la pordeto savis lin. Sed la kialon de tiuj aferoj li ne povis kompreni.

La pordo malfermiĝis, la voĉo de Lincoln estis forviŝita kaj dronigita, kaj kuro de homoj sekvis post la tumulto. La intrudantoj venis al li kaj Lincoln gestante. La eksteraj voĉoj klarigis la dirojn de iliaj sensonaj lipoj. “ Montru al ni la Dormanton, montru la Dormanton ! ” estis la ĥoraĵo de la tumulto. Viroj kriegis : “ Ordo ! Silento ! ”

Graham ekrigardis la malfermitan pordon, kaj vidis altan oblongan bildon de la ekstera halo—ondiganta, senĉesa konfuziĝo el amasigitaj, kriantaj vizaĝoj, viroj kun

virinoj, svingantaj palbluajn vestaĵojn, etenditajn manojn. Multaj staris. Unu viro kun ĉifonitaj vestoj el malhela bruno, maldikega figuro, staris sur la benko kaj svingis nigran tukon. Graham renkontis la miron kaj atendon en la okuloj de la knabino. Kion tiuj homoj atendas de li? Li nebule rimarkis, ke la ekstera tumulto jam ŝanĝis sian karakteron, ŝajnis iamaniere takta, marŝanta. Lia propra spirito ankaŭ ŝanĝiĝis. Dum iom da tempo li ne rekonis la influon, kiu aliigas lin. Sed momento, kiam li alproksimiĝis al paniko, pasis for. Li provis aŭdebligi demandojn pri tio, kion oni volas de li.

Lincoln kriis ĉe lia orelo, sed Graham estis surda al tio. Ĉiuj aliaj krom la virino gestis al la halo. Li komprenis tion, kio la tumulto nun fariĝis. La tuta homamaso kantas kune. Tio ne sole estis kanto, sed la voĉoj ankaŭ kuniĝis kaj leviĝis sur fluego da instrumenta muziko, muziko kia tiu de orgeno, plektita teksaĵo el sonoj, plena de trumpetoj, plena de paraditaj standardoj, plena de la marŝado kaj pompo de komenciĝanta milito. Kaj la piedoj de la homoj batis la takton—paŝ', paŝ', paŝ'!

Oni instigis lin al la pordo; li obeis aŭtomate. La forto de tiu solena kanto ekprenis lin, agitis lin, kuraĝigis lin. La halo malfermiĝis al li, vasta miksiĝo el tremanta koloro, svingiĝanta sub la muziko.

“Svingu al ili vian brakon,” diris Lincoln. “Svingu vian brakon al ili.”

“Jen,” diris voĉo ĉe la alia flanko, “li devas havi tion.” Brakoj sentiĝis ĉirkaŭ lia kolo, detenante lin ĉe la pordo, kaj nigra subtile faldiĝanta mantelo pendis de liaj ŝultroj. Li svingis sian brakon libera el tiu kaj sekvis Lincoln. Li vidis apud si la grize vestitan knabinon, kun arda vizaĝo kaj antaŭeniga gesto. Momente ŝi fariĝis por li, tiom ŝi aspektis emocia kaj avida, la enkorpiĝo de la kanto. Li eliris denove en la alkovon. Senprokraste la leviĝantaj ondoj de la kanto falis kiam li aperis, kaj ŝvelis ĝis ŝaŭmo de kriegoj. Gvidate de la mano de Lincoln, li paŝis oblikve trans la centron de la estrado antaŭ la popolo.

La halo estis vasta kaj malsimpla spaco—galerioj, balkonoj, larĝaj spacoj el amfiteatraj ŝtupegoj, kaj grandaj arkaĵoj. Malproksime, alte, la elirejo de granda koridoro

ŝajnis plena de baraktantaj homoj. La tuta ĉeestantaro svingiĝis en kunpremitaj amasoj. Unuopaj figuroj sin ĵetis el la tumulto, impresis lin momente, kaj denove perdiĝis. Apud la estrado svingiĝis blonda belulino, portata de tri viroj, kun la haroj trans ŝia vizaĝo kaj gestanta per verda bastono. Proksime de tiu grupo zorgolaca maljunulo subtenis sin malfacile en la premiĝo, kaj post li kriis senhara vizaĝo kun granda kavaĵo de sendenta buŝo. Voĉo vokis la enigman vorton "Ostrog." Ĉiuj liaj impresoj estis nebulaj, krom la peza emocio de la marŝiga kanto. La amaso per piedoj batis la takton—paŝante sen ŝanĝo de loko, paŝ', paŝ', paŝ', paŝ'! La verdaj armiloj svingiĝis, brilis, kliniĝis. Tiam li rimarkis, ke la homoj plej proksimaj de li, sur ebena spaco antaŭ la estrado, marŝas antaŭ li, pasante al granda arkaĵo, kriante "Al la Konsilantaro!" Paŝ', paŝ', paŝ', paŝ'! Li levis la brakon, kaj la muĝado duobliĝis. Li memoris, ke li devas krei "Marŝu!" Lia buŝo formis neaŭdeblajn, heroecajn vortojn. Li levis la brakon denove, kaj montris al la arkaĵo, kriante "Antaŭen!" Ili ne plu paŝis senprogrese, ili nun marŝis; paŝ', paŝ', paŝ', paŝ'! En tiu amaso troviĝis barbuloj, maljunuloj, junuloj, virinoj nudbrakaj kun flirtantaj roboj, knabinoj. Homoj de la nova epoko! Riĉaj roboj, grizaj ĉifonaĵoj flirtis kune en la kirligo de sia movado inter la ĉievidata bluo. Vasta nigra standardo ŝanceliĝis dekstren. Li vidis bluestitan negron, sulkiĝintan virinon flave vestitan, poste grupo da viroj altkreskaj, blondaj, blankvizaĝaj, bluestitaj, sin ŝovis dramece preter li. Li rimarkis du hinojn. Altkreska, flaveta, nigrehara, brilokula junulo, blanke vestita de kapo ĝis piedoj, grimpis supren al la estrado, kriante lojale, kaj resaltis malsupren, kaj foriris, rigardante malantaŭen. Kapoj, ŝultroj, manoj tenantaj armilojn, ĉiuj svingiĝis sub tiuj marŝigaj kadencoj.

Vizaĝoj aperis al li el la konfuziĝo dum li staris tie, okuloj renkontis liajn, kaj preterpasis kaj malaperis. Homoj gestis al li, kriante neaŭdeblajn personaĵojn. La plejparto de la vizaĝoj estis ruĝaj pro ekscitiĝo, sed multaj estis mortece palaj. Kaj malsaneco troviĝis tie, kaj multaj manoj, kiuj svingiĝis al li, estis maldikaj kaj enkaviĝintaj. Homoj de la nova epoko! Stranga kaj nekredbla renkonto! Dum la larĝa fluo pasis dekstren

preter li, enfluantaj vicoj el la malproksimaj altaĵoj de la halo sin ŝovis malsupren kun senĉesa anstataŭiĝo de homoj ; paŝ', paŝ', paŝ', paŝ' ! La unisono de la kanto riĉiĝis kaj komplikiĝis de la pezaj eĥoj el arkaĵoj kaj koridoroj. Viroj kaj virinoj miksiĝis en la vicoj ; paŝ', paŝ', paŝ', paŝ' ! La tuta mondo ŝajnis marŝi. Paŝ', paŝ', paŝ'. paŝ' ; lia cerbo ankaŭ paŝis. La vestaĵoj flirtis antaŭen, la vizaĝoj preterfluis pli abunde.

Paŝ', paŝ', paŝ', paŝ' ; pro la tuŝo de Lincoln li sin turnis al la arkaĵo, paŝante senkonscie laŭ tiu ritmo, apenaŭ rimarkante sian moviĝon pro ĝia melodio kaj ekscitiĝo. La amaso, la gesto kaj kanto, ĉiuj moviĝis tien, la homa fluo etendiĝis malsupren, ĝis la suprenturnitaj vizaĝoj kuŝis sub la nivelo de liaj piedoj. Li vidis antaŭ si vojjon, ĉirkaŭ si sekvantaron, gardantojn kaj eminentulojn, kaj ĉe sia dekstra mano Lincolnon. Servistoj intervenis, kaj foje kaj ree kaŝis al li la amason maldekstre. Antaŭ li aperis la dorsoj de la gardantoj nigre vestitaj, trion post trio post trio. Li marŝis laŭ ĉirkaŭbarita vojeto, kaj transiris super la arkaĵo, dum la homfluo malsupreniris por preteriri sube kaj kriis supren al li. Li ne sciis, kien li iras ; li ne volis scii. Li rigardis posten trans la brilega spaco de la halo. Paŝ', paŝ', paŝ', paŝ' !

ĈAPITRO DEKA.

LA BATALO EN LA MALLUMO.

LI jam ne sin trovis en la halo. Li marŝis laŭ galerio superpendanta unu el la strategoj kun moviĝantaj trotuaroj, kiuj transiris la urbon. Antaŭ kaj post li paŝis liaj gardantoj. Sube, la tuta kavaĵo de la moviĝantaj vojoj ŝajnis kunpremita amaso da marŝantaj homoj, kiuj paŝis maldekstren, kriante, svingante brakojn kaj manojn, fluante laŭ grandega perspektivo, kriante kiam ili unue aperis, kriante dum ili preterpasis, kriante dum ili foriris, ĝis la perspektivo el globoj de elektra lumo ŝajne falis malsupren kaj kaŝis la svarmantajn nudajn kapojn. Paŝ', paŝ', paŝ', paŝ' !

Nun al Graham la kanto muĝis supren, ne plu subtenata de la muziko, sed kruda kaj bruema, kaj la batado de la marŝantaj piedoj, paŝ', paŝ', paŝ', paŝ', interplektiĝis kun la tondra nereguleco de la paŝoj de la sendisciplina amaso, kiu fluegis sur la plej altaj vojoj.

Abrupte li rimarkis kontraston. La konstruaĵoj kontraŭflanke de la vojo ŝajnis malplenaj, la ŝnuregoj kaj pontoj kiuj plektiĝis trans la arkadegon estis malplenaj kaj ombraj. La penso trafis lian cerbon, ke ankaŭ tiuj devus esti homplenaj.

Li sentis strangan emociion—pulsadon—tre rapidan ! Li denove haltis. La gardantoj antaŭ li daŭre marŝis ; tiuj apud li haltis kun li. Li vidis maltrankvilecon kaj timon sur iliaj vizaĝoj. La pulsado iel rilatis al la lumoj. Ankaŭ li rigardis supren.

Unue tio ŝajnis por li afero, kiu rilatas sole la lumojn, izolita fenomeno, nekoncernanta la subajn okazaĵojn. Ĉiu globo el blindiga blankeco aspektis kvazaŭ kaptita, kunpremita de enpulso, kiu sekviĝis de nedaŭra elpulso,

kaj denova enpulo kiel pli firma premo ; mallumo, lumo, mallumo, per rapida alterniĝo.

Graham vidis, ke tiu stranga konduto de la lumo rilatas ankaŭ la homojn sube. La aspekto de la domoj kaj vojoj, la aspekto de la kunpremitaj amasoj ŝanĝiĝis, fariĝis konfuziĝo el vivaj lumoj kaj saltantaj ombroj. Li rimarkis, ke amaso da ombroj jam ekkreskis ĝis minaca ekzisto ; ili ŝajnis suprenflui, larĝiĝi, profundigi, kreski kun firma rapideco—ŝajnis salti subite malantaŭen kaj reveni pli multnombraj. La kanto kaj la marŝo jam ĉesis. La unuanima marŝo, li trovis, estas haltigita. Ekzistis flankfluo, kirliĝoj, krioj : “ La lumoj ! ” Voĉoj kune kriis unu solan diron. “ La lumoj ! ” kriis tiuj voĉoj. “ La lumoj ! ” Li rigardis malsupren. En tiu dancanta morto de la lumoj la spaco de la strato subite fariĝis monstra baraktado. La blankaj globoj fariĝis purpurblankaj, purpuraj kun ruĝa nuanco, flagris, flagretis pli kaj pli rapide, hezitis inter lumo kaj estingiĝo, ĉesis flagri kaj fariĝis nur velkantaj eroj arde ruĝaj en vasta mallumo. Post dek sekundoj la estingiĝo kompletigis, kaj restis nur la muĝanta mallumo, nigra monstraĵo, kiu ĵus subite glutis tiujn brilajn miradojn da homoj.

Li sentis ĉirkaŭ si nevideblajn formojn ; liaj brakoj estis tenataj. Io frapis akre kontraŭ lia tibio. Voĉo kriis ĉe lia orelo, “ Ĉio estas bona—estas bona.”

Graham forĵetis la paralizon de sia unua miro. Li frapis hazarde sian frunton kontraŭ tiu de Lincoln kaj kriis, “ Kio estas ĉi tiu mallumo ? ”

“ La Konsilantoj haltigis la fluojn kiuj lumigas la urbegon. Ni devas atendi—resti. La popolo daŭre iros. Ili—”

Lia voĉo droniĝis. Voĉoj kriis, “ Savu la Dormanton. Prizorgu la Dormanton.” Gardisto falis kontraŭ Grahamon kaj vundetis al li la manon per senintenca frapo de sia armilo. Freneza tumulto leviĝis kaj kirliĝis ĉirkaŭ li, ŝajne iĝante pli laŭta kaj pli furioza ĉiumomente. Fragmentoj de rekoneblaj sonoj fluis al li, kaj forkirliĝis de li kiam lia atento streĉiĝis por kapti ilin. Voĉoj ŝajnis krii kontraŭajn ordonojn, aliaj voĉoj respondis. Subite aŭdiĝis sinsekvo da akraj ŝirkrioj proksime sub ili.

Voĉo kriigis ĉe lia orelo, “ La ruĝa polico,” kaj foriris de lia demandado.

Kraketa sono kreskis ĝis distingebleco, kaj kun ĝi saltetis malfortaj ekbriloj sur la rando de la pli malproksimaj vojoj. Per ilia lumo Graham vidis salti en momentan mallklaran videblecon la kapojn kaj korpojn de aro da viroj, armitaj per armiloj similaj al tiuj de liaj gardantoj. La tuta spaco komencis kraketi, ekbrili per etaj momentaj lumstrioj, kaj abrupte la mallumo ree deruliĝis kvazaŭ kurteno.

Brilega lumo konfuzis liajn okulojn, vasta bolanta etendaĵo de baraktantaj homoj konfuzis lian cerbon. Kriego, sono de aklamo, venis trans la vojojn. Li rigardis supren por vidi la kaŭzon de la lumo. Alte super viro pendis de la pli alta parto de kablo, tenante per ŝnureto la blindigan stelon, kiu forpelis la mallumon.

La rigardo de Graham refalis al la vojoj. Ruĝa kojno je iom da distanco laŭlonge de la perspektivo kaptis lian atenton. Li vidis, ke tio estas densa amaso da ruĝe vestitaj homoj kunpremitaj sur la plej alta kontraŭa vojo, kun dorsoj kontraŭ la senkompata klifo de konstruaĵo, kaj ĉirkaŭitaj de densa amaso da kontraŭuloj. Ili batalis. Armiloj leviĝis kaj briletis, kaj malleviĝis; kapoj malaperis ĉe la rando de la batalo, kaj aliaj kapoj anstataŭis ilin; la ekbriloj el la verdaj armiloj fariĝis ŝprucoj de fumgrizo dum la lumo daŭris.

Abrupte la lumigilo estingiĝis kaj la vojoj denove estis nigrega mallumo, tumulta mistero.

Li sentis ion puŝata kontraŭ li. Oni ŝovis lin laŭlonge la galerion. Iu kriis—eble al li. Li sentis sin tro konfuzita por aŭdi. Li estis ŝovata kontraŭ la muron, kaj multe da homoj fuŝiris preter li. Ŝajnis al li, ke liaj gardantoj baraktas unu kontraŭ alia.

Subite la kable pendants stelportanto reaperis, kaj la tuta sceno fariĝis blanka kaj brilega. La aro da ruĝvestitoj ŝajnis pli larĝa kaj pli proksima; ĝia pinto atingis duone laŭlonge la vojon al la meza arkadego. Kaj, levante la rigardon, Graham vidis, ke kelke da tiuj jam aperis en la mallumaj malsupraj galerioj de la kontraŭa konstruaĵo, kaj pafas super la kapojn de siaj kunuloj al la bolanta konfuziĝo de homoj sur la malsupraj vojoj. La signifo de tiuj vidaĵoj trafis lin. La popola marŝo renkontis embuskon je la komenco mem. Konfuzite de la estingiĝo

de la lumoj, ili nun estas atakataj de la ruĝa polico. Tiam li rimarkis, ke li staras sola, ke liaj akompanantoj kun Lincoln troviĝas en la galerio, je la direkto laŭ kiu li mem venis antaŭ ol mallumiĝis. Li vidis, ke oni gestas freneze al li, kuras rapide returne al li. Laŭtega kriado venis de trans la vojoj. Poste ŝajnis kvazaŭ la tuta fasado de la malluma kontraŭa konstruaĵo estas kovrita kaj makulita de ruĝvestitaj viroj. Kaj ili montras al li fingre, kaj krias. "La Dormanto! Savu la Dormanton!" kriis miloj da gorgoj.

Io frapis la muron super lia kapo. Li rigardis pro la frapo kaj vidis stelforman plaŭdaĵon el arĝenteca metalo. Li vidis apud si Lincolnon. Sentis sian brakon ekprenata. Tiam, pt, pt, oni maltrafis lin dufoje.

Dum momento li ne komprenis tion. La strato kaŝiĝis, ĉio kaŝiĝis, dum li rigardis. La dua flagraĵo forbruliĝis.

Lincoln tenis Grahamon je la brako kaj tiris lin laŭ la galerio. "Antaŭ ol la proksima lumo!" li kriis. Lia hasto estis kontagiata. La instinkto de Graham por sin savi venkis la paralizon de lia nekredema surprizo. Li fariĝis dumtempe blinda posedaĵo de la morttimo. Li kuradis, faletante pro la necerteco de la mallumo, fuŝiris kontraŭ siajn gardantojn dum ili turniĝis por kuri kun li. La rapideco estis lia sola deziro, liberiĝo de tiu danĝera galerio sur kiu li staras malkaŝita. Tria brilego aperis baldaŭ post la antaŭa. Kun ĝi aŭdiĝis kriegado trans la vojoj, kun responda tumulto de la vojoj mem. La ruĝvestitoj sube, li vidis, jam preskaŭ atingis la mezan koridoron. Iliaj sennombraj vizaĝoj estas turnitaj al li, kaj ili kriegas. La blanka kontraŭa fasado estas dense makulita de ruĝo. Ĉiuj ĉi mirindaĵoj kiuj koncernas lin, turniĝas ĉirkaŭ li kiel pivoto. Tiuj estas la servantoj de la Konsilantoj, kiuj penas rekapti lin.

Por li estis bonŝance, ke tiuj estis la unuaj kugloj kolere pafitaj dum cent kvindek jaroj. Li aŭdis la kuglojn frapi super lia kapo, sentis peceton de fandita metalo piki lian orelon, kaj rimarkis, ne rigardante, ke la tuta kontraŭa fasado, malkaŝita embusko de la ruĝa polico, estas homplena kaj kriegas kaj pafas je li.

Unu el la gardantoj falis antaŭ li, kaj Graham, nekapabla halti, saltis trans la tordiĝantan korpon.

Post plua sekundo li sin ĵetis, ne tuŝita, en nigran koridoron, kaj senzorge iu, eble venante transen, fuŝiris fortege kontraŭ lin. Li rapidis malsupren de ŝtuparo sub tuta mallumo. Li ŝanceliĝis, kaj estis ree frapita, kaj iris kun la manoj kontraŭ muron. Li estis premegata de la pezo de baraktantaj formoj, kirlata ĉirkaŭe, kaj ŝovata dekstren. Premego tenis lin. Li ne povis spiri—liaj ripoj ŝajnis rompiĝi. Li sentis momentan moderiĝon, kaj tiam la tuta amaso da homoj moviĝis kune, portis lin returne al la granda teatro, de kie li nur lastatempe venis. Okazis momentoj, dum kiuj liaj piedoj ne tuŝis la teron. Tiam li ŝanceliĝis kaj sin ŝovis antaŭen. Li aŭdis kriojn, “Ili venas!” kaj obtuzan krion apude. Lia piedo iris kontraŭ ion molan, li aŭdis raŭkan ŝirkrion subpiede. Li aŭdis kriojn, “La Dormanto!” sed li sin sentis tro konfuzita por paroli. Li aŭdis la verdajn armilojn kraketi. Dum iom da tempo li perdis la propran volon, fariĝis atomo en paniko blinda, senpensa, aŭtomata. Li ŝovis sin antaŭen kaj posten, kaj tordis sin pro la premado, frapis per la piedo baldaŭ kontraŭ ŝtupon, kaj sin trovis supreniranta deklivon. Kaj abrupte la vizaĝoj ĉirkaŭ li saltis el la nigreco, videblaj, mortece blankaj kaj surprizitaj, timigitaj, ŝvitantaj sub palega brilo. Unu vizaĝo, de junulo, aperis tre proksime de li, ne distance pli ol kvindek centimetrojn. Tiam, tio nur ŝajnis negrava okazaĵo sen valoro aŭ emocio, sed poste ĝi revenis al li dum liaj sonĝoj. Ĉar la junulo, tenata rekte de la amaso dum kelka tempo, antaŭe vundiĝis kaj jam estis mortinta.

Kredeble kvara blanka stelo estis ekbruligita de la viro sur la kablo. Ĝia lumo enbrilegis tra vastaj fenestroj kaj arkaĵoj, kaj montris al Graham, ke li nun estas ero de densa amaso da flugantaj nigraj formoj, repremataj trans la malsupran spacon de la granda teatro. Tiun fojon la bildo estis palega kaj fragmenta, tranĉita kaj striita de nigraj ombroj. Li vidis, ke tute apud li la ruĝaj gardistoj batalas por vojo tra la amaso. Li ne povis scii, ĉu ili jam vidis lin. Li serĉis Lincolnon kaj siajn gardantojn. Li vidis Lincolnon apud la estrado de la teatro ĉirkaŭitan de aro da revolucianoj kun nigraj insignoj; tiu jam leviĝis kaj rigardegis ĉirkaŭen kvazaŭ por serĉi lin. Graham rimarkis, ke li mem staras apud la kontraŭa rando de la amaso, ke

malantaŭ li, apartigitaj de barilo, kliniĝas la nun vakaj sidlokoj de la teatro. Subita ideo trafis lin, kaj li komencis barakti por vojo al la barilo. Ĝuste kiam li atingis ĝin la brilego finiĝis.

Tuj li dejetis la grandan mantelon, kiu ne nur malhelpis liajn movojn sed ankaŭ igis lin rimarkebla, kaj ĝi forglitis de liaj ŝultroj. Li aŭdis iun faleti en ĝiaj faldaĵoj. Post plua minuto li supersaltis la barilon kaj falis en la transan mallumon. Tiam, palpe serĉante sian vojon, li venis al la malsupra fino de kliniĝanta galerio. En la mallumo la sono de pafado haltis kaj la muĝo de piedpaŝoj kaj voĉoj kvietiĝis. Tiam subite li atingis neatenditan ŝtupon kaj ŝanceliĝis kaj falis. Dume lagoj kaj insuloj inter la mallumo ĉirkaŭ li saltis ree en vivan lumon, la tumulto ŝvelis pli laŭte, kaj la brilego de la kvina blanka stelo venis tra la vastaj fenestrotruoj de la muroj de la teatro.

Li ruliĝis inter kelkajn benkojn, aŭdis kriegadon kaj la zuman krakadon de pafiloj, baraktis por stariĝi, kaj trovis sin ree faligita; li vidis, ke kelke da viroj kun nigraj insignoj staras tute ĉirkaŭ li kaj pafas al la ruĝvestitoj sube, saltante de benko al benko, kaŭrante inter la benkoj por reŝarĝi pafilojn. Instinkte li ankaŭ kaŭris inter la benkoj, dum vagantaj kugloj ŝiris la pneŭmatajn kusenojn kaj tranĉis brilajn striojn sur iliaj molmetalaj strukturoj. Instinkte li notis la direkton de la trairejoj, la plej bonaj vojoj por sin savi tuj kiam la malluma vualo denove falos.

Junulo vestita per velkinta bluo alvenis saltante trans la benkojn. "Ha! Jen!" li diris, kun siaj etenditaj piedoj malproksimaj malpli ol dekkvin centimetrojn de la vizaĝo de la kaŭranta Dormanto.

Li rigardis lin sen ia signo de rekono, turniĝis por pafi, pafis, kaj kriante, "Al la infero la Konsilantoj!" pretiĝis por denove pafi. Tiam ŝajnis al Graham, ke la duono de la kolo de tiu viro ĵus malaperis. Guto de malsekajo falis sur la vango de Graham. La verda pafilo haltis duone levita. Dum momento la viro staris, senmova, lia vizaĝo subite senesprima, tiam li komencis kliniĝi antaŭen. Liaj genuoj fleksiĝis. La viro kaj la mallumo kune defalis. Je la sono de lia falo Graham leviĝis kaj kuris freneze ĝis malsuprenira ŝtupo faligis lin. Li rampe tariĝis, turniĝis laŭ la trairejo, kaj daŭre kuris.

Kiam la sesa stelo brilegis, li jam sin trovis apud la abisma gorgo de koridoro. Li kuris pli rapide pro la lumo, eniris la koridoron, kaj turniĝis ĉirkaŭ angulo en absolutan nokton denove. Oni puŝbatis lin flanken, li ruliĝis, kaj restariĝis. Li trovis sin inter amaso da nevideblaj forkurantoj rapidantaj unudirekten. Lia sola nuna penso estis ankaŭ ilia penso ; sin liberigi el tiu batalo. Li puŝis kaj frapis, ŝanceliĝis, kuris, sin trovis fiksita, ŝoviĝis malantaŭen, kaj tiam denove staris libera.

Dum kelkaj minutoj li kuris tra la mallumo laŭ serpenta koridoro, kaj tiam li transiris larĝan malfermitan spacon, pasis laŭ longa deklivo, kaj fine venis malsupren de ŝtuparo al ebena loko. Multaj homoj kriis, " Ili venas ! La polico venas. Ili pafas. Iru for de la batalo. La polico pafas. Estas sendanĝere en la Sepa Vojo. Ĉi tien al la Sepa Vojo ! " Krom viroj troviĝis en la amaso ankaŭ virinoj kaj infanoj.

La amaso kunpremiĝis ĉe arkaĵo, pasis tra mallonga gorgo, kaj reeliris al pli larĝa spaco, nur malforte luma. La nigraj formoj ĉirkaŭ li disiĝis kaj kuris supren de io, kio ŝajnis sub la krepusko esti giganta serio da ŝtupoj. Li sekvis ilin. La homoj foriris dekstren kaj maldekstren. . . . Li rimarkis, ke li ne plu staras inter amaso. Li haltis apud la plej alta ŝtupo. Antaŭ li, sur tiu nivelo, staris grupoj da benkoj kaj eta kiosko. Li alproksimiĝis al tiu, kaj, haltante sub la ombro de ĝiaj randoj, ĉirkaŭrigardis senspire.

Ĉio aspektis nebula kaj griza, sed li vidis, ke tiuj ŝtupegoj estas serio de trotuaroj de la " vojoj," nun ne plu moviĝantaj. La trotuaro kliniĝis supren ambaŭflanke, kaj la altaj konstruaĵoj leviĝis kontraŭe kiel vastaj fantomoj ; iliaj skribaĵoj kaj anoncoj estis malklare videblaj. Supre tra la trabegoj kaj kabloj vidiĝis nebula interrompita rubando de pala ĉielo. Multaj homoj preterrapidis. Laŭ iliaj krioj kaj voĉoj ŝajnis, ke ili iras por aliĝi al la batalo. Aliaj malpli bruemaj formoj pasis timeme inter la ombroj.

De tre malproksime sur la strato li povis aŭdi la sonon de barakto. Sed evidentiĝis al li, ke ĉi tiu ne estas la strato, en kiun la teatro malfermiĝas. Tiu antaŭa batalo ŝajne subite malaperis el aŭdebleco. Kaj oni batalas pro li !

Dum kelka tempo li sin sentis kiel viro, kiu paŭzas dum

legado en tre vivosimila libro, kaj subite dubas la realecon de tio, kion li antaŭe sendemande kredis. Tiam li ne havis atenton por detaloj ; la tuta efekto estis grandega surprizo kaj miro. Strange, kvankam lia kurado for de la malliberejo de la Konsilantaro, la granda homamaso en la halo, kaj la atako de la ruĝa polico kontraŭ la svarmanta popolo, estis tute klaraj en lia cerbo, tamen nur pene li povis aldoni sian vekigon kaj rememori la intertempon de meditado en la Silentaj Ĉambroj. Unue lia memoro saltis trans tiujn aferojn, kaj portis lin returne al la akvofalo ĉe Pentargen tremanta sub la vento, kaj ĉiuj malhelaj grandiozaĵoj de la marbordo de Cornwall. La kontrasto nuancigis ĉion per nerealeco. Kaj tiam la interspaco pleniĝis, kaj li komencis kompreni sian situacion.

Tio ne plu estis tute enigma, kiel antaŭe en la Silentaj Ĉambroj. Almenaŭ li nun posedis ĝian strangan nudan konturon. Iamaniere li estas la posedanto de la mondo, kaj grandaj politikaj partioj batalas por lin posedi. Unuflanke staras la Konsilantoj, kun sia ruĝa polico, ŝajne intencante nepre uzurpi lian havaĵon kaj eble murdi lin ; aliflanke troviĝas la revolucio, kiu liberigis lin, kun tiu nevidita Ostrog kiel ĉefo. Kaj la tuto de tiu giganta urbego konvulsiiĝas pro ilia baraktado. Freneza evoluo de lia mondo! " Mi ne komprenas," li kriis, " Mi ne komprenas ! "

Li ĵus glitis de inter la batalantoj en tiun liberecon de krepusko. Kio nun okazos ? Kio okazos ? Li bildigis al si la ruĝvestitojn, diligente lin serĉantajn, forpelantajn antaŭ si la nigre insignitajn ribelulojn.

Almenaŭ la hazardo donis al li spacon por spiri. Li povis kaŝiĝi nedisputate de la preterpasantoj, kaj observi la kuron de aferoj. Lia rigardo supreniris la malsimplan malluman grandecon de la krepuske lumitaj konstruaĵoj, kaj la ideo venis, kvazaŭ afero senfine mirinda, ke tie supre la suno leviĝas, kaj la mondo brilas kaj ardas sub la antikve familiara taglumo. Post nelonga tempo li denove spiris trankvile. La neĝo sur lia vestaro jam sekigis.

Li vagis tutajn mejlojn laŭ tiuj krepuskaj vojoj, parolante al neniŭ, alparolate de neniŭ—nigra formo inter nigraj formoj—la enviita viro el la pasinteco, la netaksebla senvola posedanto de la mondo. Kie ajn montriĝis lumoj aŭ densaj amasoj da homoj, aŭ neordinara ekscitiĝo, li timis

esti rekonata, kaj rigardis kaj turniĝis, aŭ iris supren aŭ malsupren laŭ la mezaj ŝtuparoj, en iun transan sistemon de vojoj je pli aŭ malpli alta nivelo. Kaj kvankam li ne trovis pli da batalado, tamen la tuta urbego ekscitiĝis pro bataloj. Unu fojon li devis kuri por eviti marŝantan amason, kiu forpelis ĉion de la strato. Ĉiu, kiu troviĝis ekstere, ŝajnis esti implikita. La plejparto de ili estis viroj, kaj ili portis aĵojn, kiujn li konjektis esti pafiloj. Ŝajnis kvazaŭ la barakto kuncentriĝis ĉefe en la kvartalo, de kie li ĵus venis. Foje kaj ree malproksima muĝado, malproksima eĥo de tiu konflikto, atingis al liaj oreloj. Tiam lia singardemo kaj lia scivolemo interbaraktis. Sed la singardemo venkis, kaj li vagis ankoraŭ pli foren de la batalo—tiel bone, kiel li povis juĝi ties direkton. Li iradis netuŝita, nesuspektita, tra la mallumo. Post kelka tempo li ĉesis aŭdi eĥ malproksiman eĥon de la batalo, pli kaj pli malmulte da homoj preterpasis lin, ĝis fine la stratoj fariĝis tute malplenaj. La frontoj de la konstruaĵoj iĝis nebelaj kaj krudaj; ŝajnis, ke li atingas kvartalon kun vakaj tenejoj. La soleco malrapide kaptis lin—liaj paŝoj malvigliĝis.

Li rimarkis en si kreskantan lacecon. Foje li turnis sin flanken kaj sidiĝis sur unu el la multnombraj benkoj sur la plej altaj vojoj. Sed febra senripozeco, lia scio pri lia grava rilato kun tiu barakto, ne lasis lin longe ripozi ie ajn. Ĉu la konflikto okazas sole pro li?

Kaj tiam en soleca placo ekkreis la ŝoko de tertremo—muĝado kaj tondrado—ventego de malvarma aero, kiu fluegis tra la urbego, la glitado kaj bruado de falanta masonaĵo—serio da gigantaj ŝokoj. Amaso da vitro kaj feraĵo falis de la malproksima tegmento en la mezan galerion, distance ne cent metrojn de li, kaj malproksime okazis kriadado kaj kurado. Li, ankaŭ, surpriziĝis al sencela agemo, kaj kuris iadirekte, kaj tiam returne egale sencele.

Viro venis kurante al li. Lia sinregado revenis. “Kion oni eksplodigis?” demandis la viro senspire. “Tio estis eksplodo,” kaj li forrapidis, antaŭ ol Graham povis respondi.

La grandaj konstruaĵoj leviĝis nebule, vualitaj de perpleksa krepusko, kvankam la rivereto de ĉielo supre nun brilis pro la taglumo. Li rimarkis multajn strangajn trajtojn, ne komprenante ion tiutempe; li eĥ politere legis multajn al la skribaĵoj en fonetika literado. Sed kion

profitis deĉifri konfuzon de kuriozaj literoj, kiu solviĝis, post penega streĉo de okulo kaj cerbo, al "Jen Edhamito" aŭ "Laborista Oficejo—Malsupra Kvartalo?" Kia groteska penso, ke ĉiuj ĉi klifsimilaj domoj estas liaj!

La kontraŭemo de lia sperto perceptiĝis vive al li. Efektive li faris tian salton trans la tempon, kian romanistoj foje kaj ree imagis. Kaj, kompreninte tiun fakton, li sin sentis preta. Lia spirito kvazaŭ sin sidigis antaŭ spektaklo. Kaj malvolviĝis nenia spektaklo, sed anstataŭe nur granda nebula danĝero, malsimpatiaj ombroj kaj valoj de mallumo. Ie en la labirinta obskuraĵo lia morto lin serĉis. Ĉu, malgraŭ ĉio, li mortiĝos antaŭ ol vidi? Eble eĉ ĉe la proksima angulo lia detruo kuŝis en embusko. Granda deziro vidi, granda volo scii, leviĝis en li.

Li komencis timi pri anguloj. Ŝajnis al li, ke sendanĝero troviĝas nur en kaŝejo. Kie li povas sin kaŝi por esti nerimarkinda, kiam la lumoj rebrilos? Fine li sidigis sur seĝo en alkovo sur unu el la plej altaj vojoj, kredante sin sola tie.

Li premis la fingrartikojn en siajn lacajn okulojn. Supozu, ke kiam li denove rigardos, li trovos tute for la malhelan trogon de paralelaj vojoj kaj tiun netolereblan altecon de konstruaĵoj. Supozu, ke li trovos, ke la tuta historio de la lastaj tagoj, la vekiĝo, la kriantaj homamasoj, la mallumo kaj la batalo, estas fantomaĵo, estas nova kaj pli vivosimila speco de sonĝo. Ĝi nepre estas sonĝo; ĝi estas tiel neracia, tiel nesinsekva. Kial la popolo batalas pro li? Kial tiu pli mensosana mondo konsideras lin Posedanto kaj Mastro?

Tiel li premis, sidante kaj vidante nenion, kaj poste li denove rigardis, duone esperante, spite siaj oreloj, vidi iun familieran aspekton de la dek-naŭa jarcento, vidi, eble, la haveneton de Boscastle ĉirkaŭ si, la klifojn de Pentargen, aŭ la litĉambron de sia hejmo. Sed faktoj tute ne atentis homajn esperojn. Aro da homoj kun nigra standardo marŝis tra la pli proksimaj ombroj, atentega pri la konflikto, kaj malantaŭ ili leviĝis tiu kapturna frontmuro, vasta kaj malluma, kun la malklaraj nekompreneblaj literoj etenditaj sur ĝia surfaco.

"Tio ne estas sonĝo," li diris. "Nenia sonĝo." Kaj li klinis la vizaĝon sur siajn manojn.

ĈAPITRO DEK-UNUA.

LA MALJUNULO, KIU SCIIS ĈION.

LI surpriziĝis de tuso tre proksime de li.

Li turniĝis abrupte, kaj spioninte, vidis etan kuntiritan figuron, kiu sidis du metrojn distance de li sub la ombro de la barilo.

“Ĉu vi scias ian novaĵon?” demandis la altsona, fajfspira voĉo de tre maljuna viro.

Graham hezitis. “Nenion,” li diris.

“Mi restos ĉi tie ĝis la lumoj revenos,” diris la maljunulo. “Tiuj bluaj friponoj troviĝas ĉie—ĉie.”

La respondo de Graham donis neklaran jeson. Li provis vidi la maljunulon, sed la mallumo kaŝis ties vizaĝon. Li tre deziris respondi, paroli, sed li ne sciis kiel komenci.

“Malluma kaj damninda,” subite diris la maljunulo. “Malluma kaj damninda! Pelita for de mia ĉambro en ĉi tiujn danĝerojn!”

“Tio estas bedaŭrinda,” hezite diris Graham. “Tio estas malbona por vi.”

“Mallumo! Maljunulo perdiĝinta en la mallumo! Kaj la tuta mondo freneziĝinta. Militado kaj batalado. La polico venkitaj kaj friponoj vagantaj ĉien. Kial oni ne venigas negrojn por defendi nin? . . . Mi ne plu eniros malluman koridoron. Mi faletis sur mortinton.”

“Oni sin trovas pli sendanĝera inter kunuloj,” diris la maljunulo, “—se ili estas kunuloj de bona speco,” kaj li senkaŝe rigardis lin. Li leviĝis subite kaj venis al Graham.

Ŝajnis, ke la vido estas kontentiga. La maljunulo sidiĝis, kvazaŭ trankvila pro tio, ke li ne plu sin trovas sola. “Nu!” li diris, “ĉi tiu estas terura tempo! Militoj kaj bataloj, kaj la mortintoj kuŝadas—viroj, fortuloj, mortas en la mallumo. Filoj! mi posedas tri filojn. Nur Dio scias, kie ili restas nun.”

La voĉo haltis. Poste ĝi ripetis tremete: "Nur Dio scias, kie ili restas nun."

Graham staradis, meditante demandon, kiu ne malkaŝos lian nescion. Denove la voĉo de la maljunulo finis la paŭzon.

"Tiu Ostrog venkos," li diris. "Li venkos. Kaj neniu povas scii, kiel la mondo progresos sub li. Miaj filoj laboras ĉiuj sub la ventmaŝinoj. Unu el miaj bofilinoj estis dum iom de tempo lia amatino. Lia amatino! Do, ni ne estas ordinaruloj; eĉ se oni forsendis min hodiaŭ nokte, por vagi kaj riski mian vivon . . . Mi sciis, kio okazas. Antaŭ ol multaj personoj sciis. Sed tiu mallumo! Kaj faleti sur kadavro subite en la mallumo!"

Lia fajfa spirado estis aŭdebla.

"Ostrog!" diris Graham.

"La plej granda ĉefo, kiun la mondo iam vidis," diris la voĉo.

Graham traserĉis sian cerbon. "La Konsilantoj posedas malmultajn amikojn inter la popolo," li hezite diris.

"Malmultajn. Kaj malbonajn eĉ tiujn. Ili jam postvivis sian tempon. Ili devus sin teni al la plej lertaj. Sed dufoje ili prokrastis la elekton. Kaj Ostrog. Kaj nun ĝi jam krevis, kaj nenio povas ĉesigi ĝin, nenio povas ĉesigi ĝin. Dufoje ili rifuzis Ostrogon—Ostrogon, la ĉefon. Mi sciigis tiam pri lia kolero—li estis terura. La Ĉielo savu ilin. Ĉar nenio surtera kapablas tion, nun kiam li jam levis la Laboristajn Kompaniojn kontraŭ ili. Neniu alia kuraĝus tion. La tuta blua kanvaso armita kaj marŝanta! Li daŭrigos la aferon ĝisfine. Li daŭrigos ĝin."

Li restis silenta nelongan tempon. "Tiu Dormanto," li diris kaj haltis.

"Nu," diris Graham. "Kio?"

La maljuneca voĉo mallaŭtiĝis ĝis konfidema flustro, la nebula, pala vizaĝo alproksimiĝis. "La vera Dormanto—"

"Jes?" diris Graham.

"Mortis antaŭ jaroj."

"Kio?" kriis Graham abrupte.

"Antaŭ jaroj. Mortis. Antaŭ jaroj."

"Ĉu vi volas diri—?" demandis Graham.

“Jes. Mi ja diras tion. Li mortis. Ĉi tiu Dormanto, kiu ĵus vekigis, oni interŝanĝis ilin dumnokte. Kompatinda drogita krietajo sen konscio. Sed mi devas ne diri ĉion, kion mi scias. Mi devas ne diri ĉion.”

Dum momento li balbutis neaŭdeble. Lia sekreto venkis lin. “Mi ne konas tiujn, kiuj dormigis lin—tio okazis antaŭ mia tempo—sed mi konas la viron, kiu injektis la stimulilon por veki lin. Ekzistis dek ŝancoj kontraŭ unu de sukceso—veki aŭ mortigi. Veki aŭ mortigi. Jen la metodo de Ostrog.”

Graham tiom surpriziĝis pri tiu diro, ke li devis interrompi, kaj igi la maljunulon ripeti siajn vortojn, devis nebule redemandi, antaŭ ol li certigis pri la signifo kaj malsaĝeco de tio, kion li ĵus aŭdis. Lia vekigo ne estis natura! Ĉu tio ankaŭ estas la malvigla superstiĉo de maljunulo, aŭ ĉu ĝi enhavas veron? Serĉante la mallumajn angulojn de sia memoro, li baldaŭ trovis ion, kio povis eble esti impresio pri tia stimulado. Li ekpensis, ke li ĵus trafis bonŝancan renkontiĝon, ke nun fine li eble sciigos ion pri la nova epokó. La maljunulo fajfe tuis momente kaj kraĉis; poste la altsona, rememora voĉo daŭrigis:

“La unuan fojon oni rifuzis lin. Mi sciis pri ĉio.”

“Rifuzis kiun?” diris Graham. “La Dormanton?”

“La Dormanton? Ne. Ostrogon. Li estis terura—terura! Kaj ili promesis tiam al li—promesis, ke nepre la proksiman fojon. Malsaĝaj ili estis—ili ne pli multe timis pri li. Nun la tuta urbego estas lia muelejo, kaj homoj, kiaj ni, estas polvo muelita per ĝi. Polvo muelita per ĝi. Antaŭ ol li alvenis, la laboristoj kutime tranĉis reciproke siajn gorĝojn, kaj murdis iafoje ĥinon aŭ laborpolicanon, kaj lasis paca la ceteron de ni. Kadavroj! Rabado! Mallumo! Tiaj aferoj ne vidiĝis dum groso da jaroj. Nu!—sed estas malbone por malgranduloj, kiam la granduloj kverelas! Malbone!”

“Ĉu vi diris—ke ne okazis—kio?—dum groso da jaroj?”

“Kio?” diris la maljunulo.

Li aldiris ion pri fortranĉado de silaboj, kaj igis lin ripeti tion eĉ triafoje. “Batalado, kaj mortigado, kaj armiloj en mano, kaj malsaĝuloj kriantaj pri libereco, kaj tiel plu,” diris la maljunulo. “Ne dum mia tuta vivo tio

antaŭe okazis. Ĉi tiuj similas al la malnovaj tagoj—certe—kiam la Parizanoj ribelis—antaŭ tri grosoj da jaroj. *Tio* estas la afero, pri kiu mi diris, ke ĝi ne okazis. Sed ĝi estas la kutimo de la mondo. Ĝi devis reokazi. Mi scias. Mi scias. Dum kvin jaroj Ostrog laboras, kaj ĝenaĵo sekvas ĝenaĵon, kun malsato kaj minacoj, kaj fanfarono kaj armiloj. Blua kanvaso kaj plendado. Neniu ekster danĝero. Ĉio falas kaj glitas. Kaj nun jen ni! Ribeloj kaj bataloj, kaj la Konsilantaro venas al sia fino.”

“Vi ŝajnas bone informita pri tiuj aferoj,” diris Graham.

“Mi scias tion, kion mi aŭdis. Mia diro ne estas tute nur Babilmaŝinaĵo.”

“Ne,” konsentis Graham, scivolante, kio Babilmaŝino eble estas. “Kaj vi estas certa, ke tiu Ostrog—vi estas certa, ke Ostrog organizis la ribelon kaj aranĝis la vekigon de la Dormanto? Nur por montri sian potencon—ĉar oni ne elektis lin al la Konsilantaro?”

“Ĉiu scias tion, mi kredas,” diris la maljunulo. “Krom—nur malsaĝuloj. Li intencis iel fariĝi la Mastro. Aŭ en la Konsilantaro, aŭ ne. Ĉiu, kiu scias ion ajn, scias tion. Kaj jen ni troviĝas kun kadavroj en la mallumo! Nu, kie vi forestis, se vi ne sciigis pri la kverelo inter Ostrog kaj la Verney-anoj? Kaj kio viaopinie kaŭzis la kverelon? La Dormanto? Ĉu jes? Vi opinias, ke la Dormanto estas reala, kaj vekigis propravole—ĉu?”

“Mi estas stultulo, pli aĝa ol mi aspektas, kaj forgesema,” diris Graham. “Multe da aferoj, kiuj okazis—precipe lastatempe—. Se mi mem estus la Dormanto, verdire, mi ne povus scii malpli pri ili.”

“Kio?” diris la voĉo. “Maljuna, vi estas, ĉu? Via voĉo ne sonas tre maljuna! Sed ne ĉiu tenas sian memoron ĝis mia aĝo—vere. Sed tiuj famkonataj aferoj! Sed vi ne estas tiel aĝa kiel mi—nek preskaŭ tiel aĝa. Nu! Eble mi devus ne juĝi aliajn virojn laŭ mi mem. Mi min sentas juna—por tia maljunulo. Eble vi vin sentas maljuna por tia junulo.”

“Jen la vero,” diris Graham. “Kaj mi travivis strangan historion. Mi scias tre malmulton. Kaj pri la historio, mi scias preskaŭ nenion ajn da historio. La Dormanto kaj Julio Cezaro tute egalas por mi. Interesas min aŭdi vin paroli pri tiuj aferoj.”

“ Mi scias iom,” diris la maljunulo, “ mi scias kelkajn aferojn. Sed— Aŭskultu ! ”

La duo silentiĝis aŭskultante. Aŭdiĝis peza sono, ŝoko kiu tremiĝis ilian benkon. La preterpasantoj haltis, kriis unu al la alia. La maljunulo tre emis demandi ; li vokis al viro, kiu pasis proksime. Graham, kuraĝigite de lia ekzemplo, stariĝis kaj alparolis aliajn. Neniu sciis, kio ĵus okazis.


Li revenis al la benko kaj trovis la maljunulon, kiu murmuris subvoĉe malklarajn demandojn. Dum iom da tempo ili diris nenion unu al la alia.

La sento de tiu giganta barakto, tiel proksima kaj tamen tiel malproksima, subpremis al Graham la imagon. Ĉu tiu maljunulo pravis, kaj ĉu la revolucioj venkas ? Aŭ ĉu ĉiuj eraras, kaj la ruĝvestitaj gardistoj pelas ĉion antaŭ si ? Iumomente la milita diluvo povas fluegi en tiun silentan kvartalon kaj denove kapti lin. Estas bone, ke li eltrovu ĉion eblon dum li disponas la tempon. Li turniĝis subite al la maljunulo kun demando, kaj tamen lasis ĝin nedirita. Sed lia movo instigis la maljunulon ree paroli.

“ Nu ! kiel aferoj kunlaboras ! ” diris la maljunulo. “ Tiu Dormanto, kiun ĉiuj ĉi malsaĝuloj fidas ! Mi posedas la tutan historion—ĉiam mi estis lerta je historioj. Dum mia knabeco—mi eĉ estas tiel aĝa—mi kutimis legi presitajn librojn. Vi apenaŭ kredos tion—ili tiom putras kaj polviĝas, ke la Sanitara Kompanio bruligis ilin por fari Cindroliton. Sed ili oportunis laŭ sia malpura maniero. Oni lernis multon. Tiuj novmodaj Babilmaŝinoj—ili ne ŝajnas novmodaj por vi, ĉu ?—ili estas facile aŭdeblaj, facile forgeseblaj. Sed mi sekvis la detalojn de la afero de ĝia komenco.”

“ Vi apenaŭ kredos tion,” diris Graham malrapide, “ sed mi estas tiel senscia—mi tiom priokupiĝis pri propraj aferetoj, miaj cirkonstancoj estis tiel strangaj—mi scias nenion pri la historio de la Dormanto. Kiu li estis ? ”

“ Nu ! ” diris la maljunulo. “ Mi scias tion. Mi scias. Li estis kompatinda neniulo, kaj li kverelis kun ludema virino—la kompatindulo ! Kaj li entranciĝis. Ekzistas ankoraŭ la antikvaj aĵoj, tiuj brunajoj—argentaĵoj foto-



grafajoj—ankoraŭ montrantaj lin dum li kuŝis—antaŭ
groso kaj duono da jaroj—groso kaj duono da jaroj.”

grozo? ←

“Kverelis kun ludema virino, la kompatindulo,” mallaŭte diris Graham al si mem, kaj poste laŭtvoĉe, “Jes—nu, daŭrigu.”

“Necesas scii, ke li havis kuzon nomitan Warming, solecan viron seninfanan, kiu treege riĉiĝis spekulante pri vojoj—la unuaj vojoj el Edhamito. Sed ĉu vi ne sciiĝis? Ne? Kial? Li aĉetis ĉiujn patentrajtojn kaj fondis grandan kompanion. Tiam ekzistis multe da grosoj da apartaj firmoj kaj komercaj kompanioj. Grosoj da grosoj! Liaj vojoj venkis la fervojojn—la antikvajn aferojn—post du doznoj da jaroj; li aĉetis kaj Edhamitis iliajn relvojojn. Kaj ĉar li ne volis dispecigi sian grandan havajon nek enlasi akciulojn, li testamentis ĉion al la Dormanto, kaj metis ĝin sub Direktoraro de Administrantoj, kiujn li mem elektis kaj edukis. Li sciis tiam, ke la Dormanto ne vekigĝos, ke li daŭre dormos, dormos ĝis li mortos. Li sciis tion tute bone. Kaj jen! viro en Usono, kiu antaŭe perdis du filojn pro boata akcidento, sekvis tion per alia grandega testamentaĵo. Liaj administrantoj sin trovis kun dozno da miriadoj da leonoj aŭ eĉ pli je la komenco mem.”

?

“Kiel li nomiĝis?”

“Graham.”

“Ne, mi aludas—la Amerikanon.”

“Isbister.”

“Isbister!” diris Graham. “Mi eĉ ne rekonas la nomon.”

“Certe ne,” diris la maljunulo. “Certe ne. Oni ne lernas multe nuntempe en la lernejoj. Sed mi scias ĉion pri li. Li estis riĉa Amerikano, kiu migris de Anglujo, kaj li testamentis al la Dormanto eĉ pli ol Warming. Kiel li gajnis tion, mi ne scias. Io rilate bildojn per maŝinoj. Sed li gajnis kaj testamentis ĝin, kaj tiamaniere la Konsilantaro havis sian komencon. Komence ĝi estis nur administra konsilantaro”

“Kaj kiamaniere ĝi kreskis?”

“Nu!—vi ne scias multon. La mono allogas la monon—kaj dek du cerboj pli valoras ol unu. Ili ludis tre lerte. Ili rilatigis la politikon kun la financo, kaj daŭre pliiĝis la

monon, funkciigante la valuton kaj la impostojn. Ĉio kreskis—kreskis. Kaj dum multaj jaroj la dek du administrantoj kaŝis la kreskadon de la havaĵo de la Dormanto sub duoblaj nomoj, titoloj de Kompanioj, k.t.p. La Konsilantaro etendiĝis per rajtodokumentoj, hipotekoj, akcioj, ĉiu politika partio, kaj ĉiu ĵurnalo, kiun ili aĉetis. Se vi aŭskultos la malnovajn rakontojn, vi vidos la Konsilantaron daŭre kreski. Bilionoj sur bilionoj da leonoj fine—la posedaĵo de la Dormanto. Kaj la tuto kreskis el kaprico—el la testamento de Warming kaj la akcidento de la filoj de Isbister.

“La homoj estas strangaj,” diris la maljunulo. “Mi trovas stranga la fakton, ke la Konsilantoj tiel longe kunagis. Tiel grandnombre kiel dek du. Sed eĉ de la komenco ili laboris en subbrondetoj. Kaj ili iris malantaŭen. Dum miaj junecaj tagoj oni kutime parolis pri la Konsilantoj, kiel nesciulo parolas pri Dio. Oni ne kredis, ke ili kapablas malbonfari. Oni ne sciis pri iliaj virinoj, k.t.p. ! Nu, mi pli saĝiĝis.

“La homoj estas strangaj,” diris la maljunulo. “Jen vi, juna kaj nescia, kaj mi—sepdozjara, kaj mi kun deco darius forgesi—mi klarigas ĉion al vi koncize kaj mallonge.

“Sepdozjara,” li diris, “sep dozoj, kaj mi ankoraŭ aŭdas kaj vidas—aŭdas pli bone ol mi vidas. Kaj mi rezonas klare, kaj min informas pri ĉiuj okazaĵoj. Sepdozjara !

“La vivo estas stranga. Mi estis dudozjara antaŭ ol Ostrog estis infano. Mi memoras lin de longe antaŭ ol li sin ŝovis antaŭen al la ĉefeco de la Ventmaŝina Direktoraro. Mi vidis multe da ŝanĝoj. Jes, mi portis la blupon. Kaj fine mi vivas por vidi tiun homamason kaj mallumon kaj tumulton kaj kadavrojn preterportatajn amase sur la vojoj. Kaj ĉion li faris. Ĉion faris li !”

Lia voĉo forvelkis ĝis apenaŭ aŭdeblaj laŭdoj pri Ostrog. Graham meditis. “Lasu min konstati,” li diris, “ĉu mi ĝuste komprenas.”

Li etendis manon kaj notis la punktojn sur siaj fingroj. “La Dormanto jam dormis—”

“Anstataŭigite !” diris la maljunulo.

“Eble. Kaj dume la havaĵo de la Dormanto kreskis sub la manoj de Dek Du Administrantoj, ĝis ĝi englutis preskaŭ la tutan vaŝtan havaĵon de la mondo. La Dek Du

Administrantoj, pro tiu havaĵo, fariĝis mastroj de la mondo. Ĉar ili havas la pagan potencon—ĝuste same, kiel havis la antikva angla parlamento——”

“Nu!” diris la maljunulo, “tre vere, tio estas bona komparo. Vi ne estas tiel——”

“Kaj nun tiu Ostrog—subite ŝanĝis la mondon, vekante la Dormanton—kiu, laŭ la kredo de ĉiu, krom la superstiĉa vulgara popolo, neniam vekigis—vekante la Dormanton, por ke tiu postulu sian havaĵon ĉe la Konsilantoj, post tiom da jaroj.”

La maljunulo konsentis al tiu diro per tuso. “Estas strange,” li diris, “renkonti viron, kiu unue sciigis nur hodiaŭ nokte pri tiuj aferoj.”

“Jes,” diris Graham, “estas strange.”

“Ĉu vi restis en Plezururbo?” demandis la maljunulo. “Dum mia tuta vivo mi deziregis——” Li ridis. “Eĉ nun,” li diris, “mi povus ĝui iom da gajeco. Mi ĝuus almenaŭ la vidon de ili.” Li murmuris frazon, kiun Graham ne komprenis.

“La Dormanto—kiam li vekigis?” diris Graham subite.

“Antaŭ tri tagoj.”

“Kie li estas?”

“Ostrog gardas lin. Li liberigis de la Konsilantoj antaŭ ne pli ol kvar horoj. Sinjoro, kie vi troviĝis tiam? Li staris en la halo super la vendplaco—kie la batalo okazis poste. La tuta urbo kriis pri li. Ĉiuj Babilmaŝinoj. Ĉie oni kriis pri li. Eĉ la malsaĝuloj, kiuj subtenas la Konsilantojn, konfesas la aferon. Ĉiuj kuris por vidi lin—ĉiuj akiris armilojn. Ĉu vi estis ebria aŭ dormanta? Kaj eĉ tiam! Sed vi ŝercas! Certe vi ŝajnigas. Kaj por malhelpi la kriadon de la Babilmaŝinoj kaj la kolektiĝon de la popolo oni forkomutis la elektran fluon kaj metis tiun damnindan mallumon sur nin. Ĉu vi volas diri——?”

“Mi jam sciigis, ke oni liberigis la Dormanton,” diris Graham. “Sed—mi repensu momente. Ĉu vi estas certa, ke Ostrog gardas lin?”

“Li ne forlasos lin,” diris la maljunulo.

“Kaj la Dormanto. Ĉu vi estas certa, ke li ne estas la vera? Mi neniam aŭdis——”

“Tiamaniere pensas ĉiuj malsaĝuloj. Tiele ili pensas. Kaj tamen ekzistas mil aferoj, pri kiuj oni neniam aŭdis.

Mi konas Ostrogon tro bone por diris? Tiamaniere mi estas parento. Pro mia bofilino.”

“Mi supozas——”

“Nu?”

“Mi supozas, ke ne ekzistas trudos. Mi supozas, ke tuj nepre sin trovos pupeto, ĉu sub tiuj de la Konsilantoj?”

“Sub la manoj de Ostrog pupeto? Konsideru liansituacion, donos al li ĉiun eblan plezurun trudi?”

“Kio tiuj Plezururboj estas?”

La maljunulo igis lin ripeti la certigis pri la vortoj de Graham. “Tio estas troa,” li diris. “Vi Mi jam suspektis, ke vi scias pri

“Eble jes,” diris Graham.

ŝajnigu? Ne, mi ne scias, kio e la maljunulo ridis familiare.

“Kaj plue, mi eĉ ne scias, kio scias, kiun monon oni uzas, mi ne ekzistas. Mi ne scias, kie mi e kalkuli. Mi ne scias, kie mi rice “Nu, nu,” diris la maljunulo da trinkaĵo nun, ĉu vi metus ĝi okulon?”

“Mi deziras, ke vi mem donu

“Hi, hi! Nu! Sinjoroj, k gajigi.” Malgrasa mano momente brakon. “Silko. Nu, tute eg kiun oni starigis anstataŭ la Dormanton. Multe da pompo kaj prez vizagaĵo. Antaŭe, kiam oni per havigis bileton al mi kaj iris.

Dormanto, kiel la fotografajoj li nepre satigis. La mondo estis bonŝanco. La bonŝanco! Mi scias Capri. Tie oni trovas la plej bonkanto.”

La tuso denove ekprenis lin. Tiam li komencis murmuri envieme pri plezuroj kaj strangaj amuzajoj. “La bonŝanco. Lia bonŝanco! Dum mia tuta vivo mi restis en Londono, esperante havi okazon iri tien.”

“Sed vi ne *scias*, ke la Dormanto mortis,” diris Graham subite.

La maljunulo igis lin ripeti la vortojn.

“La homoj ne postvivas dek doznojn da jaroj. Tio ne estas la natura ordo de aferoj,” diris la maljunulo. “Mi ne estas malsaĝulo. Malsaĝuloj eble kredus tion, sed ne mi.”

Graham kolerigis pri la certeco de la maljunulo. “Ĉu vi estas aŭ ĉu vi ne estas malsaĝulo,” li diris, “okazas, ke vi malpravas pri la Dormanto.”

“Kio?”

“Vi malpravas pri la Dormanto. Mi ne antaŭe diris tion al vi, sed nun mi diros ĝin. Vi malpravas pri la Dormanto.”

“Kiel vi scias tion? Vi diris, ke vi scias nenion—ĉe ne pri la Plezururboj.”

Graham paŭzis.

“Vi ne scias tion,” diris la maljunulo. “Kiel vi povus scii? Tre malmulte da homoj—”

“Mi mem estas la Dormanto.”

Li devis ripeti ankaŭ tion. Okazis mallonga paŭzo.

“Estas malsaĝe diri tion, sinjoro, pardonu min. Tio povus okazigi ĝenojn por vi en tia tempo, kia la nuna,” diris la maljunulo.

Graham, iomete malkuraĝigite, ripetis la aserton.

“Mi diris, ke mi estas la Dormanto. Ke antaŭ multaj jaroj mi ja ekdormis, en eta ŝtonkonstruita vilaĝo, dum la tagoj kiam ankoraŭ ekzistis heĝoj kaj vilaĝoj kaj trinkejoj, kaj la tuta kamparo estis distranĉita en pecetoj, kampetoj. Ĉu vi ne aŭdis pri tio? Kaj mi mem—mi, kiu parolas al vi—mi vekigis antaŭ kvar tagoj.”

“Antaŭ kvar tagoj! La Dormanto! Sed ili *tenas* la Dormanton. Ili tenas lin kaj ne lasos lin foriri. Sensencaĵo! Vi tamen parolis sufiĉe saĝe ĝis nun. Mi povas imagi ĝin, kvazaŭ mi ĉeestus tie. Lincoln marŝos kiel gardanto malantaŭ li; oni ne permesos, ke li promenu sola. Fidu al ili pri tio. Vi estas kuriozulo. Ŝercaĉanto. Mi komprenas nun, kial vi fortranĉis tiel kurioze viajn silabojn, sed—”

Li haltis abrupte, kaj Graham povis vidi lian geston.

“Ĉu Ostrog lasu lin promeni sola? Ne, vi diras tion al tute malgusta persono. Ĉu mi tion kredis! Kion vi intencas? Plue, ni jam sufiĉe parolis pri la Dormanto.”

Graham stariĝis. “Aŭskultu,” li diris, “mi efektive estas la Dormanto.”

“Vi estas kuriozulo,” diris la maljunulo; “Sidi ĉi tie en la mallumo fortranĉante silabojn kaj mensogante tiamaniere. Sed—”

La incitigo de Graham malpliĝis ĝis ridado. “Tio estas absurdega,” li kriis. “Absurdega. La sono devas ĉesi. Ĝi pli kaj pli frenezigas. Jen mi—sub tiu damninda krepusko—mi neniam antaŭe spertis sonĝon kun krepusko—ducent-jara anakronismo, kaj mi penas persvadi maljunan malsaĝulon, ke mi ja estas mi mem, kaj dume—Uĥ!”

Li moviĝis pro ekblovo de kolero, kaj ekpaŝis for. Post momento la maljunulo sekvis lin. “Nu! sed ne foriru!” kriis la maljunulo. “Mi estas malsaĝulo, mi scias. Ne foriru. Ne lasu min sola en ĉi tiu mallumo.”

Graham hezitis, haltis. Subite li komprenis la malsaĝecon, ke li malkaŝu sian sekreton.

“Mi ne volis vin ofendi—ne kredante vin,” diris la maljunulo alproksimiĝante. “Tio ne kaŭzos ion malbonan. Nomu vin la Dormanto, se tio plaĉas al vi. Ĝi estas sensencaĵo—”

Graham hezitis, turniĝis abrupte kaj daŭre foriris.

Dum iom da tempo li aŭdis la laman persekutadon de la maljunulo, kaj liajn fajfajn vokojn, kiuj ŝajnis iri posten. Sed fine la mallumo glutis lin, kaj Graham ne plu vidis lin.

ĈAPITRO DEK-DUA.

OSTROG.

GRAHAM nun povis pli klare kompreni sian situacion. Longe ankoraŭ li vagis, sed, post lia interparolo kun la maljunulo, la sento restis klara en lia cerbo, ke lia eltrovo de Ostrog estos la neevitebla fina decido. Evidentiĝis, ke tiuj, kiuj troviĝis en la ĉefloko de la revolucio, admirinde sukcesis kaŝi la faktojn pri lia malapero. Sed ĉiumomente li atendis aŭdi raporton ke li mortis, aŭ rekaptiĝis de la Konsilantoj.

Baldaŭ viro haltis antaŭ li. “Ĉu vi jam sciigis?” li diris.

“Ne?” diris Graham surprizite.

“Preskaŭ dozando,” diris la viro; “dozando da homoj!” kaj forrapidis.

Aro da viroj kun knabino preterpasis en la mallumo, gestante kaj kriante: “Ili kapitulacis! Ili cedis!”
? ← “Dozando da homoj.” “Du dozandoj da homoj.”
“Ostrog, brave! Ostrog, brave!” La krioj foriris, nebuliĝis.

Aliaj kriantoj sekvis. Dum iom da tempo lia atento absorbiĝis de la fragmentoj de frazoj, kiujn li aŭdis. Li dubis, ĉu ciuj parolas angle. Vortoj flotis al li, frazeroj kvazaŭ el la “Piĝin” (Azia-anglaĉa) dialekto, aŭ el negra dialekto, nebulaj kaj tranĉitaj distordajoj. Li ne kuraĝis aldemande haltigi iun. La impresoj, kiun tiu popolo donis al li, tute ne harmoniis kun liaj antaŭkredoĵoj pri la barakto, kaj konfirmis la fidon de la maljunulo pri Ostrog. Nur malrapide li kredigis al si, ke ĉiuj ĉi homoj ĝojas pri la falo de la Konsilantoj, ke la Aro, kiu ĵus tiel potence kaj vikle lin persekutis, estis spite de ĉio la pli malforta el la du partioj en la barakto. Kaj se tio estas vera, kiel ĝi koncernas lin? Kelkfoje li hezitis sur la rando mem de fundamenta demando. Unu fojon li turniĝis kaj longe sekvis malgrandan viron kun dika invita konturo, sed ne povis gajni sufiĉe da memfido por alparoli lin.

Nur malrapide lin trafis la ideo, ke li demandu la direkton de la Oficejo de Ventmaŝinoj—kio ajn tiu eble estas. Lia unua demando nur rezultis en la informo, ke li daŭre iru al Westminster. La dua kaŭzis la trovon de pli mallonga vojo, en kiu li rapide perdiĝis. Oni diris, ke li forlasu la vojojn, al kiuj li ĝis nun sin tenis—ne konante alian irmetodon—kaj subiru laŭ unu el la mezaj ŝtuparoj en la nigrecon de transa vojo. Sekve okazis bagatelaj aventuroj; la ĉefa estis duba renkontiĝo kun raŭkvoĉa nevidebla homo, kiu parolis strangan dialekton, unue ŝajne fremdan lingvon, densan parolfluan enhavantan flotantajn kadavrojn de anglaj vortoj, la dialekton de la tiama krimulo. Tiam alia voĉo alproksimiĝis, la voĉo de knabino kantanta “tralala, tralala.” Ŝi parolis al Graham, ŝiaj vortoj enhavis iom de la sama tono. Ŝi pretekstis la perdon de fratino, ŝi fuŝiris nenecese kontraŭ lin, ekprenis lin kaj ridis. Sed vorto de malforta riproĉo forsendis ŝin ree en la mallumon.

La sonoj ĉirkaŭ li pliiĝis. Fuŝirantaj homoj preterpasis, parolante ekscite. “Ili jam cedis!” “La Konsilantaro! Ĉu vere la Konsilantaro!” “Oni tion diras sur la Vojoj.” La koridoro ŝajnis pli larĝa. Subite la muroj iris malantaŭen. Li sin trovis sur vasta placo, kaj homoj malproksime moviĝis. Li demandis sian direkton de nebula formo. “Transiru rekte,” diris la voĉo de virino. Li forlasis la muron, kiu antaŭe lin gvidis, kaj post momento trafis tableton sur kiu staris vitraj ujoj. La okuloj de Graham, nun akordigitaj kun la mallumo, vidis longan perspektivon kun tabloj ambaŭflanke. Tion li laŭiris. Je kelkaj tabloj li aŭdis la sonon de glasoj kaj la sonon de manĝado. Do troviĝis homoj sufiĉe trankvilaj manĝi, aŭ sufiĉe kuraĝaj ŝteli manĝon, spite la socia renversiĝo kaj la mallumo. Malproksime kaj alte li baldaŭ vidis palan lumon rondforman. Dum li sin direktis al tio, nigra rando suprenvenis kaj kaŝis ĝin. Li ŝanceliĝis pro ŝtupoj, kaj sin trovis en galerio. Li aŭdis ploradon, kaj trovis du timajn knabinecojn kaŭrantajn apud la barilo. Ili silentiĝis je la proksima sono de piedpaŝoj. Li penis konsoli ilin, sed ili nur silentis, ĝis li forlasis ilin. Tiam, dum li foriris, li reaŭdis ilin plori.

Post nelonge li sin trovis ĉe la malsupro de ŝtuparo kaj apud larĝa aperturo. Li vidis lumetan krepuskon super tiu kaj supreniris el la mallumo en novan straton de moviĝantaj vojoj. Laŭlonge de ĝi senorda homamaso svarmis kriante. Ili kantis pecetojn el la ribela kanto, la plejparto el ili malĝuste. Foje kaj ree flagris torĉoj, kreante nedaŭrajn historiajn ombrojn. Li demandis sian direkton, kaj dufoje perpleksiĝis de tiu sama densa dialekto. Lia tria provo gajnis kompreneblan respondon. Li staras je du kilometroj for de la oficejo de ventmaŝinoj ĉe Westminster; sed la vojo estas facile trovebla.

Kiam li fine alproksimiĝis al la distrikto de la ventmaŝina oficejo, ŝajnis al li, pro la aplaudantaj procesioj kiuj marŝis laŭ la Vojoj, pro la ĝoja tumulto, kaj fine pro la refunkciado de la lampoj de la urbego, ke la falo de la Konsilantoj certe jam efektiviĝis. Kaj tamen ankoraŭ neniu novaĵo pri lia foresto venis al liaj oreloj.

La relumigo de la urbego venis surprize abrupte. Subite li sin trovis staranta, palpebrumanta; ĉie ĉirkaŭ li homoj konfuzite haltis, kaj la mondo estis inkandeska. La lumo trovis lin jam sur la limo de la ekscititaj amasoj, kiuj troplenigis la Vojojn apud la ventmaŝina oficejo, kaj la sento pri videbleco kaj malkovro, kiu akompanis ĝin, ŝanĝis lian senkoloran intencon pri aliĝo al Ostrog, en akran deziron.

Dum iom da tempo li estis puŝata, malhelpata, kaj endanĝerigata de homoj lacaj pro kriadado de lia nomo, kaj ofte bandaĝitaj kaj sangaj pro lia afero. La fasado de la oficejo estis iluminita de ia movbildo, sed li ne povis vidi la specon, ĉar spite liaj viglaj penoj la denseco de la amaso malhelpis, ke li alproksimiĝu al ĝi. Laŭ la fragmentoj de frazoj, kiujn li kaptis, ĝi ŝajne donis novaĵon pri la batalo ĉirkaŭ la Konsilejo. La nescio kaj maldecidemo igis liajn movojn malrapidaj kaj neefikaj. Dum iom da tempo li ne povis kompreni, kiel eniri tra la senporda fasado de la konstruaĵo. Li malrapide sin ŝovis al la mezo de tiu homamaso, ĝis li rimarkis, ke la ŝtuparo ĉe la meza vojo kondukas al la interno de la konstruaĵoj. Tio donis al li celon, sed la amaso sur la meza vojo estis tiel densa, ke nur post longa tempo li atingis ĝin. Kaj eĉ tiam li renkontis konstantan malhelpon, kaj spertis

horon de vigla argumentado, jen en iu gardejo kaj jen en alia, antaŭ ol oni konsentis porti mesaĝon de li al tiu el ĉiuj viroj, kiu plej deziris lin vidi. En unu loko oni priridis lian rakonton, do, kiam fine li atingis duan ŝtuparon, li nur pretekstis havi novaĵon de neordinara graveco por Ostrog. Li rifuzis diri, kio tio estas. Oni malvolonte sendis lian mesaĝon. Longe li atendis en ĉambreto ĉe la malsupro de la liftŝakto, kaj fine tien venis Lincoln, avida, pardonpetema, surprizita. Li haltis ĉe la pordo, observante Grahamon, tiam rapidis antaŭen fervore.

“Jes,” li kriis, “tio estas vi. Kaj vi ne mortis!”

Graham faris mallongan klarigon.

“Mia frato atendas,” diris Lincoln. “Li estas sola en la oficejo de ventmaŝinoj. Ni timis, ke vi estas mortigita en la teatro. Li dubis—kaj aferoj ankoraŭ urĝas, malgraŭ tio, kion ni diras tie al la popolo—alie, li venus al vi.”

Oni supreniris per lifto, pasis laŭ mallarĝa koridoro, transiris grandan halon, malplenan krom por du rapidantaj mesaĝistoj, kaj eniris iom malgrandan ĉambbron, kies solaj mebloj estis longa benko kaj granda ovala disko el nuba, variema grizo, pendigita per kabloj sur la muro. Tie Lincoln lasis Grahamon dum tempospaco, kaj li restis sola, ne komprenante la fumecajn formojn, kiuj malrapide flotis trans la diskon.

Lia atento kaptiĝis de sono kiu abrupte komenciĝis. Ĝi estis akklamado de vasta sed tre malproksima homamaso, muĝanta ĝojego. Tio ĉesis tiel abrupte, kiel ĝi komenciĝis, kvazaŭ sono aŭdata inter la malfermo kaj refermo de pordo. En la ekstera ĉambro sonis bruo de rapidaj paŝoj kaj muzika tintado, kvazaŭ longa ĉeno kuras trans la dentojn de rado.

Tiam li aŭdis la voĉon de virino, la susuron de neviditaj vestaĵoj. “Jen Ostrog!” li audis ŝin diri. Tintileto sonis hezite, kaj tiam ĉio ree silentiĝis.

Baldau aŭdiĝis voĉoj, movoj, kaj piedpaŝoj ekstere. La piedpaŝoj de unu persono sin apartigis de la aliaj sonoj, kaj alproksimiĝis, firmaj, regule mezuritaj. La kurteno leviĝis malrapide. Aperis altstatura, blankhara viro, vestita per kremkolora silko, rigardanta Grahamon de sub sia levita brako.

Momente la blanka figuro restis, tenante la kurtenon, tiam li faligis tion kaj staris antaŭ ĝi. La unua impresio de Graham estis pri tre larĝa frunto, tre palaj, bluj okuloj profunde enkaviĝintaj sub blankaj brovoj, agleca nazo, kaj peze sulkita firma buŝo. La karnaj faldadoj super la okuloj, la depremo ĉe la lipanguloj, kontraŭdiris la rektan sintenon kaj montris la viron maljuna. Graham instinkte stariĝis, kaj momente la du viroj silente staradis sin rigardante reciproke.

“ Vi estas Ostrog ? ” diris Graham.

“ Mi estas Ostrog.”

“ La Ĉefo ? ”

“ Tiel oni min nomas.”

Graham sentis la embarason de la silento. “ Mi devas danki ĉefe al vi mian savon, mi kredas,” li diris baldaŭ.

“ Ni timis, ke oni vin mortigis,” diris Ostrog. “ Aŭ ekdormigis vin ree—por ĉiam. Ni jam faris nian eblon kaŝi nian sekreton—la sekreton pri via malapero. Kie vi restis? Kiel vi venis ĉi tien ? ”

Graham mallonge diris al li.

Ostrog silente aŭskultis.

Li ridetis iomete. “ Ĉu vi scias, kion mi ĵus faras, kiam oni venis por sciigi al mi, ke vi alvenis ? ”

“ Kiel mi divenu ? ”

“ Mi pretigis vian duoblulon.”

“ Mian duoblulon ? ”

“ Viron, tiel similan al vi, kiel ni povis trovi. Ni intencis hipnoti lin, por evitigi al li la malfacilan ludadon de rolo. Li estis nepre necesa. Tiu ĉi tuta revolucio dependas de la kredo, ke vi mem maldormas, vivanta kaj inter ni. Eĉ nun granda homamaso jam kolektiĝis en la teatro kaj brue postulegas vin vidi. Ili ne fidus nin. . . . Vi scias, kompreneble—ion pri via situacio ? ”

“ Tre malmulton,” diris Graham.

“ Jen la afero.” Ostrog marŝis kelkajn paŝojn en la ĉambron kaj turniĝis. “ Vi estas absoluta posedanto,” li diris, “ de la mondo. Vi estas la Reĝo de la Tero. Via potenco estas limigita laŭ multaj komplikitaj manieroj, sed vi estas la antaŭfiguro, la populara simbolo de la regado. Tiu Blanka Konsilantaro, la Administraj Konsilantoj, kiel oni nomas ilin—”

“ Mi jam havas la malklaran konturon de tiuj aferoj.”

“ Mi volis scii tion.”

“ Mi renkontis babileman maljunulon.”

“ Mi komprenas. . . . Niaj Masoj—la vorto devenas de via periodo—vi scias, sendube, ke ni ankoraŭ posedas malsuperan klason—konsideras vin kiel nian veran reganton. Tute same, kiel multaj personoj dum via periodo kredis, ke la reĝo estas la reganto. Ili estas nekontentaj—la “ amaso ” trans la tuta tero—pri la regado de niaj Administrantoj. Plejparte tio estas la antikva nekonto, la antikva kverelo inter la vulgarulo kaj lia propra vulgareco—la mizero de laboro kaj disciplino kaj malsano. Sed krome viaj administrantoj malbone regis. Rilate kelkajn aferojn, ekzemple, la administradon de la Laboristaj Kompanioj, ili sin montris malsaĝaj. Ili senfine lasis okazojn por kritiko. Jam antaŭe ni, la popola partio, agitis rilate reformojn—kiam via vekigo okazis. Okazis ! Se oni antaŭe aranĝus tion, ĝi ne povus okazi pli oportune.” Li ridetis. “ La popola ideo, ne pripensante viajn jarojn de kvieteco, jam trafis de la projekto veki vin kaj peti al vi, kaj—jen ! ”

Li indikis la ekribelon per gesto, kaj Graham kapjesis por montri, ke li komprenas.

“ La Konsilantoj fuŝis—kverelis Tiaj aroj ĉiam agas tiel. Ili ne povis decidi, kion fari el vi. Vi memoras, kiel oni malliberigis vin ? ”

“ Mi komprenas. Jes. Kaj nun—ni venkas ? ”

“ Ni venkas. Nepre ni venkas. Hodiaŭ nokte, dum kvin rapidaj horoj. Subite ni frapis ĉie. La ventmaŝinaj servistoj, la Laborista Kompanio kun siaj milionoj, rompis siajn katenojn. Ni estris la aeroplanojn.”

“ Jes,” diris Graham.

“ Tio, kompreneble, necesis. Alie ili forflugus. La tuta urbego leviĝis, preskaŭ ĉiu tria homo partoprenis ! La bluestitoj, ĉiuj publikaj servoj, krom nur kelkaj aernaŭtoj, kaj proksimume la duono de la ruĝa polico. Oni savis vin, kaj ilia polico de la Vojoj—ne la duonon da ili oni povis amasigi ĉe la Konsilejo—jam disrompiĝis, aŭ senarmigita aŭ mortigita. La tuta Londono estas en niaj manoj—nun. Restas nur la Konsilejo.

“La duonon de sia cetero de la ruĝa polico ili perdis, dum tiu malsaĝa provo rekapti vin. Ili frenezigiĝis, kiam ili perdis vin. Ili ĵetis sian tutan havon kontraŭ la teatron. Ni apartigis ilin tie de la Konsilejo. Vere la nuna estas venka punkto. Ĉie brilegis via stelo. Antaŭ unu tago—la Konsilantaro regis, same kiel ĝi jam faris dum groso da jaroj, dum jarcento kaj duono, kaj tiam, per nur iometa frustrado, kaŝita armado tie kaj tie ĉi, subite—Jen!”

“Mi estas tre nescia,” diris Graham. “Mi supozas—mi ne klare komprenas la kondiĉojn de tiu batalo. Se vi povus klarigi ĝin. Kie estas la Konsilantoj? Kie okazas la batalo?”

Ostrog transpaŝis la ĉambron, io klaketis, kaj subite, ekster ovala lumeto, ili sin trovis en mallumo. Momente Graham miris.

Tiam li vidis, ke la nube griza disko nun havas profundecon kaj koloron, prenis aspekton kvazaŭ ovala fenestro montranta strangan nefamiliaran vidaĵon.

Unuavide li ne povis diveni, kio tiu sceno estas. La sceno estis tagluma, kun la taglumo de vintra tago, griza kaj klara. Trans la bildon, kaj, kiel ŝajnis, duondistance inter li kaj la plua malproksimeco, forta kablo el plektita blanka drato sin streĉis vertikale. Tiam li rimarkis, ke la vicoj de grandaj ventmaŝinoj, la larĝaj interspacoj, la kelkaj faŭkoj de mallumo, similas tiujn, inter kiuj li forkuris de la Konsilantejo. Li vidis regulan vicon de ruĝvestitoj marŝantaj trans malplenan spacon inter vicoj de nigrevestitoj, kaj komprenis, antaŭ ol Ostrog parolis, ki li rigardas la superan surfacon de tiutempa Londono. La neĝo de la pasinta punkto jam malaperis. Li supozis, ke tiu spegulo estas moderna anstataŭaĵo de la lenskamero, sed tion oni ne klarigis al li. Li rimarkis, ke, kvankam la vico de ruĝvestitoj kuretas dekstren, tamen ili elbidiĝas maldekstren. Momente li miris, sed tiam vidis, ke la bildo mem pasas malrapide kvazaŭ panoramo trans la ovalon.

“Post momento vi vidos la batalon,” diris Ostrog ĉe lia kubuto. “Tiu ruĝvestitoj, kiujn vi rimarkas, estas kaptitoj. Tio estas la tegmenta spaco de Londono—ĉiuj domoj nun kunstaras preskaŭ seninterrompe. La stratoj kaj placoj havas tegmentojn. La fendaĵoj kaj abismoj de via periodo malaperis.”

Io misfokusita kaŝis la duonon de la bildo. Ĝia konturo sugestis viron. Okazis metala eklumo, io transiris la ovalon, kiel la palpebro de birdo transiras ĝian okulon, kaj la bildo ree klariĝis. Kaj nun Graham vidis virojn kuran-tajn inter la ventmaŝinoj, celantajn per armiloj, el kiuj ŝprucis fumaj ekbriloj. Ili svarmis dekstren pli kaj pli dense, gestante—eble ili kriis, sed pri tio la bildo diris nenion. Kune kun la ventmaŝinoj ili pasis malrapide kaj regule trans la spegulon.

“Nun,” diris Ostrog, “aperos la Konsilejo,” kaj malrapide nigra rando enrampis kaj kaptis la atenton de Graham. Baldaŭ tio ne plu aspektis kiel rando, sed kiel abismo, vasta nigra spaco inter la kunpremitaj konstruaĵoj, kaj el ĝi maldikaj fumspiraloj leviĝis al la pala vintra ĉielo. Nudaj ruinigitaj masoj de la konstruaĵo, fortegaj senkapigitaj turoj kaj trabegoj, leviĝis malgaje el tiu kaverneca mallumo. Kaj super tiuj restaĵoj de belega palaco, sennombraj etaj homoj grimpis, saltis, svarmis.

“Jen la Konsilejo,” diris Ostrog. “Ilia lasta fortikaĵo. Kaj tiuj malsaĝuloj foruzis municion sufiĉan por tuta monato, eksplodigante la ĉirkaŭajn konstruaĵojn—por malhelpi nian atakon. Vi aŭdis la ekkrevon? Ĝi frakaŝis la duonon de la rompebla vitro de la urbo.”

Kaj dum li parolis, Graham rimarkis, ke malantaŭ tiu ruinigita spaco, pendante super ĝi kaj leviĝante ĝis granda alteco, staras kruda amaso de blanka konstruaĵo. Tiu amaso izoliĝis de la senkompata detruo de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Nigraj truoj markis la interspacojn, kiujn la eksplodo disŝiris; grandaj haloj fendigis, la dekoracio de iliaj internoj montriĝis malgaje sub la vintra tagiĝo, kaj sur la rompitaĵoj pendis girlandoj el dividitaj ŝnuregoj kaj torditaj pecoj de dratoj kaj metalbastonoj. Kaj inter la vastaj detaloj moviĝis ruĝaj punktoj, la ruĝe vestitaj defendantoj de la Konsilantoj. Foje kaj ree malfortaj ekbriloj lumigis la palajn ombrojn. Unuavide ŝajnis al Graham, ke atako okazas kontraŭ la izolita blanka konstruaĵo, sed poste li rimarkis, ke la ribeluloj ne antaŭeniras, sed, sin ŝirmante inter la kolosa frakasajo, kiu ĉirkaŭis tiun lastan krudan fortikaĵon de la ruĝvestitoj, halteme pafadas.

Kaj antaŭ malpli ol dek horoj li mem staris sub la ventolilo en ĉambreto en tiu fora konstruaĵo, sin demandante, kio okazas en la mondo !

Rigardante pli atente, dum tiu batala epizodo moviĝis silente trans la mezon de la spegulo, Graham vidis, ke la blanka konstruaĵo estas ĉirkaŭita ĉiuflanke de ruinoj, kaj Ostrog daŭre priskribis per abruptaj frazoj, kiel ĝiaj defendantoj penis per tiu detruo izoli sin de la ventego. Li parolis per senzorga tono pri la homperdo, kiun tiu grandega falo kaŭzis. Li montris improvizitan mortinteton inter la ruinoj, kaj ambulancojn svarmantajn kiel fromaĝ-akaroj sur kanelo, kiu antaŭe estis strato kun moviĝantaj vojoj. Li pli interesiĝis montrante la partojn de la Konsilejo, kaj la aranĝojn de la sieĝantoj. Post ne longe la interna milito, kiu ĵus konvulsiigis Londonon, ne plu estis mistero por Graham. Tio, kio ĵus okazis, ne estis tumulta ribelo, nek milito inter egaluloj, sed bonege organizita plano. La kapablo de Ostrog pri detaloj estis mirinda ; li ŝajnis scii la celon eĉ de la plej malgranda aro da nigraj aŭ ruĝaj punktoj, kiuj rampas inter tiuj lokoj.

Li etendis grandan nigran brakon trans la luman bildon, kaj montris la ĉambron, de kie Graham liberiĝis, kaj, trans la abismon de ruinoj, la vojon de lia forkuro. Graham rekonis la abismon, trans kiun etendiĝis la kanaletoj, kaj la ventmaŝinojn, sub kiuj li kaŭris pro la flugmaŝino. La cetero de la vojo malaperis dum la eksplodo. Li rigardis denove la Konsilejon, sed ĝi jam duone kaŝiĝis, kaj dekstre monteto glitis al la vido, kun amaso da kupoloj kaj turpintoj, nebulaj kaj malproksimaj.

“Kaj la Konsilantoj ja falis ?” li diris.

“Ili ja falis,” diris Ostrog.

“Kaj mi——. Ĉu estas vere, ke mi——?”

“Vi estas la Mastro de la Mondo.”

“Sed tiu blanka standardo——”

“Tio estas la standardo de la Konsilantoj—la flago de Regado super la Tero. Tio falos. La batalo finiĝas. Ilia atako kontraŭ la teatro estis nur la lasta freneza barakto. Ili posedas nur ĉirkaŭ mil homojn, kaj parto de tiuj ne restos lojalaj. Ili posedas malmulte da municio. Kaj ni restarigas la antikvajn artojn. Jam ni fandmuldas kanonojn.”

“ Sed—helpado? Ĉu tiu urbego estas la tuta mondo? ”

“ Tio estas preskaŭ la tuta restaĵo de ilia imperio. Alilande la urboj aŭ ribelis kun ni, aŭ atendas la rezulton. Via vekigo perpleksis ilin, paralizis ilin.”

“ Sed ĉu la Konsilantoj ne posedas flugmaŝinojn? Kial oni ne batalas per ili? ”

“ Ili posedis ilin antaŭe. Sed la plejparto de la aeronaŭtoj ribelis kun ni. Ili ne riskis batali niaflanke, sed ili ne konsentis moviĝi kontraŭ ni. Ni *devis* havi influon inter la aeronaŭtoj. Almenaŭ la duono estis kun ni, kaj la aliaj sciis tion. Tuj kiam ili sciigis, ke vi sukcese forkuris, tiuj, kiuj serĉis vin, ne plu flugis. Ni mortigis tiun, kiu pafis je vi—antaŭ unu horo. Kaj de la komenco ni okupis la flugstaciojn de ĉiu ebla urbo, kaj tiele haltigis kaj kaptis la pli grandajn maŝinojn. Rilate la malgrandajn maŝinojn, kiuj elvenis—kelkaj ja faris tion—ni tro rekte kaj daŭre pafadis, kaj ili ne povis alproksimiĝi al la Konsilejo. Se ili mallevigis, ili ne kapablis ree leviĝi, ĉar ne ekzistas klara spaco ie ĉirkaŭe, kiu ebligus, ke ili leviĝu. Kelkajn ni frakasis, kelkaj aliaj mallevigis kaj cedis, la cetero forflugis al la Kontinento por trovi, se eble, amikan urbon, antaŭ ol la brulaĵo foruziĝos. La plejparto de tiuj homoj nur ĝojis, ke ni kaptis kaj forigis ilin el danĝero. La falado el flugmaŝino ne estas alloga afero. La Konsilantaro ne havas ŝancon tiumaniere. Ĝiaj tagoj jam finiĝis.”

Li ridis, kaj turniĝis denove al la ovala spegulo, por montri al Graham tion, kion li volis diri per “ flugstacioj.” Eĉ la kvar plej proksimaj aspektis obskuritaj de maldensa matena nebulo. Sed Graham povis vidi, ke ili estas vastaj konstruaĵoj, eĉ juĝate laŭ la nivelo de la aĵoj, kiuj ĉirkaŭas ilin.

Kaj tiam, dum tiuj malklaraj formoj pasis maldekstren, revenis la vido de la etendaĵo, trans kiun la senarmigitaj ruĝvestitoj antaŭe marŝis. Kaj poste la nigraj ruinoj, kaj poste denove la sieĝata blanka fortikaĵo de la Konsilantoj. Tiu ne plu aspektis kiel fantoma amaso, sed ardis sukcesen-kolore sub la sunbrilo, ĉar nuba ombro ĵus forpasis. Ĉirkaŭ ĝi la pigmea barakto ankoraŭ ne finiĝis, sed nun la ruĝvestitaj defendantoj ne plu pafis.

Tiumaniere, en krepuska silento, la viro el la dek-naŭa jarcento vidis la ferman scenon de la granda ribelo, la

perfortan starigon de lia regno. Kun eco de surpriza eltrovo la penso trafis lin, ke la vera mondo estas ĉi tiu, kaj ne tiu alia, kiun li postlasis; ke ĉi tio ne estas spektaklo, kiu kulminas kaj finiĝas; ke en ĉi tiu mondo pasos kiu ajn vivtempo ankoraŭ restos por li, kuŝos liaj devoj kaj danĝeroj kaj respondaĵoj. Li turniĝis kun novaj demandoj. Ostrog komencis respondi, sed sin interrompis abrupte. "Tiujn aferojn mi devas plene klarigi poste. Nuntempe ekzistas—devoj. La popolo venas sur la moviĝantaj vojoj al tiu ĉi distrikto el ĉiu parto de l'urbego—la vendplacoj kaj haloj estas dense plenaj. Vi venas ĝustatempe por ili. Oni postulegas vidi vin. Kaj alilande oni deziras vidi vin. Parizo, Novjorko, Chicago, Denver, Capri—miloj da urboj leviĝas kaj bruas nedecideme, kaj postulas vidi vin. Ili jam petegis dum jaroj, ke oni veku vin, kaj nun, kiam tio okazis, ili apenaŭ volas kredi—"

"Sed tamen—ĉu mi iru . . ."

Ostrog respondis de la alia flanko de la ĉambro, kaj la bildo sur la ovala disko paliĝis kaj malaperis, kiam la lumoj subite revenis. "Ekzistas kineto-foto-telegrafoj," li diris. "Dum vi kliniĝas al la homoj ĉi tie, tra la tuta mondo miriadoj da miriadoj da homoj, kunpuŝitaj kaj silentaj en mallumaj haloj, ankaŭ vidos vin. Per blanko kaj nigro, kompreneble—ne per koloroj kiel tiu. Kaj vi aŭdos iliajn kriojn pliigi tiujn en la halo mem.

"Kaj ankaŭ ni uzos optikan maŝinon" diris Ostrog, "kiun uzas kelkaj pozistinoj kaj dancistinoj. Eble ĝi estos nova por vi. Vi staros sub tre brila lumo, kaj oni vidos ne vin, sed treege grandigitan bildon ĵetitan sur ekranon—tiel ke eĉ la plej malproksima viro sur la plej alta galerio povas laŭvole kalkuli viajn okulharojn."

Graham ekprenis spasme unu el la demandoj en sia cerbo. "Kiom estas da loĝantoj en Londono?" li diris.

"Ok kaj dudoznoj da miriadoj."

"Ok kaj kio?"

"Pli ol tridek-tri milionoj."

La ciferoj superis la imagon de Graham.

"Oni postulos, ke vi diru ion," diris Ostrog. "Ne tion, kion vi kutimis nomi Parolo, sed tion, kion nia popolo nomas Vorto—nur unu frazon, ses ĝis sep vortojn. Ion

formalan. Se mi darf^{as}* sugesti—' Mi vekigis, kaj mia koro restas ĉe vi.' Tiuspecan aferon oni deziras."

" Ĉu vi ripetos tion?" demandis Graham.

" ' Mi vekigis, kaj mia koro restas ĉe vi.' Kaj klinu vin—klinu vin majeste. Sed unue ni devas havigi al vi nigrajn robojn—ĉar nigro estas via koloro. Ĉu tio vin ĝenos? Poste ili disiros hejmen."

Graham hezitis. " Mi devas fidi min al vi," li diris.

Ostrog ankaŭ evidente opiniis same. Li meditis dum momento, turnigis al la kurteno, kaj vokis mallongajn ordonojn al nevidataj servistoj. Preskaŭ tuj oni alportis nigran robon, tute similan al tiu, kiun Graham jam portis en la teatro. Dum li ĵetis ĝin ĉirkaŭ siajn ŝultrojn, aŭdigis en la ekstera ĉambro la akra sono de sonorilo. Ostrog turnigis ekdame al la servisto, sed subite ŝanĝis la decidon, tiris la kurtenon flanken, kaj malaperis.

Momente Graham staris apud la respekta servisto, aŭskultante la forirantajn piedpaŝojn de Ostrog. Okazis sono de rapida demando kaj respondo, kaj de kurantaj homoj. La kurteno abrupte fortiriĝis, kaj Ostrog reaperis, kun la peza vizaĝo arda pro ekscitiĝo. Li transiris la ĉambrom per unu paŝego, klakete mallumigis ĝin, ekprenis la brakon de Graham, kaj gestis al la spegulo.

" Tuj kiam ni forturnis nin," li diris.

Graham vidis lian montrofingron, nigran kaj kolosan, sur la bildigita Konsilejo. Momente li ne komprenis. Tiam li rimarkis, ke la flagstango, kiu antaŭe portis la blankan standardon, estas nuda.

" Ĉu tio signifas—" li komencis.

" La Konsilantoj cedis. Ilia regno finiĝis por ĉiam."

" Rigardu!" kaj Ostrog montris volvaĵon el nigro, kiu rampis saltete supren de la vaka stango, malvolvante sin dum leviĝo.

La ovala bildo paliĝis, kiam Lincoln tiris la kurtenon flanken kaj eniris.

" Ili fariĝas postulemaj," li diris.

Ostrog daŭre tenis la brakon de Graham.

" Ni levis la popolon," li diris. " Ni donis al ili armilojn. Almenaŭ hodiaŭ ilia volo devas esti leĝo."

* Pro komplezo permesiĝi (= ang. *may* ; germ. *dürfen*.)

Lincoln tenis flanke la kurtenon, kaj Graham kaj Ostrog trapasis. . . .

Survoje al la vendplacoj Graham ricevis ekvidon de longa mallarĝa blankmura ĉambro, en kiun viroj vestitaj per la tutmonda blua kanvaso portis aĵojn kovritajn kiel brankardojn, kaj en kiu viroj vestitaj per kuracista purpuro rapidis ĉien. El tiu ĉambro eliris krioj kaj ĝemoj. Li ricevis impreson pri malplena sangokovrita lito, pri homoj bandaĝitaj kaj sangomakulitaj sur aliaj kuŝejoj. Tio estis nur ekrigardo el ferbarita vojeto, kaj tiam murapogilo kaŝis la lokon, kaj ili jam foriris al la haloj. . . .

La muĝo de la homamaso nun sonis tre proksima; ĝi levigis ĝis tondro. Kaj, allogante lian atenton, flirtiĝis nigraj standardoj, svingiĝis blua kanvaso kaj brunaj ĉifonaĵoj, kaj la troplena vasteco de la teatro super la vendplacoj venis al lia vido je la fino de longa koridoro. La bildo etendiĝis. Li vidis, ke ili eniras la grandan teatron kie li unue aperis, la grandan teatron, kiun li laste vidis kvazaŭ ŝaktabulon el brilo kaj nigro, dum li forkuris de la ruĝa polico. Tiun fojon li eniris per galerio je nivelo tre alta super la scenejo. Nun denove la loko estis brile lumigita. Liaj okuloj serĉis la trairejon laŭ kiu li sin savis, sed li ne povis rekoni ĝin inter dekoj da ĝiaj similaĵoj, nek, pro la denseco de la ĉeestantoj, li povis vidi la frakasitajn sidlokojn, tranĉitajn kusenojn, kaj tiajn sekvojn de la barakto. Ekster la scenejo la tuta loko estis dense plena. Rigardate de supre, la efekto estis kvazaŭ spaco tute supermakulita de rozkoloro; ĉiu makulo estis vizaĝo senmova kaj turnita supren al li. Je lia apero kun Ostrog la kriadado ĉesis, la kantado silentiĝis, komuna intereso kvietigis kaj unuigis la malordon. Ŝajnis, kvazaŭ ĉiu individuo el tiuj miriadaĵoj lin rigardas.

ĈAPITRO DEK-TRIA.

LA FINO DE LA MALNOVA REĜIMO.

TROM, kiom Graham povis juĝi, estis tagmezo kiam la blanka standardo de la Konsilantoj falis. Sed kelkaj horoj devis forpasi antaŭ ol estis eble efektiviĝi la formalan kapitulacion; sekve, dirinte sian "Vorton," li eniris sian novan apartamenton en la Ventmaŝina Oficejo. La konstanta ekscitiĝo de la lastaj dek du horoj lasis lin neordinare laca, eĉ lia scivolo eluziĝis; dum iom da tempo li sidis malvigle kaj pasive kun malfermitaj okuloj; kaj dum iom da tempo li dormis. Vekis lin du kuracaj servistoj veninte kun stimuloj por subteni lin tra la venonta okazaĵo. Glutinte la drogojn, kaj sin baninte laŭ ilia konsilo en malvarma akvo, li sentis rapidan revenon de sia intereso kaj energio, kaj baldaŭ kapablis akompani Ostrogon, ŝajne tra kelkaj kilometroj da koridoroj, liftoj, kaj glitvojoj, al la ferma sceno de la regado de la Blanka Konsilantaro.

La vojo kondukis vageme tra labirinto de konstruaĵoj. Ili atingis fine koridoron, kiu fleksiĝis kaj montris antaŭ li oblongan malfermaĵon, nubojn varmajn pro sunsubiro, kaj la krudan konturon de la Konsilejo. Tumultoĵ de krioj venis supren al li. Post denova momento ili elvenis alte sur la supro de la klifo el torditaj konstruaĵoj, kiu superpendis la rompajon. La vasta spaco etendis sin antaŭ Graham; ne estante malpli stranga kaj mirinda, kvankam li jam spertis, en la ovala spegulo, malproksiman rigardon al ĝi.

Tiu krude amfiteatra spaco nun ŝajnis ampleksi pli ol kilometron trans la ekstera rando. Maldekstre ĝi ore lumiĝis, kaptante la sunbrilon, kaj malsupre kaj dekstre ĝi aspektis klara kaj malvarma sub la ombro. Super la ombre griza Konsilejo, kiu staris meze de ĝi, la granda nigra standardo de le cedo pendis ankoraŭ per malviglaj

faldoj kontraŭ la flama sunsubiro. Fortranĉitaj ĉambroj, haloj kaj koridoroj strange sin montris, rompitaĵ metalmasoj elstaris malgaje el la tordita rompaĵo, vastaj amasoj da plektitaj ŝnuregoj pendis kvazaŭ implikita algo, kaj el ĝia fundo venis tumulto de sennombraj voĉoj, fortegaj ŝokoj, kaj la sono de trumpetoj. Tute ĉirkaŭ tiu granda blanka konstruaĵo kuŝis rondo el ruinaĵo; la frakasitaj nigraj amasoj, la nudaj fundamentoj kaj ruinigitaj materialoj de la konstruaĵoj, kiujn oni detruis laŭ la ordono de la Konsilantaro, skeletoj el traboj, titanaj masoj da muraĵo, arbaroj el dikaj kolonoj. Inter la ombra rompaĵo sube, fluanta akvo ekbrilis kaj lumetis, kaj malproksime trans la spaco, el la mezo de senforma vasta maso da konstruaĵoj, elstaris la tordita fino de akvotubego, al' a kvindek metrojn en la aero, tondre ŝprucegante en brila kaskado. Kaj ĉie troviĝis grandaj amasoj da homoj.

Kie ajn ekzistis spaco por la piedoj, svarmis homoj, malgranduloj, mikroskope klaraj, krom kie la sunbrilo ŝanĝis ilin al nedistingebla oro. Ili grimpis la ŝanceliĝantaj murojn, ili sin tenis laŭ rondoj kaj grupoj ĉirkaŭ la altaj kolonoj, ili svarmis sur la randoj de la ruinoj. La aero estis plena de ilia kriegado, kaj ili sin premis kaj svingis al la meza spaco.

La supraj etaĝoj de la Konsilejo ŝajnis malplenaj, neniu estis videbla. Nur la pendanta standardo de la cedo siluetiĝis peze kontraŭ la lumo. La mortintoj kuŝis en la Konsilejo, aŭ estis kaŝitaj de la svarmanta amaso, aŭ forportitaj. Graham povis vidi nur malmultajn neatentitajn kadavrojn en alkovoĵoj kaj anguloj de la ruinoj, kaj inter la fluetoj de la akvo.

“Ĉu vi nun lasos ilin vidi vin, Majstro?” diris Ostrog.
“Ili tre deziras vin vidi.”

Graham hezitis, kaj paŝis tiam antaŭen al loko, kie la rompita rando de la muro abrupte finiĝis. Li staris rigardante malsupren, soleca, altkreska, nigra figuro kontraŭ la ĉielo.

Tre malrapide la svarmantoj sur la ruinoj rimarkis lin. Dum tiu tempo aretoj da viroj kun nigraj uniformoj aperis malproksime, sin ŝovante tra la amaso al la Konsilejo. Li vidis etajn nigrajn kapojn roziĝi, rigardante lin, vidis per tio ondon de rekono flui trans la lokon. Li pensis, ke li

devus doni al ili ian signon. Li levis la brakon, tiam gestis al la Konsilejo, kaj faligis la manon. La voĉoj sube fariĝis samsonaj, plifortiĝis, leviĝis al li kiel multnombraj ondetoj de akklamado.

La okcidenta ĉielo estis pale bluverda, kaj Jupitero brilis alte sude, antaŭ ol ĉi plenumis la kapitulacon. Supre okazis malrapida, nerimarkebla ŝanĝiĝo, la antaŭeniĝo de la nokto, trankvila kaj bela; malsupre troviĝis rapidado, ekscitiĝo, kontraŭemaj ordonoj, paŭzoj, spasmaj evoluoj de organizado, vasta leviĝanta bruoj kaj konfuziĝo. Antaŭ ol la Konsilantoj eliris, penegantaj ŝvitantoj, direktate de konflikto de krioj, elportis centojn da tiuj, kiuj pereis en la mano-ĉe-mano barakto en tiuj longaj koridoroj kaj ĉambroj.

Nigre vestitaj gardistoj viciĝis laŭ la vojo kiun la Konsilantoj estis sekvontaj; kaj ĝis tiel malproksime, kiel la okulo povis atingi en la nebule blua krepusko de la ruinoj, kaj svarmante nun ĉe ĉiu ebla punkto sur la kaptita Konsilejo, kaj laŭlonge de la frakasita klifo el ĝiaj ĉirkaŭaj konstruaĵoj, staris sennombraj homoj, kies voĉoj, eĉ kiam oni ne aplaŭdis, bruas kiel la maro sur ŝtoneta bordo. Ostrog jam elektis grandegan mason de rompita kaj deĵetita masonaĵo, kaj estradon el lignaj kaj metalaj traboj oni rapide starigis sur ĝi. La esencaj partoj jam kompletigis, sed zumantaj kaj bruaj maŝinoj ankoraŭ foje montriĝis en la ombro sub tiu portempa konstruaĵo.

La estrado enhavis pli malgrandan parton, sur kiu Graham staris, kun Ostrog kaj Lincoln apude, iom antaŭ grupo de malsuperaj oficistoj. Pli larĝa malsupra estrado ĉirkaŭis tiun supran parton, kaj sur ĝi staris la nigre vestitaj gardistoj de la revolucio, armitaj per la verdaj armiletoj, eĉ kies nomojn Graham ankoraŭ ne sciis. Tiuj, kiuj staris ĉirkaŭ li, rimarkis, ke liaj okuloj konstante vagas de la svarmanta amaso sur la krepuske lumigitaj ruinoj ĉirkaŭe, al la malluma konturo de la Blanka Konsilejo, de kie la Administrantoj poste venos, kaj al la nudaj klifoj el ruinaĵo kiuj ĉirkaŭas lin, kaj tiamaniere returnen al la popolo. La voĉoj de la amaso ŝvelis ĝis surdiga tumulto.

Li unue vidis la Konsilantojn tre malproksime sub la brilo de unu el la novaj lampoj kiuj markis ilian vojon;

ili estis grupeto de blankaj figuroj sub nigra arkaĵo. En la Konsilejo ĉio estis malluma. Li rigardis ilin alproksimiĝi, preterpasi unu elektran stelon post alia ; la minaca muĝo de la popolo, sur kiu ilia potenco daŭre premis dum cent kvindek jaroj, marŝis apud ili. Kiam ili pli alproksimiĝis, li vidis iliajn vizaĝojn, lacajn, palajn, kaj maltrankvilajn. Li vidis ilin palpebrumi supren tra la brilego ĉirkaŭ li kaj Ostrog. Li komparis iliajn strangajn malvarmajn rigardojn en la Halo de Atlas. . . . Baldaŭ li povis rekonigi kelkajn ; la viro kiu frapis la tablon al Howard, diktrunka viro kun ruĝa barbo, kaj malaltkreska viro kun delikataj trajtoj kaj strange longa kranio. Li rimarkis, ke tiuj du flustras kune kaj rigardas malantaŭ lin al Ostrog. Poste venis altkreska, malhela, bela viro, marŝante malgaje. Abrupte li rigardis supren, liaj okuloj tuŝis Grahamon momente, kaj pasis preter lin al Ostrog. La vojon, kiun oni konstruis por ili, oni faris tiamaniere, ke ili devis pretermarŝi kaj turniĝi antaŭ ol ili venis al la dekliva vojo el tabuloj, kondukanta supren al la estrado, kie ili devos cedi.

“ La Mastro, la Mastro ! Dio kaj la Mastro ! ” kriis la popolo. “ Al la infero la Konsilantoj ! ” Graham rigardis la amasojn, kiuj etendiĝis malantaŭen ekster kalkulebleco ĝis krianta nebuleto, kaj tiam Ostrogon apude, palan, kaj firman, kaj trankvilan. Lia okulo reiris al la grupeto da Konsilantoj. Kaj tiam li rigardis la familiarajn silentajn stelojn super sia kapo. La mirinda eco de lia destino subite evidentiĝis. Ĉu ambaŭ vivoj povas esti liaj—tiu eta vivo en lia memoro jam forpasinta ducent jarojn, kaj ankaŭ ĉi tiu nuna ?

ĈAPITRO DEK-KVARA.

DE LA ELRIGARDEJO.

KAJ tiele, post multaj prokrastoj, kaj laŭ vojo de dubo kaj batalo, tiu viro el la dek-naŭa jarcento fine atingis sian situacion je la supro de tiu malsimpla mondo.

Unue, kiam li vekigis el la longa profunda dormo, kiu sekvis lian saviĝon kaj la cedon de la Konsilantoj, li ne rekonis sian ĉirkaŭaĵon. Per peno li kaptis ideon en sia cerbo, kaj ĉio, kio jam okazis, revenis al li—unue kun nereala eco kvazaŭ aŭdata rakonto, aŭ io legata en libro. Kaj eĉ antaŭ ol lia memoro klariĝis, la ĝojo pri lia liberiĝo, la miro pri lia alta situacio, troviĝis ree en lia cerbo. Li estis posedanto de la mondo; Mastro de la Tero. Tiu granda nova epoko estis lia laŭ la plej kompleta senco. Li ne plu esperis trovi, ke lia sperto estas sonĝo; li nun deziris sin konvinki, ke ĝi estas reala.

Respekta valetto helpis lin vestiĝi sub la ordonoj de digna ĉefservisto, malgrandulo, kies vizaĝo montris lin japana, kvankam li parolis angle kiel anglo. De tiu japano li sciigis ion pri la nuna stato de aferoj. Jam la revolucio estas akceptita fakto; jam la komercon oni rekomencis tra la tuta urbo. Alilande la falo de la Konsilantoj ricevigis plejparte kun ĝojo. La Konsilantaro nenie estis populara, kaj la mil urboj de Okcidenta Ameriko, post ducent jaroj ankoraŭ ĵaluza pri Novjorko, Londono, kaj la Oriento, leviĝis preskaŭ unuanime antaŭ du tagoj pro la novaĵo pri la malliberiĝo de Graham. Parizo batalas interne de si. Le cetero de la mondo atendas.

Dum li matenmanĝis, la sono de telefona tintilo ŝprucis de angulo, kaj lia ĉefservisto atentigis lin pri la voĉo de Ostrog, kiu faras ĝentilajn demandojn. Graham interrompis sian manĝon por respondi. Tre baldaŭ Lincoln alvenis, kaj Graham tuj esprimis fortan deziron paroli al personoj, kaj vidi pli detale la novan vivon, kiu malfermiĝas

antaŭ li. Lincoln sciigis al li, ke post tri horoj reprezenta kolektiĝo de oficistoj kaj iliaj edzinoj kunvenos en la Oficiala Apartamento de la Ventmaŝina Ĉefo. La deziro de Graham suriri la vojojn de la urbo, tamen, nuntempe estas neplenumbla, pro la treega ekscitiĝo de la popolo. Tamen, estis tute eble, ke li spertu transrigardon al la urbo ĉe la elrigardejo de la ventmaŝina gardisto. Tien, do, Graham kondukiĝis de sia servisto. Lincoln, per ĝentila komplimento al la servisto, pardonpetis, ke li ne akompanos ilin, pro la premo de la administra laboro.

Pli alte eĉ ol la plej gigantaj ventradoj pendis la elrigardejo, plene tricent metrojn super la tegmentoj, malgranda diskforma aĵeto sur stango el metala puntaĵo, firmigita de dratoj. Al ĝia supro Graham tiriĝis sur malgranda ŝnurpendanta seĝo. Ĉe la duona alteco de la malfortŝajna stango staris malpeza galerio, de kiu pendis grupo da tuboj—tre etaj ili aspektis de supre—rondirantaj malrapide sur la ringo de ĝia ekstera barilo. Tiuj estis la lensoj, en rilato kun la speguloj de la ventmaŝina gardisto, en unu el kiuj Ostrog jam montris al li la alvenon de lia regno. Lia japana servisto supreniris antaŭ li, kaj ili pasigis preskaŭ unu horon per demandoj kaj respondoj.

La tago ŝajnis plena de la promeso kaj sento de l' printempo. La tuŝo de la vento varmigis. La ĉielo estis intense blua, kaj la vasta etendaĵo de Londono brilis konfuzo sub la matena suno. La aero estis pura kaj senfuma, dolĉa kiel la aero de monta valo.

Krom la neregula ruina ovalo ĉirkaŭ la Konsilejo kaj la nigra standardo kiu flirtis tie, la vasta urbego, vidate de supre, montris nemultajn signojn de la rapida revolucio kiu, laŭ lia imago, ŝanĝis la destinojn de la mondo dum unu nokto kaj tago. Homamaso ankoraŭ svarmis trans la ruinojn, kaj la gigantaj stacioj el lataĵo en la distanco, de kiuj foriris dum pacaj tempoj la aeroplana servo al la diversaj urbegoj de Eŭropo kaj Ameriko, ankaŭ aspektis nigraj pro la venkintoj. Trans mallarĝa tabula vojeto levita sur stabloj, kiu transiris la ruinojn, laboristoj sin okupis riparante la kablojn kaj dratojn inter la Konsilejo kaj la ĉefero de la urbo, prepare por la transmoviĝo de la ĉefoficejo de Ostrog el la Ventmaŝina Oficejo.

La cetero de la luma etendaĵo estis trankvila. Ĝia kvieteco estis tiel vasta, kompare kun la maltrankvilaj lokoj, ke baldaŭ Graham, rigardante ĝis trans ili, preskaŭ povis forgesi la milojn da homoj, kiuj kuŝis kaŝitaj sub la artefarita brilego en la kvazaŭ-subtera labirinto, mortintaj aŭ mortantaj pro siaj vundoj; forgesi la improviziajn hospitalojn kun la arego da kuracistoj, geflegistoj kaj vundit-portistoj febre okupitaj; forgesi, unuvorte, la tutan miron, konsternon kaj novecon sub la elektraĵ lampoj. Li sciis, ke tie sube en la kaŝitaj vojoj de la formikejo la revolucio triumfas, kaj la nigra koloro ĉie superas—nigraj insignoj, nigraj standardoj, nigraj girlandoj trans la stratoj. Kaj tamen ĉi tie, sub la freŝa sunbrilo, preter la kratero de la batalo, kvazaŭ nenio ĵus okazis al la tero, la arbaro de ventmaŝinoj, kiuj pliĝis de unu aŭ du dum la regno de la Konsilantoj, muĝis pace je sia senĉesa devo.

Malproksime, pinthavaj kaj zigzagaj pro la ventradoj, la montetoj de Surrey leviĝis bluaj kaj nebulaj; norde kaj pli proksime la akutaj konturoj de Highgate kaj Muswell Hill montriĝis simile ŝiritaj. Kaj trans la tuta lando, li sciis, sur ĉiu montsupro, kie antaŭe la heĝoj interplektiĝis kaj dometoj, preĝejoj, trinkejoj kaj farmdomoj nestis inter la arboj, ventmaŝinoj similaj al tiuj staris, portante vastajn reklamojn, nudaj kaj distingaj simboloj de la nova epoko; deĵetante rondrapidantajn ombrojn, ili provizis konstante la energion, kiu forfluis konstante tra ĉiuj arterioj de la urbego. Kaj sub tiuj vagis la sennombraj ŝaf- kaj brutaroj de la Brita Nutraĵa Kompanio, lia havaĵo, kun siaj solecaj gardistoj kaj paŝtistoj.

Neniu familiara konturo ie rompis la aron da gigantaj formoj sube. La Preĝejo de Sankta Paŭlo, li sciis, ankoraŭ restas, kaj multaj el la antikvaj konstruaĵoj ĉe Westminster, kaŝitaj for de la vido, superarkitaj kaj kovritaj inter la gigantaj konstruaĵoj de tiu granda epoko. La rivero Thames, ankaŭ, ne montris iun argentan ekrilon por rompi la dezerton de la urbo; la soifaj akvotubegoj glutis ĉiun guton de ĝia akvo antaŭ ol ĝi atingis la murojn. La riverlito kaj elfluejo, purigitaj kaj dragitaj, nun estis marakva kanalo, kaj gento de fulgaj boatistoj kondukis sur ĝi la pezajn materialojn de l'komerco de la Pool sub

la piedoj mem de la laboristoj. Nebule oriente, inter tero kaj ĉielo, pendis la amaso da mastoj de la kolosaj ŝipoj sur la Pool. Ĉar la tuta peza ŝargaĵo, por kiu ne necesis rapideco, alvenis per gigantaj velŝipoj de la finoj de la tero, kaj la pezaj varoj kiuj estis urĝaj, per meĥanikaj ŝipoj de pli malgranda kaj rapida speco.

Kaj sude, super la montetoj, venis vastaj akvopontoj kun marakvo por la kloakoj; kaj laŭ tri apartaj direktoj iris palaj linioj—la ĉefvojoj, makulitaj de moviĝantaj grizaj punktoj. Li decidis, je la unua okazo kiu sin prezentos, iri por vidi tiujn ĉefvojojn. Sed tio devos veni post la flugŝipo, kiun li baldaŭ provos. Lia serva oficisto priskribis la vojojn, kiel paron da larĝe kurbitaj surfacoj larĝaj cent metrojn, ambaŭ nur por veturiloj irantaj unudirekte, kaj faritaj el substanco nomita Edhamito—artefarita substanco, tiom, kiom li povis kompreni, simila al fortika vitro. Laŭlonge de tio rapidis stranga veturilaro kun kaŭĉuke kovritaj radoj, grandaj unuradaĵoj, veturiloj kun du kaj kvar radoj, antaŭenirante laŭ rapideco de po unu ĝis ses kilometroj ĉiuminute. Fervojoj delonge malaperis; kelkaj digoj restis tie kaj ĉi tie kiel rustkronitaj fosaĵoj. Kelkaj konsistigis la bazon de Edhamitaj ĉefvojoj.

Inter la unuaj aferoj kaptantaj lian atenton, troviĝis la aregoj da reklam-balonoj kaj kajtoj, kiuj foriris laŭ neregulaj perspektivoj norden kaj suden apud la direkto de la aeroplanaj vojaĝoj. Oni povis vidi neniujn grandajn aeroplanojn. Iliaj vojaĝoj ĉesis, kaj nur unu ŝajne malgranda monoplaneo* rondiris alte malproksime super la montetoj de Surrey, neimpona ŝvebanta punkto.

Fakto, kiun Graham jam sciis, kaj kiun tamen li nur malfacile povis imagi, estis, ke preskaŭ ĉiu provinca urbo, kaj preskaŭ ĉiu vilaĝo, jam malaperis. Nur kelkloke, li kredis, giganta hotelaspekta konstruaĵo staras inter kvadrataj kilometroj de sola propra bieno, kaj konservas la nomon de urbo—ekzemple Bournemouth, Wareham aŭ Swanage. Tamen la oficisto rapide konvinkis lin, ke tia ŝanĝiĝo estis neevitebla. La antikva reĝimo makulis la landon per farmbienoj, kaj post ĉiu tri-kvar kilometroj troviĝis la bieno de la posedanto de la kampoj, kun la

*Aeroplano kun nur unu flugilo.—*trad.*

loko de la trinkejo kaj la ŝufaristo, la spicisto kaj la preĝejo —la vilaĝo. Post ĉiu dek-duo da kilometroj troviĝis la provinca urbo, kie loĝis advokato, gren- kaj lan-vendisto, selisto, bestkuracisto, homa kuracisto, drapisto, ĉapelistino, kaj tiel plu. Ĉiu dek-du-kilometre—nur ĉar la dek-du-kilometra vojaĝo al la vendplaco, ses por iri, ses por reveni, estis tiel longa, kiel la farmistoj trovis komforta. Sed tuj kiam la fervojoj alvenis, kaj post tiuj la malpezaj fervojoj kaj la rapidaj aŭtomobiloj, kiuj anstataŭis ĉevalajn veturilojn, kaj tuj kiam oni komencis fari la ĉefvojojn el ligno kaj kaŭcuko kaj Edhamito, kaj el ĉiuspecaj elastaj daŭraj substancoj—la bezono al tiel oftaj urboj malaperis. Kaj la grandaj urboj pligrandiĝis. Ili allogis la laboriston per la magneta forto de ŝajne senfina okupado, la estron per sia sugesto pri senfina oceano da laboristoj.

Kaj dum la grado de vivkomforto plialtiĝis kaj la malsimpleco de la mekanismo de vivrimedoj kreskis, la loĝado en la kamparo pli kaj pli kariĝis, aŭ mallarĝiĝis kaj nebligis. La malapero de la paroĥestro kaj vilaĝa sinjoro, la forigo de la kampara kuracisto pro la urba specialisto, ŝtelis de la vilaĝo ĝian lastan kulturnuancon. Post kiam la telefono, kinematografo kaj gramofono anstataŭis jurnalajn, librojn, instruistojn kaj leterojn, vivi ekster la atingo de elektraj kabloj estis vivi kvazaŭ izolita sovaĝulo. En la kamparo troviĝis nek nutraĵoj nek vestaĵoj (laŭ la luksaj ideoj de la epoko), nek kompetentaj kuracistoj por gravaj tempoj, nek kunuloj, nek interesaĵoj.

Krome, la mekanikaj aparatoj por la terkultivo igis unu ingenieron egala al tridek laboristoj. Sekve, renversante la ŝtaton de la urba komizo dum la tempo, kiam Londono estis apenaŭ enloĝebla pro la karba malpuraĵo en la aero, la laboristoj nun venis nokte al la urbego kun ĝia vivo kaj ĝuaĵoj, kaj forlasis ĝin denove matene. La urbego jam glutis la homaron; la homo komencis novan gradon de sia evoluado. Komence troviĝis la vaganto, la ĉasisto; poste sekvis la terkultivisto de la kampara periodo, kies urboj kaj havenoj nur estis la ĉeflokoj kaj vendplacoj de la kamparo. Kaj nun, la logika sekvo de inventa epoko, troviĝis tiu nova vastega kolektiĝo da homoj.

Tiaj aferoj, kvankam simplaj faktoj por tiamuloj, streĉis la imagon de Graham, kiam li provis bildigi ilin

al si. Kaj kiam li ekrigardis " tien transen " al la strangaj aferoj ekzistantaj sur la kontinento, la imago tute rifuzis lin obei.

Li vidis revon pri urbo post urbo ; urboj sur vastaj ebenaĵoj, urboj apud grandaj riveroj, vastaj urboj laŭlonge de la marbordo, urboj zonitaj de neĝkovritaj montoj. Tra granda parto de la tero oni parolis angle ; se oni enkalkulis ĝian hispan-amerikan kaj hindan kun la negra kaj " Piĝin " (orient-azia) dialektoj, ĝi troviĝis la ĉiutaga lingvo de du trionoj de l'homaro. Sur la Kontinento, kun escepto de foraj kaj kuriozaj restaĵoj, nur tri aliaj lingvoj paroliĝis —la germana, kiu atingis ĝis Antioĥo kaj Genovo kaj tuŝis la hispan-anglan ĉe Cadiz ; francigita ruslingvo, kiu renkontis la hinda-anglan lingvon en Persujo kaj Kurdistano kaj la " Piĝin " anglan ĉe Pekin ; kaj la franca lingvo, ankoraŭ klara kaj brila, la lingvo por klareco, kiu disdividis la Mediteraneon kun la hinda anglaĵo kaj la germana lingvo, kaj atingis pere de negra dialekto al la Kongo.

Kaj ĉie nun trans la urbemita tero, krom en la administrata " negra zono " de landoj inter la tropikoj, la sama kosmopolita socia organizo regis, kaj ĉie de Poluso al Ekvatoro lia havaĵo kaj lia respondaĵo etendiĝis. La tuta mondo jam civilizigis ; la tuta mondo loĝis en urbegoj ; la tuta mondo estis lia.

En la nebula sudokcidento, ekbrilantaj kaj strangaj, voluptaj kaj iamaniere teruraj, brilis la Plezur-urboj, pri kiuj la kinemo-fonografo kaj la maljunulo sur la strato parolis al li. Strangaj lokoj memorigaj pri la legenda Sybaris, urboj de arto kaj beleco, aĉetebla arto, kaj aĉetebla beleco, senutilaj mirindaj urbegoj de moviĝo kaj muziko, kien rapidis ĉiuj, kiuj profitis de la sovaĝa malglora ekonomia barakto, kiu daŭre okazis en la brilaĉa labirinto sube.

Li sciis, ke ĝi ja estas sovaĝa. Kiel sovaĝa li kapablis juĝi, laŭ la fakto, ke tiu posta popolo aludas la Anglujon en la dek-naŭa jarcento, kiel la simbolon de idilia, senzorga vivo. Li turnis ree la rigardon al la sceno rekte antaŭ si, penante bildigi al si la grandajn fabrikejojn de tiu implikita labirinto. . . .

ĈAPITRO DEK-KVINA.

EMINENTAJ PERSONOJ.

LA oficiala apartamento de la Ventmaŝina Ĉefgardisto certe tiam mirigus Graham, se li enirus ĝin tuj post sia vivo de la dek-naŭa jarcento ; sed li jam kutimiĝis al la vivgrado de la nova epoko. Li eliris tra la nun familiaraj glitpaneloj sur ebenaĵon ĉe la supro de aro de tre larĝaj kaj malaltaj ŝtupoj, kiujn geviroj, multe pli brile vestitaj ol iuj, kiujn li ĝis nun vidis, supren- kaj malsupreniris. De tie li elrigardis laŭ perspektivo de subtila kaj variigita ornamaĵo nebrile blanka kaj violkolora kaj purpura, transpasita de pontoj, kiuj ŝajnis faritaj el porcelano kaj metala retaĵo ; ĝi finiĝis malproksime per nuba misteraĵo el truitaj ekranoj.

Rigardante supren, li vidis etaĝon super etaĝo da galerioj, kun vizaĝoj kiuj malsuprenrigardas al li. La aero estis plena de la babilado de sennombraj voĉoj, kaj de muziko kiu venis de supre, gaja kaj vigliga muziko, kies fonton li ne povis rimarki.

La centra vojo estis dense kovrita de homoj, sed tamen neniel estis malkomforte troplena ; sume tiu kolektiĝo certe enhavis multajn milojn. Ili aspektis brile, eĉ fantazie vestitaj, la viroj egale fantaziaj kun la virinoj, ĉar de longe malaperis la sobriga influo de la Puritana koncepto pri digno ĉe la vira vestaro. La haroj de la viroj, ankaŭ, kvankam oni malofte portis ilin longaj, kutime estis buklitaj laŭ maniero kiu pensigis pri frizisto, kaj senhareco jam malaperis for de la tero. Abundis frizitaj, rekte tranĉitaj amasoj, pri kiuj Rossetti carmiĝus, kaj unu sinjoro, kiun oni montris al Graham sub la mistera titolo "amoristo," portis la harojn aranĝitaj laŭ du taŭgaj plektaĵoj, laŭ la modo de Margarito en "Faŭsto." Modo kun unuopa plektaĵo ankaŭ rimarkiĝis ; ŝajnis, ke la urbanoj kun ĥina deveno jam ne hontis pri sia raso. Ne

evidentiĝis multe da unuformeco de modo ĉe la formoj de la vestaĵoj. La plej belkonturaj viroj montris sian simetron per senpantalonaĵoj longaj ŝtrumpoj; jen vidiĝis krispoj kaj faldaĵoj, jen mantelo, kaj jen robo. La manieroj de la periodo de Louis Xa eble estis la plej vaste favorataj, sed la estetikaj ideoj de la Okcidenta Azio ankaŭ aperis. Vira dikeco, kiu, dum Viktorinaj jaroj, devus suferi la premegajn danĝerojn, la senkompatan emfazon de fraka vestaro prema ĉe brakoj kaj kruroj, nun estis la bazo por abundo da digno kaj pendantaj faldaĵoj. Gracia maldikeco ankaŭ abundis. Por Graham, tipe nefleksebla viro el tipe nefleksebla epoko, tiuj ne nur aspektis korpe multe tro graciaj, sed ankaŭ multe tro viglaj je esprimo de vizaĝo. Ili gestis, esprimis surprizon, intereson, amuzon, super ĉio ili esprimis per surpriza libereco la emociojn instigitajn al iliaj spiritoj de la virinoj ĉirkaŭ ili. Eĉ je la unua ekvido evidentiĝis, ke la virinoj estas multe pli multnombraj ol la viroj.

La virinoj akompanantaj tiujn sinjorojn montris, egale, ĉe sinteno, vestaro kaj konduto malpli da emfazo kaj pli da subtileco. Iuj afektis klasikan simplecon ĉe robo kaj faldaĵoj, laŭ la modo de la unua franca imperio, kaj ekbriligis belajn ŝultrojn kaj brakojn dum Graham preterpasis. Aliaj portis malvaste faritajn robojn sen kudraĵo aŭ zono je la talio, kelkfoje kun longaj faldaĵoj pendantaj de la ŝultroj. La ĝuindaj trajtoj de la virina vespera vestaĵo ne malpliigis pro la forpaso de du jarcentoj.

Ĉies gestoj ŝajnis graciaj. Graham diris al Lincoln, ke li vidas homojn marŝi kvazaŭ en la bildoj de Rafaelo, kaj Lincoln respondis, ke la akiro de taŭga gestprovizo estas parto de la edukado de ĉiu riĉulo. La eniron de la Mastro oni salutis per speco de subrida aplaŭdo, sed tiuj homoj evidentiĝis sian distingitan ĝentilecon per tio, ke ili ne ĉirkaŭis lin nek ĝenis lin per persista rigardado, dum li malsupreniris la ŝtupojn ĝis la nivelo de la vojo.

Li jam sciigis de Lincoln, ke tiuj estas la ĉefoj de la tiama eminentularo de Londono; preskaŭ ĉiu ĉeestanto tiun vesperon estis aŭ potenca oficisto aŭ proksima parenco de potenca oficisto. Multaj ĵus revenis el la plezururboj de Eŭropo por bonvenigi lin. La aeronautaj aŭtoritatoj, kies foriĝo havis gravecon rilate la falon de la Konsilantaro nur

malpli ol la graveco de Graham mem, estis tre rimarkindaj, kaj same ankaŭ estis la Administrantaro de la Ventmaŝinoj. Inter aliaj, ĉeestis iuj el la plej eminentaj oficistoj de la Nutraĵa Departemento; la administranto de la Tuteŭropa Porkejo havis aparte interesan kaj malĝojan vizaĝon kaj delikate cinikan sintenon. Episkopo en plena eklezia vestaro pasis tra la vido de Graham, parolante kun sinjoro vestita ĝuste kiel la tradicia Chaucer, eĉ ĝis la laŭra krono.

“ Kiu tiu estas? ” li demandis preskaŭ senvole.

“ La Episkopo de Londono, ” diris Lincoln.

“ Ne, mi intencis diri la alia. ”

“ La Poeto Laŭreata. ”

“ Oni ankoraŭ—? ”

“ Li ne verkas poemojn, kompreneble. Li estas kuzo de Wotton, iu konsilanto. Sed li apartenas al la Ruĝrozaj Rojalistoj—ĉarma klubo—kaj ili daŭrigas tiajn tradiciojn. ”

“ Asano diris al mi, ke ankoraŭ ekzistas reĝo. ”

“ La reĝo ne apartenas al la ‘ Rojalistoj. ’ Oni devis forpeli lin. Pro la sango de la Stuartoj mi supozas; sed, vere— ”

“ Netolereble—ĉu? ”

“ Por la klubo, jes. ”

Graham ne bone komprenis ĉion ĉi, sed ĝi ŝajnis parto de la ĝenerala renversiĝo en la nova epoko. Li kliniĝis fiere al la unua prezentito. Evidentiĝis, ke subtilaj distingiĝoj de klasoj regas eĉ en tiu kolektiĝo; ke nur al malgranda nombro da gastoj, al interna grupo, Lincoln lin prezentos. Tiu unua prezentito estis la Ĉefa Aeronauto, viro, kies sunbrunigita haŭto kontrastis strange kun la delikataj koloroj de liaj kunuloj. Nuntempe lia ĝustatempa foriĝo de la Konsilantaro igis lin treega gravulo.

Lia sinteno kontrastis tre preferinde, laŭ la ideoj de Graham, kun la ĝenerala aspekto. Li faris kelkajn banalajn frazojn, certigojn pri lojaleco, kaj liberajn demandojn pri la sano de la Mastro. Lia sinteno estis vigla, lia voĉtono ne havis la facilan stakaton de la tiama angla lingvo. Li tre bone klarigis al Graham, ke li estas afabla “ aera hundo ”—li uzis tiun esprimon—ke ne ekzistas ĉe li sensencaĵo, ke li estas tute vireca viro, kaj krom tio malnovmoda, ke li ne pretendas scii multon, kaj ke tio,

kion li ne scias, ne valoras la scion. Li abrupte kliniĝis, tute ne komplezaĉe, kaj forpasis.

“Mi ĝojas, ke tiu tipo daŭre ekzistas,” diris Graham.

“Pro gramofonoj kaj kinematografoj,” diris Linclon, iom malice. “Li studis tion el la antikva vivo.” Graham ekrigardis denove la grandan korpon. Ĝi estis kurioze memoriga.

“Efektive, ni subaĉetis lin,” diris Lincoln. “Parte. Kaj parte li timis pri Ostrog. Ĉio dependis de li.”

Li turniĝis abrupte, por prezenti la Ĝeneralan Inspektoron de la Publikaj Lernejoj. Tiu estis gracila figuro kun blugriza akademia robo. Li radiis al Graham tra nazumaj okulvitroj de Viktorina modelo, kaj klarigis siajn dirojn per gestoj de bele zorgita mano. Graham tuj interesiĝis pri la okupo de tiu sinjoro, kaj faris al li kelke da neordinare trafaj demandoj. La Ĝenerala Inspektoro ŝajnis amuziĝi pri la fundamenta abrupteco de la Mastro. Li sin montris iom senscia pri la monopolo de instruado, kiun lia Kompanio posedas; tio estis funkciigita per kontrakto kun la sindikato reganta la diversajn distriktojn de Londono, sed li entuziasmiĝis pri la eduka progreso farita de post la Viktorina epoko. “Ni venkis la instruegon,” li diris, “tute venkis ĝin—ne plu okazas ekzameno en la mondo. Ĉu vi ne ĝojas?”

“Sed kiel vi instigas ilin labori?” demandis Graham.

“Ni igis la laboron alloga—kiel eble plej alloga. Kaj se ĝi ne allogas ilin—ni ne plu atentigas ĝin. Ni okupas vastan kampon.”

Li daŭris kun detaloj, kaj ili longe interparolis. Graham sciigis, ke la Universitatoj ankoraŭ ekzistas sub modifita formo. “Ekzistas, ekzemple, tipo de knabino,” diris la Inspektoro, ŝvelante pro sento de sia propra utileco, “kun vera pasio por severa studado—se ĝi ne estas tro malfacila, kompreneble. Ni provizas por ili milope. Je la nuna momento,” li aldiris kun Napoleona gesto, “preskaŭ kvincent gramofonoj prelegas en diversaj partoj de Londono pri la influo de Platono kaj Swift sur la amaferoj de Shelley, Hazlitt, kaj Burns. Kaj poste oni verkos traktaĵojn pri la prelegoj, kaj la nomojn laŭ meritordo oni anoncos je publikaj lokoj. Vi konstatas, kiom via

eta ĝermo jam kreskis. La needukita meza klaso de viaj tagoj tute malaperis.”

“Pri la publikaj komenc-lernejoj,” diris Graham. “Ĉu vi direktas ilin?”

La Ĝenerala Inspektoro respondis jese—“ĉiujn.” Nu, Graham, dum siaj lastaj demokrataj tagoj treege interesigis pri tiuj, kaj lia demandado plivigliĝis. Okazaj frazoj diritaj de la maljunulo, kun kiu li interparolis en la mallumo, revenis al lia cerbo. La Inspektoro, efektive, subtenis la vortojn de la maljunulo. “Ni penas tre plaĉigi la komenc-lernejojn por la infanetoj. Ili tiel frue devas eklabori. Nur kelkaj simplaj principoj—obeado—laboremo.”

“Vi instruas al ili tre malmulton.”

“Kial ni agu alie? Tio nur kaŭzus ĝenon kaj mal-kontentiĝon. Ni amuzas ilin. Eĉ nun—ni spertas ĝenojn—agitadojn. Oni ne povas scii, de kie la laboristoj ricevas la ideojn. Ili informas unu la alian. Ekzistas revoj pri socialismo—eĉ pri anarkismo! Agitistoj *insistas* labori inter ili. Mi opinias—mi ĉiam opinias—ke mia unua devo estas batali kontraŭ la popola malkontento. Kial oni malfeliĉigu la popolon?”

“Mi scivolos pri tio,” diris Graham penseme. “Sed troviĝas multe da aferoj, kiujn mi deziras scii.”

Lincoln, kiu staris observante la vizaĝon de Graham dum la tuta interparolo, nun intervenis. “Troviĝis aliaj personoj,” li diris subvoĉe.

La Ĝenerala Inspektoro de Lernejoj gestis sin for. “Eble,” diris Lincoln, kaptante senzorgan rigardon, “vi volus ekkoni kelkajn el tiuj sinjorinoj.”

La filino de la Administranto de la Porkejoj estis aparte ĉarma etulino kun ruĝaj haroj kaj brilaj bluaj okuloj. Lincoln forlasis lin por ke li interparolu kun ŝi, kaj ŝi sin montris vera entuziasmulo pri la “karaj antikvaj tagoj” (kiel ŝi nomis ilin), kiuj vidis la komencon de lia tranco. Dum ŝi parolis ŝi ridetis, kaj ŝiaj okuloj ridetis laŭ maniero kiu postulis respondon.

“Mi jam multfoje provis,” ŝi diris, “imagi tiujn romantikajn tagojn. Kaj por vi—ili estas memorajoj. Kiel stranga kaj troplena la mondo nepre aspektas por vi! Mi vidis fotografaĵojn kaj bildojn pri la pasinteco—la

izolitaj dometoj konstruitaj per brikoj el bruligita koto kaj tute nigraj pro la fulgo de viaj fajroj ; la fervojaj pontoj la simplaj aŝiĝoj ; la severaj sovaĝaj puritanaj viroj kaj nigraj jakoj kaj tiuj altaj ĉapeloj ; feraj vagonaroj sur feraj supraĵoj ; ĉevaloj kaj brutoj, kaj eĉ hundo kiuj kuris duonsovaĝe sur la stratoj. Kaj subite vi alvenas al ĉi tio ? ”

“ Al ĉi tio, ” diris Graham.

“ El via vivo—el ĉio familara. ”

“ La antikva vivo ne estis feliĉa, ” diris Graham. “ Mi ne bedaŭras ĝin. ”

Ŝi rigardis lin rapide. Okazis mallonga paŭzo. Ŝi sopiris kuraĝige. “ Ĉu ? ”

“ Ne, ” diris Graham, “ ĝi estis vivo malgranda-sensignifa. Sed ĉi tiu—. Ni kredis la mondon sufiĉe malsimpla kaj homplena kaj civilizita. Tamen mi vidas kvankam en ĉi tiu mondo mi apenaŭ havas aĝon de kvin tagoj—postenrigardante mian propran tempon, ke estis kurioza, barbara tempo—nur la komenciĝo de tiu nova epoko. Nur la komenciĝo de ĉi tiu epoko. trovos malfacile kompreni, kian malmulton mi scias. ”

“ Vi povas demandi al mi ion ajn, kion vi deziras, ” diris, ridetante je li.

“ Diru al mi, do, kiuj estas tiuj personoj. Mi ankoraŭ scias nenion pri ili. Ili perpleksas min. Ĉu ekzistas generaloj ? ”

“ Ĉu viroj kun ĉapeloj kaj plumoj ? ”

“ Nu, kompreneble, ke ne. Ne ! Mi supozas, ke ĉi tiu estas la homoj kontrolantaj la grandajn publikajn aferojn. Kiu estas tiu viro kun eminenta aspekto ? ”

“ Tiu ? Li estas tre grava oficisto. Tiu estas Mordred. Li estas ĉefdirektoro de la Fako por Kontraŭgalaj Piloloj. Oni diras, ke liaj laboristoj foje fabrikas miriaden miriadoj da piloloj dum la dudek kvar horoj de unu tago. Imagu miriaden da miriadoj ! ”

“ Miriaden da miriadoj ! Ne estas mirinde, ke li aspektas fiera, ” diris Graham. “ Piloloj ! Kia mirinda tempo estas nuna ! Kaj pri tiu viro vestita purpure ? ”

“ Li ne estas el la plej interna rondo, vi komprenas. Sed oni ŝatas lin. Li estas vere lerta kaj tre amuza. Li estas ĉefo de la Medicina Fakultato de nia Londono. ”

Universitato. Ĉiuj kuracistoj vestiĝas purpure. Sed, kompreneble, personoj, kiujn oni pagas per mono, ĉar ili faras ion——” ŝi forridetis la pretendojn de tiaj homoj.

“Ĉu estas ĉi tie eminentaj artistoj aŭ aŭtoroj?”

“Neniuj aŭtoroj. Ili plejparte estas tiel kuriozaj—kaj tiom pripensas sin mem. Kaj ili terure kverelas inter si! Ili eĉ batalas, kelkaj el ili, por antaŭeco, sur ŝtuparo! Ĉu ne terure? Sed mi pensas, ke Raysbury, la novmoda kapilotomisto, ĉeestas hodiaŭ. El Capri.”

“Kapilotomisto?” diris Graham. “Ha, mi memoras. Artisto! Nu, kial ne?”

“Ni devas atenti lin,” ŝi diris senkulpage. “Niaj kapoj restas je liaj manoj.” Ŝi ridetis.

Graham hezitis pri la invitita komplimento, sed lia rigardo estis esprimoplena. “Ĉu la artoj kreskis kun la ceteraj civilizitaj aferoj?” li diris. “Kiuj estas viaj eminentaj pentristoj?”

Ŝi rigardis lin dubeme. Tiam si ridis. “Momente,” ŝi diris, “mi kredis, ke vi volas diri——” Denove ŝi ridis. “Vi intencas aludi, ĉu ne, tiujn bonulojn, kiujn oni antaŭe tiom laŭdis, ĉar ili kapablis kovri grandajn kanvasojn per oleaj farboj? Grandajn oblongojn. Kaj oni kutimis meti la aĵojn en orumitajn kadrojn kaj pendigi ilin linie en la kvadrataj ĉambroj. Ni ne posedas tiajn. Oni laciĝis pri tiaj aĵoj.”

“Sed kion vi unue kredis, ke mi aludas?”

Ŝi metis signife la fingron sur vango, kies arda koloro superis suspekton, kaj ridetis kaj aspektis tre petoleta kaj bela kaj alloga. “Kaj tie,” kaj ŝi montris la palpebron.

Graham spertis riskeman momenton. Tiam venis groteska memoro pri bildo ie vidita, pri Onklo Toby kaj la Vidvino.* Antikva honto kaptis lin. Li akre konsciĝis, ke li estas videbla al granda nombro da interesitoj. “Mi komprenas,” li diris nekompetente. Li sin turnis mallerte for de ŝia ĉarma facileco. Li rigardis ĉirkaŭen kaj renkontis kelkajn rigardojn, kiuj tuj okupis sin pri aliaj aferoj. Eble li iomete ruĝiĝis. “Kiu tiu estas, kiu parolas kun la safrane vestita sinjorino?” li demandis, evitante ŝiajn okulojn.

*El “Sentimenta Vojaĝo”—de Laurence Sterne.

La persono aludita, li sciĝis, estas iu el la ĉefaj organizantoj de la amerikaj teatroj, ĵus reveninta de giganta prezentado en Meksiko. Lia vizaĝo pensigis Graham pri busto de Kaligulo. Alia frape aspekta viro estis la Mastro de Negra Laboro. Tiu frazo siatempe ne profunde impresis lin, sed ĝi poste revenis—Mastro de Negra Laboro? La etulino, neniel embarasite, montris al li ĉarman virineton, kiu estis unu el la subaj edzinoj de la Episkopo de Londono. Ĝi aldonis laŭdojn pri la episkopa kuraĝo—antaŭe ekzistis regulo pri la monogamio ĉe la ekleziuloj—“ stato de aferoj nek natura, nek konvena. Kial la natura evoluo de la afekcioj estu nanigita kaj limigita, nur tial, ke viro estas pastro? ”

“ Kaj, flanke de tio,” ŝi aldiris, “ ĉu vi mem estas Anglikano? ” Graham hezitis ĉe la rando de demando pri la stato de “ suba edzino ”—ŝajne eŭfemisma frazo—kiam la reveno de Lincoln interrompis la interesan kaj sugestan konversacion. Ili transiris la vojon ĝis loko kie altkreskulo karmezine vestita, kaj du ĉarmaj personoj kun birmaj kostumoj (aŭ ŝajnis tiel al li) atendis lin respekte. De ties ĝentilaĵoj li pasis al aliaj prezentoj.

Post nelonge lia amaso da impresoj komencis sin ordigi en ĝeneralan efekton. Unue la brileto de la kolektiĝo levis ĉiujn demokratojn sentojn de Graham ; li sin sentis malamika kaj satira pri ĝi. Sed la homa naturo ne povas kontraŭstari atmosferon de ĝentila estimo. Baldaŭ la muziko la lumo, la ludado de la koloroj, la brilaj brakoj kaj ŝultroj ĉirkaŭ li, la tuŝo ĉe la manoj, la efemera interesiteco sur ridetaj vizaĝoj, la ŝaŭma sono de lerte modulitaj voĉoj, la atmosfero de komplimento, interesiĝo kaj respekto, ĉiuj kunteksiĝis en ŝtofo de nedubebla plezuro. Graham dum iom da tempo forgesis siajn vastajn decidojn. Li cedis nekonscie al la ebrieco de la situacio, kiun oni proponis por li, lia sinteno fariĝis pli konvinke reĝa, liaj piedoj paŝis firme, la nigra robo pendis per pli kuraĝaj faldoj kaj la fiereco nobligis al li la voĉon. Spite ĉion, tiu esti brila interesa mondo.

Li rigardis supren, kaj vidis pasi trans porcelanaraponton kaj rigardi malsupren al li, vizaĝon, kiu preskaŭ tuj kaŝiĝis—la vizaĝon de la knabino, kiun li vidis la pasin

tan nokton en la ĉambreto de la teatro post lia liberiĝo for de la Konsilantaro. Kaj ŝi observis lin.

Momente li ne memoris, kiam li antaŭe vidis ŝin, kaj tiam venis nebula memoro pri la emocioj de ilia unua renkonto. Sed la dancanta reto de melodio ĉirkaŭ li tenis la melodion de tiu granda marŝkanto ankoraŭ for de lia memoro.

La sinjorino al kiu li parolis ripetis sian diron, kaj Graham revokis sin al la kvazaŭ-reĝa koketado, kiun li ĵus entreprenis.

Tamen, nekompreneble, eniris lian spiriton malklara senripozeco, sento, kiu kreskis ĝis malkontento. Li sentis sin ĝenata kvazaŭ de duone forgesita devo, de sento pri gravaj aferoj kiuj glitas for de li inter la lumo kaj la brilo. Tute ĉesis la allogo, kiun li komencis senti pri la virinoj, kiuj amase ĉirkaŭis lin. Li ne plu redonis nelertajn nebulajn respondojn al la subtile amemaj antaŭ-provoj, kiujn oni faris al li, kaj liaj okuloj forvadis, por kapti alian vidon al la knabino de la frua ribelo.

Kie, precize, li antaŭe vidis ŝin ?

Graham staris en unu el la superaj galerioj, interparolante kun brilokula sinjorino pri Edhamito—li, ne ŝi, elektis la temon. Li ĵus interrompis ŝiajn varmajn certigojn pri propra sindediĉo per praktika demando. Li trovis ŝin, kiel li jam trovis kelkajn aliajn tiamajn virinojn tiun vesperon, malpli bone instruita, ol ĉarma. Subite, baraktante kontraŭ la kirlanta fluo de la pli proksima melodio, pulsante venis malsupren al li la revolucia kanto, la granda kanto aŭdita de li en la Halo, raŭka kaj masiva.

Ho ! nun li memoras !

Li ekrigardis supren, surprizite, kaj vidis super si rondan fenestreton, tra kiu la kanto venas, kaj, preter tio, la suprajn nivelojn de kabloj, la bluan nebuleton, kaj la pendantan teksaĵon de la lampoj sur la publikaj vojoj. Li aŭdis la kanton fendi tumulton de voĉoj, kaj halti. Li rimarkis tute klare la zumon kaj tumulton de la moviĝantaj trotuaroj kaj la murmuron de multaj homoj. Li sentis nebulan kredon, kiun li ne povis klarigi, specon de instinkta ideo, ke ekstere sur la stratoj granda homamaso nepre observas tiun lokon, kie la Mastro sin amuzas,

Kvankam la kanto tiel abrupte haltis, kaj la propra muziko de tiu kunveno ree sin enrudis, la ario de la marŝkanto, nun komencite, restis en lia spirito.

La brilokula sinjorino ankoraŭ baraktis kun la misteroj de Edhamito, kiam li denove rimarkis la knabinon, kiun li vidis en la teatro. Ŝi venis al li nun laŭ la galerio; li vidis ŝin unue, antaŭ ol ŝi vidis lin. Ŝi portis vestaĵon lumete grizan, ŝiaj malhelaj haroj kuŝis ĉirkaŭ ŝia frunto kvazaŭ nubo, kaj, kiam li ŝin vidis, la malvarma lumo el la rondaj malfermaĵoj al la vojoj falis sur ŝian mallevitan vizaĝon.

La sinjorino kiu sin ĝenis pri Edhamito vidis la ŝanĝiĝon de lia aspekto, kaj kaptis la okazon por liberiĝi. "Eble vi ŝatus koni tiun knabinon, Majstro?" ŝi demandis maltime. "Ŝi estas Heleno Wotton—nevino de Ostrog. Ŝi scias multajn seriozaĵojn. Ŝi estas unu el la plej seriozaj vivantaj homoj. Mi estas certa, ke vi ŝatos ŝin."

Post denova momento Graham interparolis kun la knabino, kaj la brilokula etulino jam forflugetis.

"Mi bone memoras vin," diris Graham. "Vi ĉeestis en tiu ĉambreto. Kiam ĉiu kantis kaj batis la takton per la piedoj. Antaŭ ol mi paŝis trans la Halon."

Ŝia momenta embarasiĝo forpasis. Ŝi levis la rigardon al li, kaj ŝia esprimo estis firma. "Ĝi estis mirinda," ŝi diris, hezitis, kaj parolis per subita penego. "Ĉiuj volonte mortus por vi, Majstro. Sennombraj homoj ja mortis por vi tiun nokton."

Ŝia vizaĝo ardis. Ŝi ekrigardis rapide flanken, por certiĝi, ke neniu alia aŭskultas ŝiajn vortojn.

Lincoln aperis je iom da distanco sur la galerio, alproksimiĝante al ili tra la amaso. Ŝi vidis lin, kaj turniĝis al Graham strange avide, kun rapida ŝanĝiĝo al konfidenco kaj intimeco. "Majstro," ŝi diris rapide, "Mi ne povas sciigi al vi ĉi tie kaj nun. Sed la popolo estas tre malfeliĉa. Oni subpremas ilin—oni misregas ilin. Ne forgesu la popolon, kiu frontis la morton—la morton, por ke vi vivu."

"Mi scias—nenion—" komencis Graham.

"Mi ne povas nun sciigi al vi."

La vizaĝo de Lincoln aperis apud ili. Li kliniĝis pardonpete al la fraŭlino.

“Vi trovas la novan mondon amuza, Majstro?” demandis Lincoln, kun rideta respekto, kaj indikis la vastecon kaj brilecon de la kunveno per unu ampleksa gesto. “Ĉiokaze, vi trovos ĝin ŝanĝita.”

“Jes,” diris Graham, “ŝanĝita. Kaj, tamen, post ĉio, ne multe ŝanĝita.”

“Atendu, ĝis vi vin trovos en la aero,” diris Lincoln. “La vento jam malpliĝis. Eĉ nun aeroplano atendas vin.”

La sinteno de la knabino atendis forpermeson.

Graham rigardis ŝian vizaĝon, ekdemandis ion, trovis averton en ŝia esprimo, kliniĝis al ŝi, kaj turniĝis por akompani al Lincoln.

ĈAPITRO DEK-SESA.

LA MONOPLANO.

LA Flugstacioj de Londono staris kune en kruda duonrondo ĉe la suda bordo de la rivero. Ili konsistigis tri arojn el po du stacioj, kiuj konservis la nomojn de antikvaj suburbaj montetoj aŭ vilaĝoj. Ili nomiĝis respektive Roehampton, Wimbledon, Streatham, Norwood, Blackheath kaj Shooter's Hill. Ili estis similaj konstruaĵoj levitaj alte super la ĝenerala nivelo de la tegmentoj. Ĉiu el ili estis longa proksimume kvar mil metrojn kaj larĝa mil metrojn, kaj konstruita el la miksaĵo de aluminio kaj fero kiu anstataŭis la feron por arkitekuro. Iliaj plej altaj etaĝoj estis lataĵo el traboj, tra kiu supreniris liftoj kaj ŝtuparoj. La supro estis ebena etendaĵo, kun partoj—la forsendaj portiloj—kiujn oni povis levi, kaj kiuj povis tiam ruliĝi sur iomete klinitaj reloj al la limo de la strukturo.

Graham iris al la flugstacioj per la publikaj vojoj. Akompanis lin Asano, lia japana servisto. Lincoln estis forvokita de Ostrog, kiu sin okupis pro la administraj aferoj. Forta gvardio el la ventmaŝina polico atendis la Mastron ekster la oficejoj, kaj oni pretigis spacon por li sur la supera movtrotuaro. Lian veturon al la flugstacio oni ne atendis, tamen granda amaso kolektiĝis kaj sekvis lin al lia celita loko. Irante, li aŭdis la popolon voki lian nomon, kaj vidis sennombrajn homojn kaj infanojn bluestitajn svarmi el la ŝtuparoj ĉe la meza vojo, gestante kaj kriante. Li ne povis kompreni tion, kion ili vokas. Li certigis denove pri la evidenta ekzisto de vulgara dialekto inter la urbaj malriĉuloj. Kiam fine li forlasis la trotuaron, lia gvardio tuj ĉirkaŭiĝis de densa, ekscitita amaso. Poste li memoris, ke kelkaj provis atingi lin kun petskriboj. Lia gvardio malfacile faris por li spacon.

Li trovis monoplanon sub gardo de aeronaŭto; ĝi atendis lin sur la okcidenta stacio. Observate de proksime, tiu mekanismo ne plu aspektis malgranda. Kuŝante sur la forflugiga portilo sur la vasta etendaĵo de la stacio, la skeleto de ĝia aluminia trunko estis tiel alta, kiel la korpo de dudek-tuna jaĥto. Ĝiaj flankaj subtenaj flugiloj, firmigitaj de metalaj nervoj preskaŭ same kiel tiuj de abela flugilo, kaj faritaj el vitreca artefarita membrano, ĵetis siajn ombrojn trans spacon de centoj da kvadrataj metroj. La seĝoj por la inĝeniero kaj la pasaĝero pendis libere kaj svingiĝis sur komplika ŝnuraro, inter la ŝirmaj ripoj de la korpo kaj multe malantaŭ la mezo. La seĝo por la pasaĝero estis ŝirmita de ventŝirmilo kaj defendita de metalaj stangoj portantaj aerkusenojn. Tion, laŭ deziro, oni povis plene enfermi, sed Graham volis sperti la novaĵon, kaj petis, ke oni lasu ĝin malfermita. La aeronaŭto sidis malantaŭ vitraĵo, kiu ŝirmis lian vizaĝon. La pasaĝero povis fiksi sin firme sur la seĝo, kaj tio estis preskaŭ neevitebla je alteriĝo, aŭ li povis sin movi per tenilo kaj stango al ŝranko je la malantaŭo de la maŝino, kie liaj pakajoj, liaj ekstraj kovriloj kaj refreŝigiloj estis metitaj; tiuj ankaŭ kun la seĝoj faris kontraŭpezon por partoj de la meza motoro, kiuj elstaris al la helico.

La stacio ĉirkaŭ li estis malplena, kun escepto de Asano kaj ilia gardistaro. Laŭ instruo de la aeronaŭto li sin metis en la sidlokon. Asano forpaŝis tra la stangoj de la korpo, kaj staris sube sur la stacio, svingante la manon. Li ŝajnis gliti dekstren laŭ la stacio, kaj malaperis.

La motoro laŭte zumis, la helico turniĝis, kaj dum sekundo la stacio kaj la aliaj konstruaĵoj glitis rapide kaj horizontale preter la okuloj de Graham; tiam ili ŝajnis abrupte kliniĝi supren. Li premis instinkte la stangetojn je ambaŭ flankoj de si. Li sin sentis iri supren, kaj aŭdis la venton fajfi super la randon de la ventŝirmilo. La helico rondiris per fortegaj ritmaj impulsoj—unu, du, tri, paŭzo; unu, du, tri—kiujn la inĝeniero tre delikate regis. La maŝino komencis tremantan vibradon, kiu daŭris dum la tuta flugo, kaj la tegmentaj spacoj ŝajnis forflugi tre rapide dekstren kaj tre rapide malpligrandiĝi. Li rigardis de la vizaĝo de la aeronaŭto tra la ripoj de la maŝino. Rigardante flanken, nenion tre surprizan li vidis—rapida ŝnurfervojo

povus doni similajn sentojn. Li rekonis la Konsilejon kaj la Ridge ĉe Highgate. Kaj tiam li rigardis rekte malsupren inter siaj piedoj.

Momente korpa teruro kaptis lin, pasia sento de nefirmeco. Li premegis la stangon. Dum unu aŭ du sekundoj li ne kapablis levi la okulojn. Ĉirkaŭ tridek metrojn sub li staris unu el la grandaj ventradoj de sudorienta Londono, kaj preter tiu la suda flugstacio estis kovrita de nigraj punktetoj. Ĉio ŝajnis forfali de li. Dum sekundo li spertis impulson sekvi la teron. Li kunpremis la dentojn, levis la okulojn per muskola penego, kaj la panika momento forpasis.

Li restis kelkan tempon kun la dentoj firme kunpremitaj, kun la okuloj rigardegantaj en la ĉielon. Bat', bat', bat'—paŭz', daŭris la motoro; bat', bat', bat'—paŭz'! Li premis la stangojn, ekrigardis la aernaŭton, kaj vidis rideton sur ties sunbrunigita vizaĝo. Li ridetis reciproke—eble iom ŝajnige. "Estas iom strange unue," li kriis, antaŭ ol li memoris ŝian dignon. Sed dum longe li ne kuraĝis denove rigardi malsupren. Li rigardis preter la kapon de la aernaŭto, al loko, kie rando el nebule blua horizonto ŝteliras supren sur la ĉielo. Dum kelka tempo li ne povis forigi de si la penson pri ebla akcidento. Bat', bat', bat', paŭz; supozu, ke iu negrava ŝraŭbo malĝustiĝus en tiu subtena motoro! Supozu—! Li severe penis forpeli ĉiujn tiajn supozojn. Post nelonge ili forlasis almenaŭ la antaŭon de lia atento. Kaj daŭre ili supreniris, pli kaj pli alten en la klara aero.

Kiam malaperis la mensa ŝoko pro nesubtenata moviĝo tra la aero, liaj sentoj ne plu malplaĉis al li, rapide fariĝis plezuroj. Oni antaŭe avertislin pri aermalsano. Sed li trovis la pulsan iradon de la monoplano, dum ĝi sin pelis kontraŭ la malforta sudokcidenta vento, ne multe pli malbona, ol la tangado de boato rekte kontraŭanta la ondojn dum modera ventego, kaj li estis nature bona marvojaĝanto. Kaj la akreco de la pli maldensa aero, en kiun ili supreniris, kaŭzis sentojn de malpezeco kaj vikleco. Li rigardis supren, kaj vidis la bluan ĉielon striita de streknujoj. Lia okulo vagis singardeme tra la ripoj kaj stangoj al brila aro da blankaj birdoj, kiuj pendis en la pli malalta ĉielo. Dum kelka tempo li observis tiujn. Poste,

rigardante pli malalten, kaj ne sentante sin tiel timema, li vidis la gracilan formon de la elrigardejo de la ventmaŝina gardisto brili ore sub la sunlumo kaj malpligrandiĝi ĉiumomente. Dum lia rigardo nun pli kuraĝe iris suben, aperis blua vico da montetoj, kaj jam Londono, maldekstre, estis komplika aro da tegmentoj. Ĝia plej proksima rando aspektis akra kaj klara, kaj forpelis liajn lastajn timojn per surpriza ŝoko. Ĉar la limo de Londono similis muron, aŭ klifon; troviĝis dekliva falo profunda ĉirkaŭ cent metrojn, fronto fendita nur kelkloke de terasoj, malsimpla ornama fasado.

La grada ŝanĝiĝo de urbo al kamparo tra vasta spongo de suburboj, kiu estis tiel karakteriza trajto de la urbegoj en la dek-naŭa jarcento, jam ne ekzistis. Nenio el ĝi restis tie, krom dezerto de ruinoj, diverskolora kaj densa pro aroj de la multspecaj kreskaĵoj, kiuj antaŭe ornamis la ĝardenojn de la zono, dismetitaj inter ebenaj brunaj spacoj de prisemita tero, kaj verdaj etendaĵoj de vintraj vegetaĵoj. La lastaj eĉ etendiĝis inter la restaĵoj de domoj. Sed plej ofte rifo aŭ insuleto el ruinoj, la rompaĵo de domoj, staris inter siaj stratoj kaj vojoj, kvazaŭ kurioza insulo inter ebena etendaĵo verda kaj bruna. Sendube ili estis forlasitaj de la enloĝantoj antaŭ multaj jaroj, sed ŝajne estis tro fortikaj por esti formovitaj eĉ de granda terkultiva mekanismo tiama.

La kreskaĵaro de tiu dezerto ondis kaj ŝaŭmis inter la sennombraj ĉeloj de muroj de falantaj domoj, kaj kvazaŭ sin ĵetis kontraŭ la piedon de la urba murego per bordŝaŭmo el rubuso kaj ilekso kaj hedero kaj dipsako kaj altkreskaj herboj. Kelkloke brilaj plezurpalacoj altstaris inter la etaj restaĵoj de la viktoria epoko, kaj ŝnurfervojoj kliniĝis al ili de la urbego. Tiun vintran tagon ili ŝajnis malplenaj. Malplenaj ŝajnis ankaŭ la artefaritaj ĝardenoj inter la ruinoj. La limoj de la urbego, efektive, estis tiel klare difinitaj, kiel dum la antikvaj tagoj, kiam oni fermis nokte la pordegojn, kaj la rabista malamiko ŝtelvenis eĉ ĝis la muroj mem. Grandega duonronda gorĝo eljetis viglan veturilaron sur la Edhamita Vojo al Bath. Tiamaniere la unua vido al la mondo ekster la urbego venis al Graham kaj foriris. Kaj kiam fine li povis rigardi denove rekte malsupren, li vidis sub si la vegetaĵajn kampojn

de la valo de la Thames—sennombraj oblongetoj ruĝbrunaj, transpinitaj de brilaj fadenoj, la drenkanaloj.

Lia ekscitiĝo rapide kreskis, fariĝis speco de ebrieco. Li sin trovis profunde enspiranta aeron, laŭte ridanta, deziranta krii. Post nelonge tiu deziro plene kaptis lin, kaj li kriis. Ili sin turnis suden. Ili iris kun iometa kliniĝo for de la vento, per malrapida alterniĝo je la movado; unue mallonga kruta supreniro, kaj poste longa glito malsupren, kiu estis tre rapida kaj plaĉa. Dum tiuj glitoj la helico tute ne funkciis. La supreniroj donis al Graham gloran senton pri sukcesplena penego; la glitoj tra la maldensa aero estis plaĉaj preter ĉia sperto. Li deziris neniam plu forlasi la superan aeron.

Dum kelka tempo li atentis la pejzaĝon, kiu kuras rapide norden sub li. Ĝiaj etaj klaraj detaloj tre plaĉis al li. Lin tre impresis la falo de la domoj, kiuj antaŭe superpuktis la landon; kaj la vasta senarba etendaĵo da tero, de kiu malaperis ĉiuj vilaĝoj kaj bienoj, krom nur polviĝantaj ruinoj. Li jam sciis, ke tio estas fakto, sed observi ĝin tiel estis afero tute diferenca. Li provis rekonii familiarajn lokojn en la kava baseno de la tero sub li, sed unue li ne povis distingi ion, nun kiam ili jam postlasis la valon de Thames. Baldaŭ, tamen, ili flugis super akra kreta monteto, kiun li rekonis la Guildforda "Porkdorso" (Hog's Back), pro la familiara konturo de la kanjoneto ĉe ĝia orienta fino, kaj pro la ruinoj de la urbo, kiuj krute kliniĝis ĉe ambaŭ randoj de tiu kanjoneto. Kaj, lasante tion, li rekonis aliajn lokojn, Leith Monteto, la sabla dezertaĵo ĉe Aldershot, kaj tiel plu. La valo de la rivero Wey estis plena de densejoj, krom kie la larĝa Edhamita vojo al Portsmouth, dense makulita de rapidantaj formoj, sekvis le direkton de la antikva fervojo.

La tuta etendaĵo de la eskarpo de la Downs—tiel klare, kiel la griza nebuleto lasis lin vidi—kovriĝis de ventmaŝinoj, de kiuj la plej granda en la urbo ŝajnis nur pli juna frato. Ili turniĝis per majesta moviĝo antaŭ la sudokcidenta vento. Kaj multloke kuŝis terpecoj punktitaj de la ŝafoj de la Brita Nutraĵa Kompanio, kaj foje kaj ree surĉevala ŝafisto faris nigran makulon. Tiam rapide de sub la monoplane venis la Altaĵoj de Wealden, kun dua vico de ventmaŝinoj, kiuj ŝajnis penegi forrabi de la kirliĝantoj

de la Downs ilian parton de la vento. La purpura eriko estis tuŝita de flava ulekso, kaj je la transa flanko aro da nigraj bovoj forkuregis antaŭ paro de rajdantoj. Rapide tiuj posteniris kaj malpligrandiĝis kaj perdis koloron, kaj fariĝis apenaŭ moviĝantaj punktoj, kiuj glutigis de nebulo. *mi komprenas, "kiujn nebulo glutis," ĉu ?*

Kaj kiam tiuj malaperis malproksime Graham aŭdis vanelon kvazaŭ plorgemi apude. Li rimarkis, ke li nun flugas super la Suda Downs, kaj, turnante la okulojn, li vidis la barilojn de la flugstacio ĉe Portsmouth alte stari sur la rando de Monteto Portsdown. Post plua momento aperis aro da ŝipoj similaj al flotantaj urboj, la blankaj klifetoj apud Needles, nanigitaj kaj sunlumaj, kaj la griza brileta akvo de la mallarĝa maro. Ili ŝajnis dum unu momento supersalti Solenton, kaj post kelkaj sekundoj la insuleto Wight pretérkuris; tiam sub li etendiĝis maro pli kaj pli larĝa, jen purpura pro la ombro de nubo, jen griza, jen polurita spegulo, jen etendaĵo el nuba verdblauo. La insuleto pli kaj pli malgrandiĝis. Post kelkaj pluaj minutoj strio de griza nebuleto disigis sin de aliaj nubostrioj, deiris el la ĉielo, kaj fariĝis marbordo—sunluma kaj plaĉa—la bordo de Norda Francujo. Tiu leviĝis, prenis kolorojn, igis difinita kaj detala, kaj similaĵo de la angla Downs preterrapidis sub ili.

Post ŝajne nelonge, Parizo aperis super la horizonto, pendis tie dum tempospaco, kaj subiris denove, kiam la monoplano turniĝis norden. Sed li vidis, ke la Turo Eiffel ankoraŭ staras, kaj apud ĝi grandega kupolo kun Koloso kvazaŭ pinglopinto sur ĝi. Kaj li vidis, ankaŭ, kvankam tiam li ne komprenis ĝin, klinitan fumbloviĝon. La aeronauĵo diris ion pri "maltrankvileco en la subvojoj," kiun Graham ne atentis. Sed li rimarkis la turojn kaj minaretojn kaj gracilajn masojn, kiuj celis ĉielen super la ventmaŝinoj de la urbo, kaj li sciis, ke almenaŭ rilate la belecon, Parizo ankoraŭ superas sian pli grandan rivalon. Kaj eĉ dum li rigardis, palblua formo supreniris tre rapide el la urbo, kvazaŭ mortinta folio kirliĝanta en la vento. Ĝi turniĝis kaj ŝvebis al ili, rapide pligrandiĝante. La aeronauĵo diris ion. "Kio?" diris Graham, ne volanta preni la rigardon for de tio. "Londona aeroplano, Majstro," kriis la aeronauĵo, gestante al ĝi.

Ili leviĝis kaj kurbturniĝis norden dum ĝi alproksimiĝis. Pli kaj pli proksimen ĝi venis, pli kaj pli grandiĝis. La bat', bat', bat'—paŭz'! de la flugo de la monoplano, kiu antaŭe estis tiel potenca kaj tiel rapida nun ŝajnis malrapida kompare kun tiu giganta antaŭenirado. Kiel granda la monstro ŝajnis, kiel rapida kaj regula! Ĝi preterpasis tre proksime sub ili, pelante sin antaŭen silente, vasta etendaĵo de retkovritaj diafanaj flugiloj, io vivanta. Graham havis momentan ekvidon al la vicoj post vicoj da volvitaj pasaĝeroj, pendantaj en siaj seĝetoj malantaŭ ventŝirmiloj, al blankvestita inĝeniero rampanta kontraŭ la ventegon laŭ ŝtupetaro, al ŝprucaj motoroj kunbatantaj, al la kirlanta helico kaj al vastaj flugiloj. Li ĝojegis pri la vidaĵo. Kaj post momento la maŝino jam preterpasis.

Ĝi leviĝis iomete, dum iliaj pli malgrandaj flugiloj balanciĝis pro la blovo de ĝia preterflugo. Ĝi malleviĝis kaj pli malgrandiĝis. Ili apenaŭ moviĝis, ŝajne, antaŭ ol ĝi estis denove nur plata bluaĵo, kiu malaperis en la ĉielon. Tiu estis la aeroplano, kiu iris kaj revenis inter Parizo kaj Londono. Dum trankvila vetero kaj dum paca tempo ĝi iris kaj revenis kvarfoje ĉiutage.

Ili ŝvebis trans la Anglan Ŝanelon, malrapide nun laŭ la kreskantaj ideoj de Graham, kaj Beachy Head aperis grize maldekstre de ili.

“Tero,” kriis la aeronaŭto, per voĉo tre malforta pro la fajfo de la vento trans la ventŝirmilon.

“Ankoraŭ ne,” kriis Graham, ride, “Ankoraŭ ne teren. Mi deziras lerni pli pri ĉi tiu maŝino.”

“Mi sugestis—” diris le aeronaŭto.

“Mi deziras lerni pli pri tiu maŝino,” ripetis Graham. “Mi venos al vi,” li diris, kaj sin ĵetis libera el la seĝo kaj paŝis sur la barita stango inter ili. Li haltis momente, lia koloro ŝanĝiĝis, kaj liaj manoj premfermiĝis. Post alia paŝo li sin tenis firme al la aeronaŭto. Li sentis pezon sur sia ŝultro, la forton de la aero. Lia ĉapelo flugis malantaŭen, kirlanta punkto. La vento venis blovege super la ventŝirmilo kaj blovis liajn harojn strie trans lian vizaĝon. La aeronaŭto haste alĝustigis ion kompanse por la moviĝo de la centroj de pezo kaj forto.

“Mi deziras kompreni tiujn aferojn,” diris Graham. “Kion vi faras por movi la motoron antaŭen?”

La aeronaŭto hezitis. Tiam li respondis, "La afero estas malsimpla, Majstro."

"Ne gravas," kriis Graham, "ne gravas por mi."

Okazis momenta paŭzo. "La aeronaŭtiko estas sekreto—privilegio—"

"Mi scias tion. Sed mi estas la Mastro. Kaj mi intencas lerni ĝin." Li ridis, ekscitita pri tiu nova kompreno de povo, kiu estis donaco al li de la supera aero.

La monoplaneo turniĝis, kaj la akra malvarma vento kvazaŭ tranĉis la vizaĝon de Graham, kaj liaj vestoj tiris lian korpon malantaŭen dum la antaŭo celis okcidenten. La du viroj rigardis sin reciproke en la okulojn.

"Majstro, ekzistas reguloj—"

"Ili ne koncernas min," diris Graham. "Vi ŝajnas forgesi."

La aeronaŭto rigardis lian vizaĝon. "Ne," li diris. "Mi ne forgesas tion, Majstro. Sed sur la tuta tero—neniu, kiu ne estas ĵurinta aeronaŭto iam havas ŝancon. Ili venas nur kiel pasaĝeroj—"

"Mi scias ion pri tio. Sed mi ne intencas argumenti tiujn detalojn. Ĉu vi scias, kial mi jam dormis ducent jarojn? Por flugi!"

"Majstro," diris la aeronaŭto, "la reguloj—se mi malobeas la regulojn—"

Graham forgestis la eblajn punojn.

"Do, se vi rigardos min—"

"Ne," diris Graham, ŝanceliĝante kaj tenante sin pli firme dum la maŝino momente relevis sian antaŭon. "Tio ne estas mia intenco. Mi deziras mem fari ĝin. Fari ĝin mem eĉ se mi frakasos ĉion! Ne! Mi volas tion! Vidu, mi intencas grimpi super tion—veni por partopreni vian seĝon. Tenu vin firme! Mi intencas flugigi mem la maŝinon, eĉ se mi frakasos min fine. Almenaŭ mi havos ion por pagi al mi mian dormon. El ĉiuj aliaj aferoj—. Pasintece mia revo estis flugi. Nun—ekvilibrigu vin!"

"Cent spionoj observas min, Majstro!"

La pacienco de Graham eluziĝis. Eble li volis, ke ĝi fariĝu tiel. Li blasfemis. Li pasis ĉirkaŭ la meza amaso de teniloj kaj la monoplaneo balanciĝis.

"Ĉu mi estas la Mastro de la tero?" li diris. "Aŭ ĉu

via Societo estas tio? Nu! Maltenu tiujn tenilojn kaj tenu miajn manojn. Jes—tiele. Kaj nun, kiel oni turnas ŝian antaŭon malsupren por gliti?”

“Majstro?” diris la aeronauĵo.

“Kio?”

“Vi defendos min, ĉu ne?”

“Ĉielo! Jes! Eĉ se necesos bruligi Londonon. Nun!”

Kaj per tiu promeso Graham aĉetis sian unuan lecionon pri aera navigado. “Nepre estos avantaĝo por vi, je ĉi tiu vojaĝo,” li diris kun laŭta rido—ĉar la aero similis fortan vinon—“se vi instruos min rapide kaj bone. Ĉu mi tiru tion? Aĥ! Jen! He!”

“Posten, Majstro! Returnen!”

“Returnen—bone. Unu—du—tri—Dio! Aĥ. Jen ŝi leviĝas! Ĉi tio estas vera vivado!”

Kaj nun la maŝino komencis fari tre strangajn dancojn en la aero. Jen ĝi turniĝis en spiralo diametre apenaŭ cent metrojn, jen ĝi rapide leviĝis kaj tuj falis krute, rapidege, same kiel falko, kaj tamen sin savis per granda kurbo, kiu portis ilin alten denove. Dum unu el tiuj faloj ĝi ŝajnis flugi rekte al la pendanta aro da balonoj je la sudoriento kaj ili nur kurbiĝis kaj maltrafis tiujn per subita reaktiro de ekvilibro. La neordinara rapideco kaj glateco de la movado, la neordinara influo de la maldensa aero sur lia korpo, instigis Graham al senzorga furiozo.

Sed fine okazis io stranga por sobriĝi lin, kaj sendi lin ree malsupren al la homplena vivo sube, kun ĝiaj mallumaj nesolveblaj enigmoj. Dum li flugfalis, aŭdiĝis frapeto, kaj io preterflugis; estis guto kiel pluvero. Tiam, dum li daŭre malsupreniris, li vidis ion kvazaŭ blankan ĉifonaĵon, kiu sekvis lin malsupren. “Kio tio estis?” li demandis. “Mi ne vidis ĝin.”

La aeronauĵo ekrigardis ĝin, kaj tiam prenis la tenilon por direkti la maŝinon, ĉar ili ankoraŭ flugfalis. Kiam la monoplano ree leviĝis, li profunde enspiris kaj respondis; “Tio,” kaj li gestis al la blankaĵo ankoraŭ flirtanta malsupren, “estis cigno.”

“Mi ne vidis ĝin,” diris Graham.

La aeronauĵo ne respondis, kaj Graham rimarkis gutetojn sur lia frunto.

Ili flugis horizontale dum Graham grimpis returnen al la pasaĝera seĝo for de la vipado de la vento. Kaj tiam sekvis rapida subenflugo, dum la helico kirligis por malhelpi la falon, kaj la flugstacio kreskis larĝa kaj malluma antaŭ ili. La suno, malaperante trans la kretaj montetoj okcidente, subiris samtempe kun ili, kaj lasis la ĉielon kiel oran fajron.

Baldaŭ ili povis vidi homojn kvazaŭ punktetojn. Li aŭdis bruon veni por renkonti lin, bruon kiel la sonon de ondoj sur ŝtoneta bordo, kaj vidis, ke la tegmentoj ĉirkaŭ la stacio estas dense kovritaj de la homoj, kiuj ĝojas pri lia sendanĝera reveno. Nigra amaso kunpusiĝis sub la stacio, mallumo makulita de sennombraj vizaĝoj, kaj tremanta pro la ondetado de svingataj manoj kaj blankaj tukoj.

ĈAPITRO DEK-SEPA.

TRI TAGOJ.

LINCOLN atendis Grahamon en ĉambro sub la flugstacio. Li ŝajnis voli scii ĉion, kio ĵus okazis, kaj ĝojis pri la neordinara plezuro kaj intereso, kiun Graham spertis pri flugado. La humoro de Graham estis entuziasma. “Mi devas lerni la flugarton,” li kriis. “Mi devas kompreni tion. Mi kompatas ĉiujn kompatindulojn, kiuj mortis sen tia ŝanco. La dolĉa rapida aero! Ĝi estas la plej mirinda sperto en la mondo.”

“Vi trovos nian novan tempon plena de mirindaj spertoj,” diris Lincoln. “Mi ne scias, kion vi ŝatos fari nun. Ni havas muzikon, kiu eble ŝajnos novaĵo.”

“Nuntempe,” diris Graham, “la flugado tenas min. Lasu min lerni pli pri tio. Via aeronauĵo diris, ke ia unuigo kontraŭas, ke oni lernu ĝin.”

“Mi kredas, ke jes,” diris Lincoln. “Sed por vi—! Se vi deziris okupiĝi pri tio, ni povas fari vin ĵurinta aeronauĵo morgaŭ.”

Graham esprimis vigle siajn dezirojn, kaj parolis iom longe pri siaj sentoj. “Kaj pri la administrado,” li demandis abrupte. “Kiel la afero progresas?”

Lincoln gestis flanken la demandon. “Ostrog informos vin pri tio morgaŭ,” li diris. “Ĉio denove bonordigas. La Revolucio plenumiĝas tra la tuta mondo. Baraktoj estas neeviteblaj kelkloke, kompreneble; sed via regno estas certa. Vi povas resti trankvila kun viaj aferoj en la manoj de Ostrog.”

“Ĉu estus eble ke mi fariĝu ĵurinta aeronauĵo, kiel vi, nomas tion, senprokraste—antaŭ ol dormi?” diris Graham, paŝante. “Por ke mi povu rekomenci ĝin frue morgaŭ matenon. . . .”

“Estus eble,” diris Lincoln penseme. “Tute eble. Efektive, ni faros tion.” Li ridis. “Mi venis preta por sugestii amuzajojn, sed vi mem trovis ion. Mi telefonos de ĉi tie al la aeronauĵa oficejo, kaj ni revenos al via aparta-

mento ĉe la Ventmaŝina Oficejo. Post via vespermanĝo la aeronauĵoj estos pretaj. Vi ne opinias, ke post la manĝo vi eble preferos—?” Li paŭzis.

“Kion?” diris Graham.

“Ni jam pretigis scenon kun dancistinoj—oni alportis ilin ĉi tien de la teatro ĉe Capri.”

“Mi malamas baletojn,” diris Graham abrupte. “Ĉiam mi malamis ilin. Ne tion mi volas vidi. Ni havis dancistinojn dum la antikvaj tagoj. Efektive, oni havis ilin en praa Egiptujo. Sed la flugado—”

“Vere,” diris Lincoln, “kvankam niaj dancistinoj—”

“Mi povas atendi ilin,” diris Graham; “Mi povas atendi ilin. Mi scias. Mi ne estas Latinulo. Mi havas demandojn por meti antaŭ iu spertulo—pri viaj maŝinoj. Mi sentas min avida. Mi ne deziras distraĵojn.”

“Vi povas elekti el la tuta mondo,” diris Lincoln. “Kion ajn vi deziras, vi povas havi.”

Asano aperis, kaj gardate de forta gvardio ili reiris laŭ la stratoj de la urbo al la apartamento de Graham. Multe pli grandaj homamasoj ol tiuj, kiuj vidis lin foriri, nun kolektiĝis por rigardi lin reveni, kaj la krioj kaj aklamoj de tiuj amasoj foje neaŭdebligis la respondojn de Lincoln al la senfinaj demandoj sugestitaj de la aera vojaĝo al Graham. Komence li respondis al la aplaŭdo de la amaso per kliniĝoj kaj gestoj, sed Lincoln avertis, ke tian respondon oni opinios konduto malkonvena. Graham, jam iom laca pro ritmaj salutoj, malatentis siajn regatojn dum la cetero de sia publika marŝo.

Tuj kiam ili alvenis al lia apartamento, Asano foriris por serĉi kinematografajn bildojn de maŝinoj, kaj Lincoln forsendis la ordonojn de Graham pri maŝinetoj kaj modeloj de maŝinoj por ilustrati la diversajn mekanikajn progresiĝojn de la du jarcentoj. La aparatoj por telegrafa komunikado allogis tiel forte la Mastron, ke lia plaĉe pretigita manĝo, servata de kelkaj ĉarme lertaj knabinoj, devis atendi dum longa tempo. La kutimo fumi jam preskaŭ malaperis el la mondo, sed kiam li esprimis deziron por tia indulgo, oni serĉis kaj trovis bonegajn cigarojn en Florida, kiujn oni sendis al li per pneŭmata tubo dum la manĝo ankoraŭ daŭris. Poste alvenis la aeronauĵoj, kaj festeno de inĝeniaj mirindaĵoj ĉe la manoj de tiama inĝeniero. Nuntempe,

almenaŭ, la orda lerteco de kalkulmaŝinoj, konstrumaŝinoj, ŝpinoj, aŭtomataj pordoj, motoroj por eksplodaĵoj, buĉmaŝinoj, leviloj por greno kaj akvo, kaj rikoltmaŝinoj, pli ravis Grahamon ol iu ajn baletistino. "Ni estis barbaruloj," estis lia diraĵo, "ni estis barbaruloj. Ni restis en la ŝtonepoko—kompare kun tio. . . . Kaj kion alian vi havas?"

Venis ankaŭ praktikaj psikologoj kun tre interesaj evoluajoj en la hipnota arto. La nomoj de Milne Bramwell, Fechner, Liebault, Vilhelmo James, Myers kaj Gurney, li sciigis, havas nun valoron, kiu mirigus iliajn samtempulojn. Kelkajn praktikajn aplikojn de la psikologio oni nun ĝenerale uzis; ĝi grandparte anstataŭis drogojn, anti-sepsilojn kaj anastezilojn ĉe la kuracarto; preskaŭ ĉiu, kiu bezonis mensan koncentron, utiligis ĝin. Ŝajnis, ke oni jam efektivigis veran grandigon de la homaj povoj rilate tiajn aferojn. La lertaĵoj de "kalkulegitoj," la mirindaĵoj, kiel Graham kutime konsideris ilin, de la hipnotismo, nun servis iun ajn, kiu povis pagi la ĉeeston de sperta hipnotigisto. Antaŭ longe la malnovaj ekzamenaj metodoj de edukado detruigis de tiuj rimedoj. Anstataŭ jaroj de studado kandidatoj pasigis sole kelkajn semajnojn en trancoj, kaj dume spertaj instruistoj nur ripetis ĉiujn informojn necesajn por kompletaj respondoj, kune kun aldona sugestio pri ties posta memorado. En la teoria matematiko, aparte, tiu servo estis treega helpo, kaj nun ĝi konstante utiligis de ludistoj de ŝako kaj tiaj ludoj de manlerteco, kiaj ankoraŭ ekzistis. Efektive, ĉiu procedo kvazaŭ-mekanika, kiun oni faris laŭ definitaj reguloj, nun staris konstante libera de la vagoj de imago kaj emocio, kaj tial atingis senprecedentan gradon de precizeco. Infano de laboristoj, tuj kiam li havis sufiĉan aĝon por hipnotigi, tiamaniere fariĝis bele akurata kaj fidinda maŝingardisto, kaj liberiĝis de tiam el la longaj, longaj pensoj de la juneco. Aeronauta lernanto, kiu spertis kapturoniĝon, povis forpeli siajn imagojn terurajn. En ĉiu strato loĝis hipnotigisto pretaj impresi daŭrajn ideojn sur la menson. Se iu deziris memori nomon, serion da numeroj, kanton aŭ parolon, li povis fari tion per tiu metodo, kaj male oni kapablis forigi memoraĵojn, kutimojn, aŭ dezirojn—efektive, speco de psika ĥirurgio ĝenerale

utiliĝis. Insultojn, humiligajn spertojn, oni tiel forgesis; vidvinoj forviŝis pensojn pri siaj antaŭaj edzoj, koleraj amantoj liberigis sin el sia sklaveco. Oni ankoraŭ ne kapablis, tamen, aldoni dezirojn, kaj ankaŭ la faktoj pri transigo de pensoj ankoraŭ ne tute sistemiĝis. La psikologoj ilustris siajn parolojn per mirindaj eksperimentoj je memorado, faritaj per helpo de aro da palvizaĝaj infanoj blue vestitaj.

Graham, same kiel preskaŭ ĉiu dum lia antaŭa vivo, malfidis la hipnotigiston, alie, li tiam povus tuj trankviligi la cerbon pri multaj dolorigaj ideoj. Sed, spite de la certigoj de Lincoln, li tenis la malnovan teorion, ke esti hipnotigita signifas iamaniere cedi sian memon, abdikigi sian volon. Ĉe la festeno de mirindaj spertoj, kiu ĵus komenciĝis, li tre akre deziris resti absolute si mem.

La proksiman tagon, kaj alian tagon, kaj denove alian tagon, li pasigis per tiaj interesaĵoj. Ĉiutage Graham spertis dum multaj horoj la gloran amuzon flugi. La trian tagon li ŝvebis trans mezan Francujon, kaj kaptis ekvidon al la neĝkovritaj Alpoj. Tiu vigla korpekzerco donis al li ripozigan dormon; li resaniĝis preskaŭ tute el la senspirita malvigleco de sia unua vekiĝo. Kaj kiam ajn li ne flugis en la aero, kaj ne dormis, Lincoln klopodis senĉese amuzi lin; ĉion, kio estis nova kaj kurioza inter la tiamaj inventaĵoj, oni alportis al li, ĝis fine lia apetito por noveco estis preskaŭ sata. Oni povus pleniĝi dekon da apartaj libretoj per la strangaĵoj, kiujn oni elmontris.

Ĉiun posttagmezon li akceptis dum ĉirkaŭ unu horo siajn korteganojn. Li trovis, ke lia intereso pri siaj samtempuloj fariĝis persona kaj intima. Antaŭe li atentis precipe aĵojn nefamiliarajn kaj kuriozajn; ia dandeco de iliaj vestoj, io ĉe ilia sinteno aŭ konduto malakorda kun liaj antaŭjuĝoj incitis lin; sed li trovis mirinda la rapidecon, laŭ kiu malaperis tiu strangeco kaj la iometa neamikceco, kiu naskiĝis de ĝi. Baldaŭ li komprenis la veran perspektivon de sia situacio, kaj vidis la antikvajn viktoriajn jarojn malproksimaj kaj kuriozaj. Li sin trovis aparte amuzata de la ruĝhara filino de la Administranto de la Eŭropaj Porkejoj. La duan tagon, post la vespermanĝo li konatiĝis kun dancistino, kaj trovis ŝin miriga artisto. Kaj, post tio, pluajn hipnotajn mirindaĵojn. La trian tagon

Lincoln sugestis, ke la Mastro foriru al plezururbo, sed tion Graham rifuzis fari, kaj ankaŭ ne volis akcepti la servojn de la hipnotigistoj por siaj aeraj eksperimentoj. La ligilo de loka scio ligis lin al Londono ; li trovis plezuron identigi lokojn, kiun li alilande ne havus. "Ci tie, aŭ tridek metrojn sube," li povis diri, "mi kutimis manĝi mian tagmezan kotleton dum miaj tagoj ĉe la Londona Universitato. Sub ĉi tie staris Waterloo kaj la ĝena serĉo por konfuzaj vagonaroj. Ofte mi staris tie sube atendante, kun valizo ĉe mano, kaj rigardas la ĉielon super la arbaro el signalstangoj, ne pensante, ke iun tagon mi staros tridek metrojn supre en la aero. Kaj nun, en tiu ĉielo mem, kiu antaŭe ŝajnis griza baldakeno, mi ĉirkaŭiras per monoplane."

Dum tiuj tri tagoj Graham tiom okupiĝis pri tiuj distraĵoj, ke la vastaj politikaj movadoj malvolvigantaj ekster lia apartamento nur iomete okupis lian atenton. La homoj ĉirkaŭ li diris al li malmulton. Ĉiutage venis Ostrog, la Ĉefo, lia Granda Veziro, por raporti per nebulaj frazoj la konstanta firmiĝo de lia regno ; "ioma ĝenaĵo" baldaŭ forigota en ĉi tiu urbo, "iometa maltrankvileco" en tiu. La kanto de la revolucio ne plu venis al li ; li neniam sciigis, ke oni malpermesis ĝin inter la limoj de la ĉefurbo ; kaj la grandaj emocioj spertitaj en la elrigardejo dormis en lia cerbo.

Sed la duan kaj trian tagojn li sin trovis—spite sia intereso pri la filino de la Pork-administranto, aŭ eble pro la pensoj instigitaj de ŝia parolo—memoranta la knabinon, Helenon Wotton, kiu tiel strange parolis al li ĉe la kunveno ĉe la Ventmaŝina Ĉefgardisto. La impresio, kiun ŝi tiam faris al li, estis profunda, kvankam la senĉesa surprizo pri novaj aferoj igis lin dum kelka tempo ne primediti ĝin. Sed nun la memoro pri ŝi reakiris sian regnon. Li sin demandis, kion signifis ŝiaj rompitaĵoj, duone forgesitaj frazoj ; la bildo de ŝiaj okuloj kaj la fervora pasio de ŝia vizaĝo pli heliĝis, dum lia intereso pri mekanikaĵoj velkis. Ŝia gracila beleco venis forte inter li kaj kelkaj proksimaj tentoj al malnobla pasio. Sed tri tagoj plene pasis, antaŭ ol li ŝin revidis.

ĈAPITRO DEK-OKA.

GRAHAM MEMORAS.

Ŝi aperis al li fine en malgranda galerio kondukanta de la Ventmaŝina Oficejo al lia oficiala apartamento. La galerio estis longa kaj mallarĝa, kun kelkaj alkovoj, kies fenestraj arkaĵoj elrigardis sur korto kun palmoj. Li trovis ŝin sidantan en unu el tiuj alkovoj. Ŝi turnis la kapon pro la sono de liaj piedpaŝoj, kaj eksaltis vidante lin. Ĉiu nuanco de koloro malaperis de ŝia vizaĝo. Ŝi starigis tuj, faris paŝon, kvazaŭ por alparoli lin, sed hezitis. Li haltis kaj staris senmova, atendante. Tiam li rimarkis, ke nerva tumulto silentigas ŝin, rimarkis ankaŭ, ke ŝi certe volis paroli al li, ĉar ŝi atendas lin tie.

Li spertis reĝan impulson helpi ŝin. "Mi volis renkonti vin," li diris. "Antaŭ kelkaj tagoj vi deziris diri ion al mi—vi deziris paroli al mi pri la popolo. Kion vi volis diri?"

Ŝi rigardis lin per maltrankvilaj okuloj.

"Vi diris, ke la popolo estas malfeliĉa?"

Ankoraŭ momenton ŝi restis silenta.

"Tio sendube ŝajnis stranga al vi," ŝi diris abrupte.

"Sendube. Kaj tamen—"

"Ĝi estis nur impulso."—"Nu?"

"Jen la tuto."

Ŝi rigardis lin kun hezitema vizaĝo. Ŝi parolis pene. "Vi forgesas," ŝi diris, spirante profunde.—"Kion?"

"La popolo—"—"Ĉu vi volas diri—"

"Vi forgesas la popolon." Lia rigardo estis demando.

"Jes. Mi scias, ke vi surpriziĝos. Ĉar vi ne komprenas tion, kio vi mem estas. Vi ne scias, kio nun okazas."—"Nu?"

"Vi ne komprenas."—"Eble ne klare. Sed—diru al mi."

Ŝi turniĝis al li kun subita decido. "Estas malfacile klarigi tion. Mi intencis, mi volis klarigi. Kaj nun—mi ne povas. Miaj vortoj ne estas pretaj. Sed rilate vin ili

sentas ion. Miron. Pri via dormo—via vekigo. Tiaj aferoj estas mirakloj. Almenaŭ por mi—kaj por la suba popolo. Vi, kiu vivis kaj suferis kaj mortis, vi, kiu estis ordinara urbano, vekigas, revivas, kaj trovas vin Mastro de la tero.”

“Mastro de la tero,” li diris. “Tiel oni diras al mi. Sed provu imagi, kiel malmulton mi scias pri ĝi.”

“Urbegoj — Kompanioj — la Laborista Departemento—”

“Princlandoj, potencoj, regnoj—la potenco kaj la gloro! Jes, mi aŭdis ilin kriegi tion. Mi scias. Mi estas la Mastro. La reĝo, se vi preferas tion. Kun Ostrog, la Ĉefo—” Li paŭzis.

Ŝi turnis al li sciŝvolan rigardon kaj observis lian vizaĝon. “Nu?”

Li ridetis. “Por respondi ĉion.”

“Jen kion ni jam komencis timi.” Dum momento ŝi diris nenion plu. “Ne,” ŝi aldonis malrapide. “Vi devas respondi ĉion. La devo respondi estas via. La popolo atendas tion.”

Ŝi parolis mallaŭte. “Aŭskultu! Dum almenaŭ la duono de la jaroj de via dormo—en ĉiu generacio grandaj kaj pli grandaj homamasoj preĝis, ke vi vekigu—*preĝis*.”

Graham moviĝis por paroli, sed ne parolis.

Ŝi hezitis, kaj nuanco da koloro revenis al ŝia vango. “Ĉu vi scias, ke por miriadoj vi estas—reĝo Arturo, Barbarossa—la reĝo, kiu fine revenos por ĝustigi la mondon?”

“Mi supozas, ke la popolo imaga—”

“Ĉu vi ne aŭdis nian proverbon, ‘Kiam la Dormanto vekigos.’? Kiam vi kuŝis tie senkonscia kaj senmova—miloj venis. Miloj! La unuan de ĉiu monato vi solene kuŝis portanta blankan robon, kaj la popolo preterpasis vin unuope. Kiam mi estis ankoraŭ knabineto mi vidis vin tiel, kun la vizaĝo blanka kaj trankvila.”

Ŝi fortunis de li la vizaĝon kaj rigardis fikse la pentritan muron antaŭ si. Ŝia voĉo ĉesis. “Kiam mi estis knabineto, mi kutimis rigardi vian vizaĝon . . . ĝi ŝajnis al mi fiksita kaj atendanta, same kiel la pacienco de Dio.

“Jen kion oni opiniis pri vi,” ŝi aldiris. “Jen kia vi ŝajnis al ni.”

Ŝi turnis al li brilajn okulojn, ŝia voĉo sonis klara kaj forta. “En la urbo, sur la tero, miriada da miriadaoj da homoj atendas, por vidi, kion vi faros; ili estas plenaj de strangaj nekredeblaj esperoj.”

“Ĉu jes?”

“Ne Ostrog—neniu—povas plene respondi tion.”

Graham rigardis ŝin surprizite, rigardis ŝian vizaĝon ardan de emocio. Ŝi ŝajnis unue paroli pene, kaj poste ardiĝi parolante.

“Ĉu vi supozas,” ŝi diris, “ke vi, kiu antaŭe travivis tiun etan vivon tiel malproksime pasintece; vi, kiu jam falis en tiun miraklon de dormo kaj leviĝis el ĝi—ĉu vi supozas ke la miro kaj adoro kaj espero de la duono de la mondo kolektiĝas ĉirkaŭ vi sole por ke vi travivu alian etan vivon? . . . Por ke vi transdonu la respondecon al iu alia homo?”

“Mi scias, kiel granda estas tiu mia regno,” li diris halte. “Mi scias, kiel granda ĝi ŝajnas. Sed ĉu ĝi estas reala? Ĝi aspektas nekredebla—kvazaŭ sonĝo. Ĉu ĝi estas reala, aŭ ĉu ĝi estas nur granda trompiĝo?”

“Ĝi estos reala,” ŝi diris; “se vi kuraĝos.”

“Sed fine, same kiel ĉiu reĝeco, mia reĝeco fondiĝas sur la kredo. Ĝi estas revo en la spiritoj de homoj.”

“Se vi kuraĝos!” ŝi diris.—“Sed—”

“Sennombraj homoj,” ŝi diris, “kiuj, dum tio restos en iliaj spiritoj, obeos vin.”

“Sed mi scias nenion. Jen kion mi volis diri. Mi scias nenion. Kaj tiuj aliaj—la Konsilantoj, Ostrog. Ili estas pli saĝaj, pli trankvilaj, ili tiom scias, ĉiun detalon. Kaj, efektive, kio estas la mizeroj, pri kiuj vi parolas? Kion mi devus scii? Ĉu vi volas—”

Li haltis preskaŭ stulte.

“Ankoraŭ mi estas apenaŭ pli ol knabino,” ŝi diris. “Sed al mi la mondo ŝajnas plena de mizero. La mondo multe ŝanĝiĝis post via tempo, ŝanĝiĝis tre strange. Mi preĝis, ke mi povu renkonti vin kaj diru al vi tiujn aferojn. La mondo estas ŝanĝita. Kvazaŭ ĝi eksuferas pro korodo—kiu forrabas de la vivo ĉion, kio valoras la penon ĝin posedi.”

Ŝi turnis al li ruĝiĝintan vizaĝon, sin movante subite. “Via tempo estis tempo de libereco. Jes—mi jam pensis.

Io igis min pensi, ĉar mia vivo—ne estis feliĉa. La homoj jam ne sin trovas liberaj—kaj ili ne statas pli bone, ol la homoj de via epoko. Tio ne estas la tuto. Ĉi tiu urbo—estas malliberejo. Ĉiu urbo nun estas malliberejo. Mamono tenegas la ŝlosilon en sia mano. Miriadoj, sennombraj miriadoj, pene laboras de la infaneco ĝis la tombo. Ĉu tio estas justa? Ĉu tio daŭros—por ĉiam? Jes, multe pli malbone, ol dum via tempo. Ĉie ĉirkaŭ ni, sub ni, malĝojo kaj doloro. La malprofundan plezuron de tiu vivo, kiun vi trovas ĉirkaŭ vi, nur malmulto apartigas de vivo mizera preter iu ajn priskribo. Jes, la malriĉuloj scias—ili scias, ke ili suferas. Tiuj sennombraj amasoj, kiuj frontis la morton pro vi antaŭ du noktoj—! Vi ŝuldas la vivon al ili.”

“Jes,” diris Graham, malrapide. “Jes. M ŝuldas al ili la vivon.”

“Vi venas,” ŝi aldiris, “el la tempo, kiam tiu nova tiraneco de urbegoj apenaŭ komenciĝis. Ĝi estas tiraneco—vera tiraneco. En via tempo la feŭdaj militistaj ĉefoj jam malaperis, kaj la novaj ĉefoj pro riĉeco ankoraŭ ne aperis. La duono de la homoj de la mondo ankoraŭ loĝis sur la libera kamparo. La urbegoj ankoraŭ ne glŭtis ilin. Mi legis la historion en la antikvaj libroj—la nobleco ekzistis tiam! La ordinaraĵoj homoj spertis vivojn kun amo kaj fidelo tiam—ili faris mil aferojn. Kaj vi—vi devenas el tiu tempo.”

“Ĝi ne estis—. Tamen, ne gravas. Kio troviĝas nuntempe?”

“Avereĝo kaj la Plezururboj! Aŭ sklaveco—nedankata, nehonorata sklaveco.”

“Sklaveco!” li diris.

“Sklaveco.”

“Ĉu vi volas diri, ke homoj estas nur posedaĵoj.”

“Eĉ pli malbone. Jen kion mi volis, ke vi sciu, ke vi vidu. Mi sciis, ke vi ne scias. Oni tenos la scion for de vi, oni kondukos vin baldaŭ al Plezururbo. Sed vi jam rimarkis homojn kaj infanojn, vestitajn per palblua kanvaso, kun maldikaj flavaj vizaĝoj kaj malbrilaj okuloj, ĉu ne?”—“Ĉie.”

“Ili parolas teruran dialekton, krudan kaj malfortan.”

“Mi aŭdis ĝin.”

“ Ili estas la sklavoĵ—viaj sklavoĵ. Ili estas la sklavoĵ de la Laborista Departemento, kiun vi posedas.”

“ La Laborista Departemento ! Tio estas—iamaniere—familiara. Ha ! nun mi memoras. Mi vidis ĝin dum mi vagis ĉirkaŭ la urbo, post kiam la lumoj ree brulis ; grandaj konstruaĵaj frontoj estis kolorigitaj palblue. Ĉu tio vere signifas—? ”

“ Jes. Kiel mi klarigu al vi ? Komprenoble vi rimarkis la bluan uniformon. Preskaŭ triono de nia popolo portas tion—pli da homoj prenas ĝin ĉiutage. Tiu Laborista Departemento kreskas nerimarkite.”

“ Sed kio *estas* la Departemento ? ”

“ Dum via tempo, kion oni faris por malsateguloj ? ”

“ Ni havis paŭperejojn—kiujn la urboj subtenis.”

“ Paŭperejojn ! Jes—mi memoras ion. En niaj lecionoj historiaj. Nun mi memoras. La Laborista Departemento forpelis la paŭperejojn. Ĝi kreskis—parte—el io—eble vi memoras ĝin—el emocia religia organizaĵo nomita la Savarmeo—kiu fariĝis komerca kompanio. Unue ĝi estis preskaŭ almoza institucio. Por savi homojn el la mizero de la paŭperejo. Okazis antaŭe granda agitado kontraŭ la paŭperejoj. Nun mi memoras, ke tio estis inter la plej unuaj kompanioj, kiujn viaj Administrantoj aĉetis. Ili aĉetis la Savarmeon kaj reorganizis ĝin jene. La unua ideo estis organizi la laboron de malsataj senhejmuloj.”

“ Jes.”

“ Nuntempe ne ekzistas paŭperejoj, nek almozaj institucioj aŭ ŝirmejoj, ne ekzistas io ajn krom tiu Departemento. Ĝiaj oficejoj staras ĉie. Tiu bluo estas ĝia koloro. Kaj iu ajn homo aŭ infano, kiu fariĝas malsata kaj laca kaj ne havas hejmon, amikon aŭ rifuĝejon, devas fine iri al la Departemento—aŭ serĉi ian rimedon morti. La Eŭtanasio* estas tro kosta por ili—por la malriĉulo ne ekzistas facila morto. Kaj je iu ajn horo de tago aŭ nokto ĉiu venanto trovas manĝon, ŝirmon kaj bluan uniformon—jen la unua kondiĉo de la fondiĝo de la Departemento—kaj reciproke por unutaga ŝirmo la Departemento postulas unutagan laboron, kaj tiam redonas la propran vestaĵon al la homo kaj forsendas lin aŭ ŝin denove.”—“ Jes ? ”

* “ Plaĉa morto ” : originale el greka lingvo.—*Trad.*

Eble tio ne ŝajnas al vi tre terura. Dum via tempo homoj mortmalsatis sur viaj stratoj. Tio estis malbona. Sed ili mortis kiel—*homoj*. Tiuj bluestitoj—la proverbo diras: “Blua kanvaso unu fojon kaj por ĉiam.” La Departemento faras negocon je ilia laboro—kaj antaŭe certigas la provizon de tiu. Homoj vizitas ĝin malsategaj kaj senhejmaj—ili manĝas kaj dormas dum unu tago kaj unu nokto, ili laboras dum unu tago, kaj fine de la tago ili denove foriras. Se ili laboris bone ili posedas eble unu pencon—sufiĉe por teatro aŭ malkara dancejo, aŭ kinematografa rakonto, aŭ manĝo, aŭ veto. Kiam ĝi elspeziĝas, ili ĉirkaŭvasas. La almozpetado estas malpermesata de la polico de la vojoj. Krom tio, neniu ion donas. La homoj revenas la proksiman tagon aŭ la postproksiman—pelataj returne de la sama senpoveco, kiu unue alkondukis ilin. Fine iliaj vestaĵoj foruziĝas, aŭ iliaj ĉifonaĵoj fariĝas tiel malfreŝaj, ke ili hontas. Tiam ili devas labori dum monatoj por gajni novajn. Se ili deziras novajn. Granda nombro da infanoj naskiĝas sub la zorgo de la Departemento. La patrino poste ŝuldas al ili unumonatan laboron—la infanojn ili prizorgas kaj edukas, ĝis ili estas dek-kvarjaraj, kaj ili pagas per du jaroj da servo. Vi povas kompreni, ke tiujn infanojn oni edukas taŭge por la blua kanvaso. Kaj tiamaniere funkcias la Departemento.”

“Kaj neniu estas tute senhava en la urbego?”

“Neniu. Ili troviĝas aŭ en la blua kanvaso, aŭ en la malliberejo. Ni jam forigis la senhavecon. Tio estas presita sur la biletoj de la Departemento.”

“Supozu, ke ili ne volas labori?”

“Preskaŭ ĉiu laboras, atinginte tiun gradon de mizero, kaj la Departemento posedas povojn. Oni donas pli kaj pli malplaĉan laboron—rifuzas al ili nutraĵon—kaj homo, kiu unufoje rifuzis labori, estas konata en la oficejoj de la Departemento tra la tuta mondo per sistemo marki la dikfingron. Krome, kiel malriĉulo povus forlasi la urbon? Kostas du leonojn iri al Parizo. Kaj por la malobeado troviĝas la malliberejoj—mallumaj kaj mizeraj—sube, for de la vido. Oni havas nun malliberejojn por multaj aferoj.”

“Kaj triono de la popolo portas tiun bluan kanvason?”

“Pli ol triono. Ili estas laboregantoj, vivantoj sen gojo aŭ espero, kun la rakontoj pri la Plezururboj sonantaj en iliaj oreloj por moki iliajn hontajn vivojn, iliajn mizerojn kaj bezonojn. Ili estas tro malriĉaj eĉ por la Eŭtanasio, la rifuĝo de la riĉulo kontraŭ la vivo. Mutaj, kriplaj milionoj, sennombraj milionoj, ĉirkaŭ la tuta mondo, konsciaj pri nenio krom bariloj kaj nesatigitaj deziroj. Ili naskiĝas, ili sklaviĝas, kaj ili mortas. Jen la stato, al kiu ni jam atingis.”

Dum tempospaco Graham sidis depremita.

“Sed ĉu ne okazis revolucio,” li diris. “Nun oni ŝanĝos ĉion. Ostrog—”

“Jen nia espero. Jen la espero de la mondo. Sed Ostrog ne faros tion. Li estas politikisto. Al li ŝajnas, ke aferoj nepre devas esti tiaj. Por li tio ne gravas. Li kredas ĝin la destino. Ĉiuj riĉuloj, ĉiuj influaj personoj, fine supozas, ke tiaj mizeroj estas la destino. Ili utiligas la popolon por sia politiko, ili vivas en lukso per ĝia mizero. Sed vin—kiu venas el epoko pli feliĉa—vin la popolo atendas. Vin.”

Li rigardis ŝian vizaĝon. Ŝiaj okuloj brilis pro nefalintaj larmoj. Li sentis fluon da emocio. Momente li forgesis la urbegon, forgesis la homaron, kaj ĉiujn pli malklarajn vokojn, pro la apuda homeco de ŝia beleco.

“Sed kion mi faru?” li diris, kun la rigardo sur ŝi.

“Reĝu,” ŝi respondis, kliniĝante al li kaj parolante per mallaŭta tono. “Reĝu la mondon, kiel neniu ĝis nun reĝis ĝin, por la bono kaj feliĉo de la homaro. Ĉar vi povas—vi kapablas reĝi ĝin. La popolo ekmoviĝas. Tra la tuta mondo la popolo ekmoviĝas. Nur mankas unu vorto—unu vorto de vi—kaj ili ĉiuj kuniĝos. Eĉ la homoj de la meza speco estas maltrankvilaj—malfeliĉaj.

“Oni ne diras al vi tion, kio okazas. La popolo ne volas reiri al sia sklaveco—ili rifuzas senarmiĝi. Ostrog vekis ion pli grandan, ol li prirevis—li vekis esperojn.”

Lia koro batis rapide. Li penis ŝajni juĝema, pesi detalojn.

“Ili nur bezonas ĉefon,” ŝi diris.—“Kaj poste?”

“Vi povos fari ion ajn, kion vi volos. La mondo estos via.”

Li sidis, ne plu rigardante ŝin. Post ne longe li parolis. “La malnovaj revoj, kaj tio, kion mi revis, la libero, la feliĉo. Ĉu ili estas nur revoj? Aŭ ĉu unu homo—nur *unu homo*—” Lia voĉo velkis kaj ĉesis.

“Ne nur homo, sed ĉiuj homoj—nur donu al ili ĉefon, kiu diros ilian kordeziron.”

Li svingis la kapon nee, kaj dum iom da tempo estis silenta. Li levis la rigardon subite, kaj renkontis ŝian. “Mi ne posedas vian fidon,” li diris. “Mi ne havas vian Junecon. Mi staras ĉi tie kun potenco, kiu mokas min. Ne—lasu min paroli. Mi volas agi—ne juste—mi ne havas sufiĉan forton por tio—sed pli juste ol maljuste. Tio ne fondas la ‘feliĉan jarmilon,’ sed mi nun decidus, ke mi reĝos. Tio, kion vi ĵus diris, vekis min. . . . Vi estas prava. Ostrog devas sciigi pri sia ĝusta situacio. Kaj mi sciigos Pri unu afero mi promesas vin. Tiu sklavigo de laboristoj finiĝos.”

“Kaj vi reĝos?” “Jes. Kondiĉe, ke—. Unu afero.”

“Kio?”—“Ke vi helpu min.”

“*Mi!*—knabino!”

“Jes. Ĉu vi ne rimarkas, ke mi staras tute sola?”

Ŝi eksaltis, kaj dum momento ŝiaj okuloj enhavis kompaton. “Ĉu necesas, ke vi demandu, ĉu mi helpos vin?” ŝi diris.

Sekvis streĉita silento, kaj poste la bato de horloĝo kiu anoncis la horon. Graham stariĝis.

“Eĉ nun,” li diris, “Ostrog atendas min.” Li hezitis, frontante ŝin. “Kiam mi faros al li kelkajn demandojn—. Ekzistas multo, kion mi ne scias. Eble mi iros por vidi propraokule la aferojn, pri kiuj vi parolis. Kaj kiam mi revenos—?”

“Mi sciigos pri via foriro kaj via reveno. Mi denove atendos vin ĉi tie.”

Ili rigardis unu la alian firme, demandeme, kaj tiam li forturniĝis de ŝi al la Ventmaŝina Oficejo.

ĈAPITRO DEK-NAŬA.

LA VIDPUNKTO DE OSTROG.

GRAHAM trovis Ostrogon, kiu atendis por doni al li formalon raporton pri sia administrado dum tiu tago. Ĉiam antaŭe li pasigis tiun ceremonion kiel eble plej rapide, por repreni siajn aerajn spertojn, sed nun li komencis fari abruptajn demandojn. Li tre deziris tuj havigi al si sian regnon. Ostrog donis flatajn raportojn pri la progreso de eksterlandaj aferoj. Ĉe Parizo kaj Berlino—Graham baldaŭ rimarkis lin diri—okazis maltrankvilaĵo, tamen ne organizita kontraŭstaro, nur malobeado. “Post tiom da jaroj,” diris Ostrog, kiam Graham insiste demandis plu, “la komunismo denove levas sian kapon. Jen, fakte, la vera speco de la barakto.” Sed jam oni reordigis tiujn urbojn. Graham, jam pli trankvile juĝema pro la pulsanta emocio, kiun li sentis, demandis, ĉu okazis batalo. “Iomete,” respondis Ostrog. “Nur en unu distrikto. Sed la Senegala regimento de nia afrika terkultiva polico—ĉar la Unuigitaj Afrikaj Kompanioj posedas bone dresitan policon—staris preta, kaj ankaŭ la aeroplanoj. Ni atendis iom da ĝenaĵo en la kontinentaj urboj, kaj en Ameriko. Sed aferoj nun estas tre trankvilaj en Ameriko. Oni estas kontenta pri nia venko kontraŭ la Konsilantoj. Almenaŭ nuntempe.”

“Kial vi atendis ĝenaĵon?” demandis Graham abrupte.

“Ekzistas multe da malkontento—socia malkontento.”

“Sub la Laborista Departemento?”

“Vi rapide lernas,” diris Ostrog, kun iom da surprizo.

“Jes. Precipe la malkontento ekzistas kontraŭ la Laborista Departemento. Tiu malkontento donis la movforton por nia venko—tio kune kun via vekigo.”

“Ĉu jes?”

Ostrog ridetis. Li fariĝis klarigema. “Ni devis inciti ilian malkontenton. Necesis revivigi la antikvajn idealojn

pri tutmonda feliĉo—kun ĉiuj homoj egalaj—ĉiuj feliĉaj—ke ekzistu nenia lukso, kiun ne ĉiu povas partopreni—idealojn, kiuj jam dormis ducent jarojn. Vi scias tion? Necesis revivigi tiujn idealojn, malgraŭ ilia neebleco—por venki la Konsilantojn. Kaj nun—”

“Nu?”

“Nia revolucio jam efektiviĝis, kaj ni venkis la Konsilantojn, sed la popolo, kiun ni agitis—daŭre ekscitiĝas. Okazis apenaŭ sufiĉe da bataloj. . . . Kompreneble ni promesis multon. Estas eksterordinare, kiel fortege kaj rapide tiu nebula malnovmoda humanismo reviviĝis kaj disvastiĝis. Eĉ ni, kiu semis ĝin, surpriziĝis. Ĉe Parizo, kiel mi jam diris—ni devis venigi iom da ekstera helpo.”

“Kaj ĉi tie?”

“Ekzistas maltrankvilo. Multe da homoj ne volonte reiros al la laboro. Okazas ĝenerala striko. La duono de la fabrikejoj estas malplenaj, kaj la homoj svarmas sur la Vojoj. Oni parolas pri Komunumo. Viroj silke aŭ atlase vestitaj insultiĝis sur la stratoj. La blua kanvaso atendas de vi ĉiuspecajn rezultojn. . . . Kompreneble, ne necesas, ke vi vin ĝenu. Ni ekfunkciigas la Babilmaŝinojn kun kontraŭaj sugestoj pri ordo kaj bona konduto. Ni devas teni ĉion iom firme; jen ĉio necesa.”

Graham meditis. Li perceptis rimedon sin entrudi. Sed li parolis sindetene.

“Eĉ se ni devas venigi nigran policon,” li diris.

“Ili tre utilas,” diris Ostrog. “Ili estas bonaj, lojalaj brutoj, kaj ne tenas en la cerbo la akvecajn ideojn, kiajn niaj amasoj havas. Se la Konsilantoj uzus ilin kiel vojpolicon, aferoj eble status diference. Kompreneble, ni ne timas ion, krom tumulton kaj rompadon. Vi nun kapablas funkciigi la proprajn flugilojn, kaj povas forflugi al Capri se leviĝas fumo aŭ bruoj. Ni havas influon sur ĉiuj grandaj aferoj; la aeronaŭtoj estas riĉaj kaj privilegiitaj, ili estas inter la plej potencaj unuigoj de la mondo, kaj same estas la inĝenieroj de la ventmaŝinoj. Ni estras la aeron, kaj la estroj de la aero povas estri la teron. Neniu, kun ia ajn lerteco, organiziĝas kontraŭ ni. Ili ne havas ĉefojn—nur la fakĉefojn de la sekreta societo organizita de ni antaŭ via tre oportuna vekigo. Ili estas

nur trudemuloj kaj sentimentuloj, kaj estas akre ĵaluzaj unu pri la aliaj. Neniu el ili estas sufiĉe forta por esti centra ĉefo. La sola ĝenaĵo estos senorda barakto. Por paroli senkaŝe—tio eble okazos. Sed ne necesos, ke vi interrompu vian aeronautikon. La tagon jam forpasis, kiam la popolo sola povis fari revolucion.”

“Mi supozas, ke jes,” diris Graham, “mi supozas, ke jes.” Li meditis. “Tiu via mondo estas plena de surprizo por mi. Antaŭe ni kutimis revii pri mirinda, demokrata vivo, pri epoko, kiam ĉiuj homoj estos egalaj kaj feliĉaj.”

Ostrog fikse rigardis lin. “La tempo de la demokratio jam forpasis,” li diris. “Ĝi forpasis por ĉiam. Ĝi komenciĝis kun la arkpafistoj ĉe Crecy, ĝi finiĝis kiam marŝanta infanterio, kiam amasoj da ordinaraj homoj, ĉesis venki en la bataloj de la mondo, kiam kostaj kanonoj, grandaj kirasŝipoj, kaj strategiaj fervojoj fariĝis la rimedoj por potenco. La hodiaŭa tempo estas la tempo de mono. La mono nun estas potenco kiel neniam antaŭe—ĝi estras teron, maron kaj ĉielon. Ĉia potenco apartenas al tiuj, kiuj povas disponi monon. Per via aŭtoritato—. Vi devas akcepti faktojn, kaj jen estas faktoj. La mondo por la Amaso! La Amaso kiel Reganto! Eĉ antaŭ via tempo oni provis tiun kredon kaj kondamnis ĝin. Hodiaŭ ĝi havas nur unu kredanton—multoblan, stultan kredanton—la homon en la Amaso.”

Graham ne tuj respondis. Li staris profundiginta en malhelaj meditoj.

“Ne,” aldiris Ostrog. “La epoko de la ordinara homo estas pasinta. En la kruda kamparo unu viro egalas alian, aŭ preskaŭ egalas. La plej fruaj aristokratoj havis necertajn rajtojn bazitajn sur forto kaj aŭdaco. Kontraŭis ilin ribeloj, tumultoj kaj dueloj. La unuaj veraj aristokratoj, la unua fiksita aristokratio, alvenis kun kasteloj kaj kiraso, kaj malaperis antaŭ la pafilo kaj la pafarko. Sed la hodiaŭa estas la epoko de la dua aristokratio. La vera. Tiu tempo de pulvo kaj la demokratio estis nur kirlo en la fluo. La ordinarulo nun estas senpova ero. Hodiaŭ ni posedas tiun grandan maŝinon, la urbon, kun organizo tro komplika por lia kompreno.”

“Tamen,” diris Graham, “io kontraŭstaras vin, ion vi subpremas—io, kio moviĝas kaj puŝas.”

“Vi vidos,” diris Ostrog, kun perforta rideto, kiu volis brosi flanken la malfacilan demandon. “Mi ne levis la forton por detrui min mem—fidu al mi pri tio.”

“Mi dubas,” diris Graham.

Ostrog rigardis lin surprizite.

“Ĉu la mondo nepre devas progresi tiamaniere?” diris Graham, en kiu parolis la emocioj mem. “Ĉu ĝi nepre progresos tiamaniere? Ĉu ĉiuj niaj esperoj estis vanaj?”

“Kion tio signifas?” diris Ostrog. “Esperoj?”

“Mi venas el demokrata epoko. Kaj mi trovas aristokratan tiranecon!”

“Nu,—vi mem estas la ĉefa tirano.”

Graham svingis nee la kapon.

“Nu,” diris Ostrog, “konsideru la ĝeneralan demandon. Tiu estas la vojo, laŭ kiu la ŝanĝoj ĉiam veturas. La aristokratio, la regado en la nomo de la plej taŭgaj—la suferado kaj estingiĝo por la netaŭgaj, kaj tiel ni iros al pli bona stato.”

“Sed aristokratoj! tiuj, kiujn mi renkontis—”

“Ho! ne *tiuj!*” diris Ostrog. “Sed la plimulto el ili iras rekte al la morto. Pro malvirto kaj plezuraĉo. Ili ne posedas infanojn. Se la mondo daŭre iros sur la rekta vojo, se oni ne iros malantaŭen, tiu speco de materialo malaperos. Facila vojo al eksceso, oportuna Eŭtanasio por plezuramantoj kiuj bruletiĝas en la flamo, jen la rimedo plibonigi la rason!”

“Plaĉa estingiĝo,” diris Graham. “Sed tamen—” Li meditis momente. “Ekzistas ankaŭ tiu alia speco—la Amaso, la granda amaso da malriĉuloj. Ĉu tiu ankaŭ estingiĝos? Ĝi ne estingiĝos. Kaj tamen ĝi suferas, ĝia sufero estas forto, kiun eĉ vi—”

Ostrog gestis senpacience, kaj, kiam li parolis, lia voĉo sonis iom malpli regula ol antaŭe.

“Ne ĝenu vin pri tiaj aferoj,” li diris. “Ĉio trankviliĝos nun post nemultaj tagoj. La Amaso estas grandega malsaĝa besto. Kio, se ĝi ne estingiĝos? Eĉ se tio ne okazos, oni povos dresi kaj direkti ĝin. Mi sentas nenian simpatian por servutuloj. Vi aŭdis tiujn homojn,

kiuj kantis kaj kriegis antaŭ du noktoj. Oni *instruis* al ili tiun kanton. Se vi elektus iun ajn el ili, kaj demandus poste, kial li kriegas, li ne kapablus diri al vi. Ili kredas, ke ili krias pro vi, ke ili estas lojalaj kaj sindonaj al vi. Tiam ili sin sentas pretaj buĉi la Konsilantojn. Hodiaŭ—jam ili murmuris kontraŭ tiuj, kiuj venkis la Konsilantaron.”

“Ne, ne,” diris Graham. “Ili kriis, ĉar iliaj vivoj estas malgajaj, sen ĝojo aŭ fiero, kaj ĉar pri mi—pri mi—ili esperis.”

“Kaj kion ili esperis? Kio estas ilia espero? Kiel ili rajtas esperi? Ili laboras mallerte, kaj ili postulas la rekompencan de tiu, kiu laboras lerte. La espero pri la homaro—kio tio vere estas? Ke iam la Superhomo alvenos, ke iam la malsuperulo, la malfortulo kaj la brutulo subpremiĝos aŭ estingiĝos. Subpremiĝos, se ne estingiĝos. La mondo ne estas taŭga loko por la malbonulo nek por la stultulo, la malviglulo. Ilia devo—kaj jen grandioza devo!—estas morti. La morto por la nesukcesa! Jen la vojo, laŭ kiu la besto sin levis ĝis homeco, laŭ kiu la homo iras antaŭen al stato ankoraŭ pli alta.”

Ostrog faris paŝon, ŝajnis pripensi, kaj turniĝis al Graham. “Mi povas imagi, kiel ĉi tiu nia granda mondŝtato aspektas al viktoria anglo. Vi bedaŭras la malnovajn formojn de reprezenta regado—iliaj fantomoj ankoraŭ hantas la mondon, la voĉdonaj elektadoj, kaj parlamentoj, kaj ĉiu tia dek-ok-jarcenta sensencaĵo. Vi incitigas kontraŭ niaj Plezururboj. Eble mi devus antaŭpensi tion,—sed mi tro okupiĝis. Sed vi ŝanĝos la opinion. La popolo estas freneza pro envio—ili konsentas kun vi. Eĉ nun, sur la stratoj, ili bruas kontraŭ la Plezururboj. Sed la Plezururboj estas la *ekskretaj* organoj de la ŝtato, allogaj lokoj, kiuj jaron post jaro kuntiras ĉion, kio estas mallaborema kaj voluptema, stulta kaj malvirta, ĉian facilan friponaĵon, for de la mondo al gracia pereco. Ili iras tien, ili pasigas sian tempon, ili mortas sen infanoj, la beletaj, malsaĝaj, voluptaj virinoj mortas seninfanaj, kaj la homaro statas pli bone pro tio. Se la popolo estus saĝa, ĝi ne enviis al la riĉuloj ilian mortrimedon. Kaj vi volas liberigi la malsaĝajn, sencerbajn laboristojn, kiujn ni sklavigis, kaj provi fari iliajn vivojn

denove plaĉaj kaj facilaj. Kiam ili nur ĵus subiris al tio, por kio ili taŭgas!” Li montris rideton, kiu strange incitis Grahamon. “Vi ŝanĝos la opinion. Mi konas tiujn ideojn; dum miaj knabjaroj mi legis vian Shelley kaj revis pri la Libereco. La libereco ne ekzistas, ekzistas nur saĝo kaj sinregado. La libereco loĝas interne—ne ekstere. Ĝi estas la propra afero de ĉiu individuo. Supozu—tamen estas neeble—ke tiuj svarmantaj, blekantaj malsaĝuloj en bluo venkus nin, kio okazus? Ili nur apartenus al aliaj mastroj. Tiel longe, kiel ekzistos ŝafoj, la Naturo insiste provizos rabobestojn. Tio nur kaŭzus kelkjarcentan prokraston. La alveno de la aristokrato estas certa destino. La rezulto estos la Superhomo—spite de ĉiuj frenezaj protestoj de la homaro. Ili ribelu, ili mortigu min kaj miajn simulojn. Aliaj leviĝos—aliaj mastroj. La fino estos sama.”

“Mi dubas,” ripetis Graham obstine.

Dum momento li staradis subpremita.

“Sed mi devas mem vidi tiujn aferojn,” li diris, subite kaptante tonon de memfida mastreco. “Nur vidante, mi povas kompreni. Mi devas lerni. Jen kion mi volas diri al vi, Ostrog. Mi ne volas esti reĝo en Plezururbo; tio ne plaĉas al mi. Mi jam pasigis sufiĉe da tempo per aeronautiko—kaj tiuj aliaj aferoj. Mi devas informi min, kiel homoj nun vivas, kiel la ordinara vivo jam evoluiĝis. Tiam mi pli bone komprenos tiujn aferojn. Mi devas vidi, kiel la ordinara homoj vivas—la laboristoj precipe—kiel ili laboras, geedziĝas, naskas infanojn, mortas—”

“Vi ricevos tion de niaj realismaj novelistoj,” sugestis Ostrog, subite pensema.

“Mi volas la realecon mem,” diris Graham.

“Ekzistas malfacilaĵoj,” diris Ostrog, kaj pripensis. “Eble, tamen— Mi ne atendis— Mi kredis— Tamen, eble—. Vi diras, ke vi deziras iri sur la Vojoj de la urbego kaj vidi la subulojn.”

Subite li atingis decidon. “Necesos, ke vi alivestu,” li diris. “La urbo estas treege ekscitita, kaj la malkaŝo de via ĉeesto inter ili povus krei teruran tumulton. Tamen tiu via deziro iri tra la urbo—tiu ideo—. Jes, nun, kiam mi konsideras la ideon, ĝi ŝajnas al mi ne tute—. Mi

povas trovi rimedon. Se vi vere interesigas pri tio! Kompreneble, vi estas la Mastro. Vi povos iri baldaŭ, se vi volas. Asano klopodos pri alivestajo por vi. Li akompanos vin. Efektive, tiu via ideo ne estas malbona.”

“Vi ne volos konsili kun mi pri io?” demandis Graham abrupte, frapita de stranga suspekto.

“Ah, ne! ne! Mi kredas, ke vi povas fidi al mi pri la administrado, almenaŭ dum nelonge,” diris Ostrog, kun rideto. “Eĉ se ni malkonsentas——”

Graham rigardis lin.

“Ĉu batalo eble okazos baldaŭ?” li demandis abrupte.

“Certe ne.”

“Mi ĵus pripensis pri tiuj negroj. Mi ne kredas, ke la popolo intencas esti malamika kontraŭ mi, kaj tio estas mia afero, ĉar mi estas la Mastro. Mi ne volas, ke oni venigu negrojn al Londono. Eble tio estas arkaika opinio, sed mi havas fortajn sentojn pri Eŭropanoj kaj la subaj rasoj. Eĉ pri Parizo——”

Ostrog staris rigardanta lin de sub siaj mallevitaj brovoj. “Mi ne venigas negrojn al Londono,” li diris malrapide. “Sed se——”

“Vi ne darfus venigi armitajn negrojn al Londono, ĉu gravas aŭ ne gravas la okazo,” diris Graham. “Pri tio mi fikse decidus.”

Ostrog decidis ne paroli, kaj kliniĝis respekte.

alivestu aŭ alivestiĝu

ĈAPITRO DUDEKA.

SUR LA VOJOJ DE LA URBEGO.

KAJ tiun nokton, nekonata kaj ne suspektata, Graham, vestita kvazaŭ libertempanta suboficisto de la Ventmaŝinĵoj, kaj akompanata de Asano, kiu vestiĝis per la kanvaso de la Laborista Departemento, trarigardis la urbon. Tra tio li jam vagis, kiam ĝi kuŝis vualita de malklumo, sed nun li vidis ĝin lumigitan kaj maldorman, kirlakvon de vivo. Spite de la premo kaj svingo de la revoluciaj fortoj, spite de la neordinara malkontento, la murmuroj de la pli granda barakto, al kiu la unua ribelo estis nur la preludo, la miriadoj da fluoj de la komerco ankoraŭ progresis, vastaj kaj fortaj. Li komprenis nun ion pri la amplekso kaj kvalito de la nova epoko, sed li ne sin trovis preta por la senlima surprizo de la detala rigardo, por la diluvo da koloro kaj vivaj impresoj, kiu fluegis preter li.

Tio estis lia unua vera kontakto kun la popolo de tiuj tagoj. Li konsciis, ke ĉio antaŭe spertita, ekster lia ekvido al la publikaj teatroj kaj vendhaloj, enhavis econ de izoligo, estis nur irado inter la kompare malvasta politika rondo, ke ĉiuj antaŭaj spertoj turniĝis proksime ĉirkaŭ la ideo de lia propra situacio. Sed jen troviĝis la urbo je la plej okupataj horoj de la nokto, kun popolo plejparte reirinta al la propraj interesaĵoj; jen estis la restarigo de la vera neformala vivo, la komunaj kutimoj de la nova tempo.

Ili elvenis komence sur straton, kies kontraŭaj vojoj estis premplenaj de blukanvasaj livreoj. Tiu svarmo, li vidis, estas parto de procesio—estis strange vidi procesion promeni tra la urbo *sidante*. Ili portis flagojn el kruda nigra ŝtofo kun ruĝaj literoj. “Neniu senarmigo,” diris la flagoj, plejparte per fuŝe ŝmiritaj literoj kaj kun neĝusta literado, kaj “Kial oni senarmigu nin?” “Neniu sen-

armigo.” “Neniu senarmigo.” Flago post flago preteriris, rivereto el flagoj preterfluis, kaj poste, je la fino, la revolucia kanto kaj orkestro el strangaj instrumentoj. “Ili ĉiuj devus nuntempe labori,” diris Asano. “Ili ne manĝis dum du tagoj, se ili ne ŝtelis nutraĵon.”

Baldaŭ Asano ĉirkaŭiris por eviti kunpremitan amason, kiu gape rigardis la kelkfojan portadon de kadavroj el hospitalo al mortejo, la kolekton post la rikolto de la morto ĉe la unua ribelo.

Tiun nokton nemulte da homoj dormis, ĉiu promenis ekstere. Vasta ekscitiĝo, konstantaj amasoj, kiuj konstante sin ŝanĝis, ĉirkaŭis Grahamon; lia cerbo estis konfuzita kaj malgajigita de senĉesa tumulto, de la krioj kaj enigmaj fragmentoj de la socia barakto, ankoraŭ ĵus komenciĝanta. Ĉie girlandoj kaj flagoj el nigra ŝtofo kun strangaj ornamaĵoj atestis la gradon de lia populareco. Ĉie li kaptis vortojn el tiu kruda neklara dialekto, kiu servis por ĉiutagaj aferoj la needukitan klason, la klason, kiu troviĝis preter la atingo de kulturo per gramofonoj. Ĉie tiu maltrankvilo pro senarmigo aŭdiĝis, kaj ĝia proksima graveco estis multe pli granda, ol li eĉ revis dum sia izoliĝo en la Ventmaŝina Kvartalo. Li komprenis, ke tuj kiam li revenos, li devos diskuti tion kun Ostrog, tion kaj la pli grandajn aferojn, kiujn ĝi simbolas, laŭ maniero multe pli decida, ol antaŭe. Senĉese, tiun nokton, eĉ dum la fruaj horoj de ilia promeno tra la urbego, la spirito de senripozo kaj ribelemo kaptis lian atenton, forpelante sennombrajn strangaĵojn, kiujn alie li eble rimarkus.

Tiu enpensigo fragmentigis liajn impresojn. Tamen inter tiom, kiu estis stranga kaj frapa, nenia temo, eĉ la plej propra kaj persista, povis regi ne malhelpite. Okazis momentoj, kiam la revolucio tute forpasis de lia atento—estis detirita flanken kvazaŭ kurteno, antaŭ iu surpriza detalo de la periodo. Heleno antaŭe instigis lian spiriton al tiu treege serioza demandado, sed okazis fojoj, kiam eĉ ŝi subiris el liaj konsciaj pensoj. Unu momenton, ekzemple, li trovis, ke ili transiras la religian kvartalon,—ĉar la facila irado ĉirkaŭ la urbo igis nenecesa, ke preĝejoj troviĝu hazarde lokitaj—kaj lia atento vigle altiriĝis de la fasado de la preĝejo de unu el la Kristanaj sektoj.

Ili vojaĝis sidante sur rapida supera vojo, kaj la konstruaĵo kvazaŭ saltis al la vido ĉirkaŭ stratkurbiĝo, kaj venis rapide al ili. Ĝi estis kovrita de surskribaĵoj de supro ĝis fundo, per hela bluo kaj blanko, krom kie granda brilega kinematografa ekrano prezentis realisman scenon el la Nova Testamento, kaj kie vasta nigra festono, pendante trans la literojn, montris, ke la popola religio sekvas la popolan politikon. Graham jam familiariĝis kun la nova literado, kaj tiuj surskriboj haltigis lian atenton, ĉar ili estis, laŭ liaj ideoj, plejparte preskaŭ nekredeblaj blasfemajoj. Inter la malpli ofendaj troviĝis: "Savado ĉe la unua Etaĝo—Turniĝu Dekstren." "Aĉetu Akcion en la Kompanio de l' Kreinto." "La plej Rapida Konvertiĝo en Londono. Spertaj Metiistoj! Rapidu!" "Kion Kristo dirus al la Dormanto?—'Aliĝu al la Novmodaj Sanktuloj!'" "Estu Kristano—sen malhelpo al via nuntempa Okupo." "La plej Brilaj Episkopoj sur la Benko hodiaŭ vespere, kaj la Prezoj laŭ Kutimo." "Brilaj Benoj por Kleraj Komercistoj."

"Sed tio estas terura!" diris Graham, dum tiu surdiga krio de komercema pieco pendis super ili.

"Kio estas terura?" demandis la malgranda oficisto, ŝajne serĉante ion nekutiman inter tiuj kriantaj literoj.

"*Tio!* Ĉu la esenco mem de la religio ne estas la respektego."

"Ho, *tio!*" Asano rigardis Grahamon. "Ĉu ĝi ofendas vin?" li aldonis per tono de viro, kiu eltrovas ion. "Ha, mi supozas, ke jes, kompreneble. Mi forgesis. Nuntempe la konkurado por atento estas tre akra, kaj la homoj vere ne havas liberan tempon por atenti siajn animojn, kiel oni kutimis antaŭe." Li ridetis. "En la malnova tempo vi havis kvietajn dimanĉojn, kaj la kamparon. Tamen mi legis ie pri dimanĉaj vesperoj, kiuj—"

"Sed *tio*," diris Graham, ekrigardante posten al la foriranta bluo kaj blanko. "Ĉu tio estas la sola—?"

"Ekzistas kelkcent diversaj metodoj. Sed, kompreneble, se sekto ne atentigas la publikon, ĝi ne sukcesas. La adorado ŝanĝiĝis konforme kun kutimoj. Ekzistas altgradaj sektoj kun pli kvietaj kutimoj—kosta incenso, individua atento, k.t.p. Tiuj aliaj, tamen, estas tre popularaj kaj prosperaj. Ili pagas kelkajn doznojn da

leonoj por tiuj ĉambroj al la Konsilantoj—al vi, mi devus diri.”

Graham ankoraŭ spertis malfacilecon pri ilia mono, kaj tiu aludo al doznoj da leonoj atentigis tiun aferon abrupte al li. Post momento li forgesis la kriantajn templojn kun iliaj svarmantaj klientserĉistoj, pro tiu nova interesaĵo. Frazo sugestis, kaj respondo fiksas la ideon, ke la oro kaj la arĝento ambaŭ ne plu havas valoron kiel mono, ke la stampita oro, kiu komencis sian regnon ĉe la negocistoj de Fenikujo, nun fine detroniĝis. La ŝanĝo okazis laŭ gradoj, sed rapide, kaj estis rezulto de la etendiĝo de la ĉeksistemo, kiu, eĉ dum lia antaŭa vivo, jam preskaŭ anstataŭis la oron por ĉiuj pli grandaj negocoj. La ordinarajn aferojn de la urbo, kaj efektive, de la mondo, oni faris per la brunaj, rozaj kaj verdaj ĉeketoj de la Konsilantoj por malgrandaj sumoj, presitaj kun spaco por la nomo de la pagoto. Asano donis al li kelkajn, kaj je la unua okazo li kompletigis serion por Graham. Ili estis presitaj ne sur ŝirebla papero, sed sur duone diafana ŝtofo de ŝilka fleksebleco, intertekstata per silko. Trans ilin streĉiĝis kopio de la nomskribo de Graham, lia unua renkonto kun la kurboj kaj strekoj de tiu familiara aŭtografo dum du cent tri jaroj.

Kelkaj aliaj spertoj ne faris impresojn sufiĉe fortajn por malhelpi, ke la demando pri senarmigo denove okupu liajn pensojn; malklara bildo de templo de teosofio kiu promesis

MIRAKLOJN !

per grandegaj fajraj literoj, eble estis la malplej forpuŝita, sed poste sekvis vizito al la manĝhalo en Northumberland Avenuo. Tio tre interesis lin.

Pro la energio kaj pripenso de Asano li povis rigardi tiun lokon el kaŝita galerieto rezervita por la servistoj ĉe la tabloj. La konstruaĵo pleniĝis de malproksimaj obtuzaj ululoj, fajfoj kaj krioj, kies signifon li ne unue komprenis, sed kiuj memorigis al li misteran kvazaŭ ledan voĉon aŭditan de li post la refunkciado de la lumoj dum la punkto de lia soleca vago.

Li jam kutimiĝis al vasteco de loko kaj grandeco de homnombroj, tamen tiu spektaklo kaptis lin dum tre longa tempo. Nun kiam li observis la servadon pli proksime

sub si, kaj intermetis multajn demandojn pri detaloj, la kompreno de la plena signifo de tiu manĝo por kelkmlil personoj venis al li.

Li konstante surpriziĝis trovante, ke tiuj detaloj kiujn oni atendus frapi la atenton vigle eĉ je la komenco mem, neniam rimarkiĝis de li, ĝis iu bagatelaĵo subite fariĝis enigmo, kaj indikis la evidentan fakton, kiun li ĝis tiam ne rimarkis. Nur nun li ekpensis, ke tiu kontinueco de la urbego, tiu forteno de la vetero, tiuj vastaj haloj kaj vojoj postulas la malaperon de la familia domo; ke la tipe viktorina "Hejmo," la eta ĉelo el brikoj kun kuirejo kaj lavejo, dormĉambroj kaj loĝĉambroj, jam, ekster la ruinoj kiuj punktis la kamparon, malaperis tiel certe, kiel la arkaika kabano el koto. Nur nun li perceptis tion, kio, tamen, de la komenco evidentiĝis, ke Londono, konsiderata kiel urbo por enloĝado, ne plu estas kolekto da domoj, sed vastega hotelo, hotelo kun mil gradoj de loĝado, miloj da manĝĉambroj, preĝejoj, teatroj, vendplacoj kaj kunvenejoj; sintezo de entreprenaĵoj, kies ĉefa posedanto li mem estas. Homoj okupis dormĉambrojn, eble ankaŭ kun antaŭĉambroj, kaj tiuj ĉiam estis almenaŭ puraj, kiu ajn ilia grado de komforto kaj privateco; ekster tio ili vivis, multe same kiel multaj vivis en la novaj gigantaj hoteloj de la viktorinaj tagoj, manĝante, legante, pensante, ludante, parolante, ĉiuj en publikaj ĉambroj, irante por labori al la fabrika kvartalo de la urbo, aŭ negocante en siaj kontoroj en la komerca kvartalo.

Li komprenis tuj, ke tiu aferstato necese evoluigis el la viktorina urbego. La fundamenta kaŭzo de la moderna urbego estis la ŝparado per kooperado kaj kunlaborado. La ĉefa kialo, kiu malhelpis la merĝadon de la apartaj familioj dum lia propra generacio, estis sole la ankoraŭ neperfekta civilizigo de la popolo, la fortaj, barbaraj fierecoj, pasioj kaj kredoj, la ĵaluzoj, rivalaĵoj, kaj abrupteco de la meza kaj malsupera klasoj, kiu necesis la tutan apartigon de apudaj familioj. Sed la ŝanĝigo, la malsovaĝigo de la popolo, eĉ tiam rapide progresis. Dum sia mallonga tridekjara tempo de antaŭa vivo li vidis treegan etendiĝon de la kutimo manĝi for de la domo; ekzemple, la nur hazarde vizitata ĉambreto dividita kvazau ĉevalejoj,

anstataŭiĝis de la larĝa kaj homplena kafejo ; kluboj por virinoj iniciatiĝis, kaj treega disvastiĝo de legoĉambroj, parolĉambroj kaj bibliotekoj atestis la kreskadon de la socia konfido. Tiaj promesoj nun fine atingis sian tutan plenumiĝon. La enŝlosita kaj forbarita familia domo jam longe malaperis.

La homoj sub li apartenis, li sciigis, al la submeza klaso, la klaso tuj super la bluestitaj laboristoj, kiu klaso, dum la viktoria periodo, tiel kutimis manĝi kun ĉia gardo por sia privateco, ke ĝiaj anoj, se okazaĵo devigis al ili publikan manĝon, devis kaŝi sian embarasiĝon aŭ sub krudaj ŝercoj aŭ sub tre batalema sinteno. Sed tiuj gaje kvankam malpeze vestitaj homoj sube, eĉ se ili estis vivecaj, rapidemaj, kaj senparolemaj, tamen kondukis elegante, kaj certe aspektis tute trankvilaj unu rilate la alian.

Li rimarkis signifan afereton ; la tablo estis kaj restis plaĉe orda, ne montriĝis io por egali la konfuziĝon, la disĵetitajn panerojn, la makulojn de nutraĵoj kaj kondimentoj, la renversitajn trinkaĵojn kaj forpuŝitajn ornamaĵojn, kiuj antaŭe markis la ventegan progreson de la viktoria manĝo. La manĝilaro estis tute diferenca. Ne troviĝis ornamaĵoj, nek floroj, kaj la tablo ne portis tukon, estante farita, li sciigis, el solida substanco kun aspekto kaj surfaco kvazaŭ damasko. Li povis vidi, ke tiu damaska substanco havas desegnon el gracie aranĝitaj komercaj reklamoj.

En speco de alkoveto antaŭ ĉiu manĝanto staris komplika aparato el porcelano kaj metalo. Ĉiu havis nur unu teleron el blanka porcelano, kaj per kranoj por volatilaj fluidaĵoj varma kaj malvarma la manĝanto mem lavis tiun inter la servado ; li ankaŭ lavis la elegantajn blankmetalajn tranĉilon kaj forkon, kiam necesis.

Supo kaj la artefarita vino, kiu estis la ordinara trinkaĵo, liveriĝis de similaj kranoj, kaj la ceteraj manĝaĵoj iris aŭtomate en plaĉe aranĝitaj pladoj laŭlonge de la tablo sur arĝentaj reloj. La manĝanto haltigis ilin kaj mem servis sin laŭvole. Ili aperis el pordeto ĉe unu fino de la tablo kaj malaperis ĉe la alia. Tiu demokrata sentimento nun polviĝinta, tiu malbela fiereco de servutaj animoj, kiu igis egalulojn malvolontaj servi unu la alian, ankaŭ estis tre forta inter tiuj antaŭ li. Li tiom enpeniĝis pri tiuj detaloj,

?
 ke nur kiam li ekforlasis la lokon li rimarkis la grandegajn reklamajn dioramojn, kiuj iris majeste laŭ la superaj muroj kaj anoncis la plej surprizajn aĵojn.

Post tiu loko ili venis en homplenan halon, kaj li trovis la kaŭzon de la bruoj kiu tiel perpleksis lin. Ili haltis ĉe turnbarilo ĉe kiu oni pagis.

La atento de Graham tuj kaptiĝis de fortega abrupta ululo, sekvata de vasta ledsimila voĉo. "La Mastro pace dormas," ĝi kriegis. "Li bonege sanas. Li intencas dediĉi la ceteron de la vivo al la aeronaŭtiko. Li diras, ke virinoj estas pli belaj, ol iam ajn antaŭe. Galup'! Ŝaŭ! Nia mirinda civilizacio surprizas lin pretermezure. Preter ĉiu mezuro. Galup'! Li tre fidas al Ĉefo Ostrog, absolute fidas al Ĉefo Ostrog. Ostrog estos lia ĉefministro; li havas aŭtoritaton forpeli aŭ restarigi publikajn oficistojn — ĉiu oficdonado restos en liaj manoj. Ĉiu oficdonado en la manoj de Ĉefo Ostrog! La Konsilantojn oni jam sendis al ilia propra malliberejo super la Konsilejo."

Graham haltis je la unua frazo, kaj, rigardante supren, vidis stultan trumpetan vizaĝon, el kiu tio blekiĝis. Tio estis la Ĝenerala Informa Maŝino. Dum kelka tempo ĝi ŝajnis rehavigi al si spiron, kaj aŭdiĝis regula pulsado el ĝia cilindra korpo. Tiam ĝi trumpete diris "Galup'! Galup'!" kaj rekomencis paroli.

"Parizo nun tute trankviliĝis. Ĉiu kontraŭstaro jam finiĝis. Galup'! La negra polico tenas ĉiun gravan pozicion en la urbo. Ili tre kuraĝe batalis, kantante laŭdojn verkitajn pri iliaj prapatroj de la poeto Kipling. Kelkfoje ili sendiscipliniĝis, kaj torturis kaj atakis vunditajn kaj kaptitajn ribelulojn, virojn kaj virinojn. Do— ne ribelu! Haha! Galup'! Galup'! Ili estas gajuloj. Gajaj bravuloj. Tio estu leciono por la senorda *banderlog* de ĉi tiu urbo. Jaha! Banderlog! Malpuraĵo de l' tero! Galup'! Galup'!"

La voĉo haltis. Aŭdiĝis konfuzita murmuro de malaprobo inter la amaso. "Damnindaj negraĉoj." Viro apud ili komencis deklami. "Ĉu tio estas la ago de la Mastro, fratoj? Ĉu tio estas la ago de la Mastro?"

"Negra polico!" diris Graham. "Kio tio estas? Ĉu tio signifas—"

Asano tuŝis lin je la brako kaj donis al li avertan rigardon ; tuj alia el tiuj mekanismoj kriis surdige, kaj parolegis per akra voĉo. "Jahaha ! Jaha ! Jap ! Aŭdu viglan ĵurnalon bleki ! Viglan ĵurnalon ! Jaha ! Terura afero en Parizo ! Jahaha ! La Parizanoj incitiĝis de la negra polico ĝis murdema grado. Teruraj revenĝoj. La sovaĝa epoko revenas. Sango ! SANGO ! Jaha." La pli proksima Babilmaŝino ululis gigante, "Galup' ! Galup' !" dronigis la finon de la diraĵo, kaj daŭrigis, per iom pli malalta tono ol antaŭe, novajn komentariojn pri la abomenaĵoj de senordeco. "La leĝon kaj ordon oni devas subteni," diris la pli proksima Babilmaŝino.

"Sed——" komencis Graham.

"Ne demandu ĉi tie," diris Asano. "Aŭ vi troviĝos miksita en argumento."

"Do, ni foriru," diris Graham, "ĉar mi volas scii plu pri tio."

Dum li kun sia kunulo sin ŝovis al la elirejo tra la ekscitita svarmo, kiu staris amase sub tiuj voĉegoj, Graham rimarkis pli klare la amplekson kaj detalojn de la halo. Entute, grandaj kaj malgrandaj, probable troviĝis preskaŭ mil de tiuj maŝinoj, kiuj fajfis, ululis, kriegis kaj babilis en tiu vasta spaco, ĉiu kun sia amaso de ekscititaj aŭskultantoj, kies plejparto estis blue vestita. Estis maŝinoj de ĉiu speco, de la etaj skandalantaj aparatoj, kiuj rikanis mekanikan saskasmon en kaŝitaj anguloj, tra multaj gradoj, ĝis dek-kvin-metraj gigantoj, kiaj tiu, kiu unue kriegis super Graham.

Tiu halo estis pli ol ordinare plena, pro la treega publika interesiĝo pri aferoj en Parizo. Estis evidente, ke la barakto estis multe pli sovaĝa, ol Ostrog antaŭe priskribis ĝin. Ĉiuj maŝinoj parolis pri tiu temo, kaj ĉar la ĉeestantoj ripetis ilin, la vastega abelujo zumis per tiaj frazoj, kiaj : "Policano pendigita." "Virinoj mortbruligitaj," ktp. "Sed ĉu la Mastro permesas tiajn agojn ?" demandis viro apud li. "Ĉu *tio* estas la komenco de la regno de la Mastro ?"

Ĉu *tio* estas la komenco de la regno de la Mastro ? Longe post kiam li forlasis la halon, la kriegoj, fajfoj kaj blekoj de la maŝinoj sekvis lin ; "Galup' ! Galup' !" "Jahaha,

Jaha, Jap' ! Jaha ! " Ĉu tio estas la komenco de la regno de la Mastro ?

Tuj kiam ili sin trovis sur la vojoj, li komencis aldemandi Asanon insiste pri la barakto en Parizo. " Tiu senarmigo ! Pri kio ili sin ĝenis ? Kion ĉio signifas ? " Asano ŝajnis precipe voli certigi lin, ke ĉio statas bone. " Sed tiuj kruelaĵoj ! " " Oni ne povas fari omeleton, ne rompante ovojn, " diris Asano. " Tio nur estas la kanajlo. Nur en unu kvartalo. La tuta cetero statas bone. La laboristoj de Parizo estas la plej sovaĝaj de la mondo, krom niaj. "

" Kio ! la Londonanoj ? "

" Ne, la Japanoj. Oni nepre devas firme regi ilin. "

" Sed mortbruligi virinojn ! "

" Komunumo ! " diris Asano. " Ili volas forŝteli vian havaĵon. Ili volas malpermesi la posedadon de havaĵo, kaj starigi la reĝnon de la Amasaĉo. Vi estas la Mastro, la mondo estas via. Sed ne fondiĝos Komunumo ĉi tie. Ĉi tie ne necesos negra polico. "

" Krome, oni uzis por ili ĉiun prizorgon. Oni venigis iliajn proprajn negrojn—france parolantajn negrojn. Regimentojn el Senegal, kaj Niger, kaj Timbuktu. "

" Regimentoj ? " diris Graham, " Mi kredis, ke estas nur unu— "

" Ne, " diris Asano, kaj kaŝe rigardis lin. " Estas pli ol unu. "

Graham sin sentis malplaĉe senpova.

" Mi ne supozis, " li komencis, kaj haltis abrupte. Li parolis flanke de la temo, petante informon pri la Babilmaŝinoj. La plejparto de la amaso aspektis malfreŝe aŭ eĉ ĉifone vestita, kaj Graham sciigis, ke rilate la pli prosperajn klasojn, ĉiuj pli komfortaj loĝejoj de la urbo enhavas Babilmaŝinojn, kiuj parolas tuj kiam oni movas tenilon. La enloĝanto povis konekti tiun kun la kabloj de tiu el la grandaj Novaĵaj Sindikatoj, kiun li preferis. Kiam li sciis tion, li demandis la kialon, ke ili forestas de lia propra apartamento. Asano embarasiĝis. " Tion mi ne rimarkis, " li diris. " Verŝajne Ostrog forigis ilin. "

Graham rigardis lin fikse. " Kiel, do, mi sciu ion ? " li kriis.

" Eble li kredis, ke ili ĝenos vin, " diris Asano.


“ Mi ordonos, ke oni restarigu ilin, tuj kiam mi reiros, ”
diris Graham post paŭzo.

Li trovis malfacile kompreni, ke tiu novaĵohalo kaj la manĝhalo ne estas grandaj centraj lokoj—ke similaj haloj troviĝas sennombre tra la tuta urbego. Sed foje kaj ree dum la nokto liaj oreloj kaptis inter la tumulto de la vojoj la strangan ululon de la organo de Ĉefo Ostrog, “ Galup’ ! Galup’ ! ” aŭ la akresonan “ Jahaha ! Jaha ! Jap’ !—Aŭdu viglan ĵurnalon bleki ! ” de ĝia ĉefa rivalo.

Troviĝis ankaŭ infanejoj similaj al tiu, kiun li nun eniris. Oni atingis ĝin per lifto, kaj per vitra ponto, kiu transiris la manĝhalon kaj la straton per nekruta suprena kliniĝo. Por eniri la unuan fakon de la infanejo, li devis uzi sian nomskribon laŭ la instruo de Asano. Tuj ili atentigis de viro vestita per purpura robo kun ora ligilo, la insigno de la kuracistoj. Li vidis, per la sinteno de tiu viro, ke oni jam rekonis lin, kaj li sekve senkaŝe demandis pri la strangaj aranĝoj de la loko.

Ambaŭflanke de la koridoro, kiu estis silenta kaj remburita, kvazaŭ por mallaŭtigi piedsonojn, troviĝis mallarĝaj pordetoj, kies grando kaj aranĝo sugestis la ĉelojn de Viktorina malliberejo. Sed la supera parto de ĉiu pordeto estis farita el la sama verdeta diafana materialo, kiu antaŭe enfermis lin, kiam li vekigis, kaj interne, mallare videbla, kuŝis en ĉiu fako tre juna infaneto sur nesto el vato. Komplika aparato gardis la atmosferon, kaj sonigis sonorilon malproksime en la centra oficejo je la plej malgranda ŝanĝiĝo for de la ĝusta grado de temperaturo kaj malsekeco. Sistemo de tiaj infanejoj preskaŭ tute anstataŭis la danĝerajn aventurojn de la antikva vartado. La kuracisto baldaŭ rimarkigis al Graham la “ nutristinojn, ” vicon de mekanikaj figuroj, kun brakoj, ŝultroj kaj brustoj mirege reale skulptitaj kaj kunigitaj per artikoj, sed tamen kun nur metalaj tripedoj sube, kaj portantaj anstataŭ vizaĝon platan diskon kun reklamoj interesaj al patrinoj.

El ĉiuj strangaj aferoj, vidataj de Graham tiun nokton, neniu pli agacis lian kutiman pensmanieron ol tiu loko. La vido de la rozaj kreitaĵetoj, kun malfortaj membroj, hezite moviĝantaj kaj sin svingantaj, lasitaj en soleco sen kareso aŭ amo, tute ŝokis lin. La gardanta kuracisto



male opiniis. Lia statistiko konstatis nedisputeble, ke dum la Viktorina epoko la plej danĝera parto de la vivo okazis inter la brakoj de la patrino, ke tie la homa mortado ĉiam estis plej terura. Kontraŭe, ĉi tiu infaneja kompanio, la Internacia Infaneja Sindikato, ne perdis duonon procento el la miliono da infanoj, kiuj estis ĝia propra gardaĵo. Sed la antaŭjuĝo de Graham venkis en li eĉ la ateston de tiaj ciferoj.

En unu el la multaj koridoroj ili poste trovis junan paron vestitan per la kutima blua kanvaso; ili rigardis tra la diafanaĵo, kaj ridis histerie pri la senhara kapo de ilia unua naskito. La vizaĝo de Graham verŝajne malkaŝis lian opinion pri ili, ĉar ilia gajeco ĉesis kaj ili aspektis hontigitaj. Sed tiu eta okazaĵo emfazis lian subitan komprenon pri la abismo inter lia penskutimo kaj la moroj de tiu nova epoko. Li pasis al la ramejoj kaj ludejoj, perpleksite kaj maltrankviligite. Li trovis la senfine longajn ludejojn malplenaj! — almenaŭ la tiamaĵ infanoj pasigis la nokton per dormo. Dum ili transiris la ĉambrojn, la malgranda oficisto priskribis la specon de la ludiloj, kiuj estis evoluajoj el tiuj inventitaj de la inspirita sentimentalisto Froebel. Troviĝis ĉi tie kelkaj vartistinoj, sed multo estis farita de maŝinoj, kiuj kantis kaj dancis kaj lulis.

Graham ankoraŭ ne klare komprenis multajn detalojn. “Sed tiom da orfoj!” li diris perpleksite, revenante al sia unua eraro, kaj sciigis denove, ke ili ne estas orfoj.

Forlasinte la infanejon, li tuj komencis esprimi la abomenon, kiun la infanetoj en siaj kovriloj sentigis al li. “Ĉu la patrina amo malaperis?” li diris. “Ĉu ĝi estis nur hipokritaĵo? Ĉu ĝi ne estas instinkto? Tio ŝajnas tiel nenatura—preskaŭ abomena.”

“Ĉi tie ni trovos la dancejon,” diris Asano por respondo. “Sendube ĝi estos plena. Malgraŭ la politika renversiĝo ĝi estos plena. La virinoj ne multe interesiĝas pri la politiko—krom nur malmultaj. Vi vidis la patrinojn—la plejparto de la junulinoj de Londono estas patrinoj. En tiu klaso oni opinias meritinde naski unu infanon—tio pruvas vigelecon. Malmultaj el la meza klaso posedas pli ol unu infanon. Sed sub la Laborista Departemento la afero estas tute diferenca. Kaj rilate patrinan amon!

Ili ankoraŭ treege fieras pri siaj infanoj. Ili ofte venas ĉi tien por rigardi ilin.”

“Ĉu do tio signifas, ke la loĝantaro de la mondo——?”

“Malpliĝas? Jes. Krom inter la homoj sub la Laborista Departemento. Spite de la scienca disciplino ili estas senzorgaj——”

La aero subite dancis per muziko, kaj laŭ koridoro, al kiu ili oblikve alproksimiĝis, kaj kiu ŝajnis enhavi vicon da grandiozaj kolonoj el diafana ametisto, fluis amaso da gajuloj kaj tumulto el krioj kaj ridoj. Li vidis bukklajn kapojn, girlanditajn brovojn, kaj feliĉan, komplikan nebulon el rozkoloro pasi triumfe trans la bildon.

“Vi rimarkos,” diris Asano ridete. “La mondo tute ŝanĝiĝis. Post momento vi vidos la patrinojn de la nova epoko. Venu ĉi tien. Tre baldaŭ vi denove vidos ĉi tiujn.”

Ili supreniris iom da distanco per rapida lifto, kaj transpasis al malpli rapida. Dum ili iris, la muziko ŝajne kreskis, ĝis ĝi aŭdiĝis proksima kaj profunda kaj grandioza, kaj ili povis distingi la takton de sennombraj dancantaj piedoj, kiuj moviĝis laŭ ĝia glora teksaĵo el sonoj. Ili pagis ĉe turnbarilo, kaj eliris al la plena raveco de sono kaj vidaĵo sur la larĝan galerion, de kiu oni superrigardis la dancejon.

“Tie,” diris Asano, “troviĝas la gepatroj de la infanetoj, kiujn vi vidis.”

La halo ne estis tiel riĉe ornamita, kiel tiu kun la Atlas, sed, esceptinte tion, ĝi estis la plej belega iam vidita de Graham. La belaj blank-membraĵaj statuoj, kiuj subtenis la galeriojn, memorigis lin ankoraŭ unu fojon pri la reflorado de la skulptarto; ili ŝajnis sin tordeti en plaĉaj pozoj, iliaj vizaĝoj ridis. La fonto de la muziko kiu plenigis la halon estis kaŝita, kaj la tuta vasta, brilanta planko estis dense kovrita de dancantaj paroj. “Rigardu ilin,” diris la malgranda oficisto, “vidu, kiel malmulte ili sin ĝenas pri patrino amo.”

La galerio, sur kiu ili staris, troviĝis sur la supra rando de grandega ekrano, kiu apartigis la dancejon je unu flanko de speco de ekstera halo, kiu malkaŝis tra larĝaj arkaĵoj la senĉesan antaŭeniron de la urbaj vojoj. En tiu ekstera loko estis granda amaso da homoj malpli

brile vestitaj, preskaŭ samnombraj kiel tiuj, kiuj dancis interne; ili portis grandaparte la bluan uniformon, kiu nun estis tiel familiara al Graham. Kvankam tro malriĉaj por trapasi la pagbarilojn al la festo, ili tamen ne povis forteni sin de ĝia alloga sono. Kelkaj eĉ malplenigis spacojn, kaj ankaŭ dancis, flirtigante la ĉifonaĵojn en la aero. Iuj kriis dancante, kun ŝercoj kaj kuriozaj aludoj nekomprenblaj al Graham. Unu fojon iu komencis fajfi la melodion de la revolucia kanto, sed ŝajnis, ke tiun komencon oni tuj malpermesis. La angulo ne estis luma, kaj Graham ne povis vidi. Li turniĝis denove al la dancejo. Super la kariatidoj staris marmoraj bustoj de homoj, kiujn tiu epoko nomis eminentaj moralaj pioniroj; sed la plejparto estis nekonata al Graham, kvankam li rimarkis, ke troviĝas Grant Allen, Le Gallienne, Nietzsche, Shelley, kaj Goodwin. Nigraj festonegoj kaj elokventaj citaĵoj subtenis la grandegon surskribon, kiu parte kaŝis la superan finon de la dancejo, kaj anoncis, ke la "Festo de la Vekiĝo" nun okazas.

"Pro tio, miriadoj libertempas aŭ restas for de la laboro, tute ekster tiuj laboristoj, kiuj rifuzas reiri al la laboro," diris Asano. "Tiuj homoj estas ĉiam pretaj libertempi."

Graham paŝis al la parapeto, kaj kliniĝis super ĝi, rigardante la dancantojn. Krom du aŭ tri proksimaj flustrantaj paroj, kiuj kaŝe apartigis sin de la amaso, li kaj lia sekvanto staris solaj sur la galerio. Varma spiro de parfumo kaj viveco supreniris al li. Kaj viroj kaj virinoj sube estis malpeze vestitaj, kun nudaj brakoj kaj koloj, kiel la konstanta varmeco de la urbo ebligis. La haroj de la viroj ofte aspektis kiel amaso da virinecaj bukloj, iliaj mentonoj ĉiam estis razitaj, kaj multaj el ili havis ruĝiĝintajn aŭ kolorigitajn vangojn. Multaj el la virinoj estis tre belaj, kaj ĉiuj estis vestitaj kun pene konsiderita koketeco. Dum ili preterdancis sube, li vidis ekstazajn vizaĝojn kun okuloj duone fermitaj pro plezuro.

"Kiu grado de homoj tiuj estas?" li demandis abrupte.

"Laboristoj—prosperaj laboristoj. Tiuj, kiujn vi antaŭe nomus la meza klaso. La sendependaj vendistoj kun apartaj butiketoj jam de longe malaperis, sed ni havas estrojn de aferoj, servistojn en provizejoj por necesajoj, inĝenierojn de cent specoj. Hodiaŭ okazas libertempo,

kaj ĉiu dancejo tra la urbo estos premlena, kaj ankaŭ ĉiu preĝejo.”

“Sed—la virinoj?”

“Tute same. Ni havas cent specojn de laboro por virinoj. Sed vi vidis la komenciĝon de la sendependa laboristino dum viaj tagoj. Nun la plejparto da virinoj estas sendependa. La plejparto el tiuj estas pli aŭ malpli edziniĝinta—ni havas kelkajn metodojn de kontrakto—kaj la laboro donas al ili pli da mono, kaj ebligas, ke ili sin amuzu.”

“Mi komprenas,” diris Graham, rigardante la ruĝiĝintajn vizaĝojn, la ekbrilon kaj kirligon de la movoj, kaj ankoraŭ li memoris tiun inkubon de rozaj, senpovaj membroj. “Kaj tiuj estas—patrinoj?”

“La plimulto el ili.”

“Ju pli mi vidas de tiuj aferoj, des pli komplikaj mi trovas viajn problemojn. Ekzemple, tio estas surprizo. Tiu novaĵo pri Parizo ankaŭ estis surprizo.”

Post ne longe li denove parolis.

“Tiuj estas patrinoj. Mi supozas, ke poste mi atingos la modernan manieron konsideri tiajn aferojn. Mi havas malnovajn kutimojn de penso—kutimojn bazitajn, mi supozas, sur bezonoj, kiuj jam de longe ĉesis ekzisti. Kompreneble, dum mia tempo decis, ke virino ne nur nasku infanojn, sed ankaŭ prizorgu ilin, sin dediĉu al ili, eduku ilin—ĉiujn esencajn partojn de la morala kaj mensa edukado la infano ricevis de sia patrino. Se ne, ĝi tute ne ricevis ilin. Tre multaj, mi konfesas, ne ricevis ilin. Nuntempe, evidente, ili ne pli bezonas tian zorgon, ol se ili estus papilioj. Mi komprenas tion! Sed antaŭe ni havis idealon—tiu bildo de serioza, pacienca virino, silente kaj trankvile mastrino de la hejmo, la patrino kaj la kreanto de homoj—ami ŝin estis speco de adoro—”

Li haltis kaj ripetis, “Speco de adoro.”

“La idealoj ŝanĝiĝas,” diris la malgranda oficisto, “kiam la bezonoj ŝanĝiĝas.”

Graham vekigis el momenta revo, kaj Asano ripetis siajn vortojn. La atento de Graham reiris al la afero diskutata.

“Kompreneble, mi konfesas la perfektan raciecon de ĉi tio. Trankvileco, sobreco, la matura penso, la neegoisma

ago, ili necesas por la barbara vivo, la vivo inter danĝero. La malgajeco estas la tributo de la homo al nevenkita naturo. Sed la homo jam venkis la naturon—liaj politikaj aferoj estas aranĝitaj de Ĉefoj posedantaj negran policon—kaj la vivo estas ĝoja.”

Li rerigardis la dancantojn. “Ĝoja,” li diris.

“Okazas momentoj de laceco,” diris penseme la oficisto.

“Ili ĉiuj aspektas junaj. Inter ili mi evidente aspektus la plej maljuna. Tamen dum mia propra tempo oni kredus min nur mezaĝa.”

“Ili ja estas junaj. Troviĝas malmultaj maljunuloj el tiu klaso en la laborurboj.”

“Kaj la kialo?”

“La vivo de maljunulo ne estas tiel plaĉa kiel antaŭe, se oni ne estas sufiĉe riĉa aĉeti amantojn kaj helpantojn. Kaj ni posedas institucion nomitan ‘Eŭtanasio.’”

“Ha, tiu Eŭtanasio!” diris Graham. “La plaĉa morto?”

“La plaĉa morto. Ĝi estas la lasta plezuro. La Eŭtanasia Kompanio tre bone aranĝas ĉion. Oni pagas la monsumon—ĝi estas kosta afero—longe antaŭe, foriras al plezururbo, kaj revenas malriĉa kaj laca, tre laca.”

“Jam restas multo nekomprenebla al mi,” diris Graham post paŭzo. “Tamen mi komprenas la logikecon de ĉio. Nia aro da furiozaj virtoj kaj maldolĉaj sindetenoj estis sekvo de necerteco kaj danĝero. La Stoikulo, la Puritanulo, eĉ dum mia tempo, estis malaperantaj tipoj. En tiuj malnovaj tagoj la homo sin armis kontraŭ Doloro, sed nun li estas avida nur por Plezuro. Jen troviĝas la diferenco. La civilizacio forpelis doloron kaj danĝeron tiel malproksimen—por la mezriĉuloj. Kaj nur ili gravas nun. Mi dormis ducent jarojn.”

Dum minuto ili sin apogis sur la parapeto, sekvante per okuloj la komplikan evoluon de la danco. Vere, la sceno estis tre bela.

“Antaŭ Dio!” kriis Graham, subite, “Mi plivolus esti vundita sentinelo frostanta en la neĝo, ol unu el tiuj kolorigitaj malsaĝuloj!”

“En la neĝo,” diris Asano, “oni eble pensus diference.”

“Mi estas barbaro,” diris Graham, ne atentante lin. “Jen la malfacilaĵo. Mi estas praa—ŝtonepoka. *Ilia*

fonto de kolero kaj timo kaj furiozo estas fermita kaj sigelita, la kutimoj de ilia tuta vivo igas ilin bonhumoraj kaj facilaj kaj plaĉaj. Vi devas toleri miajn malŝatojn kaj ŝokojn de la dek-naŭa jarcento. Tiuj, vi diras, estas spertaj laboristaj, k.t.p. Kaj dum ili dancas, aliaj homoj batalas—homoj mortas en Parizo por defendi la mondon—por ke tiuj dancu.”

Asano necerte ridetis. “Sed efektive, homoj ankaŭ mortas en Londono,” li diris.

Okazis momenta silento.

“Kie tiuj dormas?” demandis Graham.

“Sube, kaj supre—la loko estas komplika kuniklejo.”

“Kaj kie ili laboras? Tio estas la familia vivo.”

“Vi vidos nemulte da laboro hodiaŭ nokte. La duono el la laboristoj estas armitaj aŭ forlasis la laboron. La duono el ĉi tiuj libertempas. Sed ni vizitos la fabrikejojn, se vi tion volas.”

Dum iom da tempo Graham rigardis la dancantojn, tiam subite sin forturnis. “Mi volas vidi la laborantojn. Mi jam vidis sufiĉe da tiuj,” li diris.

Asano kondukis lin laŭ la galerio trans la dancejon. Baldaŭ ili vidis transan koridoron, kiu blovigis spiron el aero pli pura, pli malvarma.

Asano ekrigardis tiun koridoron dum ili preterpasis ĝin, haltis, reiris al ĝi, kaj turniĝis al Graham kun rideto. “Jen io, Majstro,” li diris, “kio estos familiara al vi—almenaŭ—tamen—. Sed mi ne diros al vi. Venu!”

Li kondukis lin laŭ enfermita koridoro, kiu poste malvarmiĝis. La resonado de iliaj piedpaŝoj montris, ke la loko estas ponto. Ili eniris rondan galerion kun vitraĵoj kontraŭ la ekstera vetero, kaj tiamaniere atingis rondan ĉambron kiu ŝajnis familiara, kvankam Graham ne povis klare memori, kiam li antaŭe eniris ĝin. En tiu ĉambro staris ŝtupetaro—la unua, kiun Graham vidis post sia vekigo—kaj ili supreniris ĝin kaj atingis altan, malluman, malvarman lokon, en kiu denova ŝtupetaro staris preskaŭ vertikale. Ankaŭ tion ili supreniris, Graham ankoraŭ perpleksita.

Sed je la supro li komprenis, kaj rekonis la metalajn stangojn, al kiuj li sin tenas. Li staris en la kaĝo sub la globo de la katedralo de S-ta. Paŭlo. La kupolo leviĝis

→ *novajo* ?

nur iomete super la ĝenerala konturo de la urbego, en la trankvilan krepuskon, kaj forkurbiĝis, brilante grase sub nemultaj malproksimaj lumoj, en ĉirkaŭa puto el mallumo.

Li elrigardis tra la stangojn al la klara nordokcidenta ĉielo, kaj vidis neŝanĝitaj la brilajn stelarojn. Capella pendis okcidente, Vega ĵus leviĝis, kaj la sep lumaj punktoj de la Granda Urso svingiĝis supre en sia majesta rondo ĉirkaŭ la Polusa Stelo.

Li vidis tiujn stelojn sur klara spaco de ĉielo. Oriente kaj sude la grandaj, rondaj konturoj de plendantaj ventmaŝinoj kovris la ĉielon, tiel ke la brilego ĉirkaŭ la Konsilejo estis kaŝita. Sudoriente pendis Oriono, sin montrante kvazaŭ pala fantomo tra lataĵo el fero kaj interplektitaj formoj super konfuza aro da lumoj. Muĝado kaj la krio de sireno, kiuj venis de la flugstacioj, anoncis al la mondo, ke unu el la aeroplanoj estas preta foriri. Li restis kelkan tempon rigardante la brilegan stacion. Tiam lia rigardo revenis al la nordaj stelaroj.

Longe li silentis. "Tio," li diris fine, ridetante en la ombro, "ŝajnas la plej stranga el ĉio. Stari sub la kupolo de S-ta. Paulo kaj vidi pluan fojon tiujn familiarajn, silentajn stelojn!"

De tie Graham kondukiĝis de Asano laŭ multaj vojoj al la granda spekula kaj negoca kvartalo, kie la plejparto de la riĉaĵo de la urbo estis perdata kaj gajnata. Tiu impresis lin, kiel preskaŭ senfina serio da tre altaj haloj, ĉirkaŭitaj de etaĝo sur etaĝo de galerioj, al kiuj malfermiĝis miloj da kontoroj, kaj transpasita de komplika amaso da pontoj, trotuaroj, aeraj reloj kaj kablaj pendvojoj. Kaj tie, pli ol ĉie ajn, alte leviĝis la tono de furioza vigleco, de nekontrollebla, hasta agemeco. Ĉie troviĝis fortega reklamado, ĝis lia cerbo turniĝis pro la tumulto de lumo kaj koloro. Kaj Babilmaŝinoj kun aparte raŭkaj tonoj abundis, kaj plenigis la aeron per penaj ŝirkrioj kaj idiota slango. "Grasu la okulojn kaj glitu!" "Gehup', Bonanza," "Goliproj venu kaj vidu!"

La loko ŝajnis esti dense plena de homoj, aŭ profunde ekscititaj, aŭ ŝvelantaj pro kaŝita ruzeco; tamen li sciigis, ke la halo estis kompare malplena, ke la grandaj politikaj konvulsioj de la lastaj tagoj malpliigis la negocadon ĝis senprecedente malalta nivelo. En unu vastega loko staris

longaj vicoj da tabloj por ruleto, ĉiu el kiuj havis eksцитitan sendignan amason ĉirkaŭe; en alia krinta Babelo el blankvizaĝaj virinoj kaj ledopulmaj ruĝnukaj viroj aĉetis kaj vendis la akciojn de absolute fiktiva negoca entreprenaĵo, kiu ĉiukvinminute pagis dividendon de dek pro cento, kaj nuligis parton da siaj akcioj per loteria rado.

Tiujn negocajn aferojn oni daŭrigis per energio, kiu facile transiris en furiozon, kaj Graham, alproksimiĝante al densa amaso, trovis ĉe ĝia mezo duon da eminentaj komercistoj, fortege argumentantaj per dentoj kaj ungoj pri iu delikata punkto de komerca etiketo. Do io ankoraŭ restis en la vivo, pro kio oni povis batali! Poste li spertis ŝokon pri kriega anonco en literoj el helruĝaj flamoj, ĉiu double tiel alta, kiel homo:

NI SEKURAS LA POS'DANT'. NI SEKURAS LA POS'DANT'.

"Kiu estas la Pos'dant'?"

"La Posedanto—vi."

"Sed kio estas 'sekuri.' Ĉu ili sendanĝerigas min? Kaj kiel?"

"Ĉu vi ne havis sekuradon?"

Graham meditis. "Ĉu asekurado?"

"Jes—asekurado. Mi memoras, ke tio estis la pli malnova vorto. Ili asekuras vian vivon. Dozandoj da homoj havigas al si polisojn, miriadojn da leonoj oni riskas pro vi. Kaj pli malproksime oni vendas vivrentojn pro via vivo. Ili faras tion pro ĉiu, kiu estas iel eminenta. Rigardu tien!"

Homamaso muĝis kaj ŝoviĝis, kaj Graham vidis vastan nigran ekranon subite lumigita de ankoraŭ pli grandaj literoj el brulanta purpuro:

VIVRENTOJ PRŬL' POS'DANT'—x 5 PR. G.

La amaso komencis krii pri tio, aro da spiregaj sovaĝokulaj viroj preterkuris, ekprenante la aeron per hoksimilaj fingroj. Okazis furioza premiĝo ĉirkaŭ pordeto.

Asano kalkulis rapide kaj neĝuste. "Dek-sep pro cento por jaro estas ilia propono pri vi. Ili ne volus pagi tiom, se ili povus vidi vin nun, Majstro. Sed ili ne scias. Viaj vivrentoj antaŭe estis tre senriskaj spekulajoj, sed nun vi estas tre riskema afero, kompreneble. Tio kredeble

estas malespera propono. Mi dubas, ĉu la homoj ricevos sian monon.”

La amaso de vivrent-postulantoj tiel densiĝis ĉirkaŭ ili, ke dum longe ili ne povis moviĝi antaŭen aŭ malantaŭen. Graham rimarkis—laŭ lia penso—grandan proporcion da virinoj inter la spekulantoj, kaj denove memoris la nunan ekonomian sendependecon de ilia sekso. Ili ŝajnis rimarkinde kapablaj prizorgi sin en la amaso, kaj uzis tre lerte la kubutojn, kiel li dolore sciigis. Iu buklehara virino kaptita nelonge en la premo rigardis lin fikse kelkfoje, preskaŭ kvazaŭ ŝi lin konas, kaj poste, ŝtelvenante definitive al li, tuŝis lian manon per sia brako laŭ apenaŭ akcidenta maniero, kaj evidentigis per rigardo tiel antikva kiel Kaldeo, ke ŝi trovas lin plaĉa. Kaj tiam malgrasa grizbarbulo, ŝvitante treege pro nobla pasio de sinhelpemo, blinda al ĉia teraĵo krom tiu brilega allogilo, sin ŝovis inter ilin per kataklisma kurego al tiu sorĉa “x 5 pr. G.”

“Mi volas foriri de ĉi tie,” diris Graham al Asano. “Nenion mi venis por vidi. Montru al mi la laborantojn. Mi volas vidi la bluestitajn homojn. Tiuj parazitaj frenezuloj—”

Li sin trovis fiksita en baraktanta amaso da homoj.

ĈAPITRO DUDEK-UNUA.

LA SUBA PARTO.

El la Komerca Kvartalo ili poste pasis per la moviĝantaj vojoj al malproksima parto de la urbo, kie okazis la plejparto de la fabrikado. Survoje la trotuaroj dufoje iris trans la Thames, kaj pasis per larĝa viadukto trans unu el la grandaj vojoj, kiuj eniris la urbegon de la nordo. Ambaŭfoje lia impresio estis rapida kaj ankaŭ tre frapa. La rivero estis larĝa sulkiĝinta brileto de nigra marakvo, superarkita de konstruaĵoj, kaj malaperinta ambaŭflanken en nigrecon punktitan de forpasantaj lumoj. Vico da nigraj kanalboatoj iris maren, direktitaj de bluestitoj. La granda vojo estis longa tunelo, tre larĝa kaj alta, sur kiu grandradaj maŝinoj iris senbrue kaj rapide. Tie, ankaŭ, la distinga bluo de la Laborista Departemento evidentiĝis. La glateco de la duobla vojo, la grandeco kaj malpezeco de la grandaj pneŭmataj radoj, kompare kun la korpo de la veturilo, frapis Grahamon tre forte. Unu mallarĝa kaj tre alta ŝarĝveturilo, kun rektaj metalaj stangoj portantaj la gutantajn kadavrojn de multaj centoj da ŝafoj, kaptis lian atenton antaŭ ĉio. Abrupte la rando de la arkaĵo tranĉis kaj kaŝis la bildon.

Baldaŭ ili forlasis la Vojon kaj malsupreniris per lifto kaj iris laŭ koridoro kondukante malsupren, kaj tiel denove venis al malsuprenira lifto. La aspekto de la loko ŝanĝiĝis. Malaperis eĉ la ŝajnigo pri arkitektura ornamaĵo, la lumoj malpliĝis laŭ numero kaj grando, la strukturoj fariĝis pli kaj pli ampleksaj proporcie al la interspacoj, dum ili alproksimiĝis al la fabrika kvartalo. Kaj en la polvokovrita fabrikejo de la potfaristoj, inter la muelejoj por feldspato, en la fornegejoj de la metalistoj, inter inkandeskaj lagoj el kruda Edhamito, la blua kanvaso troviĝis portata de viro, virino kaj infano.

Multaj el tiuj gigantaj kaj polvaj galerioj estis nur silentaj vicoj da maŝinoj, senfinaj estingitaj cindraĵoj fornegoj atestis la renversigon de aferoj pro la revolucio, sed, kie ajn oni laboris, la laboro estis farata de malrapidmovaj laboristoj blue vestitaj. La solaj homoj ne portantaj la kanvason estis la estroj de la laborejoj kaj la orange vestitaj laborpolicanoj. Kaj nur ĵus veninta de la ruĝigintaj vizaĝoj en la danchaloj, la volonta vigleco de la negoca kvartalo, Graham povis rimarki kontraste la maldikajn vizaĝojn, la malfortajn muskolojn, la lacajn okulojn de multaj el tiuj laboristoj. Tiuj, kiujn li vidis labori, aspektis notinde malsuperaj, rilate la korpon, al la gaje vestitaj geestroj, kiuj direktis ilian laboron. La dikkorpaj laboristoj de la malnova viktoria tempo jam sekvis la tirĉevalon kaj ĉiujn tiajn vivantajn fortproduktantojn, al estingigo; iliajn kostajn muskolojn oni anstataŭigis per lerta maŝino. La nuna laboristo, vira kaj virina, estis nur maŝingardisto, servisto kaj helpanto, aŭ artisto sub iĉes ordonoj.

La virinoj, kompare kun tiuj memorataj de Graham, aspektis evidente nebelaj kaj platbrustaj. Du jarcentoj da emancipiĝo el la morala regado de Puritana religio, du jarcentoj da urbega vivo, jam efike forigis la trajtojn de virina beleco kaj vigleco de inter la bluvestitaj miriadoj. Esti brila korpe aŭ mense, esti iamaniere alloga aŭ neordinara, antaŭe estis kaj ankoraŭ restis certa vojo al liberiĝo for de laboro, de foriro al la Plezururbo kun ĝiaj grandiozaj amuzaĵoj, kaj fine al la Eŭtanasio kaj la paco. Oni apenaŭ povis atendi, ke tiel avare nutritaj animoj restu firmaj kontraŭ tiaj allogaĵoj. En la junaj urboj de la antaŭa vivo de Graham, la nove kolektiginta amaso da laboristoj estis diversa svarmo, ankoraŭ regata de la tradicio de propra honoro kaj alta moralo; nun ĝi tute ŝanĝiĝis al aparta klaso, kun propra morala kaj korpa diferenco—eĉ kun propra dialekto.

Ili penetris suben, ĉiam suben, al la laborejoj. Poste ili pasis sub strato kun moviĝantaj vojoj, kaj vidis ĝiajn trotuarojn iri sur siaj reloj alte supre, kun strioj de blanka lumo inter la transaj latoj. La fabrikejoj en kiuj oni ne laboris estis apenaŭ lumaj; kun siaj vualitaj vicoj da gigantaj maŝinoj ili ŝajnis al Graham mergitaj en mallumo, kaj eĉ tie, kie oni laboris, la lumo multe malpli brilis, ol sur la publikaj vojoj.

boatojn, kovritajn de faruneca polvo, oni malŝarĝis de ilia pezo da pulvorigita feldspato; ili ĉirkaŭiĝis de amaso da tusantaj viroj. Ĉiu ŝovis etan portilon, kaj la polvo plenigis la lokon per sufokanta nebulo, kiu flavigis la brilon de la elektraĵoj lumoj. La malklaraj ombroj de tiuj laboristoj gestis ĉirkaŭ iliaj piedoj, kaj rapidis tien kaj reen sur longa etendaĵo el blankigita muro. Foje unu haltis por tusi.

Ombra masego da masonaĵo leviĝanta el la ink-kolora akvo pensigis Grahamon pri la multaj vojoj kaj galerioj kaj liftoj kiuj leviĝis supre inter li kaj la ĉielo. La viroj silente laboris sub kontrolo de du laborpolicanoj; iliaj piedoj faris kavan tondron sur la tabuloj, sur kiuj ili iris kaj revenis. Kaj dum li rigardis tiun scenon, iu voĉo kaŝita en la mallumo komencis kanti.

“Ĉesigu tion!” kriis unu policano, sed la ordonon oni malobeis, kaj komence unu kaj poste ĉiuj blankigitaj viroj, kiuj tie laboris, prenis la batantan melodion, kantante ĝin defie—la Kanton de la Ribelo. La piedoj sur la tabuloj tondris nun laŭ la ritmo de la kanto, paŝ’, paŝ’, paŝ’! La policano, kiu antaŭe kriis, ekrigardis sian kunulon, kaj Graham vidis lin levi la ŝultrojn. Li ne plu penis haltigi la kanton.

Kaj tiamaniere ili iris tra tiuj fabrikejoj kaj laborejoj, vidante multajn dolorigajn kaj malĝojigajn okazaĵojn. Tiu promeno lasis en la spirito de Graham labirinton el memoraĵoj, variantaj bildoj de vualitaj haloj, kaj homplenaj kelegoj vidataj tra polvnubo; de malsimplaj maŝinoj, fadenoj rapidantaj tra teksiloj, la peza bato de stampilegoj, kaj la muĝo kaj klako de rimenoj kaj dinamoj; de malbone lumigitaj subteraj vicoj da dormejoj; de senlimaj perspektivoj el lumpunktoj. Jen flariĝis laodoro de tanado, jen laodoro de bierfarado, kaj jen senprecedentaj odoraĉoj. Ĉie staris kolonoj kaj transaj arkaĵoj kun tia grandeco, kian Graham neniam antaŭe vidis, dikaj Titanoj el grasaj, brilaj brikoj premegataj sub la giganta pezo de tiu komplika urbega mondo, tute same kiel tiuj sensangaj milionoj estis premegataj sub ĝia komplikeco. Kaj ĉie vidiĝis palaj vizaĝoj, maldikaj membroj, difektoj kaj mizero.

Duan fojon, kaj denove trian, Graham aŭdis la ribelan kanton dum sia longa, malplaĉa vago tra tiuj lokoj, kaj unu fojon li vidis konfuzan barakton en koridoreto, kaj

sciĝis, ke kelkaj el tiuj sklavoj ekprenis sian panon, antaŭ ol fini la laboron. Graham jam resupreniris al la Vojoj, kiam li vidis aron da blue vestitaj infanoj kurantaj en transa koridoro, kaj baldaŭ trovis la kialon de ilia paniko, ĉar aro da laborpolicanoj, armitaj per bastonoj, kuretas al iu nekonata maltrankvilaĵo. Kaj tiam aŭdiĝis malproksima barakto. Sed plejparte tiu cetero, kiu ankoraŭ laboris, laboris senespere. Kiom ajn da kuraĝo restis ĉe la falintaj homoj, troviĝis tiun nokton supre sur la stratoj, vokis la Mastron, kaj brave kaj brue gardis siajn armilojn.

Ili eliris el sia ^{zedo}vago, kaj denove staris konfuzite sub la brila lumo de la meza strato el Vojoj. Ili konsciis pri la malproksimaj ululoj kaj blekoj de la maŝinoj de iu Generala Informa Kompanio, kiam subite homoj venis kurantaj, kaj sur la trotuaroj kaj ĉie ĉirkaŭ la Vojoj aŭdiĝis kriado kaj bruado. Tiam preterpasis virino kun vizaĝo de muta pala teruro, kaj alia, kiu spiregis kaj kriis kurante.

“Kio okazas nun?” diris Graham, perpleksite, ĉar li ne povis kompreni ilian fuŝparolon. Tiam li aŭdis la aferon angle diritan, kaj konsciĝis, ke tio, kion ĉiu krias, kion viroj kriegas unu al alia, kion virinoj ŝirkrie subtenas, kio pasas, kvazaŭ la unua venteto de fulmotondro, malvarme kaj subite tra la urbego, estas la jeno: “Ostrog venigas la Negran Policon al Londono. La Negra Polico venas el Sudafriko. . . . La Negra Polico. La Negra Polico.”

La vizaĝo de Asano aspektis pala kaj konsternita; li hezitis, rigardante la vizaĝon de Graham, kaj diris al li tion, kion li jam sciis. “Sed kiamaniere ili povis sciigi tion?” demandis Asano.

Graham aŭdis iun krii: “Ĉesigu ĉiun laboron. Ĉesigu ĉiun laboron,” kaj bruna ĝibulo, absurde gaje vestita per verdo kaj oro, saltis al li malsupren de la trotuaroj, kriante refoje per bona anglaĵo, “Jen la ago de Ostrog, Ostrog la Fripono! Ili perfidas la Mastron.” Lia voĉo estis raŭka, kaj maldensa ŝaŭmo gutis de lia malbela krianta buŝo. Li kriegis pri nepriskribebbla abomenaĵo, kiun la Negra Polico faris en Parizo, kaj tiel forpasis kriante, “Ostrog la Fripono!”

Momente Graham staris senmova, ĉar denove li ŝajnis senti, ke ĉi tio estas ŝonĝo. Li rigardis ambaŭflanke la

grandajn klifojn el konstruaĵoj, kiuj fine malaperis en bluan nebuleton super la lumoj, kaj tiam malsupren al la muĝantaj ŝtupegoj el trotuaroj, kaj la kriantaj, kurantaj homoj, kiuj gestante preterpasis. "Oni perfidas la Mastron!" ili kriis. "Oni perfidas la Mastron!"

Subite la situacio formiĝis en lia spirito reala kaj urĝa. Lia koro komencis bati forte kaj rapide.

"Ĝi venas," li diris. "Mi devus antaŭscii ĝin. La horo venas."

Li pripensis rapide. "Kion mi faru?"

"Reiru al la Konsilejo," diris Asano.

"Kial mi ne proklamu—? La popolo troviĝas ĉi tie."

"Vi nur perdos la tempon. Ili dubos, ĉu tio estas vi. Sed ili amasiĝos ĉirkaŭ la Konsilejo. Tie vi trovos iliajn ĉefojn. Via pleja forto kuŝas tie—inter ili."

"Supozu, ke tio estas nur onidiro?"

"Ĝi ŝajnas vera," diris Asano.

"Ni havigu al ni la faktojn," diris Graham.

Asano levis la ŝultrojn. "Pli bone, ke ni iru al la Konsilejo," li kriis. "Tien ili svarmos. Eĉ nun povas esti neeble transpasi la ruinojn."

Graham rigardis lin dubeme, kaj sekvis lin.

Ili supreniris la trotuarajn ŝtupojn ĝis la plej rapida, kaj tie Asano alparolis laboriston. La respondoj al liaj demandoj venis en la fuŝa vulgara dialekto.

"Kion li diris," demandis Graham.

"Li scias malmulton, sed li diris, ke la Negra Polico jam alvenus, antaŭ ol la popolo sciiĝos, se iu el la Ventmaŝina Oficejo ne sciiĝus. Li diris, ke iu knabino."

"Knabino? Ĉu—?"

"Li diris, ke knabino—sed ne scias, kiu ŝi estis. Ŝi venis el la Konsilejo, kriante la aferon laŭte, kaj diris ĝin al la homoj laborantaj inter la ruinoj."

Kaj tiam alia diraĵo kriegiĝis, ordono, kiu ŝanĝis sencelan tumulton al deciditaj movoj; ĝi iris kvazaŭ vento laŭ la strato. "Al viaj Kvartaloj, al viaj Kvartaloj. Ĉiu havigu al si armilojn. Ĉiu al sia Kvartalo!"

ĈAPITRO DUDEK-DUA.

LA BARAKTO EN LA KONSILEJO.

RAPIDANTE al la ruinoj ĉirkaŭ la Konsilejo, Graham kaj Asano rimarkis ĉie la leviĝantan ekscitiĝon de la popolo. "Al viaj Kvartaloj! Al viaj Kvartaloj!" Ĉie viroj kaj virinoj bluestitaj rapidis for de nekonataj subteraj okupoj, laŭ la trotuaroj de la Meza Vojo; jen Graham vidis armilejon de la revolucia komitato ĉirkaŭitan de svarmo da kriantaj homoj; jen duo da viroj portantaj la malamatan flavan uniformon de la Laborpolico, kaj persekutataj de kreskanta amaso, forkuris freneze sur la plej rapida kontraŭe iranta vojo.

La krioj: "Ĉiu al sia kvartalo!" fariĝis fine senĉesa bruo, kiam ili alproksimiĝis al la Konsileja Kvartalo. Multaj el la krioj estis nekomprenblaj. "Ostrog perfidas nin," iu homo kriaĉis refoje per raŭka voĉo, jetante tiun ĥoraĵon en la orelon de Graham, ĝis ĝi hantis lin. Tiu homo restis apud Graham kaj Asano sur la plej rapida vojo, kaj kriis al la homoj svarmantaj sur la pli malaltaj trotuaroj, dum li preterrapidis ilin. Sian krimon pri Ostrog li alternigis kun nekomprenblaj ordonoj. Post nelonge li saltis mal-supren de vojo al vojo kaj malaperis.

La cerbo de Graham sentiĝis plena de la bruo. Liaj planoj estis senformaj kaj nebulaj. Li posedis unu ideon pri alta loko, de kie li povos alparoli la amason, kaj alian pri renkonto vizaĝo-al-vizaĝe kun Ostrog. Li sin sentis plena de kolero, de treega muskola ekscitiĝo, liaj manoj preme fermiĝis, liaj lipoj kunpremiĝis.

La vojo trans la ruinojn al la Konsilejo estis ne plu transirebla, sed Asano solvis tiun problemon kondukante Grahamon al la ĉefa poŝtoficejo. Laŭdire tiu poŝtoficejo ankoraŭ funkciis, sed la bluestitaj portistoj aŭ moviĝis kvazaŭ testudoj, aŭ tute haltis, por rigardi tra la arkaĵoj de siaj galerioj la kriantan homfluan, kiu preterpasis ekstere. "Ĉiu al sia Kvartalo! Ĉiu al sia Kvartalo!" Tie, laŭ la konsilo de Asano, Graham malkaŝis sian identon

Ili transiris al la Konsilejo per kabla fervojeto. Jam, dum la mallonga tempo post la kapitulaco de la Konsilantoj, oni faris grandan ŝanĝon al la aspekto de la ruinoj. La ŝprucantaj kaskadoj el la rompita marakvaj tubegoj jam kaptiĝis kaj dresiĝis, kaj grandegaj portempaj tuboj estis subtenitaj supre sur ŝajne malfortika teksaĵo el traboj. La ĉielo retmaniere kovriĝis de la riparitaj kabloj kaj dratoj, kiuj servis la Konsilejon, kaj maso da nova masonaĵo elstaris maldekstre de la blanka konstruaĵo, kun arganoj kaj aliaj konstrumaŝinoj sur ĝi.

La moviĝantaj vojoj, kiuj ruliĝis preter tiu spaco, estis riparitaj, kvankam ili ĝis nun devis iradi sub plena ĉielo. Tiuj estis la vojoj, kiujn Graham vidis de la balkoneto en sia vekiga horo, antaŭ malpli ol naŭ tagoj, kaj la halo, kie li kuŝis en tranco, antaŭe staris kontraŭflanke; tie nun kunkuŝis senformaj amasoj da rompita kaj frakasita masonaĵo.

Jam estis tagmezo, kaj la suno varme brilis. El siaj grandaj kavernoj sub la blua elektra lumo venis la rapidaj vojoj plenaj de kunpremitaj homoj, kiuj fluegis de ili kaj kolektiĝis ĉiam pli dense inter la rompaĵo kaj konfuziĝo de la ruinoj. La aero estis plena de iliaj krioj, kaj ili sin premis kaj svingis al la centra konstruaĵo. Plejparte tiu krianta amaso konsistis el senordaj svarmoj; tamen, kelkloke Graham povis rimarki, ke kruda disciplino komencas evidentiĝi. Kaj ĉiu voĉo postulegis ordon inter la ĥaoso. "Al viaj Kvartaloj! Ĉiu al sia Kvartalo!"

La kabla veturilo portis ilin en halon kiun Graham rekonis, la antaŭĉambron de la Halo de Atlas, sur kies galerio li paŝis antaŭ kelkaj tagoj kun Howard, por sin montri al la poste malaperintaj Konsilantoj, unu horon post sia vekigo. Nun la ĉambro estis preskaŭ malplena; troviĝis nur du servistoj de la kabla vojeto. Tiuj viroj ŝajnis tre miri, rekonante, kiel la Dormanton, la viron kiu desaltis de la kruca sidloko.

"Kie troviĝas Ostrog?" li demandis. "Mi devas vidi Ostrogon senprokraste. Li malobeis min. Mi revenas por forpreni la administradon el liaj manoj." Ne atendante Asanon, li rekte transiris la lokon, supreniris la ŝtupojn ĉe la transa fino, kaj, detirante la kurtenon, sin trovis frontanta la senĉese penegantan Titanon.

La halo estis malplena. Ĝia aspekto multe diferencis de kiam li unue vidis ĝin. Ĝi tre difektigis dum la freneza barakto de la unua ekribelo. Dekstre de la giganta statuo, la supra parto de la muro forŝiriĝis je longo de pli ol kvindek metroj, kaj tavolo to el la sama vitreca materialo, kia antaŭe enfermis Graham je lia vekiĝo, estis streĉita trans la fendaĵon. Ĝi mallaŭtigis, sed ne tute silentigis la muĝon de la popolo ekstere. “Kvartaloj! Kvartaloj!” ili ŝajnis diri. Tra tiu tavolo to vidiĝis la traboj kaj subteniloj de metalaj starejoj, kiuj leviĝis kaj malleviĝis laŭ la bezonoj de granda aro da laboristoj. Senmova konstrumaŝino, kun longaj brakoj el ruĝe kolorigita metalo, sin streĉis trans tiu verdnuanca bildo. Sur ĝi ankoraŭ staris kelkaj laboristoj, rigardantaj la amason sube. Momente li haltis, elrigardante, kaj Asano lin reatingis.

“Ostrog,” diris Asano, “kredeble troviĝas en la malgranda oficejo tie.” La malgrandulo nun aspektis mortpala, kaj liaj okuloj traserĉis la vizaĝon de Graham.

Apenaŭ ili faris dek paŝojn antaŭen, antaŭ ol panelo maldekstre de la statuo ruliĝis supren, kaj Ostrog aperis, akompanata de Lincoln kaj sekvata de du flave kaj nigre vestitaj negroj; li transiris la kontraŭan angulon de la halo ĝis dua panelo, kiu restis levita kaj malfermita. “Ostrog,” vokis Graham, kaj je la sono de lia voĉo la grupeto surprizite turniĝis.

Ostrog diris ion al Lincoln kaj antaŭeniris sola.

Graham estis la unua, kiu parolis. Lia voĉo sonis laŭta kaj ordonema. “Kion mi sciigis?” li demandis. “Ĉu vi venigas negrojn ĉi tien—por subpremi la popolon?”

“Ne tro frue,” diris Ostrog. “Ili pli kaj pli sendiscipliniĝas de post la revolucio. Mi ne sufiĉe taksis—”

“Ĉu tio signifas, ke tiuj diablaj negroj jam ekvojaĝis?”

“Jes. Eĉ nun—ĉu vi ne vidis la popolon—ekstere?”

“Kaj mi ne miras pri ili! Sed—post tio, kion mi diris. Vi faris pli ol vi rajtis, Ostrog.”

Ostrog diris nenion, sed alproksimiĝis.

“Tiuj negroj devas ne alveni al Londono,” diris Graham.

“Mi estas la Mastro, kaj mi ne permesos ĝin.”

Ostrog ekrigardis al Lincoln, kiu tuj alproksimiĝis kun la du servistoj malantaŭ si. “Kial ne?” demandis Ostrog.

“Blankulojn nur blankuloj devas estri. Krome—”

“La negroj nur estas ilo.”

“Tio ne estas la demando. Mi estas la Mastro. Mi intencas esti la Mastro. Kaj mi diras al vi, ke tiuj negroj devas ne alveni.”

“La popolo—”

“Mi fidas la popolon.”

“Nur ĉar vi estas anakronismo. Vi estas viro el la Pasinteco—nur akcidento. Eble vi estas la Posedanto de la mondo. Laŭnome—laŭleĝe. Sed vi ne estas la Mastro. Vi ne sufiĉe scias por fariĝi Mastro.”

Denove li ekrigardis al Lincoln. “Nun mi scias, kion vi opinias—mi povas iom diveni viajn intencojn. Eĉ nun tamen ne estas tro malfrue averti vin. Vi revas pri la egaleco de homoj—pri speco de socialisma reĝimo—vi vidas ĉiujn eluzitajn revojn de la dek-naŭa jarcento freŝaj kaj viglaj en via cerbo, kaj vi volas reĝi ĉi tiun mondon, kiun vi ne komprenas.”

“Aŭskultu!” diris Graham. “Vi povas ĝin aŭdi—sonon, kvazaŭ la maron. Ne voĉojn—sed unu voĉon. Ĉu vi tute komprenas?”

“Ni instruis tion al ili,” diris Ostrog.

“Eble. Ĉu vi povas instrui ilin forgesi ĝin? Sed sufiĉe! La negroj devas ne alveni.”

Paŭzo okazis, kaj Ostrog rigardis lin rekte en la okulojn.

“Ili ja alvenos,” li diris.

“Mi malpermesas ĝin,” diris Graham.

“Ili jam ekvojaĝis.”

“Mi ne toleros ilin.”

“Ĉu ne?” diris Ostrog. “Kvankam mi bedaŭras uzi la metodojn de la Konsilantoj—. Por via propra bono—vi ne darfis fariĝi partiano—de Malordo. Kaj nun, kiam vi troviĝas ĉi tie—. Estis bone, ke vi venis ĉi tien.”

Lincoln metis la manon sur la ŝultron de Graham. Subite Graham komprenis la grandecon de sia eraro, ke li revenis al la Konsilejo. Li turniĝis al la kurtenoj, kiuj apartigis la halon kaj la antaŭĉambron. La avida mano de Asano intervenis. Post plua momento Lincoln ekprenis Graham je la mantelo.

Li turniĝis kaj penis bati la vizaĝon de Lincoln, sed senhezite unu negro kaptis lin je ŝultro kaj brako. Li

fortiregis sin, lia maniko brue ŝiriĝis kaj li ŝanceliĝis posten, tiel ke la alia negro faligis lin. Li frapis peze kontraŭ la teron, kaj sin trovis rigardanta la malproksiman plafonon de la halo.

Li kriegis, ĉirkaŭruliĝis, baraktis furioze, prenis la kruron de servisto por faligi lin kapantaŭe, kaj barakte stariĝis.

Lincoln aperis antaŭ li, falis peze pro frapo sub la pinton de la mentono, kaj kuŝis senmova. Graham faris du paŝojn, faletis. Kaj tiam la brako de Ostrog ĉirkaŭis lian kolon, li sin sentis detirita dorsantaŭe, peze falis, kaj trovis siajn brakojn fiksitaj al siaj flankoj. Post nelonga forta penego li ĉesis barakti, kaj kuŝis rigardante la spiregantan gorĝon de Ostrog.

“Vi—estas—kaptita,” spiregis Ostrog ĝoje. “Estis—malsaĝe—reveni.”

Graham turnis sian kapon ĉirkaŭe kaj, tra la neregula verda fenestro en la muro de la halo, vidis la virojn, kiuj antaŭe funkciigis la konstruarganojn, gestantaj ekscitite al la homoj sube. Ili ĵus vidis ĉion !

Ostrog sekvis lian rigardon kaj eksaltis. Li kriis ion al Lincoln, sed Lincoln ne moviĝis. Kuglo plaŭdis inter la kornicoj super la Atlas. La du tavoloj el diafana materialo, kiuj etendiĝis trans la fendaĵo, nun ŝiriĝis, la randoj de la ŝirita parto malheliĝis, kurbiĝis, rapidis ĝis la kadro, kaj post momento la Konsila ĉambro ree estis malfermita al la aero. Malvarma venteto enblovis tra la truo, portante kun si konflikton el voĉoj el la ruinigitaj spacoj ekstere, koboldan babiladon. “Savu la Mastron !” “Kion ili faras al la Mastro ?” “Oni perfidas la Mastron !”

Kaj tiam li rimarkis, ke la atento de Ostrog delogiĝis, ke la manoj de Ostrog ne plu tenas lin, kaj, fortiregante la brakojn, li baraktis surgenuen. Post plua momento, li jam ŝovis Ostregon malantaŭen, kaj staris sur unu piedo, premegante per unu mano la gorĝon de Ostrog, dum la manoj de Ostrog tenis la silkon ĉirkaŭ lia kolo.

Sed nun viroj venis al ili de la estrado—viroj, kies intencojn Graham miskomprenis. Li ekvidis iun kurantan malproksime al la kurtenoj de la antaŭĉambro, kaj tiam Ostrog forglitis de sub li, kaj tiuj novevenintoj kuris rekte al Graham. Je lia senfina surprizo, ili kaptis lin. Ili obeis al la krioj de Ostrog.

Ili tiris lin dek metrojn antaŭ ol li komprenis, ke ili ne estas amikoj—ke ili tiras lin al la malfermita panelo. Kiam li rimarkis tion, li premis sin malantaŭen, li penis ĵeti sin teren, li alvokis helpon per sia tuta forto. Kaj tiun fojon venis respondaj krioj.

La premo sur lia kolo malpliĝis, kaj jen ! en la malsupera angulo de la fendaĵo en la muro, aperis komence unu kaj poste kelkaj nigraj figuretoj, kriante kaj svingante la brakojn. Ili desaltis el la malfermaĵo, sur la galerieton, kondukantan al la Silentaj Ĉambroj. Ili kuris laŭ ĝi, tiel proksime, ke Graham povis vidi la armilojn en iliaj manoj. Tiam Ostrog kriis apud lia orelo al la homoj, kiuj tiris lin, kaj pluan fojon li troviĝis baraktanta per la tuta forto kontraŭ iliaj penoj ŝovi lin al la panelo jam malfermita por engluti lin. “Ili ne povas veni malsupren,” spiregis Ostrog. “Ili ne kuraĝos pafi. Ĉio iras bone. Ni fortenos lin de ili eĉ nun.”

Ŝajnis al Graham, ke tiu malglora barakto daŭras dum longaj minutoj. Liaj vestaĵoj ŝiriĝis multloke, li kovriĝis de polvo, iu paŝis sur lia mano. Li povis aŭdi la kriojn de siaj subtenantoj, kaj unufojon li aŭdis pafojn. Li sentis, ke lia forto eluziĝas, ke liaj penoj estas furiozaj kaj sencelaj. Sed helpo ne alvenis, kaj certe, nerezisteble, alproksimiĝis tiu nigra faŭko.

La premo sur li ĉesis, kaj li barakte stariĝis. Li vidis foriri la grizan kapon de Ostrog, kaj rimarkis, ke oni ne plu tenas lin. Li ĉirkaŭturniĝis kaj kunfrapis plene kontraŭ nigrevestita viro. Verda armileto krakis apud li, nubeto da pikodora fumo ĉirkaŭis lian vizaĝon, kaj ekbrilis ŝtala klingo. La grandega ĉambro rondiris ĉirkaŭ li.

Li vidis viron palblue vestitan pikbati nigre kaj flave vestitan serviston malproksime ne tri metrojn de lia vizaĝo. Tiam manoj rekaptis lin.

Oni nun tiris lin dudirekten. Ŝajnis, ke homoj krias al li. Li volis kompreni, sed ne povis. Iu tenis liajn krurojn, kaj levis lin spite de liaj viglaj penoj. Subite li komprenis, kaj ĉesis barakti. Viroj levis lin ĝis sur siaj ŝultroj, kaj forportis lin de tiu minaca panelo. Dek mil gorĝoj akklamis.

Li vidis homojn blue kaj nigre vestitajn, kiuj rapidas pafante post la forirantajn Ostroganojn. Levite, li nun vidis trans la tuta etendo de la halo sub la statuo de Atlas,

vidis, ke oni portas lin al la estrado meze de la loko. La malproksima fino de la halo jam estis plena de homoj kurantaj al li. Ili rigardis lin kaj aklamis.

Li konsciis, ke gardistaro ĉirkaŭas lin. Viglaj homoj ĉirkaŭ li kriis neprecizajn ordonojn. Li vidis apud si la flavvestiton kun la nigraj lipharoj, kiu troviĝis inter tiuj, kiuj renkontis lin en la publika teatro; tiu kriis ordonojn. La halo jam estis dense plena de ŝovantaj homoj, la metala galerieto fleksiĝis sub krianta ŝarĝo, la kurtenoj de la antaŭĉambro forŝiriĝis, kaj la antaŭĉambro vidiĝis premplena. Li apenaŭ povis aŭdigi sin al la apuda viro, pro la ĉirkaŭa tumulto. "Kien Ostrog iris?" li demandis.

La viro, kiun li aldemandis, montris per fingro trans la kapojn al la malsupraj paneloj de la halo, je la flanko kontraŭ la fendaĵo. Ili restis malfermitaj, kaj armitaj homoj, bluestitaj kun nigraj zonoj, kuris tra ili kaj malaperis en la eksterajn ĉambrojn kaj koridorojn. Ŝajnis al Graham, ke la sono de pafado ŝvebas tra la tumulto. Oni portis lin laŭ ŝancela kurbo trans la halon ĝis malfermaĵo sub la fendaĵo.

Li vidis homojn laborantajn kun kruda disciplino por forpuŝi de li la amason, por fari liberan spacon ĉirkaŭ li. Li pasis el la halo, kaj trovis krudan novan muron staranta rekte antaŭ li, kun la blua ĉielo supre. Ili demetis lin surpiede; iu tenis lian brakon kaj gvidis lin. Li vidis apude la flave vestitan viron. Oni kondukis lin supren de mallarĝa brika ŝtuparo, kaj proksime leviĝis la grandaj ruĝe kolorigitaj masoj, la arganoj, brakoj kaj la senmovaj motoroj de la konstrumaŝino.

Li sin trovis supre de la ŝtuparo. Oni rapidigis lin trans mallarĝa barita trotuaro, kaj subite, kun vasta aklamado, la amfiteatro el ruinaĵo denove malfermiĝis antaŭ li. "La Mastro troviĝas inter ni! La Mastro! La Mastro!" La krio fluis trans la lago el vizaĝoj kvazaŭ ondo, rompiĝis kontraŭ la malproksima klifo de la ruinoj, kaj revenis per krieta ŝaŭmo: "La Mastro staras niaflanke!"

Graham rimarkis, ke li ne plu estas ĉirkaŭata de amaso; ke li staras sur kruda estradeto el metalo, parto de ŝajne malfortika trabaro, kiu plektiĝis tute ĉirkaŭ la granda maso de la Konsilejo. Tute trans la vasta etendaĵo de la ruinoj swingiĝis kaj ŝoviĝis la krianta popolo; kaj kelkloke

la nigraj standardoj de la revoluciaj societoj balanciĝis kaj leviĝis kaj faris maloftajn centrojn de organizo en la ĥaoso. Sur la kruta ŝtuparo el muroj kaj trabaro, per kiu liaj savintoj atingis la malfermaĵon en la muro de la Halo de Atlas, sin tenis solida homamaso, kaj energiaj nigraj figuretoj, sin tenantaj al kolonoj kaj elstaraĵoj, vigle penis instigi la kunpremitan amason formoviĝi. Malantaŭ Graham, je pli alta nivelo sur la trabaro, kelkaj viroj baraktis supren, portante la flirtegantajn faldojn de grandega nigra standardo. Sube, tra la larĝa fendaĵo en la muroj, li povis rigardi malsupren sur la premitajn atentajn amasojn en la Halo. La malproksimaj flugstacioj sude staris brilaj kaj klaraj, ŝajne proksimaj pro neordinara diafaneco de la aero. Sola monoplano leviĝis de la meza stacio, kvazaŭ por renkonti la venontajn aeroplanojn.

“Kie Ostrog estas?” demandis Graham, kaj eĉ dum li parolis, li vidis, ke ĉiu rigardo turniĝas for de li al la supro de la Konsilejo. Li ankaŭ rigardis laŭ tiu universale atentata angulo de muro, akra kaj klara kontraŭ la ĉielo. Tiam, en la ombro, li rimarkis la internon de ĉambro, kaj rekonis surprizite la verdan kaj blankan ornamaĵon de sia antaŭa malliberejo. Kaj iranta rapide trans tiun fenditan ĉambron, kaj ĝis la rando mem de la klifo el ruinoj, venis blankvestita figureto, sekvata de du pli malgrandaj figuroj vestitaj nigre kaj flave. Li aŭdis la viron apud si krii “Ostrog,” kaj turniĝis por demandi ion. Sed li ne faris tion, pro la surprizita krio de alia el tiuj apud li, kaj longa, subite montranta fingro. Li rigardis, kaj jen! la monoplano, kiu leviĝis de la flugstacio, kiam li laste rigardis tion, nun flugas rekte al ili. La regula ŝveba flugado ankoraŭ estis sufiĉe nova por allogi la atenton de Graham.

Ĝi alproksimiĝis, rapide kreskante, ĝis ĝi transflugis la kontraŭan randon de la ruinoj kaj estis videbla al la dense premita amaso sube. Ĝi ŝvebis kurbe trans la spacon, kaj leviĝis kaj pasis supre, superpasante la mason de la Konsilejo, diafana formo kun sola aeronaŭto spionanta tra ĝiaj ripoj. Ĝi malaperis post la konturon de la ruinoj.

Graham reatentis Ostrogon. Tiu ĵus signalas per la manoj, kaj liaj sekvantoj klopodas forrompi la muron apud

li. Post plua momento la monoplando ree vidiĝis, malgrandaĵo tre malproksima, turniĝanta laŭ larĝa kurbo kaj iranta pli malrapide.

Tiam subite la flave vestita viro kriis: "Kion oni faras? Kion faras la popolo? Kial oni lasas Ostrogon tie? Kial oni ne kaptas lin? Ili forportos lin—la monoplando forportos lin! Ah!"

Tiu krio estis eĥita de kriego el la ruinoj. La kraketa sono de la verdaj armiloj venis trans la intera abismo al Graham, kaj, rigardinte malsupren, li vidis kelke da flavaj kaj nigraj uniformoj kurantaj sur unu el la galerioj, kiuj pendis malfermitaj al la aero sub la rando, kie Ostrog staris. Kurante, ili pafis je neviditaj homoj, kaj tiam elvenis kelkaj palbluaj figuroj ilin persekutantoj. Tiuj batalantaj figuretoj faris kuriozan efekton; ili ŝajnis kuri kvazaŭ modelaj soldatoj de ludilo. Tiu stranga aspekto, simila al tranĉe malfermita domo, donis al la barakto inter mebloj kaj koridoroj efekton nerealan. Ĝi okazis eble ducent metrojn distance de li, kaj preskaŭ kvindek super la kapoj sube inter la ruinoj. La nigre kaj flave vestitoj kuris sub arkaĵon, turniĝis, kaj pafis salvon. Iu el la bluestitaj persekutantoj, paŝante apud la rando, ĵetis la brakojn supren, ŝanceliĝis flanken, ŝajnis pendi kelkajn sekundojn sur la rando, kaj falis kapantaŭe malsupren. Graham vidis lin frapi kontraŭ elstara angulo, reflugi turniĝante kaj turniĝante, kaj malaperi post la ruĝan brakon de la konstrumaŝino.

Kaj tiam ombro venis inter la suno kaj Graham. Li rigardis supren, kaj vidis la ĉielon klara, sed li sciis, ke la monoplando ĵus pasis. Ostrog estis malaperinta. La flavvestito sin ŝovis antaŭ Graham, fervora kaj ŝvitanta, montranta kaj bruema.

"Ili intencas halti!" kriis la flavvestito. "Ili haltas. Diru, ke oni pafu je li. Ke oni pafu je li!"

Graham ne komprenis. Li aŭdis laŭtajn voĉojn ripeti la enigman ordonon.

Subite li vidis la antaŭon de la monoplando gliti trans la rando de la ruinoj kaj halti kun ekskuo. Tuj li komprenis, ke la maŝino haltas, por ke Ostrog sin savu per ĝi. Li vidis bluan nebulon veni supren el la abismo, kaj sciis,

ke la homoj sube nun pafas je la elstaranta antaŭo de la maŝino.

Viro apud Graham raŭke aklamis, kaj li vidis, ke la bluvestitaj ribeluloj jam atingis la arkaĵon, antaŭ nelonge defenditan de la kontraŭuloj, kaj kuras per konstanta fluo laŭ la koridoro.

Kaj subite la monoplando glitis de la rando de la Konsilejo kaj falis simile al ŝvebanta hirundo. Ĝi falis, kliniĝante laŭ kvardek-kvin gradoj al la horizonto, tiel krute, ke ŝajnis al Graham, kaj eble al multaj el tiuj sube, ke ĝi tute ne povas releviĝi.

Ĝi falis tiel proksime preter li, ke li povis vidi Ostrogon premegi la flankojn de sia sidloko, kun la blankaj haroj flirtantaj; li povis vidi la palvizaĝan aeronaŭton tiregi la tenilon, kiu turnos la maŝinon supren. Li aŭdis la nebule timan krimon de sennombraj homoj sube.

Graham ekprenis la barilon antaŭ si kaj ĉesis spiri. La momento ŝajnis esti epoko. La malsupra parto de la maŝino preskaŭ tuŝis la amason sube, kiu kriis kaj baraktis kaj paŝegis unu sur alian.

Kaj tiam ĝi releviĝis.

Momente ŝajnis, ke ĝi tute ne kapablas superpasi la kontraŭan klifon, kaj eĉ poste, ke ĝi frapos kontraŭ la ventmaŝinon turniĝantan malantaŭe.

Kaj jen! ĝi libere ŝvebis, ankoraŭ kliniĝante flanken, supren, supren en la ventblovitajn ĉielon.

La momenta timo anstataŭiĝis de furioza incitiĝo, kiam la svarmanta popolo komprenis, ke Ostrog sin savis for de ili. Kun tro malfrua vigleco ili denove pafadis, ĝis la kraketoj plektiĝis en muĝo, ĝis la tuta spaco fariĝis blua kaj nebula, kaj la aero pikodoris pro la maldensa fumo el la armiloj.

Tro malfrue! La flugmaŝino pli kaj pli malgrandiĝis, kaj kurbe turniĝis kaj ŝvebis gracie malsupren al la flugstacio, de kiu ĝi nur lastatempe leviĝis. Ostrog estis libera!

Dum tempospaco konfuzita babilado leviĝis el la ruinoj, kaj tiam la universala atento revenis al Graham, staranta alte inter la traboj. Li vidis la vizaĝojn de la homoj turnitaj al li, aŭdis iliajn kriojn pri lia saviĝo. El la gorgo de la Vojoj sonis la ribela Kanto, etendiĝante kvazaŭ venteto trans tiun ondantan maron el homoj.

La grupeto ĉirkaŭ li kriis gratulojn pri lia savo. La flave vestita viro staris apud li, kun fervora vizaĝo kaj brilantaj okuloj. Kaj la kanto leviĝis, pli kaj pli laŭte ; paŝ', paŝ', paŝ', paŝ'.

Malrapide alvenis lia kompreno pri la plena signifo por li de tiuj aferoj, pri la rapida ŝanĝo de lia situacio. Ostrog, kiu antaŭe staris apud li, kiam ajn li frontis tiun kriantan amason, nun troviĝas tie ekstere—lia kontraŭulo. Ne plu ekzistas iu, kiu regos anstataŭ li. Eĉ la homoj ĉirkaŭ li, la ĉefoj kaj organizantoj de la amaso, lin rigardas por vidi, kion li faros, atendas liajn ordonojn. Li vere estas la reĝo. Jam finiĝis lia regno nur ŝajnigita.

Li sentis sin streĉita por fari tion, kion oni atendas de li. Liaj nervoj kaj muskoloj tremetis, lia cerbo eble iom konfuziĝis, sed li ne sentis timon nek koleron. Lia mano, sur kiun iu paŝis, pulsis, kaj kvazaŭ brulis. Li iom embarasiĝis pri sia sinteno. Li sciis, ke li ne timas, sed li multe volis eĉ ne ŝajni tima. Dum sia antaŭa vivo, li ofte pli ekscitiĝis nur pro la ludado de lerta ludo. Li deziris tujan agadon ; li konsciis, ke li devas ne tro detale pensi pri la giganta malsimpleco de la barakto ĉirkaŭ li, alie li paralizigiĝos de la forta sento pri ĝia komplikeco.

Tie malproksime, tiuj kvadrataj bluaj formoj, la flugstacioj, signifas Ostrogon ; kontraŭ Ostrog, kiu estas tiel klara kaj difinita kaj decidema, li, kiu nature estas tiel nebula kaj hezitema, batalas por la tuta estonteco de la mondo.

ĈAPITRO DUDEK-TRIA.

GRAHAM DIRAS SIAN VORTON.

DUM kelka tempo la Mastro de la Tero ne estis mastro eĉ de sia propra cerbo. Eĉ lia volo ŝajnis ne esti propra al li, liaj agoj lin surprizis, kaj nur estis parto de la konfuziĝo el strangaj spertoj, kiu fluis trans lian spiriton. Kelkaj faktoj estis klaraj: La negroj venas, Heleno Wotton avertis la popolon, ke ili venas, kaj li mem estas Mastro de la Tero. Ĉiu el tiuj faktoj ŝajnis barakti por plene posedi liajn pensojn. Ili eltrudiĝis el bildo kun premplenaj haloj, altaj pontoj, ĉambroj plenaj de konsilantaj ĉefoj de kvartaloj, kinematografaj kaj telefonaj ĉambroj, kaj fenestroj, kiuj montris ŝaŭmantan maron el marŝantaj homoj. La flave vestitoj, kaj aliaj viroj nomitaj Ĉefoj de Kvartaloj, aŭ ŝovis lin antaŭen, aŭ obeeme sekvis lin. Estis malfacile scii, kiu el la du vere okazas. Eble ili faras ambaŭ alterne. Eble iu nevidata kaj nesuspektata povo antaŭenigas ĉiujn. Li sciis, ke li intencas proklami ion al la Popolo de la Tero, konsciis pri grandiozaj frazoj flotantaj en lia cerbo, por poste esti diritaj. Multaj aferetoj okazis, kaj tiam li sin trovis eniranta ĉambreton, kie li faros tiun proklamon.

Tiu ĉambro estis groteske nova rilate sian meblaron. Meze staris brila ovalo lumigata de supre per ŝirmitaj lumoj. La cetero kuŝis en ombro, kaj la duoblaj, preme fermiĝantaj pordoj, tra kiuj li venis el la plena Halo de Atlas, tre silentiĝis la lokon. Ties obtuza frapo kiam ili fermiĝis post li, la subita ĉeso de la tumulto inter kiu li ĵus vivis dum multaj horoj, le tremanta luma rondo, la flustroj kaj rapidaj senbruaĵ movoj de apenaŭ videblaj gardistoj en la ombroj, faris strangan impreson al Graham. La orelegoj de gramofona mekanismo gapis en grupo por liaj vortoj, la nigraj okuloj de grandaj fotografiloj atendis, ke li komencu, malantaŭe metalaj stangoj kaj bobenoj briletis malforte, kaj io kirliĝis kun zuma tono. La paŝis en la mezon de la lumo, kaj lia ombro kuntiriĝis al makuleto nigra kaj klara sub liaj piedoj.

La nebula konturo de tio, kion li intencis diri, jam troviĝis en lia cerbo. Sed tiu silento, tiu izoliĝo, tiu foriĝo el la premega amaso, tiu aro da gapantaj, rigardegantaj

maŝinoj, tute ne antaŭvidiĝis de li. Ĉiu subtenilo ŝajnis kune foriri de li; ŝajnis, ke li ĵus falis subite en tiun aferon, ke li subite sin trovis. Dum unu momento li tute ŝanĝiĝis. Li rimarkis, ke li nun timas esti nesufiĉa, timas esti tro teatra, timas pri la kvalito de sia voĉo, de sia sprito; mirante, li turniĝis al la flave vestita viro kun pardonpeta gesto. "Momente," li diris, "mi devas atendi. Mi ne sciis, ke la afero estos tia. Mi devas pripensi tion, kion mi diros."

Dum li ankoraŭ hezitis, ekscitita mesaĝisto donis la novaĵon, ke la unuaj aeroplanoj pasas super Madrido.

"Kion oni raportas pri la flugstacioj?" li demandis.

"La homoj en la sudokcidentaj kvartaloj staras pretaj."

"Pretaj!" Li returniĝis senpacience al la malplenaj rondoĵoj de la lensoj. "Mi supozas, ke necesas fari specon de parolo. Dio donu, ke mi sciu certe tion, kion necesas diri! Aeroplanoj super Madrido. Ili nepre ekvojaĝis antaŭ la ĉefa aro.

"Nu! Kiel gravas, ĉu mi parolos bone, ĉu malbone?" li diris, kaj sentis, kvazaŭ la lumo pli brilas.

Li ĵus pretigis nebulan frazon de demokratia sentimento, kiam subite liaj duboj venkis lin. Li trovis, ke lia kredo pri lia heroa grado kaj taŭgeco tute perdis sian firman konvinkitecon. Bildo de eta fanfaronema fuŝaĵo sur venta dezerto el nekomprenebla destino ĝin anstataŭis. Abrupte, klare, evidentiĝis al li, ke tiu ribelo kontraŭ Ostrog estas trofrua, kaj antaŭ-destinita malsukcesi, ke ĝi estas nur impulso de pasia netaŭgeco kontraŭ neeviteblaj kondiĉoj. Li konsideris tiun rapidan venadon de aeroplanoj kiel la atakon de Destino kontraŭ li. Li miris, ke li iam antaŭe taksis aferojn alimaniere. En tiu fina dilemo li debatis kun si, forŝovis debatojn flanken, decidis nepre daŭrigi la aferon jam entreprenitan. Tamen, li ne povis trovi vorton por komenci. Eĉ dum li staris, embarasite, hezite, kun nediskreta pardonpeto pri sia nekapableco treme sur la lipoj, aŭdiĝis bruo de multaj kriantoj, kaj kurado de multaj piedoj. "Atendu," kriis iu, kaj pordo malfermiĝis. Graham turniĝis, kaj la atendantaj lumoj malpliĝis.

Tra la malfermita pordo li vidis alproksimiĝi gracilan knabinan figuron. Lia koro saltis. Ĝi estis Heleno Wotton. La flave vestita viro venis el la pli apudaj ombroj en la luman rondon.

“ Jen la knabino, kiu sciigis al ni, kion Ostrog faris,” li diris.

Ŝi eniris kviete, kaj staris silenta, kvazaŭ ŝi ne volas interrompi la elokventon de Graham. . . . Sed liaj duboj kaj sindemandoj forflugis pro ŝia ĉeesto. Li memoris ĉion, kion li antaŭe intencis diri. Li denove frontis la fotografilojn, kaj la lumoj ĉirkaŭ li pli brilis. Li returniĝis al ŝi.

“ Vi tre helpis min,” li diris hezite—“ tre helpis min. . . . Ĉi tio estas tre malfacila.”

Li paŭzis. Li alparolis la nevidatajn amasojn, kiuj rigardegis lin tra tiuj groteskaj nigraj okuloj. Komence li parolis malrapide.

“ Homoj de la nova epoko,” li diris. “ Vi leviĝis por batali pro via raso ! . . . Ne troviĝas antaŭ ni facila venko.”

Li haltis por trovi vortojn. Li pasie deziris la donacon flue paroli.

“ Ĉi tiu nokto estas komenco,” li diris. “ La batalo, kiu venos, kiu alrapidus al ni hodiaŭ nokte, estos nur komenco. Dum viaj tutaj vivoj, verŝajne, necesos batali. Ne bedaŭru, se mi mem venkiĝos, se oni tute detruos min. Mi opinias, ke oni verŝajne detruos min.”

Li trovis la ideon en sia cerbo tro nebula por esti dirata. Li paŭzis momente, kaj komencis malklaran admonon ; tiam fluego el parolo venis al li. Multo, kion li diris, nur estis humanisma banalaĵo el malaperinta periodo, sed la konvinko en lia voĉo nuancis ĝin per vivo. Li metis la argumenton de la antikvaj tagoj antaŭ la popolon de la novaj tagoj, antaŭ la knabinon ĉe sia flanko. “ Mi venas al vi el la Pasinteco,” li diris, “ kun la memoro pri popolo, kiu esperis. Mia epoko estis epoko kun revoj—komenca epoko, kun noblaj esperoj ; tute tra la mondo ni forpelis la sklavecon ; tute tra la mondo ni disvastigis la deziron kaj kredon, ke militoj ne plu okazu, ke ĉiuj homoj vivu noble en libereco kaj paco. . . . Tiamaniere oni esperis, dum tiuj forpasintaj tagoj. Kaj kio fariĝis tiuj esperoj ? Kiel statas la homoj post ducent jaroj ?

“ Jen vastaj urbegoj, vastaj potencoj, komuna vasteco preter niaj sonĝoj. Ne por tio ni laboris, sed tamen ĝi venis. Sed rilate la vivetojn, kiuj konsistigas tiun vastan

vivon? Kiel statas la ordinaraj vivoj? Same kiel ĉiam—jen malĝojo kaj laboro, jen vivoj difektitaj kaj ne plenumitaj, vivoj tentitaj de potenco, tentitaj de riĉo, kaj putrintaj ĝis senvaloreco kaj malsaĝeco. La antikvaj fidoj velkis kaj ŝanĝiĝis, la nova fido—. Ĉu ekzistas nova fido?

“La kompato kaj la amo,” li hezitis; “La belo kaj la amo por belajoj—peno kaj sindediĉo! Donu vin, same kiel mi min donus—same kiel Kristo antaŭe sin donis sur la Kruco. Ne gravas, ĉu aŭ ne vi komprenas. Ne gravas, se vi ŝajnas malsukcesi. Vi *scias*—en la plejcentro de viaj koroj, vi *scias*. Ne ekzistas promeso, ne ekzistas sekureco—ne ekzistas io, por subteni nin, krom nia Fido. Kredu nenion krom la Fido—la fido kiu estas la kuraĝo. . . .”

Multon, kion li longe deziris kredi, li trovis, ke li nun kredas. Li parolis spasme, per rompigitaj nekompletaj frazoj, sed per sia tuta forto kaj koro, pri tiu nova interna fido. Li parolis pri la nobleco de la abnegacio, pri sia kredo pri senmorta vivo de la tuta Homaro, en kiu ni ekzistas kaj vivas kaj moviĝas. Lia voĉo leviĝis kaj malleviĝis, kaj la dissendiloj zumis dum li parolis—malklaraj servistoj rigardis lin el la ombro. . . .

Lia sento pri tiu silenta ĉeestanto apude subtenis lian sincerecon. Dum kelkaj ĝloraj momentoj li inspiriĝis; li sentis nenian dubon pri sia heroo destino, nenian dubon pri siaj heroecaj vortoj, li vidis ĉion klare kaj rekte. Lia elokvento ne plu lametis. Kaj fine li ĉesis paroli. “Ĉi tie kaj nun,” li kriis, “mi faras mian testamenton. Ĉion, kion mi posedas, mi donas al la popolo de la mondo. Ĉion, kio estas mia en la mondo, mi donas al la popolo de la mondo. Al ĉiuj el vi. Mi donas tion al vi, kaj mi donas min mem al vi. Kaj laŭ la volo de Dio hodiaŭ nokte, aŭ mi vivos por vi, aŭ mi mortos.”

Li finis. Li vidis la lumon de sia inspiriĝo rebrili sur la vizaĝo de la knabino. Iliaj okuloj renkontiĝis; ŝiaj okuloj estis malsekaj de larmoj entuziasmaj.

“Mi sciis,” ŝi flustris. “Ho! Patro de la Mondo—Majstro! Mi sciis, ke vi diros tion. . . .”

“Mi diris, kion mi kapablis,” li respondis embarasite, kaj ekprenis kaj tenis ŝiajn etenditajn manojn.

ĈAPITRO DUDEK-KVARA.

DUM LA AEROPLANOJ ALPROKSIMIĜIS.

La flave vestita viro staris apud ili. Ambaŭ ne rimarkis lian alvenon. Li diris, ke la sudokcidentaj kvartaloj jam ekiras. “Mi ne tiel frue atendis tion,” li kriis. “Ili faris mirindaĵojn. Vi devas sendi al ili Vorton, por subteni ilin survoje.”

Graham rigardis lin distrite. Tiam lia atento resaltis al sia antaŭa demando pri la flugstacio.

“Jes,” li diris. “Jen bone, treege bone.” Li pripensis mesaĝon. “Diru al ili: Bone farite, Sudokcidentanoj!”

Li turnis la rigardon denove al Heleno Wotton. Lia vizaĝo esprimis barakton inter konfliktaĵoj. “Ni devas kapti la flugstaciojn,” li klarigis. “Se ni ne faros tion, ili venigos negrojn. Je ĉiu kosto necesas malhelpi tion.”

Li pensis, eĉ dum li parolis, ke tio ne estis la diraĵo troviĝanta en lia cerbo, antaŭ ol oni interrompis ilin. Li vidis nuancon de surprizo en ŝiaj okuloj. Ŝi ŝajne intencis paroli, sed altsona tintilo dronigis ŝian voĉon.

Graham ekkomprenis, ke ŝi deziras, ke li direktu tiun marŝantan popolon, ke jen estas la afero, kiun li devas fari. Li abrupte proponis tion. Li parolis al la flavevestito, sed rigardis ŝin. Li vidis ŝian vizaĝon respondi. “Ĉi tie mi faras nenion,” li diris.

“Estas neeble,” protestis la flave vestita viro. “Ĝi estas barakto kvazaŭ en kuniklejo. Ĉi tie troviĝas via taŭga loko.”

Li klarigis multvorte. Li gestis al la ĉambro, kie Graham devas atendi; li insistis, ke nenia alia agado estas ebla. “Ni devas scii, kie vi troviĝas,” li diris. “Je iu ajn momento krizo povus okazi, kaj bezono de via ĉesto por decidi.”

Bildo antaŭe flotis en la cerbo de Graham pri tia vasta drameca barakto, kian sugestis la amasoj inter la ruinoj. Sed jen ne estis spektakla batalo, kian li imagis. Anstataŭe tio estis izoliĝo—kaj necerteco. Nur dum la plua daŭro de la posttagmezo li kunmetis pli veran bildon pri la batalo, kiu okazis, neaŭdata kaj nevidata, distance malpli ol sep kilometrojn de li, sub la stacio Roehampton. Ĝi estis stranga kaj senprecedenta barakto, batalo kiu konsistis el cent mil bataletoj, batalo en spongo el vojoj kaj koridoroj;

ĝi okazis for de la vido al ĉielo aŭ suno sub la elektra brilego; kaj ĝin partoprenis, inter vasta konfuziĝo, homamasoj ne dresitaj pri armiloj, gvidataj precipe de akklamado—amasoj stultigitaj de sencerba laboro kaj malfortigitaj de la tradicio de ducent jaroj da servuta sekureco. Ili frontis homojn sovaĝigitajn de vivoj de malvirta privilegio kaj volupta indulgo.

Ambaŭ ne posedis kanonojn, nek diferenciĝis en soldatoj de tiu aŭ alia speco; la sola armilo ambaŭflanke estis la verda metala karabeneto, kies sekreta fabrikado kaj subita disdonado estis unu el la kulminantaj movoj de Ostrog kontraŭ la Konsilantoj. Malmultaj estis spertaj pri tiu armilo, multaj eĉ neniam antaŭe pafis per ĝi, multaj ankaŭ, kiuj portis ĝin, venis neprovizitaj de municio; neniam, dum la historio de militado, okazis pli malsperta pafado. Ĝi estis batalo inter amatoroj, terura, eksperimenta militado, kun armitaj ribeluloj batalantaj kontraŭ same armitaj ribeluloj; ili estis pelitaj antaŭen de la vortoj kaj furiozo de kanto, de la paŝeganta simpatio de multnombro, kaj fluegis per sennombraj miriadoj ĝis la malgrandaj vojoj, la senmovaj liftoj, la galerioj glitigaj pro sango, la haloj kaj koridoroj plenaj de fumo, sub la flugstacioj, por tie lerni, kiam ilia saviĝo fariĝis neesperbla, la antikvajn lertaĵojn de batalado. Kaj supre, krom maloŭta pafado sur la tegmentoj kaj kelkaj strioj kaj fadenoj el fumo, kiuj pliiĝis kaj mallumiĝis antaŭ la vespero, la tago aspektis klare trankvila. Verŝajne Ostrog ne disponis bombojn, kaj la flugmaŝinoj ne partoprenis la fruajn fazojn de la batalo. Ne vidiĝis eĉ la plej malgranda nuboj por makuli la malplenan brilon de la ĉielo. Ĝi ŝajnis teni sin vaka atendante la alvenon de la aeroplanoj.

Kelkfoje alvenis novaĵon pri ĉi tiuj, ke ili pli kaj pli alproksimiĝas, unue de la urboj de Hispanujo kaj poste de Francujo. Sed pri la novaj kanonoj, kiujn oni fabrikis laŭ ordonoj de Ostrog, kaj kiujn oni sciis esti en la urbejo, ne aŭdiĝis ia novaĵo, malgraŭ la insistaj klopodoj de Graham; ankaŭ ne alvenis el la densa teksaĵo el batalantaj fadenoj ĉirkaŭ la flugstacio iu raporto pri sukceso. Kvartalo post kvartalo de la Laboristaj Societoj sin raportis kolektive, sin raportis ekiranta, kaj malaperis for el la scio

en la labirinton de tiu batalo. Kio okazas tie? Eĉ la okupegitaj Ĉefoj de Kvartaloj ne sciis tion. Malgraŭ la malfermiĝo kaj refermiĝo de pordoj, la rapidantaj mesaĝistoj, la sono de tintiloj, kaj la senĉesa klik-a-klak de informaj aparatoj, Graham sentis sin izolita, strange neagema, senutila.

Lia izoliĝo foje ŝajnis la plej stranga, la plej neatendita, el ĉiuj okazaĵoj post lia vekigo. Ĝi iel similis tiun inertecon, kiun oni spertas en sonĝo. Unue tumulto, la giganta kompreno pri mondbatalo inter Ostrog kaj li mem, kaj poste tiu izola, trankvila ĉambreto, kun ĝiaj telefonoj kaj tintiloj kaj rompita spegulo!

Jen oni fermis la pordon, kaj Graham kaj Heleno sin trovis kune solaj; ili ŝajnis forte baritaj for el la senprecedenta monda ventego, muĝanta ekstere, ŝajnis vive senti la ĉeeston unu de la alia, ŝajnis nur koncerniĝi unu pri la alia. Kaj jen oni malfermis la pordon, kaj mesaĝistoj eniris, aŭ altsona tintilo pikis ilian kvietan kunecon; tiam ŝajnis kvazaŭ fenestro en bone konstruita, luma domo subite malfermiĝis dum uragano. La malluma hasto kaj tumulto, la premo kaj furiozo de la batalo, enrapidis kaj fluegis super ili. Ili ne plu estas personoj, sed nur ĉeestantoj, eĉ nur ideoj pri vasta konvulsio. Ili fariĝis nerealaj eĉ al si mem, ŝajnis nur pupetoj, nepriskribeblaj malgrandaj. El la du kontraŭaj realaĵoj, la solaj ekzistantaj realaĵoj, unu estis la urbo, kiu pulsas kaj muĝis tie pro malfrua frezo sin defendi, kaj la dua estis la aeroplanoj ŝvebantaj senkompate al ili trans la rondon ŝultron de la terglobo.

Aŭdiĝis subita bruo ekstere, kurado kaj kriado. La knabino stariĝis, nekredema, ne povanta paroli.

Metalaj voĉoj diris "Venko!" Jes, ili jam venkis!

Ŝovante sin tra la kurtenoj aperis la flave vestita viro, surprizita kaj senorda pro ekscitiĝo. "Venko," li kriis, "venko!" La popolo venkas. La Ostroganoj jam mal sukcesis."

Ŝi levigis. "Ĉu venko?"

"Kion vi volas diri?" demandis Graham. "Diru! Kion?"

"Ni jam forpelis ilin el la subaj galerioj ĉe Norwood, Streatham nun bruliĝas furioze, kaj ni posedas Roehampton Nia!—kaj ni kaptis la monoplanon, kiu kuŝas tie."

Altsona tintilo aŭdiĝis. Maltrankvila grizharulo aperis el la ĉambro de la Kvartalaj Ĉefoj. “Ĉio malsukcesos,” li kriis. “Ĉu valoras nun, ke ni posedas Roehampton. La aeroplanojn oni vidis super Boulogne!”

“La Sanelo!” diris la flavevestito. Li rapide kalkulis. “Post nur duonhoro.”

“Ili ankoraŭ posedas tri el la flugstacioj,” diris la maljunulo.

“Pri la kanonoj?” demandis Graham.

“Oni ne povas starigi ilin—dum nur duonhoro.”

“Ĉu tio signifas, ke oni jam trovis ilin?”

“Tro malfrue,” diris la maljunulo.

“Se ni nur kapablu forteni ilin pluan horon!” kriis la flavevestito.

“Nenio nun povas forteni ilin,” diris la maljunulo.

“Ili havas preskaŭ cent aeroplanojn en la unua aro.”

“Ĉu nur pluan horon?” demandis Graham.

“Tiel proksime al sukceso!” diris la Kvartalĉefo.

“Nun kiam ni jam trovis la kanonojn. Tiel proksime—. Se ni nur povus levi ilin ĝis sur la tegmentoj.”

“Kiom da tempo tio okupas?” subite demandis Graham.

“Unu horon—plene.”

“Tro malfrue,” kriis la Kvartalĉefo, “tro malfrue!”

“Ĉu tro malfrue?” diris Graham. “Eĉ nun—. Unu horon!”

Subite li konceptis ideon. Li provis paroli trankvile, sed lia vizaĝo paliĝis. “Ni havas ŝancon. Vi diris, ke estas monoplano—?”

“Sur la stacio Roehampton, Majstro.”

“Ĉu frakasita?”

“Ne. Ĝi kuŝas flanke trans la portilo. Oni povus remeti ĝin sur la relojn—facile. Sed ni ne havas aeronaŭton—”

Graham ekrigardis la du virojn kaj poste Helenon. Li parolis nur post longa paŭzo. “Ni ne havas aeronaŭtojn, ĉu?”

“Neniun.”

Li turniĝis subite al Heleno. Li jam faris decidon. “Mi mem devas fari tion.”

“Fari kion?”

“Iri al tiu flugstacio, al tiu maŝino.”

“ Kion vi volas diri ? ”

“ Mi mem estas aeronaŭto. Do—. Tiuj tagoj, pri kiuj vi riproĉis min, ne estis tute senutilaj.”

Li turniĝis al la maljunulo. “ Ordonu, ke oni remetu ĝin sur la portilon.”

La viro hezitis.

“ Kion vi intencas fari ? ” kriis Heleno.

“ Tiu monoplano—ekzistas ŝanco—”

“ Ĉu vi intencas—”

“ Batali, jes. Batali en la aero. Jam antaŭe mi pensis—. La grandaj aeroplanoj estas fuŝaĵoj. Viro kun firma celo—!”

“ Sed—neniam, de kiam oni komencis flugi—” kriis la flavevestito.

“ Ne ekzistis bezono por ĝi. Sed nun alvenas la tempo. Diru al ili—sendu al ili mian ordonon—ke oni remetu ĝin sur la portilon. Nun mi komprenas, kion fari ! Nun mi komprenas, kial mi troviĝas ĉi tie ! ”

La maljunulo senvorte aldemandis la flavevestiton, kapjesis, kaj forrapidis.

Heleno faris unu paŝon al Graham. Ŝia vizaĝo paliĝis. “ Sed Majstro ! Kiel vi povas batali ? Vi estos mortigita.”

“ Eble, jes. Tamen, ne fari ĝin—aŭ eĉ lasi, ke alia homo faru ĝin—”

“ Vi estos mortigita,” ŝi ripetis.

“ Mi jam diris mian Vorton. Ĉu vi ne komprenas ? Eble ĉi tio savos—Londonon.”

Li haltis, ne povis paroli plu, li gestis for la alternativon, kaj ili restis, rigardantaj unu la alian.

Ambaŭ klare konsciis, ke li devas iri. Ne povas esti repaŝo el tia giganta heroaĵo.

Siaj okuloj pleniĝis de larmoj. Ŝi venis al li kun stranga gesto de la manoj, kvazaŭ ŝi serĉas la vojon, kaj ne povas vidi ; ŝi kaptis lian manon, kaj kisis ĝin.

“ Vi vekigis,” ŝi kriis, “ por ĉi tio ! ”

Li tenis ŝin mallerte dum momento, kaj kisis la harojn de ŝia klinita kapo, tiam li forpuŝis ŝin, kaj turniĝis al la flave vestita viro.

Li ne kapablis paroli. La gesto de lia brako diris : “ Antaŭen ! ”

ĈAPITRO DUDEK-KVINA.

LA ALVENO DE LA AEROPLANOJ.

Du viroj palblue vestitaj kuŝis en la neregula vico, kiu sin etendis laŭlonge la randon de la kaptita stacio Roehampton, de unu fino ĝis la alia; ili tenis siajn karabenojn kaj spionis en la ombrojn de la stacio Wimbledon Park. Foje ili interparolis. Ili parolis la torditan anglan lingvon de sia klaso kaj periodo. La pafado de la Ostroganoj jam preskaŭ ĉesis, kaj malmultaj kontraŭuloj nun estis videblaj dum iom longa tempo. Sed la eĥoj de la batalo, kiu nun okazis malproksime sube en la malsupraj galerioj de tiu stacio, foje kaj ree aŭdiĝis inter la stakato de la pafado de la popola partio. Unu el tiu duo priskribis al la alia, kiel li vidis viron tie sube sin kaŝanta post trabo, kaj kiel li mem hazarde celis kaj plene trafis lin, kiam tiu tro moviĝis. “Li ankoraŭ kuŝas tie sube,” diris la pafinto. “Vidu tiun makuleton. Jes. Inter tiuj stangoj.”

Nur malmultajn metrojn post ili kuŝis mortinta fremdulo, kun vizaĝo turnita supren al la ĉielo, kaj la blua kanvaso de la jako fumanta en rondeto ĉirkaŭ la klara kuglo-truo sur lia brusto. Proksime apud li vundito, kun kruro ĉirkaŭvolvita, sidadis kun senesprima vizaĝo kaj rigardis la progreson de tiu brulado. Malantaŭe, trans ĝia portilo, kuŝis la kaptita monoplano.

“Mi ne povas vidi lin nun,” diris la dua per plendema tono.

La pafinto fariĝis blasfemema kaj laŭtvoĉa pro sia fervora peno klarigi ĉion. Kaj subite, lin interrompante, aŭdiĝis brua kriado de sub la stacio.

“Kio okazas nun?” li diris, kaj sin levis sur unu brako por observi la suprojn de la ŝtuparoj sur la meza parto de la stacio. Multaj blujaj figuroj venis el tiuj, kaj svarmis trans la stacio.

“Ni ne bezonas tiujn malsaĝulojn,” diris lia amiko. “Ili nur kolektiĝas kaj malebligas pafojn. Kion ili volas?”

“Ŝs!—ili krias ion.”

La duo aŭskultis. La novevenintoj nun amasiĝis dense ĉirkaŭ la maŝinon. Tri Ĉefoj de Kvartaloj, tre rimarkindaj pro siaj nigraj manteloj kaj insignoj, grimpis en la trunkon kaj aperis sur ĝi. La ordinaruloj sin ĵetis al la flugiloj, tenante la randojn, ĝis ili ĉirkaŭis la tutan konturon, kelkloke trioje. Unu el la pafistoj sin levis sur la genuojn. “Ili remetas ĝin sur la portilo—tion ili celas.”

Li stariĝis, kaj lia amiko ankaŭ. “Kiel tio valoras?” diris lia amiko. “Ni ne havas aeronauĵojn.”

“Tamen tion ili faras.” Li rigardis sian pafilon, tiam la baraktantan amason, kaj subite turniĝis al la vundita viro. “Gardu tiujn, kunulo,” li diris, donante la karabenton kaj municiaĵojn; kaj post momento li kuris al la monoplano. Dum kvaronhoro li tiris, ŝovis, kriis, kaj aŭdis kriojn, ĝis fine oni sukcesis, kaj li staris inter amaso da aliaj kiuj aklamas sian propran faron. Li nun sciis tion, kion efektive ĉiu en la urbo sciis, ke la Mastro, kvankam nur ĵus komencinta lernanto, intencas mem flugigi la maŝinon, ke li venas eĉ nun por direkti ĝin, kaj ne lasas, ke iu alia homo provu tion.

“Kiu frontas la plej grandan danĝeron, kiu portas la plej grandan ŝarĝon, tiu estas la Reĝo;” tiel, oni raportis, la Mastro parolis. Kaj eĉ dum la pafisto aklamis, kaj dum la ŝvitgutoj ankoraŭ sekvis unu la alian falante el la senordo de liaj haroj, li aŭdis la tondron de granda tumulto, kaj per maloftaj ondoj la takton kaj impulson de la ribela kanto. Li vidis, tra spaco inter la homoj, ke densa homfluo ankoraŭ venas supren el la ŝtuparo. “La Mastro venas!” oni kriis, “la Mastro venas!” kaj la amaso ĉirkaŭ li pli kaj pli densiĝis. Li komencis sin ŝovi al la meza parto. “La Mastro venas!” “La Dormanto, la Mastro!” “Dio kaj la Mastro!” muĝis la voĉoj.

Kaj subite, tute proksime de li, vidiĝis la nigraj uniformoj de la revolucia gvardio; kaj nun, la unuan kaj lastan fojon dum sia vivo, li vidis Grahamon, vidis lin apude. Li estis altkreska malhelulo, vestita en longa nigra robo, kun pala firma vizaĝo, kaj okuloj fikse rigardantaj antaŭen; viro, kiu ne havis orelon nek okulon nek penson por la etaj aferoj ĉirkaŭe. . . .

Dum sia tuta vivo tiu viro memoris la preterpason de la sensanga vizaĝo de Graham. Post momento ĝi estis for, kaj li baraktis en la svarmanta amaso. Knabo ploranta pro teruro faletis kontraŭ li, sin premante al la ŝtuparoj, kriante "Donu spacon por la ekflugo, vi malsaĝuloj!" La sonorilo, kiu ordonis, ke la publiko forlasu la startrelojn, donis laŭtan senmelodian sonoradon.

Sub la sono de tiu sonorado Graham alproksimiĝis al la monoplano, iris sub la ombron de ĝia klinitaflugilo. Li ekkonsciis, ke kelkaj homoj ĉirkaŭ li proponas akompani lin, sed li forĝestis iliajn proponojn. Li volis memori, kiel ekfunkciigi la motoron. La sonorilo pli kaj pli rapide sonis, kaj la piedoj de la foriranta popolo muĝis pli laŭte kaj pli rapide. La flave vestita viro helpis lin engrimpi tra la ripoj de la korpo. Li eniris la lokon por la aeronaŭto, tre zorge kaj pripense sin ligante. Kio okazas? La flave vestita viro montras du malgrandajn flugmaŝinojn, suprenirantajn en la suda ĉielo. Sendube ili serĉas la venontajn aeroplanojn. Tio—poste—sed nun, la afero estas ekflugigi la maŝinon. Oni kriis al li, demandis, avertis. Ili ĝenas lin. Li volas pensi pri la motoro, memori ĉian detalon el sia antaŭa sperto. Li gestis la homojn for de si, vidis la flavevestiton deiri tra la ripoj, vidis la amason apartiĝi laŭ la linio de la reloj pro lia gesto.

Momente li restis senmova, rigardante la tenilojn, la radon per kio oni movis la motoron, kaj ĉiujn delikatajn aparatojn, pri kiuj li tiel malmulte sciis. Lia rigardo trafis spiritusan nivelilon, kies bobelo restas flanke; li memoris ion, kaj pasigis dek sekundojn movante antaŭen la motoron ĝis la bobelo flotis meze de la tubeto. Li rimarkis, ke la popolo ne plu krias, ke oni rigardas liajn movojn. Kuglo frapis sur la stango super lia kapo. Kiu pafis ĝin? Ĉu la homoj estas ĉiuj for de la reloj? Li levis sin por vidi tion, kaj residiĝis.

Post plua sekundo la helico turniĝis, kaj li rapidis laŭlonge de la reloj. Li premis la direktilon kaj svingis la motoron malantaŭen por levi la antaŭon. Tiam la popolo akklamis. Post momento li tremetis pro la vibrado de la motoro, kaj la krioj rapide mallaŭtiĝis post li, forrapidis ĝis silento. La vento fajfis trans la randon de la ŝirmilo, kaj la mondo forfalas de li tre rapide.

Bat', bat', bat'—bat', bat', bat'; supren li flugis. Li ŝajnis esti libera de ĉiu ekscitiĝo, sin sentis trankvila kaj zorgema. Li ankoraŭ pli levis la antaŭon, malfermis valvon sur la maldekstra flugilo, kaj ŝvebis ĉirkaŭe kaj supren. Li rigardis malsupren, sen iu kapturiniĝo, kaj poste supren. Unu el la aeroplanoj de Ostrog transiris lian vojon, tiel ke li flugis oblikve al ĝi, kaj pasis sub ĝi je kruta kliniĝo. Ĝiaj aeronaŭtoj spionis malsupren al li. Kion ili intencas fari? Lia cerbo vigliĝis. Unu el ili, li vidis, celas per armilo, ŝajnas preta paŝi. Ĉu ili divenas, kion li intencas fari? Post momento li komprenis ilian taktikon, kaj faris sian decidon. Lia momenta inerteco forpasis. Li malfermis du pluajn valvojn maldekstre, turniĝis por fronti tiun malamikan maŝinon, fermis la valvojn, kaj flugis rekte al ili, dum la antaŭo kaj ventŝirmilo defendis lin kontraŭ iliaj kugloj. Ili kliniĝis flanken, kvazaŭ por eviti lin. Li levis la antaŭon.

Bat', bat', bat',—paŭz'—bat', bat'—li kunpremis la dentojn, lia vizaĝo senvole grimacis, kaj krak'! li frapis kontraŭ ilin! Li frapis supren sub la pli proksima flugilo.

Tre malrapide la flugilo de lia kontraŭulo ŝajnis larĝiĝi, dum la forto de lia frapo suprenŝovis ĝin. Li vidis ĝian tutan larĝon, kaj tiam ĝi glitis malsupren, for de lia vido.

Li sentis, ke lia antaŭo falas, liaj manoj premis la tenilojn, turnis, kaj tiregis posten la motoron. Li sentis ekskuon de liberiĝo, la antaŭo de lia maŝino turniĝis abrupte supren, kaj momente li ŝajnis kuŝi sur sia dorso. La maŝino ŝanceliĝis kaj svingiĝis, ĝi ŝajnis danci sur sia helico. Momente li penegis movi la tenilojn, kaj la motoro denove venis antaŭen, sed malrapide. Li ankoraŭ flugis supren, sed malpli krute. Li ekspiris, kaj denove tiregis la tenilojn. La vento fajfis ĉirkaŭ li. Plua provo, kaj li sin trovis preskaŭ horizontala. Li denove spiris. La unuan fojon li turnis la kapon por vidi, kio fariĝis liaj malamikoj. Li turniĝis ree al la teniloj, kaj tiam denove rigardis. Momente li preskaŭ kredis, ke ili neniĝis. Kaj tiam li vidis, ke inter du stacioj troviĝas abismo, kaj en tion io, gracila rando, falas rapide kaj malaperas, simile al monereto falanta en truon.

Unue li ne komprenis, sed poste sovaĝa ĝojo regis lin. Li kriis plenvoĉe, senvorte, kaj flugis pli kaj pli alten en la ĉielo. Bat', bat', bat', paуз', bat', bat', bat'. "Kie estas la alia?" li pensis. "Ili ankaŭ—" Rigardante ĉirkaŭ la malplena ĉielo, li sentis momentan timon, ke tiu dua maŝino jam sin levis super li; tiam, tamen, li vidis ĝin alteriĝi sur la stacio Norwood. Ili nur deziris pafi. La risko de kunfrapiĝo je alteco de sescent metroj superis ilian kuraĝon. . . .

Dum nelonge li flugis, tiam ŝvebis laŭ kruta malsupreniro al la okcidenta stacio. Bat', bat', bat', bat', bat', bat'. La krepusko kreskis, la fumo el la stacio Streatham, kiu antaŭe estis densa kaj malluma, nun estis fajrkolono, kaj ĉiuj plektitaj kurboj de la moviĝantaj vojoj kaj la diafanaj tegmentaj kupoloj kaj la abismoj inter la konstruaĵoj nun arde brilis, lumigitaj de la mildaj radioj de la elektra lumo, kiun la tagluma brilego antaŭe venkis. La tri uzeblaj stacioj, kiun ankoraŭ havis la Ostroganoj—ĉar Wimbledon Park estis neutila pro la pafado de Roehampton, kaj Streatham similis al fornego—brilis per lumoj por gvidi la venontajn aeroplanojn. Dum li flugis super la stacion Roehampton li vidis la malluman amason de la homoj sur ĝi. Li aŭdis furiozan aklamadon, aŭdis kuglon de la stacio Wimbledon Park zumi preter li, kaj denove flugis supren super la dezertaĵo de Surrey. Li sentis venteton el la sudokcidento, kaj levis sian okcidentan flugilon, kiel oni instruis al li, kaj tiel balanciĝante, supreniris en la maldensan superan aeron. Zum', zum', zum'.

Pli kaj pli supren, sub tiu pulsanta ritmo, ĝis la kamparo sube aspektis blua kaj nebula, kaj Londono etendiĝis kiel landkarto desegnita per lumo, kaj kiel modelo de urbo apud la horizonto. La sudokcidento estis ĉielo el safiro super la ombra rando de la tero, kaj ĉiam, dum li flugis supren, pliiĝis la amaso da steloj.

Kaj jen! Sude, malalte, kaj rapide radiante pli proksimen, aperis du makuloj el nebula lumo. Kaj poste plua du, kaj tiam tuta brilo el rapide flugantaj formoj. Baldaŭ li povis kalkuli ilin. Ili nombriĝis dudek kvar. La unua aro da aeroplanoj alvenas! Kaj post ili aperis eĉ pli granda brilo.

Li ĉirkaŭŝvebis laŭ duonrondo, rigardante tiun antaŭ-enirantan maŝinaron. Ĝi flugis laŭ kojnforma arango, triangula aro da gigantaj lumaj formoj ŝvebantaj pli proksimen tra la pli malsupera aero. Li rapide kalkulis ilian rapidon, kaj turnis la radon kiu antaŭenigis la motoron. Li tiris tenilon, kaj la pulsa penego de la motoroj ĉesis. Li komencis fali, falis pli kaj pli rapide. Li celis trafi la pinton de la kojno. Li falis kvazaŭ ŝtoneto tra la fajfanta aero. Ŝajnis apenaŭ sekundon post tiu ŝveba momento, antaŭ ol li frapis kontraŭ la unuan aeroplanon.

Neniu el tiu tuta nigra amaso vidis la alvenon de sia morto, neniu inter ili revis pri la rabobirdo, kiu ŝvebas malsupren sur ilin el la ĉielo. Tiuj, kiuj ne kuŝis malrigidaj pro la doloro de aermalsano, streĉis la kolojn kaj elrigardis, por vidi la nebulan urbegon, kiu leviĝas el la krepusko, la riĉan belegan urbon al kiu la Ĉefo venigas iliajn obeemajn muskolojn. Brilis la dentoj kaj vizaĝoj poluritaj. Ili jam aŭdis pri Parizo. Ili sciis, ke ili spertos multe da ĝuado inter la "kompatinda blankula rubo."

Subite Graham trafis ilin.

Unue li celis trafi la korpon de la aeroplano, sed je la lasta momento pli bona plano eniris lian cerbon. Li tordis la maŝinon flanken kaj frapis per ĝia tuta pezo apud la rando de la dekstraflugilo. La kunfrapo ĵetis lian maŝinon posten. Lia antaŭo glitis trans la glata surfaco ĝis la rando. Li sentis la rapidecon de la giganta afero porti lin kaj lian monoplanon, kaj dum momento, kiu ŝajnis epoko, ne povis konstati, kio okazas. Li aŭdis mil gorgojn krei, kaj vidis, ke lia maŝino restas sur la rando de la gigantaflugilo, kaj portiĝas malsupren kun ĝi; li ekrigardis transian ŝultron kaj vidis la mezon de la aeroplano kaj la kontraŭanflugilon ŝanceliĝi supren. Tra la ripoj li kaptis bildon de glitantaj seĝoj, grandokulaj vizaĝoj, kaj manoj, kiuj premegas la kliniĝantajn stangojn. La malfermaĵoj en la duaflugilo malfermiĝis, kiam la aeronaŭto penis ekvilibrigi ŝin. Malantaŭ tio li vidis duan aeroplanon, kiu saltis krute supren por eviti la kirlon de sia ŝanceliĝanta kunulo. La larĝa spaco da svingiĝantajflugiloj ŝajnis ĵetiĝi supren. Li sentis, ke li ĵus liberiĝis, ke la monstraĵo, tute renversita, pendas kvazaŭ kliniĝanta muro super li.

Li ne klare komprenis, ke li frapis sur la flankon de laflugilo kaj poste glitis for, sed li rimarkis, ke li nun libere flugas malsupren kaj rapide alproksimiĝas al la tero. Kion li ĵus faris? Lia koro pulsas kvazaŭ brua motoro en lia gorĝo, kaj dum danĝera momento li ne kapablis movi la tenilojn pro la paraliziĝo de siaj manoj. Li tiregis la aparaton por ŝovi la motoron malantaŭen, baraktis du sekundojn kontraŭ ties pezo, sentis sin reekvilibrigi, flugis horizontale, kaj fine refunkciigis la motoron.

Li rigardis supren, kaj vidis du aeroplanojn gliti kun kriegoj malproksime supre, rigardis posten, kaj vidis la ĉefan parton de la aro apartiĝi kaj ŝvebi supren kaj flanken; vidis tiun, kiun li mem trafis, fali kun rando antaŭe, kaj tranĉi kvazaŭ giganta klingo sur la ventmaŝinojn sube.

Li depremis sian malantaŭon kaj denove rigardis. Li flugis supren, ne zorgante pri sia direkto dum li rigardis. Li vidis la radojn de la ventmaŝinoj cedi, vidis la grandegan maŝinon frapiĝi kontraŭ la tero, vidis ĝiajn malsuprenigilojn kolapsi pro la pezo de ĝia falo, kaj tiam la tuta maso renversiĝis kaj frakasiĝis, kun la subo supre, sur la kliniĝantaj radojn. Poste el la ondanta rompaĵo maldika pinto el blanka fajro flagretis supren al la zenito. Li konsciigis pri grandega maso fluganta tra la aero al li, kaj turniĝis supren nur ĝustatempe por eviti la atakon—se efektive ĝi estis atako—de dua aeroplano. Tio preterrapidis sube, ĝia blovo tiris lin suben kelkajn metrojn, kaj la vento de ĝia proksima preterpaso preskaŭ renvertis lin.

Li konsciis pri tri aliaj rapidantaj al li, konsciis pri la urĝa bezono iri super ilin. Ŝajnis, ke aeroplanoj tute ĉirkaŭas lin, freneze rondirantaj por eviti lin. Ili flugis preter li, supre kaj sube, oriente kaj okcidente. Malproksime okcidente aŭdiĝis la sono de kolizio, kaj du flagraĵoj falis. Malproksime sude dua aro alproksimiĝis. Regule li flugis supren. Baldaŭ ĉiuj aeroplanoj estis sub li, sed momente li dubis, ĉu li sufiĉe alte flugas, kaj ne atakis ilin. Tiam li venis al dua viktimo, kaj ĝia ŝarĝo de soldatoj vidis lin alproksimiĝi. La granda maŝino svingiĝis kaj ŝanceliĝis flanken, dum la panikaj homoj rampegis malantaŭen por siaj pafiloj. Dudeko da kugloj zumis tra la aero, kaj stelkonturo aperis en la dika vitra ŝirmilo, kiu

defendis lin. La aeroplano malpli rapidis, kaj iris malsupren por eviti la kunfrapon, sed ŝvebis tro malalten. Nur ĝustatempe li rimarkis la ventmaŝinojn sur la monteto Bromley veni por renkonti lin, kaj turniĝis kaj iris supren, dum la aeroplano kiun li persekutis frakasiĝis inter ili. Ĉiuj ĝiaj voĉoj plektiĝis en teksaĵo el krioj. La granda afero ŝajnis momente stari sur la antaŭo inter la rompitaĵoj kaj frakasitaĵoj, kaj tiam dispeciĝis. Grandegaj splitoj flugis tra la aero, ĝiaj motoroj eksplodis kiel bomboj. Varmega ondo el flamo flagris supren en la malluman ĉielon.

"*Du!*" li kriis, dum bombo de super li eksplodis falante, kaj tuj li komencis reiri supren. Glora ekscitiĝo nun posedis lin, giganta agemeco. Liaj duboj pri homa forto, pri sia propra lerteco, nun por ĉiam malaperis. Li estis batalanta homo, kiu ĝojas pri sia povo. Aeroplanoj ŝajnis radii for de li ĉiudirekten; ili nur celis eviti lin, kaj la krioj de iliaj kunpremitaj pasaĝeroj aŭdiĝis per mallongaj blovoj, dum ili preterapidis. Li elektis trian viktimon, frapis tro haste, kaj nur ŝovis ĝian randon supren. Ĝi evitis lin, sed frakasiĝis kontraŭ la alta klifo de la Londona muro. Ĵetite de tiu kunfrapo, li pasis tiel proksima al la malluma tero, ke li povis vidi timigitan kuniklon kuri sur deklivo. Li leviĝis krute, kaj sin trovis super suda Londono kun nur vaka aero ĉirkaŭe. Dekstre de li freneza aro da signalraketoj de la Ostroganoj krakis tumulte en la ĉielo. Sude la rompajo de kelkaj flugŝipoj flamis, kaj norden, orienten kaj okcidenten ili forflugis antaŭ li. Ili flugis orienten kaj norden kaj turniĝis je la sudo, ĉar ili ne povis halti en la aero. Pro ilia nuna konfuziĝo iu provo je manovroj certe kaŭzus terurajn koliziojn.

Li pasis sesdek metrojn super la stacio Roehampton. Ĝi aspektis nigra pro homoj kaj bruis pro iliaj frenezaj krioj. Sed kial la stacio Wimbledon Park ankaŭ estas nigra kaj akklamanta? La fumo el Streatham nun kaŝis la tri malproksimajn staciojn. Li turniĝis kaj leviĝis por vidi ilin kaj la nordon. Unue, post la fumo, vidiĝis la kvadrata maso de Shooter's Hill, luma kaj orda, kun la aeroplano kiu jam alteriĝis kaj ĝiaj deirantaj negroj. Tiam li vidis Blackheath-on, kaj fine, sub angulo de la nuboj, la stacion Norwood. Sur Blackheath neniu aeroplano ĝis nun alteriĝis. Norwood estis kovrata de svarmo da

figuretoj kurantaj tien kaj reen en pasia konfuziĝo. Kial? Abrupte li komprenis. La obstina defendiĝo de la flugstacioj estas finita, la popolo fluas en la subaĵojn de tiuj lastaj fortikaĵoj de la reĝimo de Ostrog. Kaj tiam, malproksime je la norda limo de la urbo, plena por li de glora signifo, aŭdiĝis sono, signalo, triumfaĵo, la plumbe obtuza sono de kanono. Liaj lipoj apartiĝis, lia vizaĝo ardis pro emocio.

Li enspiregis. "Ili venkas," li kriis al la malplena aero; "la popolo venkas!" Responde venis la sono de dua kanono. Kaj tiam li vidis, ke la monoplane sur Blackheath rapidas sur siaj reloj por ekflugi. Ĝi leviĝis, rapidis supren en la aero, flugis rekte suden kaj for de li.

Tuj li komprenis, kion tiu flugo signifas. Nepre ĝi estas Ostrog, kiu forflugas. Li kriis, kaj flugis malsupren post ĝi. Li utilis la forton de sia alteco kaj falis krute kaj tre rapide tra la aero. La monoplane leviĝis, kiam li alproksimiĝis ĝin. Li kalkulis ĝian rapidon kaj penis flugi rekte al ĝi.

Subite ĝi fariĝis nur plata rando, kaj jen! li jam preterpasis ĝin, kaj falis senpove malsupren pro la forto de sia malutila frapo.

Li koleriĝis furioze. Li tiregis la motoron malantaŭen kaj rondiris supren. Li vidis la maŝinon de Ostrog iri laŭ spiralo antaŭ li. Li leviĝis rekte al ĝi, iris super ĝi pro la pezo de sia ŝvebo kaj la avantaĝo, ke lia maŝino enhavas nur unu homon. Li falis senzorge—falas, kaj denove maltrafis ilin! Dum li preterrapidis, li vidis la vizaĝon de la aeronaŭto trankvila kaj certa, kaj la sintenon de Ostrog plena de timema obstineco. Ostrog rigardis fikse for de li—suden. Li komprenis, kun kolera sento, kiel fuŝa estas lia direktado de la maŝino. Sube li vidis la montetojn ĉe Croydon. Unu fojon ankoraŭ li flugis supren kaj atakis sian malamikon.

Li ekrigardis trans sian ŝultron, kaj lia atento kaptiĝis. La orienta stacio, tiu de Shooter's Hill, ŝajnis leviĝi; ekbrilo, ŝanĝiĝanta al alta griza formo, kapuĉo-kovrita figuro el fumo kaj polvo, ĵetiĝis en la aero. Momente tiu kovrita figuro staris senmova, faligante grandajn metalajn amasojn de siaj ŝultroj, kaj tiam komencis malvolvi densan kapon el fumo. La popolo eksplodigis la stacion,

kune kun la aeroplano ! Egale subite dua ekbrilego kaj griza figuro saltis supren de la stacio Norwood. Kaj, eĉ dum li rigardis tion, li aŭdis obtuzan baton ; kaj la aera ondo de la unua eksplodo frapis lin. Ĝi jetis lin supren kaj flanken.

Momente lia monoplano falis, preskaŭ kun rando antaŭe kaj antaŭo malsupre, kaj ŝajnis heziti ĉu aŭ ne tute renversiĝi. Li staris sur la ventŝirmilo, tiregante la radon kiu balanciĝis super lia kapo. Kaj tiam la ŝoko de la dua eksplodo frapis la maŝinon de unu flanko.

Li trovis sin tenanta unu el la ripoj de la maŝino, kaj la aero blovas preter li kaj supren. Li ŝajnis pendi tute senmova en la aero, dum la vento blovas supren preter li. Li komprenis, ke li falas. Tiam li sentis sin certa, ke li falas. Li ne kuraĝis rigardi malsupren.


Li sin trovis rememoranta nekredible rapide ĉion, kio okazis post lia vekigo—la tagojn de dubo, la tagojn de reĝado, kaj fine sian tumultan malkaŝon de la kalkulita perfido de Ostrog.

La bildo havis tute nerealan econ. Kiu li mem estas ? Kial li tiel preme tenas per la manoj ? Kial li ne povas malteni ? Per tia falo, kia tiu, sennombraj sonĝoj antaŭe, finiĝis. Post momento, eble, li vekigos.

Liaj pensoj pli kaj pli rapide kuris. Li scivolis, ĉu li iam revidos Helenon. Ŝajnis tute neracie, ke li neniam revidos ŝin. Tio nepre estas sonĝo ! Denove certe li renkontos ŝin. Almenaŭ ŝi estas reala. Ŝi estas reala. Li vekigos kaj revidos ŝin.

Kvankam li ne povis rigardi ĝin, li subite konsciiĝis, ke la tero estas tre proksima.

FINO.



DO
V

H.